

Danko Popoviĉo
(Данко Поповић)

LIBRO PRI MILUTENO



Serbia Esperanto-Ligo
Удружење есперантиста Србије



Удружење научних и стручних преводилаца Србије
Reprezentativno udruženje u kulturi

Danko Popovi o
(Danke Popovi h)

LIBRO PRI MILUTENO

SERIO de serba literaturo

Tradukis

Jovano Zarkoviĉo
Ĵivanko Novakovo

Provlegis

Gabányi Zoltán

Наслов ориџинала

КЊИГА О МИЛУТИНУ

Издавач

Удружење научних и стручних преводаца Србије

За издавача

Драгић Вукићевић

Уредник

др Милош Д. Ђурић

Дизајн и ѿрелом

ЈП „Службени гласник“

Тираж

50

ISBN

978-86-917873-5-6

Година издања

2024

Danko Popovi o
(Данко Поповић)

LIBRO PRI
MILUTENO

Beogrado, 2024

ANTAŬPAROLO

Romano „Libro pri Miluteno“ estas proza rakonto pri tragika vivovojo de Miluteno, la serba kamparano kiu trifoje militis por sia patrolando, ricevis nombrajn distingojn pro la kuraĝa sinteno dum bataloj, sed postmilite, li spertis la ŝtatan maljuston, malestimojn, humiligojn kaj eĉ finis sian vivon en malliberejo akuzita kiel „la ŝtata malamiko“.

Antaŭ ol transiri al pure literatura analizo de la romano, ni menicu, nur mallonge, la historion kiu sekvis la aperon de ĉi tiu romano.

La verksito pere de sia ĉefheroo Miluteno alfrontis legantojn kun historie kaj politike tikla demando: dum la Dua mondmilito en Serbio krom la kontraŭgermana batalo, ankaŭ batalis serboj kontraŭ serboj, nome serboj monarkistoj („ĉetnikoj“) kontraŭ komunistoj (partizanoj), do ĉu ne temis pri ideologiaj anstataŭ liberigaj bataloj? Alia tikla temo por neserbaj popoloj en postmilita socialisma Jugoslavio estis ofta ripetiĝo ke serboj plejparte verŝis la sangan por la fondiĝo de nova, pli larĝa sed plurnacia kaj plurkultura ŝtato nomita Reĝlando de Serboj, Kroatoj kaj Slovenoj (Jugoslavio) en la jaro 1918, sed tiel la serboj perdis sian antaŭan ŝtaton Reĝlandon de Serbio, perdis do sian identecon kaj fakte „subskribis al si mem – la mortkondamnon“.

Tiu delikata historia temo, havis grandajn implikojn kiam la romano aperis fine de la okdekaj jaroj de la dudeka jarcento, nome, nur kelkaj jaroj antaŭ la tragika milito kaj disfalo de Jugoslavio. Jugoslavio estis plurnacia kaj plur-religia lando kaj eĉ literature paroli pri nur unu nacio (ĉi tie pri la serba) kiel ekskluzive „eterna historia viktimo“ estis tikla kaj maltaŭga afero precipe en la stato de jam ekzistanta krizo inter la nacioj en socialisma Jugoslavio kaj en la situacio de same ekzistanta potenciala konflikto inter ili, kiu – iom pli poste – iĝis reala kaj transformiĝis je sangoplena milito. De tiamaj alinaciaj (do neserbaj) jugoslavijaj autoritatuloj la romano estis akuzita kiel „ekzemplo de la grandserba naciismo“, kaj la romanon multaj opiniis uverturo por la interpopola milito en Jugoslavio.

Nun, tridek jarojn poste, kiam Serbio refariĝis memstara, sendependa lando, la legado de la romano akiris tute alian ŝlosilon. Liberigitaj de ajna timo „ruinigi la rilatojn inter diversaj nacioj en multnacia Jugoslavio“, la

kritikistoj kaj legantoj nun pli klare vidas kaj konstatas ne nur la serbajn vekriojn sed ankaŭ la akrajn memkritikojn kaj kontraŭmilitajn aitutdojn elbuŝitaj de Miluteno, la romana ĉefheroo. (Ekzemple: „Oni diras ke ni serboj ne rajtas perdi la militon. Ho, kia stultaĵo! Oni ne rajtas perdi la militon sed rajtas perdi siajn plej valorajn junulojn!“).

Post tiu ĉi klarigo de la situacio en Jugoslavio ŝarĝita per tro akraj etnaj problemoj en la tempo kiam aperis la romano, ni transiru al la pure literaturaj pritaksoj.

En la romano kruciĝas du strukturaj kaj temaj linioj: la unua estas formado de la ĉefa literatura heroo Miluteno, simpla serba kamparano; la dua signas kaj klarigas la ŝlosilajn politikajn kaj sociajn problemojn de la serba ŝtormoplena historio dum la tuta 20-a jarcento.

La elementa formo de la romano estas monologo de Miluteno (kun nurŝajna dialogo kun lia kunulo en malliberejo), en kiu kuniĝas kaj per kiu formiĝas subjektiva kaj objektiva problemaro; nome, dum Miluteno parolas pri si kaj pri sia vivo, li pentras la kompletan socian kaj politikan bildojn de la serbpopola moderna historio. Samtempe per tiuj ĉi bildoj pri la objektiva stato de la serba popolo, Miluteno ankaŭ formas la bildon pri si mem.

La dua tema linio malfermante gravajn politikajn kaj sociajn problemojn, same malfermas la procezon de revalorigo de la tuta seba historia konduto dum la lastaj du jarcentoj aparte akcentante la dudekan. Nome, demandas sin Miluteno, ĉu estis vere necese idealisme kaj senhezite eniradi en ĉiujn historiajn konfliktojn kaj militojn ĝis preskaŭ biologia malapero dela tuta nacio, aŭ oni devis tiujn romantismon kaj idealismon kune kun patriotismo racie bremsi, pli racie pripensadi la aferojn, per reala pritakso de la propraj eblecoj, kaj pere de pli saĝaj politiko kaj diplomatio, atingi la dezirindajn celojn kaj eviti la grandegajn homajn viktimojn. Kiam oni starigas la naciajn celojn, ĉiam devas esti substrekata la diferenco de tio kio estas vera, reala kaj atingebla historia celo de la serba popolo, kaj de tio kio estas la nacia megalomanio.

La romano estas unuavice kontraŭmilita prozo. Ekde la komenco, en la romano oni renkontas la ideon kiu sensencigas la militojn. La brutalaj malamikaj militkrimoj – diras al leganto la spirito de la romano – ne produktas la revenĝon kaj la samajn krimojn, sed nur pravigas la ideon ke militoj estas nenecesaj kaj profunde kontraŭhomaj kaj absurdaj. Tiel en la romano videblas ekvilibro inter la milito kiel absurdo, unuflanke, kaj aliflanke, kiel perspektivo de certaj historiaj celoj kaj interesoj. Tiamaniere estas formita siaspeca antitezo: homeco, humaneco kaj homa ekzisto kontraŭ militoj, militkrimoj kaj detruoj ĉio ĉi en la nomo de „altaj“ celoj kaj „vitalaj naciaj interesoj“.

La rakonto, intrigo de la romano, konstante „fluas“ en siaspeca antagonismo: unuflanke ŝtato, nacio, granda politiko, grandaj celoj, kaj aliflanke, malgrandaj kaj simplaj vivintereso de malgranda simpla homo, kamparano, kiu nur deziras kultivi sian kampon kaj kun sia familio vivi pace kaj sekure. La homa ekzisto kaj normalaj kaj simplaj homaj deziroj reproduktiĝas per multnombraj implikoj kaj elementoj de universala homeco. Miluteno, la serba kamparano, simpla kaj needukita sed tamen saĝa kaj racia homo, al diversaj danĝeraj historiaj cirkonstancoj kaj provokoj, respondas per humaneca skeptikeco, per filozofio de relativeco kaj per siaspeca stoikismo („la afero estas tia, kion do fari“).

La vivtragedio de Miluteno metafore bildigas tragedion de la serba popolo. La tragedion kaŭzis ne nur „la eksteraj faktoroj“, sed plejparte la serba politika elito kiu dum du lastaj jarcentoj (la 19-a kaj 20-a) ne scipovis trovi la adekvatan lokon en la mondaj geopolitikaj cirkonstancoj. Kaj interese: tion klare vidis kaj komprenis simpla kaj needukita, tamen inteligenta serba kamparano. La prezo ja estis alta, ĝin dolorige sentis Miluteno.

Zlatoje Martinov

DANKO POPOVIĆO

LIBRO PRI MILUTENO

FACILE JA ESTAS MORTIGI PRINCON KAJ VIRINON

Nevĉjo mia, antaŭe mi ne estis ĉi tiel parolema. Ĉi tie la parolado al mi iĝis plezuriga, ĉi tie, en ĉi tiu malliberejo. Antaŭe konstantis laboroj, zorgoj, mi havis ne eĉ unu liberan momenton, mi ne memoris eĉ tion, kio okazis hieraŭ, sed nun mi vidas mian tutan vivon, klare kaj senbare. Mi memoras ĉion! ...

Mi memoras, kvazaŭ tio okazus hieraŭ – sonoriloj sonis de ĉiuj flankoj, la homoj, memkompreneble, sciis, ke tiel oni ne vokas al preĝoj kaj pentofaroj – tiel oni vokas al milito.

Mi eliris antaŭ stalon, sidiĝis sur grensitelon, ĝuante matenan agrablon. Oni ja devas ripozi, oni elĉerpiĝas pro fosado, falĉado kaj aliaj laboroj – oni sturme laboras – sed jen nun oni sturme sonoras.

Ĉu vi aŭdas ĉi tion, Miluteno? – la patrino alpaŝis min. Ŝi tordis la manojn, kaptis sian lanjakon, ĉifis ĝin. Mi sciis kiel ŝi fartas kiam ŝi aŭdas sonoradon, du ŝiaj filoj, du miaj fratoj, pereis dum la pasintaj militoj, dum la kontraŭturka kaj kontraŭbulgara, ankaŭ la patro – ŝia viro – li pereis en Bulgarujo, ĉe Slivnico.

Mi aŭdis, ho – diris mi – mi ne surdas ja.

Kion do vi atendas, ĉu vi ne vidas, ke la homoj iras al la lernejo.

Mi leviĝis, donis al ŝi la grensitelon, kaj tuj eliris sur la strateton. Ŝi, mia patrino, staris kun la grensitelo en la manoj antaŭ la stalo. He, tiun bildon mi memorfiksas. Mia patrino, kun la grensitelo en la manoj, staras antaŭ la stalo, kaj rigardas post min, dum bovoj komencas bleki, ĉu pro la sonorado, ĉu ĉar brutaro ion antaŭsentas – mi ne scias. Mi nur scias, ke mi sentis korpregon.

Korpregon, jes, nevĉjo mia – ĉar ĉiu milito forprenas paron da virbovoj el mia stalo. Tio ja ne estas malgravaĵo. La virbovoj estas gravaĵo, ĉiuj ja scias kiom por la kampulo gravaj estas la virbovoj. Kampulo kreskigas virbovojn, jungumas ilin, sed poste la ŝtato forprenas ilin, ĉar la virbovoj devas treni kanonojn, treni provizĉarojn, nutraĵojn... Nu, virbovoj ja devas ankaŭ plugi, veturigi grenon, kaj fojn, kaj lignon, virbovojn oni devas ankaŭ vendi, por ricevi iom da mono, kaj ne ĉi perdi ilin tiel... vane-senutile. Mi ripetas, ankaŭ pro la virbovoj mi sentis korpregon, ĉi tio estas

jam la tria paro da virbovoj el mia stalo, dum tri jaroj, jes, la virbovojn oni mobilizis antaŭ unu monato, ho kiel miaj bovoj estis brilimpresaj. Tamen, kion fari!...

Foriris mi al la lernejo, kaj tie – kion diri. La lernejon plenŝtopis plenaĝuloj, ili ariĝis, memkompreneble, por ke la instruisto diru al ni, kio nun okazas, kial ni denove devas militi.

Kial vi ne malfermis la pordon, vi sufokiĝos – diris mi. Ekvarmetis la suno, estas somera tago, opankoj fiodoris, kaj fetoris ŝvito; haladzis stalo kaj gregejo. La instruisto tenis bastoneton kaj montris Sarajevon sur karto. Li evidente ĝojzis. Kaj glorigas Junbosnujanojn. Ili faris, kion ili devis fari, ili ĉieleniris kiel martiroj. Ili ĵetis bombojn, diris li, ili mortigis ŝvaban princon kaj lian edzinon.

Vasilio sidis kaj rigardis min oblikve, kvazaŭ dirante: ĉu vi aŭdas la galimation de la instruĉjo.

Facile ja estas mortigi princon kaj virinon, tamen, militon oni ne gajnas mortigante princojn kaj virinojn – rezonas mi.

Min interesis kio nun okazos – ĉu la aliaj bosnujanoj deziras sekvi tiujn junajn bosnujanojn, ĉu ili rezistos kaj ribelos? Nin ne interesas ilia ĉieleniro, ni ĉiam havis abundon da martiroj.

Ni, ho, ni helpon bezonas. Ĉu ili, kune kun ni, batalos kontraŭ la ŝvaboj? – Mi tuj kapneis. Io estis tre suspektinda.

Al mi ne plaĉas, ke tiuj bosnujanoj sencele bravumas, ke ili mortigas princojn kaj virinojn, ĉar poste ili siajn pugnojn formovos, kaj ni, la kampuloj, ni devos pro tio pagi. Ĉu ne estas tiel? Kvankam ni estas serboj, kampuloj, ni ne estas brutoj, al ni ne plaĉas, kiam oni opinias, ke en nia kapo mankas klapo.

Ne rapidu, instruĉjo, ne rapidu, ne stultigu nin, ni ne estas infanoj – diris Paŭlo, kaj okulsignis al mi.

Sed la instruisto ripetis insiste. Tie, diris li, en Bosnujo, kaj en aliaj regionoj, kie vivas niaj fratoj, sudaj slavoj, la ribelo estas eksplodonta.

Ili aŭdu vin, instruĉjo – mi eliris ĉar, kvankam mi ne kredis je slavoj, mi ne volis en ĉeesto de la homoj kvereli kun la instruisto.

Mi iris hejmen, senĉese pensante pri tiuj slavoj. Ĉu vere estos tiel, kiel diris la instruisto. Sensence ja estas, ke oni militigu nin pro ies kaprico. Oni enŝovas nin en tion, kion ni ne komprenas. Neimageble. Ankaŭ antaŭe mi auskultis oratorojn de multaj tiaj lernejoj. Ili venas somere ferii, kaj komencas diradi pri liberigo de ĉiuj regionoj kie vivas niaj fratoj – jen, niaj fratoj, sed miaj fratoj jam pereis pro por iaj „niaj fratoj“. Mi ripetas, ili komencis diradi antaŭ la vilaĝdomo, antaŭ la lernejo aŭ antaŭ la preĝejo, ĉie kie volis, kvazaŭ iu tiel facile donos al ili tion, kion ili deziras. Mi memoras, dum la tago de Ĉieliro de Dipatrino, antaŭ la vilaĝdomo komencis oratori Veliboro Roviĉo. Altega, li grimpis sur ŝtonon, kaj babile babilis. Ni liberigis, diris li, Makedonujon. Kaj

Malnovan Serbujon, ni venkis ĉe Kumanovo kaj ĉe Bregalnico, nun ni turniĝos al niaj fratoj en Bosnujo, Hercegovino kaj en Dalmatujoj.

Tiel oratoris Veliboro, sed ĉu sufuĉos, ke ni turniĝu, por ke tuj realiĝu ĉio, kion li intencis.

Bone, Veliboro, sed kiom tio kostos? – aŭdiĝis Ĉedolubo Petroviĉo – tiutempe li ankoraŭ estis viva. Ĉu pro tiu umo niaj grenejoj estos pli plenaj, ĉu ni havos pli da bovoj kaj porkoj? Ĉu niaj samhejmanoj post tio estos pli multenombraj kaj pli gajaj?

Ĉedolubo estas maljuna, sed li scipovis pensi. Kian utilon al ni alportis la la ĝisnunaj militadoj? – demandis li.

Ho, ne temas pri viaj grenejoj kaj korboj, pri staloj kaj brutejoj, temas pri nia unuigo – impertinentis Veliboro, impertinentis, kvankam li estas febla, longa kiel stango. Kaj malsana. Ftizo lin jam preskaŭ tute formanĝis, sed jen, ĝuste li deziris determini la sorton de niaj lando kaj popolo.

Mi ripetas, la instruĉjo ne estis la unua kiu tiel parolis al ni. Ne estis la unua! Ni ankaŭ antaŭe nemalmulte aŭskultis pri tio.

Nu, bone, mi daŭrigu.

Mi foriris hejmen, sed mi ne sentis faciliĝon. Turmentis min dubo, deprimiĝo. Tio estas rideginda, mi estas kampulo, sed min turmentis dubo pri iuj slavoj, pri iuj ribeloj. Pri milito ja temas, pri niaj vivoj ja temas, pri niaj kapoj ja temas.

Mi pasumis tra kelo, drinkis – tion mi ne kaŝas. Mi blasfemis, kial mi ne blasfemu? Mi blasfemis kaj la reĝon, kaj la registaron. Kaj Gavrilon Principon.

Ne peku, Miluteno – mia patrino Gvozdenia iris malantaŭ mi, farante la signon de kruco, verŝajne ŝi opiniis, ke ankaŭ tiu Gavrililo estas grandmartirulo kaj sanktulo.

Pretigu mian blankan sakon – diris mi al la edzino – du linajn kalsonojn, du ŝtrumpoparojn, same kiel ĉiufoje, kiam mi iras militi. Mi kompatis mian edzinon – ankaŭ niaj problemoj ne estas solvitaj. Ŝi estis malsana. Infanoj ŝiaj ne vivas. Tri infanojn ŝi naskis, sed eĉ ne unu restis viva.

Mia patrino, laŭ nia moro, bakis virkokon, samkiel kiam mi iras al edziĝfestoj, kvankam antaŭ tio mi tri tagojn dum falĉado manĝis nur vinagron kaj ajlofoliojn – nu, negrave, tia estas la moro, la serboj devas sate manĝi, kiam ili pretiĝas militi kaj morti.

Mi vestis novan pantalonon, drapan, malgraŭvole. Tio estas mia lasta pantalone – la aliajn du pantalonojn mi ĉifonigis dum la antaŭaj militoj. Lanveston mi ne surmetos, ĝi estas nova, la nura kiun mi havas – ĝi estas nur por diservo, ne por portado, kial mi ĝin taŭzu en tranĉeoj? Mia edzino estas kiel ĉiuj edzinoj, ŝi ne bedaŭras ĝin, ŝi diras: Miluteno, povas okazi, dio ne permesu tion, ke vi pereos, ĉiuj sciu, ke vi estis bonhava homo.

Ĝuste pro tio mi ne deziras vesti ĝin, ĉar mi povas pereji, diris mi al la edzino. Mi mense jam kalkulis, se mi pereos, iu vilaĝano povos ricevi la lanan veston por anstataŭ ŝi plenumi falĉlaborojn, faskigi grenon – tamen, estas vane al ŝi paroli tion, ŝi jam decidis, kaj ŝi ne ŝanĝos sian decidon. Ŝi vestis min, kiel se mi estos fotita por popola kantlibro – ĉion la plej novan kaj la plej belan ŝi surmiigis.

Ne troigu, edzino – diris mi al ŝi – nur du kalsonojn kaj du lanajn ŝtrumpojn metu en la sakon, por militanta viro tio sufiĉas. Se mi ne havos bonŝancon, eĉ leda pantalono ne helpos min.

Nevĉjo mia, eble vi havos problemojn, ĉar vi interparolas kun mi, vi ja scias en kia epoko ni vivas. Nu bone, bone, se estas tiel, kiel vi diras, ni parolu plue...

Mi adiaŭis la patrinon kaj edzinon per manpremo. Tra strateto mi direktiĝis en la vilaĝon.

Ĉiuflanke resonis kriaĉado. Ĉu eblas, ke tiel rapide ebriiĝis tiom da homoj? Kial ili kantas kaj timigas kolombojn, kial ili heroumas nun, tro frue ja estas por tio?

La drinkejo de Uroŝeviĉo estas plenplena. Ĉiuj drinkas sensive. Uroŝeviĉoj pagas ĉion. Uroŝeviĉoj drinkas kaj plej laŭte kantas, ili ankaŭ plej multe insultas kaj kante minacas al la ŝvaboj – tio al ili ne estas malfacile, ili deĉiam scias kaj kantas pli ol ĉiuj aliaj, ili mem multajn kantojn faris; ili jam kantis pri Apiso, kaj pri aliaj, ankaŭ pri Gavriilo Principo – ili kantos, sed pereos aliaj.

Ek, Miluteno, ni drinku kaj kantu, – Pero Uroŝeviĉo prenis glason, kaj venŝis por mi brandon – venis tempo defendi la landon.

Vi, Uroŝeviĉoj, iru militi kune kun mi. Mi partoprenas jam tri militojn, sed vi, Pero, kaj via frato Jefto, vi partoprenis eĉ ne unu – diris mi. Ankaŭ li tion bone scias, sed Uroŝeviĉoj neniam volis blankan sakon surŝultrigi. Du monatojn ili kun armiloj paradas, ornamitaj per insignoj de makedonaj gerilanoj, sed ili ne volas iri tien, kie la kalsonojn oni sangigas, ili preferas per kantado kaj kriaĉado montri al la aŭtoritatoj ke ili amas la reĝon kaj Serbujon. Ili estis tiaj ankaŭ dum la antaŭaj militoj. Iliaj filoj ankaŭ nun troviĝas en komandejoj, en malfronto, kaj nun ili infanojn de aliaj vilaĝanoj drinkigas, ke ili ebriaj kriaĉu, kankam ili devus plori.

EBLE NI FARIS TROSEVERE JUĜIS LA TURKOJN

En mia taĉmento estis ankaŭ studento Mladeno Jeriniĉo, filo de la plej bona bienmastro en nia regiono, de Marko Jeriniĉo. Venis Mladeno el Vieno, memvole, dezirante, ke ankaŭ li defendu Serbujon. Dankon al li! Oni ja devas defendi Serbujon.

Sed kio fine okazos kun ni? Tion mi demandas al Mladeno, kaj li, la karulo, min tiam ĉirkaŭbrakis. Mi ĵuras per miaj okuloj, li estas lerneĵano, en Vieno li vizitadis lernejon, tamen li ĉirkaŭbrakis Milutenon. Al mi estis agrable, mi ne kaŝas tion, al mi agrable estis, ĉar ĉirkaŭbrakis min studento, min, simplan kampulon. Kaj parolas. Li estis plena da kredo kaj ĉarmo. Serbujo, diris li, organizis la plej grandan mobilizadon, kiun iam ajn iu ajn lando organizis en sia historio. Li parolis tiel, ripetadis la samajn frazojn, dum mi lin rigardis, preskaŭ komplete. Al mi ne ŝajnis, ke li kapablas soldati. Magra li estis, malgrasa; li estis ia tia, sed korpulenta certe ne.

Vi, Miluteno – diris al mi Mladeno – malzorgu. Gavriilo Principo per sia pafo en Sarajevo malfermis la pordon de nova historio. En Sarajevo ne pereis nur unu princo kaj unu virino, diris li, tie mortis Aŭstrujo; vi vidos, ekribelos la ĉeĥoj kaj slovakoj, ekribelos ankaŭ niaj fratoj slovenoj kaj kroatoj, slavonoj kaj dalmatoj kaj Bosnujanoj. Kiam ĉiuj ribelos, Aŭstrujo forpasos.

Bone, Mladeno – diris mi – estos bone, se ribelos ankaŭ slovenoj, kaj slavonoj, kaj dalmatoj, kaj Bosnujanoj. Estos bone, se pri tio oni jam interkonsentis.

Mladeno aldonis: Aŭstrujo, diris li, Miluteno kara, por ili estas tio, kio por ni estis Turkujo, ili devas detrui ĝin, tion ili devas fari...

Mi komprenis, ke ankaŭ li kredas je tiuj ribeloj. Kaj ankaŭ mi ekkredis. Estas normale, ke ĉiu sian Turkujon detruu. Tiel kuraĝigis min Mladeno.

Nu bone, mi daŭrigos.

Ni gajnis la batalon sur Cero, kaj konkeris la poziciojn en Maĉvo. Ni avancis en regionoj, el kiuj ni antaŭe retiriĝis.

Ho dio! En Krivajico – tridekon da virinoj kaj infanoj ŝvaboj ligis kaj buĉis. Same en Zavlako, kaj en aliaj lokoj, ĉiuloke, en Maĉvo kaj Jadar. Fotistoj klikis per aparatoj, fotografis mortigitajn virinojn kaj infanojn. Ili devas tion fari, diris ili, por la arkivo ŝtata, por mondaj gazetoj, ke ĉiuj vidu kaj sciu kiajn bestaĵojn oni faras kontraŭ serba malfortularo.

Ni haltis ĉe grupo. Tie estis ankaŭ maljunulino. Ŝi disdonis al soldatoj pomojn.

Diru, maljunulino – demandis Vasilio – ĉu la ŝvaboĵ estas danĝeraj?

Ne estas ĉiu ŝvabo danĝera, filĉjo – diris la maljunulino, danĝera estas la ŝvabo, kiu parolas nialingve.

Vasilio penis komenci interparolon kun mi, li demandis: Kiuj estas tie homoj, kiuj parolas same kiel ni, Miluteno, ĉu ili estas tiuj sudaj slavoĵ pri kiuj al ni parolis la oficiroj?

Se ni estus bonŝancaj, ho Vasilio, vi al mi parolus pri niaj domoj, pri niaj vilaĝaj stratoj – pri vinberejoj, maizkampoj kaj fruktoĝardenoj vi parolus. Sur herbejoj restis tiom da nia postfojno, tiom da nia brutaro, sed vi parolas

pri sudaj slavoj. Respondi mi al vi ne povas! Ekzistas homoj pli prudentaj ol mi, ekzistas funkciuloj, verŝajne ili scias tion, pri kio ili estas kompetentaj. Kun mi interparolu pri plugado, pri semado kaj pri kornbrutoj. Mi konstante penis eviti Vasilion, sed li piedis malantaŭ mi, kaj koleris. Nu, kvazaŭ dilemante, kial ni iras antaŭen? Se ni ne irus antaŭen, ni, asertis li, ne vidus ĉi tiun hororaĵon – li montras al mi domojn forbruligitajn, cindrejojn, eksajn grenejojn. Kaj pordegon. Bela pordego. Kolonoj masonitaj – sed la beleco estos senutila. En la pordego – homo, verŝajne bienposedanto, li kvazaŭ elirus renkonti gastojn, jen, bele vestita estas la maljunulo, sed li – pendas, li estas pendumita, dio pardonu min, nun – preskaŭ ridiga.

Nu, ni devos iri antaŭen, Vasilio; ni iris antaŭen tra nia lando, ni ne iris antaŭen tra fremda lando – mi forturnadis la kapon, por ne rigardi kompartindulojn, hejmanojn kadavrigitajn kaj pendumitajn ĉirkaŭ forbruligitaj domoj. En Maĉvo oni tion povas vidi ĉiuloke.

Sed Vasilio subite kaptis mian manon, altiris ĝin, por ke mi alrigardu lin en la okulojn. Ĉu vi vidas, Miluteno, ili eĉ greffitajn fruktarkojn ne respektas; ĉu vi vidas, ili pendumis homojn eĉ sur domajn pirujojn kaj pomujojn. Vasilio okulgapis, puŝetis min, por ke mi rigardu al kortego, kiun ni estis preterirantaj, kvazaŭ, dio min pardonu, estus grave, ĉu oni pendumas homojn sur domajn aŭ sur sovaĝajn arbojn.

Rigardu, Vasilio, antaŭ vin, ne retrorigardu, pli facile al vi estos; ne ĉirkaŭrigardu, flankenrigardu, dio al la homoj ne donis okulojn por ke ili rigardu ĉion, kion oni povas vidi – mi ne scias kion alian mi povas diri al li, al mi estas same malfacile kiel al li, sed mi diris mense: se mi rigardos antaŭ min, mi vidos malpli da nia mafeliĉo.

Diru la veron, Miluteno – Vasilio denove ektiris mian manikon, haltigis min, okulojn miajn li fiksrigardis – ĉu ni trosevere juĝis la turkojn?

Mi rigardas lin, ĉu li perdis la prudenton – kiel ni povas trosevere juĝi la turkojn, niajn malnovajn malamikojn. Sed li, jen, frotis la mentonon. Ni, diras li, kontraŭ la turkoj multe militis sed, sincerdire, ĉi tiajn veindaĵojn kaj hontindaĵojn ili ne faris – li montras infaneton senvivigitan, inan, kvaronnudan, dio pardonu, sur unu krureto estis ŝtrumpo, dika, el drapa vilaĝa trikaĵo, sangokovrita, dum muŝvarmo zumis ĉirkaŭ ĝi. La infano fetoris, fioble fi, la infano estas mortigita, muŝoj ĝin atakis, ĝi estas kvaronnuda, ĝi fetoras, hej, fetoras. La infano estas ina, la infano estas kvaronnuda.

Iom pli for, je malpli ol dek paŝoj, pendis virino – juna, harplektaĵoj flirtis sur ŝia brusto, sur brusto disbutonumita, videblas ke ŝi estis malhonorigita, sur unu unu ŝia kruro, pardonu min pro tiu vorto, restis kalsono, dio min pardonu, mi konjektis: sendube la virino estis patrino de la knabineto, ili

similas unu la alian kiel du akvogutoj. Mi enpenŝiĝis: ĉu ĉi tiun krimon partoprenis tiuj, kiuj parolas nian lingvon, aĉoble aĉ?! Vasilio iris malantaŭ mi, li puŝetis min, denove demandis: Ĉu ni trosevere juĝis la turkojn?

Eble ni trosevere juĝis la turkojn, Vasilio, sed tio ne estis nia intenco. Ni ja ne povis antaŭscii, kiajn mafeliĉojn ni travivos; ni ja ne povis scii, ke ankaŭ kontraŭ ĉi tiaj homoj ni militos, ni ja ne povis scii ke ankaŭ ĉi tiaj homoj ekzistas en ĉi tiu mondo.

POŜTRANĈILO

Mi ne scias kiel nomiĝis tiu loko, mi nur scias, ke estis dimanĉo, ĉar el malproksimo aŭdiĝis preĝeja sonorilo. Dum ni luktis pri ŝvaba standardo. Ho dio. Unu al la alia ni insulatas la patrinojn – en la sama lingvo. Ni ĝemis.

Unu al la alia ni fendis ventrojn. Mi ne scias, kial ni devas havigi tiun ŝvaban standardon, kial pro tiu tukaĉo devas perei tiom da homoj.

Tamen ĝuste mi estis tiu, kiu sukcesis forkapti la standardon.

La leŭtentanto Garaŝanino laŭdis min antaŭ soldataro. Vi glorigis ĉiujn nin, la ŝumadianojn – diris li.

Mi ĵuras antaŭ dio, mi preferus ke nin, la ŝumadianojn, glorigu tio, kio nin ĉiam glorigadis – dikaj porkoj kaj virbovoj, sekprunoj kaj brando.

Tie pereis ankaŭ Aksentijo, pedelo de nia lernejo. Sturmante bajoneton. Oni trapikis lin pro tiu bunta imperiestra tukaĉo. Ni enfosis lin. Dum mi estis lin enteriganta, mi memoris, kiel Aksentijo aŭskultis la instruiston, kiu rakontis al la infanoj pri tio, kiel niaj antaŭuloj heroumis, kiel ili „sabloklingojn nudmane kaptadis“, kiel por standardo luktis. Jen tiel ankaŭ nia Aksentijo faris, kiel niaj antaŭuloj el infanrakontoj. Sed kion mi diru al liaj infanoj, se mi viva revenos hejmen, kaj se mi renkontos ilin?!

Tie estas ankaŭ Vojislavo Dikinaco, li estis terure vundita. Bajonetumita. Li jam komprenis, kio kaj kiel okazis. Li flustras al mi – paroli li ne povas – ke mi prenu la poŝtranĉilon, kaj transdonu ĝin al liaj samdomanoj.

La poŝtranĉilon – kiun hieraŭ donis al li la kronprinco, vizitante la fronton, tiam Vojislavo estis feliĉa, feliĉega.

Li fanfaronis, ke la poŝtranĉilon li forportos hejmen, por ke Dikinacaro fieru pri ĝi. Ke ili gardu ĝin. Tio estas tre grava.

Donaco de la estonta reĝo. Kiu domo havas tian poŝtranĉilon?

Mi serĉas la poŝtranĉilon, sed ne povas trovi ĝin. Mi traserĉas liajn poŝojn, sakon – ĝi ne estas tie. Mi serĉas ĝin en pajlo, ĝi ne estas tie, sed Vojislavo testamentis al mi porti kaj transdoni ĝin al liaj samdomanoj.

Kion mi diru al Vojislavo, li mortas, la poŝtranĉilon mi ne povos trovi. Verŝajne ĝi elfalis dum li luktumis sur la batalejo, aŭ dum lin vunditan oni ĉi tien portis. Mi ne kredis, ke iu ĝin ŝtelis.

Mi kompatis Vojislavon, kaj preskaŭkulpigis la kronprincon, ĉar li donis la poŝtranĉilon al tiu martiro, al Dikinaco. Se li ne donus ĝin al Vojislavo, eble Vojislavo malpli heroumus, eble li ne pereus.

Vojislavo mortis antaŭ ni, ni lin enfosis laŭ niaj morreguloj.

Dum tiuj tagoj multaj soldatoj kapitulacis kaj donis siajn armilojn al ni. Ankaŭ oficiron ni kaptis. Poste ni sidis kaj interparolis. Kaptito el Zagrebo, serbo, iĝis parolema: la serboj en Aŭstrujo ne vivas pli facile, ne vivas pli bone, ol la serboj en Serbujo. Ankaŭ tie la serbojn oni persekutas. Arestas. Atakas iliajn domojn kaj havaĵojn. Frakasas montrofenestrojn, detruas vendejojn de metiistoj kaj komercistoj, de serboj.

Kial, do? – demandis mi antaŭ ĉiuj.

Ĉu „kial“? Pro la princo Ferdinando.

Nu, ĉu tion al la serba landanaro faras ŝvaboj? – demandis mi.

Ho ne, ne ŝvaboj, sed radiĉanoj kaj frankanoj. En Bosnujo, onidire, estas ankoraŭ pli malbone, serbojn oni tie elhejmigas, en koncentrejojn pelas, havaĵojn kaj domojn iliajn trudprenas...

Do, pri tio temas, rezonis mi.

NI ESTAS POPOLO PIEDIRA

Oni irigis nin trans la riveron Savaon, en Sremon.

Sed kiamaniere, fraĉjo, kiel armeo povis transiri Savaon? Ni ne havis flospontojn, ni estis kampuloj, ni ne sciis naĝi.

La homoj rigidiĝis, ili ne volis transiri la akvon. Ankaŭ la brutaro maltrankviliĝis, antaŭsentante akvon. Virbovoj klinis la kolojn, rigardis nin, sed ni ne aŭdacas la brutojn rigardi en la okulojn. Ho ĉiela tribunalo, kiel nia komandantaro nin en la okulojn aŭdacas rigardi!

Krakis radoj sub kanonoj kaj municicaroj, hufobruis kavalerio. Ŝteliris infanterio. Tamen, tio ne estas same, kiel kiam ni tra Serbujo iris.

Mi alpaŝas la bordon, timo penetras miajn ostojn – ĉu ni estas armeo kiu povas transiri tiel grandan riveron.

Kial ili postulas de ni tiel multon? – plendis Paŭlo.

Kroĉiĝu al virbovoj – konsilis mi – la virbovoj en akvo povas esti pli gravaj ol dum plugado. Nur ili povas helpi nin.

La ponto balanciĝis.

Oficiroj krie hastigis nin, postulis streĉi la forton.

Mi iras apud Paŭlo kaj Vasilio, por ke nin ne disigu tenebro kaj tumulto. Kie ni troviĝas? – demandas Paŭlo.

Kial vi devas tion scii; ĉion alian vi scias, nur ĉi tiu scio mankas al vi – ni plenumas la komandon. Ni nek estas sur bona loko, nek iras al bona loko; dronos ankaŭ tiuj, kiuj naĝas pli bone ol ni – diras Vasilio.

Sed Paŭlo senĉese demandadas. Li deziras scii, kie li estas, kien li iras.

Ni iros tien, transen, en Hungarujon, konkeri Aŭstrujon, liberigi niajn fratojn; tie vivas niaj samgentanoj, tie estas niaj monaĥejoj, tie estas la ostoj de niaj regantoj – nur tiam Vasilio turniĝis al mi: Bone, Miluteno, vi estas respektinda homo – vi estis la plej bona lernanto; la instruisto Zarijo, dio savu lian animon, vin estimis kaj respektis pli ol ĉiujn aliajn, do, fraĉjo mia, vi nun diru al ni, kien oni nin irigas.

Mi silentis. Mi paŝis singarde, atentis ne perdi lin kaj Paŭlon. Mi atendis, ke nin, de tiu flanko, kie troviĝas niaj monaĥejoj, niaj fratoj salutu kun rda plumbo. Tio estus normala. Kiu petis nin liberigi ilin? Se ili dezirus liberon, ankaŭ ili mem povis liberigis sin.

Iel ni atingis la bordon. Ni enpaŝis kaĉan teron. Penplene ni eltiradis la piedojn el la koto.

Mi kompatas la brutojn – kien ni irigas ilin, multegajn niajn virbovojn kaj ĉevalojn. Se ni decidis niajn vivojn pereigi, ĉu ni rajtas ankaŭ la brutojn mortigi. Kial tiom grandan havaĵon neniigi, en fremda lando? La brutojn ni ne havigis per hazardaj ludoj.

Mi tiel pensis kaj rigardis la ebenejon, kiam subite Paŭlo Kezuno ekkrietis: Kuŝiĝu, Miluteno, diris li, ne pereu stulte!

Mi ne scias ĉu li tion vere diris, sed kanona fajraĵo surŝutis nin. Disŝutiĝas tero, fajfas grenadsplitoj. Vasilio insultis la feklekan ŝvaban patrinon. Paŭlo – la frenezan serban patrinon. Kaj la fratojn. Kaj la liberigon. Kaj la monaĥejojn. Kaj relikvaĵujon de la reĝoj kaj grandsinjoroj. Ĉu pro ĉerkoj kaj reĝumo ni pereu!

Aŭdiĝis ankaŭ maŝinpafiloj. Ili tempestis pli kaj pli forte, pli kaj pli mortige. Ni estas sur ebenejo, videblaj klare kaj senbare. Ili tempestis mortige. Sed fuĝi ni ne povis, lacaj pro piedirado sur molaj plugkampoj, en disfalantaj opankoj.

Foje, antaŭ vespero, de tie, de vilaĝo, pri kiu oni diris, ke ĝi nomiĝas Ŝaŝinco, nin atakis ankaŭ infanterio. Tiam ni komencis gliti suben, retiriĝi.

Kavalerio! – deie aŭdiĝis krioj kaj pafaro, por ke oni ne aperu post nia dorso.

Ĉesu pafi! – oni denove ekkriis. Tio ne estas kavalerio, sed artileria jungitaro, kaj ne malamika, sed nia.

Kampuloj! Ili insultis nian serban patrinon, pafis kaj kuregis. Kampuloj, kien vi nun iros, vi ja ne scias naĝi? Jen, ili scias, ke ni ne scias naĝi, sed la niaj tion ne sciis. Ho dio, kial vi almenaŭ ne sendis kontraŭ ni malamikojn, kiuj ne parolas nian lingvon!

Gravas nur ke mi ne iĝu sklavo en fremda lando. Eĉ sklaveco estas pli bona en sia lando – mi kuregis kontraŭflue, al boato. Sed la boato estis plena. Akvo preskaŭ enverŝiĝis, preskaŭ dronigis ĝin. Dume, sube, laŭflue, aŭdiĝas helpokrioj. Iuj estis dronanrtaj. Serboj.

Kial ni tion faris, Miluteno – mi rigardas la malfeliĉon kaj katastrofon nian.

Poste oficiroj klarigis, ke ni en Sremon ekiris por helpi al niaj aliancanoj, por ŝvabojn kaj hungarojn haltigi. Tio estos tre utila por la aliancanoj, parolis ili. Se ni ne atakus la ŝvabojn kaj hungarojn, ili la rusojn atakus ankoraŭ pli forte. Ni, diris ili, redonis la ŝuldon al niaj slavaj fratoj. Kiu ja tion farus, se ne la serboj tion farus.

Nu, tre bone, ni denove pereadas helpante iujn slavajn fratojn – rezonis mi, sed silentis. Konstante oni nin kun iuj fratigas, kaj ni ŝarĝas nin per tio, kion ni ne kapblas porti. Ni ja ne estas potenco, ni devas jam pensi pri ni mem, elesplori nin, kompreni kiom povas estas. Mi ja miras, ke tiel grandan gloron – se ĝi vere pri serboj cirkulas tra la mondo – oni tiel facile dronigis en la idiota akvaĉo. Ĉu la kronportanto kaj la registaro ne sciis kian armeon ili havas? Kial ili hontis antaŭ la aliancanoj, ĉu ili ne povis diri, ke ilia popolo estas piedira, ke ne scipovas naĝi?!

Turmentis min tiu penso, nevĉjo mia. Mi demandis min, kion mi signifas por ĉi tiu nia ŝtato, kio mi por ĝi signifas, kaj kio por ĝi signifas tiom multaj homoj, kiuj pereis, kiuj en la idiota akvaĉo dronis.

Kaptinte eblecon, mi alpaŝis Mladenon, kaj sen ĉeesto de aliaj ĉion sincere diris, sed li min riproĉis: Ne povas, diris li, pri tio juĝi opankuloj. Tio estas gravaj demandoj pri historio kaj politiko, sed viaj, diris li, horizontoj estas malvastaj, Miluteno. Vi, diris li, parolas, kvazaŭ Sremo por vi estus fremda lando. Sremo estas, diris li, nia lando, en Sremo vivas la plej bonaj serboj. Multege da niaj homoj el Ŝumadio fuĝis de turkoj en Sremon, kaj en aliajn regionojn de Vojvodino.

Ĉu vi scias, Miluteno, kiom multe da Sremaj serboj pereis nur dum ĉi tiu milito nur pro tio, ĉar ili estas serboj? Ili nin helpadis ankaŭ dum Ribelo, ili nin helpas ankaŭ nun.

Mi ekmiris. Mi neniel riproĉis Sremanojn, mi aŭdis pri la Sremanoj, sed mi demandas min, kian utilon ili havis de nia sensenca perejo.

Tio estas, Miluteno, tro pezaj demandoj por vi, tion povas kompreni nur homoj kleraj – koleretis Mladeno. Bone, rezonas mi, la afero daŭriĝu...

MI NE PERMESIS, KE RAKAO «TROCKIO» KONSILAĈU MIN

Ni venkis en batalo ĉe Stermovo. – Mortintoj kuŝis ĉiuflanke. Mi atente observis, kaj decidis – mi prenos ŝuojn, tion mi ne volis kaŝi. Atente mi okulserĉis botojn aŭ soldatŝuojn – iun mortinton mi devos senŝuigi. Mi eĉ ne pensis pri tio, kion Ĵivana, kaj kion mia patrino dirus, nun por tio mi ne havas tempon. Mian rigardon altiris ulo kun fezo sur la kapo.

Al mi ekŝajnis, ke la mortinto estas alta kiel mi, forta kiel mi, longpieda kiel mi. Kial mi ne senŝuigu lin, ankaŭ min oni senŝuigu, se mi pereos. Mi ne ekiris en la militon por havigi vestojn kaj ŝuojn, sed se mi jam havas tian ŝancon, mi prenos la piedvestojn, mi ne volas plu akvon kaj koton kolekti en miaj opankoj.

Jevremo malantaŭ mia dorso petturmentas min: Ne faru tion, Miluteno, ne demetu piedvestojn desur mortinta malamiko, tio estas malbonŝanciga por vi, diris li, demetu ĝin desur nia mortinto, ankaŭ niaj mortintoj estas tie – li montris al mi per la manoj al stermovaj pozicioj.

Kiel mi demetu piedvestojn desur la niaj, rezonis mi, ni estas nudpiedaj, aŭ niaj piedvestoj jam disfalis, ni ne mensogu nin mem.

Mi alpaŝis alian malamikon, tio estis suboficiro. Li estis korpulenta kaj longkrura homo. Miastatura. Ankaŭ li havis fezon sur la kapo.

Tio konvenas al mi. Pli facile estos senŝuigi lin, ol iun veran ŝvabon. Senŝuigi ŝvabon mi hontus, senŝuigi ĉi tiun – ne, ĉi tiu estas turkiĝinto, iam li estis serbo, poste li turkiĝis, kaj nun, jen, serbojn li atakas.

Mi demetis unu boton – bona la boto. Ankaŭ la alian mi ektiris, sed li ekmovis la piedon. Timfrapita, mi ektiris la ponardon.

Ne, frato mia, mi estas Bosnujano! – la mortinto levetiĝis, etendante la manojn al mi, jen, ĉi tiel. Li petis. Kaj montris, ke li havas fezon sur la kapo.

Jevremo ekridaĉis: Restis vi, Miluteno, sen botoj, diris li, „ne volas boto sur vian piedon“.

Nu, bone, Bosnujano, diru – demandis mi lin – ĉu vi ĝis nun sciis, ke vi estas Bosnujano, ke vi estas mia frato, aŭ vi tion eksciis nur ĉi tie, ĉe Stermovo? De vi mi ĝis nun defendis min, pro vi mi devis forlasi mian kampon, – mi ne permesos, ke vi stultuligu min. Mi scias, kiu estas mia frato. Pri tio min devas instrui nek la reĝo, nek la registaro. Nu, ĉu ne estas tiel? Kiel Bosnujano povas esti mia frato, se mi ne estas frato de Bosnujano! Mi svingjetis la boton, rememorinte nian instruiston, kaj komencis insulti lin, pro ĉio, kion li rakontis pri Junbosnujanoj: ke ili la tutan Bosnujon ribeligos, kaj Bosnujo kunbatalos kun ni.

Rakao „Trocko“ defendis la malliberigiton. Ne ĉikanu la homon, Miluteno, diris li, ne li kulpas pri la buĉadoj kaj pendumadoj de infanoj kaj virino en Maĉvo, ĉi tio ne estas milito inter popoloj, ĉi tio estas, diris li, milito inter imperiestroj. Ŝajnigas sin grava Rakao la opankisto, ĉar li vidis iun Trockion en Beogrado, se oni tion povas kredi al li, kaj ĉar li partoprenis la unuamajajn piknikojn.

Kia milito inter imperiestroj, Rakao! – interrompis mi lin, ne permeante al Rakao Trocko saĝumi. Se ĉiuj imperiestroj de la mondo arĝus kaj invadus Serbujon trans Drinon kaj Savaon, ili kune ne forbuĉus tiom da infanoj kaj virinoj, ili ne povus tiomajn domojn forbruligi, tioman brutaron forkonduki.

NE PAŜIĈO ALPORTIS AL NI PEDIKOJN

Tuj kiam Serbujon ni liberigis, tifo ekepidemiis. Ĝi plagas, plagegas. Ni defendis nin per ajlo kaj brando. Tiam mortis Radovano el Dragolo, Veseleno el Jeloviko, Staniŝo el Stojniko, mi ne scias kiel nomiĝis Terto el Jagnilo, kaj multaj aliaj. Ho dio!

Paŭlo kaj mi foriris en malsanulejon por viziti Milovanon el Misaĉo. Sed Milovano, vidis mi, jam estis aginianta. Li ne povis rekoni nin. Li proponis, penshaose evidente, gastigi nin en sia domo. Venu, homoj, jen, mia patro sidas, atendante nin, li boligis brandon kun mielo.

Via hejmo kaj via patro atendas vin, tio estas vero, sed vi ne alvenos, rezonis mi, vin oni ĵetos en kalkujo, eble la kalkujo akceptos ankaŭ nin post kelkaj tagoj.

La manĝaĵojn, kujn ni kunportis al li, ni reportis, kaj formanĝis. Poste ni sidiĝis kaj parolis kio kaj kiel okazis al Milovano, timante tifon, sed Mladeno kvietigis nin. Ĉio ĉi estas prezo, por liberigo de la patrujo, diris li, ni devas pagi por tio, tio estas nia respondeco.

Kia pago, ho malbenulo, ni jam pagis ĉion, kion ni ŝuldis, nin pereigadis plumbaĵoj kaj bajonetoj, nin falĉis kanonaro, nin skurĝis pluvo kaj nokto, nin glutis koto; ni respondecas pri niaj montoj kaj riveroj kaj kampoj, sed kiu respondecas pri la tifo!? – ekkoleris mi.

Nu, ne Paŝiĉo alportis al ni la pedikojn, la pedikoj estas niaj, kampulaj, ne Paŝiĉaj – ekridis Vasilio, moke kaj provoke, sed Mladeno vidis, ke li estas saĝa homo, tial li turnis la interparolon al alia temo.

KIA KALKULO ESTAS TIO?!

Oni konstante parolis, ke ni iros en Tesalonikon. Multaj el ni esperis, ke ni veturos per vagonaro, ke tie nin atendas aliancanoj. Tamen, ni venis en Kosovon. Kaj de tie – en Albanujajn montojn kaj senvojejojn.

Kio okazas – demandis mi Mladenon konfidence, kiam ni estis solaj. Kaj li, la karulo, klarigis al mi. La bulgaroj fortranĉis nian vojon por retiriĝo en la Vardara valo, forpuŝis nin en Albanujon, alia vojo por ni ne ekzistas.

Nu, Mladeno – demandis mi lin – kial bulgaroj atakis nin dedorse? Ni kune kun ili Jedrenon konkeris, tie mia frato pereis. Tiam Mladeno klarigis al mi, kompreneble konfidence: Bulgaroj nin atakis ĉar Paŝiĉo malplenumis la interkonsenton kun ili, en 1913 li prenis de ili Makedonujon maldekstre de Vardaro.

Bone, Mladeno, se ne okazus la milito en 1913, se ne okazus la batalo ĉe Bregalnico, se Paŝiĉo tion ne farus pro Makedonujo, ĉu bulgaroj nun atakus nin? – demandis mi. Sed li, jen, levis la ŝultrojn: eble ili ne atakus, diris li.

Nu, bone – demandis mi – kiom nun kostos al ni la maldekstrejo de Vardaro?

Mladeno ignoris la demandon.

Mi haltis, pensante: ni prenis Makedonujon maldekstre de Vardaro, sed nun ni perdis Serbujon. Kaj multegajn homojn... Sed kiom da ni ankoraŭ restos sur ĉi tiuj montoj kaj ravinoj, mense diris mi – miskalkulo estas tio, certe.

KIO TROVIĜAS, KAJ KIO OKAZAS MALANTAŬ LA MONTO...

Mi rigardis, kiel ni puŝas kaj ĵetas kanonojn en profundaĵojn.

Tie, malproksimete, eksplodoj skuis teron – la niaj bruligas municion.

Mladeno, – mi denove alpaŝis lin – kia estas ĉi tiu kalkulo? Ĉu por ni, por la serboj ne estus pli bone, se ni iel de ĉi tie revenus hejmen, anstataŭ pereigi ĉion, kio al ni restis. Ĉu vi ne vidas, kiel ni aspektaĉas, ni ĉiuj tute kadukiĝis, ĉu ĉi tiaj homoj povas iri tra fremda lando, tra ĉi tiaj ravinoj, en ĉi tia vetero, malsataj.

Lo, Miluteno, jen pri kio temas – diris Mladeno – vi, jen, vidas, kio kaj kiel okazas, sed kio okazos, tion vi ne vidas. Vane mi provus tion klarigi al vi. Vi, ho Miluteno – li montris al mi unu el la montoj, mi ne scias kiel ĝi nomiĝas – vi vidas nur ĝis tiu monto, sed vi ne vidas, kio troviĝas, kaj kio okazas malantaŭ la monto.

Mi ektremis, se tio estus ne li, sed iu alia, mi svingigus mian manplaton, sed Mladenon mi konis, li estis nia animo, li ne volis ofendi Milutenon. Tamen, sincerdire, mi estis ofendita. Mi ja rimarkis, ke nin, la kampulojn, niaj kleruloj tre subtaksas. Ĝuste tiuj niaj, kampulaj, filoj, tiuj, kiuj ĵus demetis vilaĝajn opankojn. Je dio, mi diras la veron – ili kvazaŭ opinius, ke ni, la kampuloj, gruntas aŭ blekas, kvazaŭ ni ne povus prudente pensi, eĉ kiam pri nia vivo temas. Jen, ankaŭ vi, nevĉjo mia, vi konstante paŭtas, vi ofendiĝas, ĉar mi parolas ĉi tiel. Ankaŭ vi opinias, ke mi al vi povas diri nur pri plugado, fosado kaj pri brutoj. Sed mi, jen, ne parolas pri tio. Ankaŭ vi pensas, ke mi saĝumas, sed mi parolas tion, kio min turmentas, kio determinis mian sorton. Mi ne scias, nevĉjo mia, ĉu ĉi tiel ankaŭ aliaj popoloj kondutas al siaj kampuloj? Mi ja ne scias, pro kio ni, la serbaj kampuloj, meritis ĉi tion. Mi ne scias ĉu aliloke kampuloj suferis kaj faris por sia popolo pli ol ni. Niaj la plej gravaj homoj estis kampuloj, ĉu ne? Kiu niajn ribelojn kaj leviĝojn organizis kaj gvidis, kiu la ŝtaton kreis, gardis kaj savis, nu, diru sincere.

Sed Mladeno denove ripetis la samon: Vi ne vidas, Miluteno, trans la monton. Li fakte volis diri: vi vidas nur ĝis via korbo, kralo kaj ĉevalo, vi vidas nur ĝis via sojlo kaj kameno. Sed li ne pensis pri tio, ke tio estas malpli danĝera, ol se oni gapas trans la monton kaj rigardas ĉielon, se oni ne vidas sian sojlon kaj sian firston, se oni ne vidas, ke la hejma kamentubo ne fumas, ke en la hejma fajrejo serpentoj nestiĝis.

Nu, en ordo – diris mi al Mladeno – se mi ne vidas, vidu tiuj, kiuj tion bezonas, kiuj tion devas vidi; ni transiros ankaŭ la monton, tiam oni komprenos, kiu ĝis kie povis vidi.

SANKTAJ PATROJ

Do, ni iris, iradis, pli ĝuste, ŝanceliĝadis tra Albanujo, el glaciejo al glaciejo, el lupejo al lupejo. Tiam, jen flanke, sur plataĵo, mi vidis infanojn. Mi ne kalkulis ilin, sed mi povas diri, ke estis trideko da infanoj.

Ankaŭ la kolonelo Ivoviĉo, deie aperis inter tiuj infanoj. Li stimulis fajron, rakontis al ili, dum la infanoj lin aŭskultis kaj dentoklakis, kompreneble, la infanoj frostiĝis, ne estas ĉi tia vojo bona por infanoj, ankaŭ por la plenkreskuloj bona ĝi ne estas. He, se la patrolando estus vere lando de la patroj, mense diris mi, la infanoj ne estus kun ni, ni solaj finfarus ĉi tiu malgravaĵon.

Ho, Miluteno – diris al mi Paŭlo – ĉu vi scias kiu tago estas hodiaŭ? Hodiaŭ estas Sanktaj Patroj.

Kiaj, ho, patroj, vi, malbenulo – mi estis dironta, sed ne dirinta. Tio estis en alia tempo, kiam, laŭ la moro, infanoj ligas la patrojn, kaj la patroj donas al la infanoj donacojn, por esti malligitaj, sed nun estas alia tempo, nun la patroj infanojn ligis, en glaciejojn kaj lupejojn ili la infanojn venigis, pro la patrujo. Misaĉe. Mi nur ne scias kie malaperis patrinoj kaj avinoj, kial ili permesis ĉi tian pereon, kial ili ne defendis kaj ne gardis siajn infanoj.

Miluteno – diris al mi Paŭlo – ankaŭ mi ne scias, kiu arigis kaj irigis ĉi tiujn infanojn en ĉi tiun malfeliĉejon, kvankam mi volus scii tion. Mi ankaŭ ŝatus scii, diris li, kie estis la avoj de ĉi tiuj infanoj, kial ili decidis la nevojn pro la patrujo puŝi en ĉi tiun terurejon. Kian sencon havas sennepa patrolando! Mi timas, diris li, ke ankaŭ mia patro freneziĝis, ke ankaŭ li miajn infanojn irigis post min, ĉi tien. Mi tremas, diris li, Miluteno, time kaj froste. Se miaj infanoj en ĉi tiu glacia infero agonias pro malvarmego kaj malsato – por kio mi devas batali – por kiu patrolando, ĉu por tiu, kiu miajn infanojn pereigis? Ho, mi ja ĝin pereigos, ĝin mi ne defendos, mi ĵuras per la fastotagoj! Se estas tiel, ĝi ne bezonas pli grandan malamikon ol mi. Finfine, kio estas la patrujo! – siblis li. Malfacile al li estas, memkompreneble, la tuta mondo kvazaŭ renversiĝus, samkiel la mia, ni ja ne estas infanoj, ankaŭ brutoj ni ne estas. Ni estas nek oficiroj, nek popoloj. Ni ne vivas per gloro.

Demandu la kolonelon Ivoviĉon – mi montris direkte al la fajro. Tie, jen, la kolonelo Ivoviĉo sidis kun la infanoj. Li rakontas al ili, kio okazos kiam ni almariĝos. Li mensogis al la infanoj, ke ĉe la maro fruktoj kreskas abunde kaj fekunde, ke tie ilin atendas teo dolĉigita. Li ne volis diri, ke la maro estas akvegaĉo kaj senfundejo.

He, kial la kolonelo Ivoviĉo obstine mensogas al la infanoj, vane li pimpigis sin per la epoletoj. Ĉu vi havas iom da manĝaĵo? – demandis min Paŭlo, rigardante la infanojn. Mi havas unu terpomon.

Donu ĝin al la infanoj. Hodiaŭ estas Sanktaj Patroj, tia estas la moro, se mi havus ion, mi tion donus al ili.

Nu, ankaŭ mi ne volis per terpomo savi mian vivon, temis ja pri la vivo de infanoj. Mi alportis la terpomon, kvankam okuloj miaj larmis, mi senĉese singultis.

Mi etendis la terpomon – la infanoj min rigardis, gorĝo mia kunpremiĝis, eĉ ne unu vorton mi povis elparoli.

Kial vi ploras, soldato? – demandis min infano, dum mi dronis en larmojn. Tamen, mi diris al mi mense: Miluteno, rememoru kiel fartas tiuj, kies infanoj venis en ĉi tiun inferon – Radoŝo – lia filo alvenis, la infano malsaniĝis kaj mortis pro febro, sed li devis iri pluen. Sed kial? Kaj kontraŭ kiu? Ĉu por li pli grandaj kulpintoj estas la germanoj, aŭ la niaj, kiuj elkovis ĉi tiun infanecan strategion?

NE KIEL HERBO ESTAS LA POPOLO

Mi ne povas tutcerte diri, ke ni atingis la ĉefstabon kaj registaron, sed tie estis plataĵo, kaj sur ĝi fajroj brulantaj, kaj ĉevaloj kun ŝarĝoseloj, sub pezega portaĵo, kovritaj per tendotoloj. Ni aŭdis, ke tie estas ostoj de iuj niaj regantoj praaj.

De kiuj regnestroj vi ostojn portas – demandis mi soldaton – ĉu ni nenion pli gravan havas por porti? Mi ŝajnis min stulteta, sed la soldato ekridis, estis ion dironta, sed nur kaŝrigardis al la oficiroj, por ke ili ne aŭdu. La oficiroj estas salajratoj, ili ne aŭdacas blasfemi kontraŭ la sorto, la kampuloj estas io alia, la kampuloj, nu, fakte la soldatoj.

Verdire – diris al mi la soldato – se tio de mi dependus, mi ne portus ĉi tiujn ostojn, kial ni portaĉu ilin, la ŝvaboj ilin ne bezonas, mi eĉ ne scias kion fari kun ili.

Saĝa estis la homo, nevĉjo mia, li diris: Se ni portas ilin pro sanktpomeso, tio estas sensenca, kial ni zorgu pri sanktpromeso, ni en Serbujo ja lasis niajn domojn, samhejmanojn kaj brutaron.

Kion vi pensas pri tio? – mi alpaŝis Mladenon. Ni ne havas nutraĵon por manĝigi ĉi tiujn infanojn, kiujn tra ĉi tiu glacia infero ni gvidas. Ni entombigas nian esperon, nian estonton, sed ni portas tiun ostaron. Kion pensas pri ni la kronulo kaj la registaro, ĉu ili pensas, ke ni estas diakonoj kaj bigotoj, ke al ni la ostaro reĝa estas pli grava ol nia domo, samhejmanoj kaj brutoj.

Miluteno – diris al mi Mladeno – la popolo devas zorgi pri la ostoj de siaj antaŭuloj, la ostoj de antaŭuloj estas la plej grava subtenilo, almenaŭ por ni, por la serboj.

Sed kio okazis kun tiuj niaj slavaj fratoj? – incitis mi lin. Tio al li ne plaĉis, tial li komencis rakonti pri granda ŝtato estonta – li daŭre babilaĉis.

Ho dio, kio okazas kun ĉi tiuj niaj kleraj homoj, pensis mi, aŭskultante lin. Li jam estis apenaŭviva. Malsata, malsana, li apenaŭ povis treniĝi. Neĝo impetis, piedoj liaj frostoŝvelis, manoj liaj rigidiĝis, la kapo malgrandiĝis – tamen li, pri granda ŝtato revas.

Ĉu vi scias, Miluteno – demandis li min – kio estas Serba Vojevodujo?

Mi ŝajnis, ke mi ne scias – mi levis la ŝultrojn.

Nu, Miluteno, diris li, ankaŭ Serba Vojevodujo estos Serbujo. Ĉu vi ja scias kio estos, kiam nia landeto ornamigōs per urboj, kiaj estas Novi-Sado, Oseko, Vukovaro kaj aliaj.

Bone – eksilentas mi, ne povante ŝajnigi min pli saĝa ol la tuta popolo – ni pereu por Serba Vojevodujo, finfine, ankaŭ tie vivas serboj.

Nu, Miluteno, se ni ne akceptos ĉion ĉi, se ni ne konsentus martiriĝi, neniam unuiĝos sudaj slavoĵ. Kvankam ni, diris li, perdis nian landon, ni havos armeon. Kaj ĉi tiuj infanoĵ iĝos armeanoĵ. Kaj tiam la aliancanoĵ, kiam okazos diplomatia intertraktado, nepre plenumos niajn postulojn. Tial, diris li, la aliancanoĵ donos al ni ĉiujn regionojn, en kiuj vivas sudaj slavoĵ, tiam Dalmatujo kaj Slovenujo estos savitaj. Se ne estus tiel, la italoĵ, diris li, forprenus Dalmatujon kaj ankoraŭ iujn regionojn.

Mi levis la ŝultrojn, mi ne komprenas tiujn serbajn aferojn kaj serban kalkuladon. Mi ne povis konsenti, ke pro tio ankaŭ ĉi tiuj infanoĵ devas pereii. Bone – demandis mi lin, li ja vizitadis lernejon en Vieno – ĉu en la mondo ekzistas ankoraŭ iu popolo, kiu pereigis siajn infanojn pro la ŝtato, kaj pro iuj regionoj, kaj, se ekzistis tia popolo, kio okazis al ĝi, ĉu ĝi feliĉiĝis?

Ni ĉi tiun militon maldevas perdi, tion vi, Miluteno, ne povas kompreni, tio ja estas superaj scioĵ.

Kial, diru, ni maldevas perdi la militon, sed ni devas perdi la popolon! – rezonis mi. Ĉu ne estas tiel, nevĉjo mia? Kian sencon havos milita venko, post pereoo de la popolo?

Poste mi vidis kian sencon ĝi havas, sed jam estis tro malfrue. Venis la tempo, kiam oni bezonas homojn, kiam oni bezonas prudentulojn, serbojn oni bezonas pli ol iam ajn, sed kie ili estas, ili ja ne plu ekzistas, ili restis en neĝoŝtormoj. Ilin pereigis Albanujo. Ĉu ne estis tiel?

Ne kreskas homoj kiel fungoj. Mensogas homoj, kiuj diras, ke la popolo estas kel herbo, ke oni ĝin falĉas, kaj ĝi poste juniĝas.

Nu, bonvolu vidi, ĉu mi pravas aŭ malpravas... Nu bone, ni pluparolu.

SINCERE DIRITE

Tago komencis adiaŭi nokton, kiam, en intermonto, ni ekvidis, apud vojo, senigitajn je la vivo, virinon kaj infanojn. Serbojn, rifuĝantojn.

Estis tie ankaŭ knabino, infano kvin- aŭ sesjara, vundita kaj malvestita. Kaj en neĝo forlasita. En neĝo ŝi mortis.

Ĉu ĉi tiuj albanoĵ ĉiam kredos, ke kun la serboĵ ili povas ĉiam fari tion, kion diktas al ili propra kaprico – demandis min Paŭlo – ĉu ili, diris li, ĉiam kredos, ke ni estas senpovuloĵ, kiaj nun ni ŝajnas al ili.

Post certa tempo nin atingis niaj rifuĝantoĵ, nudaj homoj. Senvestitaj, nur en kalsonoj kaj ĉemizoj. Ili rakontis, ke ilin atakis albanoĵ, forprenis ilian ĉevalon, kaj senvestigis ilin. Dentoklakis la homoj, kaj montris al deklivo, al iuj domoj, tri-kvar kilometrojn forajn. Ni devas, diris ili, reveni, kadavrigi la

albanojn kiuj vivas en tiuj domoj, ili ja senvivigis niajn knabojn, disrompis iliajn kapojn per hakilingoj, ili eĉ ne volis malŝpari pafaĵojn, ili simple senvivigis la knabojn kaj senvestigis ilin.

Mi ne povas kompreni: kial ili mortigis ankaŭ mortontojn? Verŝajne ili jam komprenis, ke ni havas kelkajn arĝentajn moneretojn, eĉ kelketajn ormoneretojn – serboj vidigis tion, aĉetante fojnon por virbovoj kaj ĉevaloj.

Ne koleru, nevĉjo mia! Mi rakontas al vi mian sorton. Mi volas, jen, finfine kompletigi la rakonton. Antaŭe mi ne havis tian eblecon. Antaŭe ekzistis nur domo, plugkampo, brutoj, militado, neniam mi povis vidi mian vivon kompleta. Nun estas alia situacio, nun mi tion povas. En malliberejo mi estas, tempon mi havas.

Albanoj mortigadis niajn infanojn, dum Rakao Trockio parolaĉis pri frateco kun ili. Ni mortadis pro malsato kaj malvarmego, dum niaj kleruloj muelas pri tutslavismo. Ni ne aŭdacis fajron ekbruligi, piedvestoj niaj disfalis, dum la leŭtenanto Garaŝanino klarigadis al ni nian sorton. Se ni revenus al niaj domoj, se la registaro kaj la reĝo subskribus kapitulacion, diris li, la italoj forprenus parton de la teritorio de niaj sudaj slavoj kaj Dalmatujon; ĉi tiel, diris li, ni konservos iom da armeo, la reĝon kaj la registaron, poste ni havos ŝtaton, kian meritis sudaj slavoj. Nia ŝtato estos granda, eĉ ĝis Soĉo.

Sed kie estas tiu via Soĉo, kio estas tiu Soĉo? – demandis mi.

Soĉo estas, diris li, nia rivero en Aŭstrujo, tie vivas niaj fratoj.

Mi malmulton sciis pri la riveroj, kaj pri ĉi tiu mi unuafoje aŭdis. Sed mi ne aŭdacas diri: nu, kara leŭtenanto, kara sentaŭgulo, ĉu vi studis, por ke vi povu subtaksi vian popolon; ĉu ni ankaŭ tion meritis, ke vi voku nin mortadi ankaŭ por riveroj en Aŭstrujo.

Ek, bone, ni mortadu ankaŭ por tiu Soĉo – mi okulumis al Vasilio – kial ni ne mortadu ankaŭ por Soĉo, ĉi tie, en Albanujo. Kiu tion faros, se ne ni, la serboj – mi sentis, animuman malŝarĝon. Sed la leŭtenanto Garaŝanino koleris: Kial vi ŝercaĉas, Miluteno! Mi nur rigardas lin, ne aŭdacante diri – tio estas tro multe por unu popolo, precipe se ĝi estas ĉi tiel malgranda, kiel la nia, se oni ĝin pelas mortadi por ĉiu rivero. Ĉiu rivero ja havas sian popolon, kiu povas mortadi por ĝi.

Diru sincere, la armeo estas armeo, sed kio okazos kun la popolo, tio min turmentas, nevĉjo mia.

Ĉiam pli da larmvizaĝaj kaj teruritaj virinoj kaj infanoj ŝanceliris, solaj, aŭ en senfinaj kolonoj.

Nin hazarde renkontis patrolo de Danuba divizio, ili serĉis infanojn, grupon da lernantoj el Beogrado, ĝi perdiĝis en neĝoŝtormoj kaj ravinoj.

Apud vojetoj glaciigis kadavroj de lernantoj kaj soldatoj. Glaciigis ankaŭ korpoj de ĉevaloj.

SAVU LA VIRBOVOJN

Mi ne povas precize diri en kiu loko tio okazis, sed oni al nia plotono donis virbovojn. Ariĝis, je dio, sepdek virbovoj, iuj el artileriaj, aliaj el provizaj trupunuoj.

Al ni tio plaĉis – por la kampuloj la kornobruotoj havas grandan signifon, vi ja tion scias.

Iris niaj virbovoj, je dio, kvazaŭ ili sciis, ke ili devas atingi niajn kolonojn, dum mi perokule kontrolis kiom da tempo suno bezonas por subiri. Tiam eksiblis plumbaĵoj. Desur montopintoj eĥiĝis pafiloj. Nin surŝutis kaj bomboj kaj ŝtonoj.

Ĝemis brutoj, blekegis virbovoj. Ili desur krutaĵoj faladis en profundejojn. Ni – en ŝirmejojn, dum albanoj kripostulis kapitulacoon.

Ho ne, ĉio estas vana, kapitulaci antaŭ ili ni maldevas, rezonis mi, ankaŭ la bovojn ni ne povas transdoni al ili. Se dio volus ke ni kapitulacu, li elektus malamikon, antaŭ kiu indus kapitulaci, li por tio ne elektus albanojn. Ankaŭ mi pafis, rapidigis la virbovojn, pensante: estus malhoneste, rilate al la germanoj, ke ni kapitulacu ĉi tie. Kion germanoj pensus pri ni, ĉu ili respektus nin, se ni kapitulacus ĉi tie. Ĉu tio ne estas vero? Ni ja havis malamikojn, kiuj estis kaj pli fortaj, pli decaj kaj pli homecaj ol la albanoj, tamen ni ne kapitulacis. Kiel nun militkaptitoj de ĉi tiuj uloj ni estu, kiel ni ĉi tiel humiliĝu; ne ega bravulo mi estas, sed tamen, mi hontus, se mi kapitulacus antaŭ ĉi tiuj uloj. Ho, dio, rezonis mi, kion ili pensas pri ni, se ili postulas, ke ni kapitulacu al ili. Tamen, kion ili farus kun „sklavoj“? Ankaŭ sklavoj bezonas tegmenton super la kapo, kaj kuŝejon. Ankaŭ al sklavoj oni devas doni panon, kaj ne nur panon.

Ridinde, memkompreneble. Nu bone, mi plurakontu. Savu la virbovojn! Pafis ili, pafis ankaŭ ni. La brutoj ektimis flugŝtonojn, ili estis vundataj kaj mortigataj per ŝtonoj kaj bomboj. Faladis virbovoj en profundaĵojn, rokosuben. Sed, tamen, ni elturniĝis.

Ho ve, ĉu ĉi tion neparo kaj praneparo nia, kaj praneparo de praneparo nia, iam ajn forgesos, ĉu ĉi tio estos romanigita! – veis Tanasko Stragaraco, konstante rigardante al la loko, al la infero, kie ili niajn virbovojn vundadis kaj senvivigadis.

La neparo tion forgesos, komprenende, rezonis mi – kiu povos priskribi ĉi tiujn malfeliĉulojn, kiuj tranĉas ĉevalajn kadavrojn kaj manĝas, por anstataŭ pro malsato morti pro malsano; kiu povos priskribi la rifuĝantarojn, kiuj treniĝis post la armeo, kiuj estas pli elĉerpitaj kaj pli malfortaj ol la armeanoj! Kiu skribos pri la taĉmento de lernantoj kiu vojeraris en neĝoŝtormoj en albanaj montoj, kaj anstataŭ al la maro, venis al la ĉielo? Kiu tion povos priskribi?

Se dio volus, ke tio estu notita, li ĉi tian sorton donus al iu pli skribokona popolo. Al popolo pli legema. Al popolo malpli forgesema, ol estas ni.

Kaj tiel estis konstante, ni eskapadis, kaj la brutoj estis obeemaj, niaj maldikaj virbovoj iris, kvazaŭ sciante en kia danĝero ili estas, kaj kiu ilin atakas.

Ĉu indas rapidi, Miluteno? – haltetadas Tanasko Stragaraco – eble ni renkontiĝos kun aliaj albanoj diris li.

Ni ne renkontiĝos, sed ili nin atakos deflanke aŭ dedorse – rezonis mi, rapidigante ilin: Iru, fratoj miaj, ni eskapu de ili. Ĉu vi scias, diris mi, kiom ni suferis pro ĉi tiuj virbovoj, same kiel la aliaj, kiuj pereis, vi ja scias, ke albanoj fojnon al ni vendadis ne por mono papera, sed nur por mono tintipova. Multegaj, diris mi, multegaj amuletoj estis donitaj por fojno, multegajn fingroringojn, multegajn orajn horloĝojn oficiroj demetis kaj donis por fojno.

Ni perdis dektri virbovojn, kion fari, priploris ilin la homoj, priploris ilin ankaŭ mi.

Poste ni atingis la provizĉarojn, tiel tiu veturilo nomiĝas, kvankam tiuj provizĉaroj havis eĉ ne unu bendon de lardo aŭ manplenon da faruno – sed, negrave.

La leŭtenanto Garaŝanino priploris la virbovojn. Rakontas li, kio okazis, kaj kiel tio estis, dum iu majoro, intendanto, ŝajnis al mi, konsolis la leŭtenanton kaj nin: Ni estis pli bonŝancaj, ol tiuj, kiuj kondukis ĉevalaron el Lubiĉevo, ili, diris li, forperdis purrasajn ĉevalojn, kaj ni – nur ordinarajn virbovojn. Virbovojn ni facile havigos, sed purrasajn ĉevalojn havigi estos malfacilege, ilin Serbujo havigadis kaj bredadis jam en la epoko de la princo Mihailo. Tiam tiu majoro komencis al ni rakonti, kiom la princo Mihailo penis por havigi al Serbujo purrasajn ĉevalojn, sed nun ankaŭ ili pereis. Mia koro kunpremiĝis, sed kion fari. Ni pluiru!

MEDALIONOJ 11111

Malantaŭ vojkurbiĝo kaj grandeta roko aperis albanoj, sesopo. Ili ekvidas nin, iomete konfuziĝis – kaj ektimis. Ili ordinaro surprizatakadis virinojn kaj infanojn, tial al ni ekŝajnis, ke ili nin iomete ektimis. Tamen, ekpafis pafilo. Unu el ili celis Vasilion, sed virbovo savis nian Vaĉjon, post kio ni atakis. Ili rigidiĝis, komprenante, ke ili atakis mortintojn, kaj la mortintoj timas nenion. Tujtuje triopo falis, kaj unu restis senmova, timfrapita kaj konfuzita, dum duopo fuĝis, ili fuĝis tuj, suben, laŭ la vojo. Vasilio levis la pafilon, kaj trafis, je dio, unu el la funĝantoj, vundis lin!

Paŭlo ekdeziris ponardi. Mi volas, diris li, koron lian eligi, se tiu havas koron. Afliktegita estas Paŭlo pro la virbovoj.

Mi ne permesis, neniun ni buĉos: mi prenis la pafilon de la albano, elprenis ĝian perkutpinglon, kaj ĵetis ĝin en profundegaĵon. Post tio mi tuŝis ilian mortinton, kaj vidis, ke el lia poŝo elstaras kaptuko. Mi traserĉis liajn poŝojn, kaj komencis elprenadi – orelringojn, ĉirkaŭkolojn, fingroringojn, horloĝon fervojistan, kelkajn orajn dentojn kaj du medalionojn kun soldataj fotoj, ilin portis aŭ fianĉinoj, aŭ fratinoj. Mi puŝis tion sub la nazon de tiu albano, kiu tremegis kiel tremolo. Paŭlo enŝovis la manojn en ĉiujn liajn poŝojn, same kiel en la poŝojn de la mortintoj – ankaŭ ĉi tiuj estis plenaj da rabitaj aĵoj. Paŭlo retroiris unu paŝon, kaj ekpafis – la trafito falegis sur la novalon. Sed Rakao Trockio ekscitiĝis, li ekkoleris kontraŭ Paŭlo. Li defendis la albanojn. Ili, diris Rakao, estas homoj senkulpaj, ili estas popolo malriĉa, dum longa tempo ekspluatata. La serboj grave pekis kontraŭ ĉi tiu popolo. Pri tio eĉ libron verkis unu el niaj unuauloj. En tiu libro, vortis Rakao, estas grave akuzita la serba armeo, kiu antaŭ du-tri jaroj subpremis albanan ribelon. Tiu skribis, ke la soldatoj kondukis fiaĉe, ke ili kanonis la ribeliĝintajn albanojn kaj iliajn vilaĝojn.

Muelis Rakao Trockio, denove li saĝumaĉis, sed min io kvazaŭ trapikis, jen, ĉi tie. Mi ne estas libra isto, pri tio mi ne volas paroli, sed mi scias, kion mi per propraj okuloj vidis, kion mi sur propra haŭto sentis.

Diru la veron, Rakao – demandis mi lin – ĉu vi volas diri, ke ni pekis, kiam la albanoj kune kun Aŭstrujaj oficiroj atakis kaj buĉis nian Ŝumadian divizion.

Rakao iomete ekscitiĝis, ĉar Paŭlo lin, ĉi tiel, kaptegis je la brusto. Kaj insulte menciis ties patrion, la patrion de tiu, kiu verkis la libron pri Serbujo kaj albanoj. Mi ja aŭdis pri tia ploro pro fremda doloro – tremis Paŭlo, insultis la verkiston de la libro, insultis liajn adeptojn. Tiu partio, diris Paŭlo, voĉdonis kontraŭ nia milita buĝeto ankaŭ poste, kiam la germanoj estis penetrantaj al Kralevo.

Atendu, ho! – enmiksiĝis mi. Mi kaptis la manon de Paŭlo. Mi ne volis, ke okazu malbono, pensante, ke ne estas bone, ke ni batu kaj gratu unu la alian, dum albanoj mortigas niajn senfortiĝintajn soldatojn kaj infanojn.

PENSU INTENSE

Ni konstante meditis, kiamaniere iun maizujon atingi, por kuiri iom da maizo por ni, kaj por la duopo, por Mladeno kaj la leŭtenanto, por iun oveton brogi,

ili tion bezonas, ili estas homoj kleraj, molaj, dum ni estas kampuloj, vi ja tion scias, al ni estas pli facile.

Ne estus agrable rakonti, kiel ni, mi kaj Paŭlo, en fremdan maizejon kaj kokejon eniris, sed ni tie plenigis la sakojn, kaj revenis, kaŝante la maizgrajnojn kaj ovojn, ĉar ni sciis, ke Mladeno kaj la leŭtenanto, se ili tion ekscius, ilin eĉ ne gustumus, kvankam tio estis ridinda; ni estas serbaj kampuloj, ni hontis, ĉar ni devis ŝteli, sed ni timis tiujn, por kies savo ni ŝtelis. Ni revenis, la ovojn metis en gamelon – kaj surfajrigis ĝin.

Miluteno – aŭdiĝis Paŭlo – kie ja estas Mladeno?

Kion vi diris? – mi ĉirkaŭrigardis, sed vere, Mladeno forestis.

Mladeno, ho Mladeno! – li ne estis tie.

Ni kriis, li ne respondis. Nia voĉo revenadis el interkrutejoj.

Ni revenu, li ne estas malproksime, li postrestis. Tiaj homoj ne fuĝas – Paŭlo revenis, kaj kelkaj el ni sekvis lin.

Jen li! – Vasilio estis la unua kiu ekvidis Mladenon. En neĝo. En honta pozicio, super krusto de sanga fekaĵo.

Mladeno, je dio! – mi alkuris. Malcedu, tenu vin ja! – mi lin levetis, sed mi tuj vidis pri kio temas, li ne estis la unua mortinto, kiun mi levis.

Do, nun, nevĉjo mia, nun pensu, meditu pri Mladeno.

Memkompreneble, la sorton de Mladeno travivis multaj lernantoj kaj kleruloj. Mi estas kampulo, sed mi ne estas ŝtupo, mi ja scias la valoron de tiatipaj homoj.

Antaŭnelonge, ĉi tie, en malliberejo min alpaŝis Paŭlo. Nu, Miluteno – diris li al mi – kial neni provas helpi nin, ni ja senkulpegaj ŝimas en la malliberejo!

Kial vi ŝajnigas, ke vi ne scias, ke ni perdis homojn – mi rememoris Mladenon kaj la lernejanonjn – nun ni prosuferas tion, nin nun preskaŭ neni konas, niaj konatoj ne plu ekzistas, neni povas nin subteni... Nu, bone, ni pluparolu pri Albanujo!

LI ESTAS BELA KIEL ANĜELO, SED NIAJ OPANKOJ ESTAS ŜIRAĈITAJ

Ankaŭ la leŭtenanto Garaŝanino malsaniĝis: Li konstante heroumis, bravumis, sed ankaŭ li vidas, kio okazas kun ni, tial li nervoziĝis, krom tio, ankaŭ liaj intestoj ne funkciis bone.

Li ne atingos Soĉon – diris Vasilio.

Ne boju, Vasilio, se ni senfortiĝis, la animon ni ne perdis, kaj ne perdos!
– mi ne permesis al li mokridi.

Malcedu, nevĉjo mia! – mi alpaŝis la leŭtenanton, ekkaresis lian kapon, ĝi estis varmega, mi jam komprenis kio okazos. Sed kiel helpi al li? Ĉi tie mankas malsanulejo, nun li estas nur en niaj manoj, je nia honesto.

Prenu cigaredon, Miluteno – flustris al mi la leŭtenanto Garaŝanino. Li ridetas kaj per mano palpas la poŝon.

Lazaro Senico demetis la peltveston, kaj surtiris ĝin sur la dorson de la leŭtenanto. Mi levetis la leŭtenanton, kaj metis lin en la sinon de Lazaro, kiu lin tenis kiel infanon, kaj levis liajn piedojn super fajron.

Dormu, leŭtenanto – diris mi. Li ekmoviĝis, enŝovis la manon brusten, elprenis medalionon, „dipatrinon“,

ĝin kisis, demetis kaj etendis al mi, kune kun la ĉeno. Li petis min, forporti tiun Dipatrinon al lia patrino en

Aranĝelovacon.

Mi prenis Dipatrinon, turniĝis, deiris de la fajro kaj ekpreĝis. Helpu, Dipatrino, nun, se vi tion faros iam ajn!

La leŭtenanto Garaŝanino ekridetis: Li aŭdis min! Dankon Miluteno, diris li, sed tio estas vana.

Ŝi helpos ja, ŝi helpos, kiu helpos, se ne ŝi. Al kiu ŝi helpos, se ŝi ne helpos al vi. Vi ja meritis grandaniman helpon. Li ja donis, ho, nevĉjo mia, sian ringon kaj amuleton, por ke ni aĉetu fojnon por la virbovoj. Li ĉiam helpadis, sincerdire.

Sincerdire li min vere turmentis, sed ankaŭ sin li ne ŝparis.

Aŭskultu, infano, ne ŝercu, ne cedu! – mi demetis la kanabkovrilo desur virbovo, envolvis la leŭtentanton, kaj direktiĝis al la komandejo.

Super ni flugis aeroplanoj. Ni atendis bombojn, sed ili eljetis paperojn, kiuj desupre flirtfaladis. Homoj komencis arigadi la flugfoliojn. Kaj legi ilin. Ili vokis nin reveni, kaj resti en siaj hejmoj, same kiel faris niaj fratoj montenegranoj. La homoj la foliojn forĵetadis. Kaj insultis la montenegranojn. Ili ja fidis je montenegranoj – sed tiuj foriris hejmen.

La leŭtentanto Garaŝanino ordonis, ke oni alportu al li flugfolion. Alrigardinte ĝin, li nur elbuŝigis: La montenegranoj! Li, verŝajne, sentis bedaŭron, kaj kapsvingis.

Estus bone, se ni farus same kiel faris la montenegranoj, alia estus nia stato, rezonis mi.

Noktiĝis, la frostoj fortiĝis. La fingroj kunpremiĝis kaj rigidiĝis. Ni ĵetis ankoraŭ unu lankovrilon sur la leŭtenanton. Nu ek, nu ek, nu ek, ĝis la frumatenado. Kaj dum frumateno tio iĝis la plej furioza.

Leŭtenanto, vi ja frostotremas! – diris mi, sed li respondis nenion, li silentis.

Vasilio ĉe la alia fino de la portilo haltis. Atendu – diras li haltante – ni vidu, ĉu li estas viva. Vasilio levetis

la lankovrilo desur la kapo de la leŭtenanto, pripalpis lin, kaj kapsvingis.

Leŭtenanto, diomerda furzo! – mi alpaŝis, kaj tuŝis lin. Demetinte la ĉapon mi krucsignis. Dia volo, knabo mia!

Ankaŭ la aliaj krucsignis. La homoj ekploris. Li mortis senvorte. Vera oficiro. Vera soldato. Serbo vere vera. Mi vere bedaŭris, ke ni ne havis homojn, kiuj insistus, ke ni ne treniĝu tra ĉi tiu fridejo – sed mian koron premegis la malĝojoj kaj fiero pri ĉi tia oficiro.

Ni demetis lin desur la portilo, kaj metis en neĝon.

Nenie ni vidis teron, kiel ni entombigu lin? Nur blanka, neĝa, malvarma monto kaj profundegaĵoj. Kaj la vizaĝo de la leŭtentno – malvarma, sed purpura, dio min pardonu, kvazaŭ spitante la morton kaj malvarmon. Kaj la okuloj malfermitaj, kaj la buŝo malfermita, kvazaŭ li nun ekkrios ordonon, kiel iam, tie, en Serbujo.

Ni foriĝu, homoj – diris Vasilio, montrante per mano al lia vizaĝo. Ĝi estis tuj ĉe niaj ŝiraĉitaj opankoj. Jen, lia vizaĝo estis ĉe niaj opankoj. Li, bela kiel anĝelo, sed niaj opankoj estis ŝiraĉitaj. La koroj volis krevi, ni ja ne estis ŝtalhomoj.

Dum ĉi tiu milito, mi ofte memoris nian leŭtenanton. Ege ni bezonis lin. Ankaŭ en la aprila milito ni ne tiel senpoviĝus, ankaŭ poste la mensogeguloj ne umus nin, ne turmentus nin: alimaniere nia koko krius. Mi ja memoris ankaŭ aliajn, precipe la infanojn, multegajn infanojn, kiuj nun estus plenfortaj, maturaj viroj. Vi, nevĉjo mia, vi kredu, kion vi volas kredi. Vi povas, nevĉjo mia, koleri tiom, kiom vi deziras, ankaŭ mi koleris. Ankaŭ la aliaj. Kiom da fojoj mi kaj miaj parencoj kaj amikoj, ĉi tiel, dum familiaj kaj vilaĝaj patronfestoj, dum festenoj kaj postenteriga kunmanĝado, interparolis kaj memoris pri tiuj infanoj. Ĝuste je Festotago de sankta Vido ni foriris al la ostejo okaze de solena kaj funebra diservo.

Popoj kantis kaj legis la popaĵojn, laŭvice, dum ni staras flanke, ili apartigis la maljunajn batalantojn, ĉar estas ja Festotago de sankta Vido. Kaj alvenis ankaŭ la delegito de la reĝo, generalo, en uniformo. Sed Paŭlo, jen tiel, eksuspiris laŭte, kaj diris: He, se la stultuloj ne pereigus amase niajn infanojn, kaj niajn virojn, ankaŭ la serboj estus konsiderinda popolo.

La generalo iĝis afliktita, tial li komencis mueli, glorante nian venkon.

Sed Paŭlo ekvortis malhezite: Generalo kara, diris li, ni ne estas infanoj, ni scias, kion ni parolas – dio volu, ke ne alvenu la tago, kiam tion ankaŭ Vi en Beogrado komprenos. Se vi ekbezonos homojn por defendi ĉi tiun ŝtatan

foiraĉon, sciu, ke vi ilin ne plu trovos, la serboj ne estas plu tiaj, kiaj ili estis dum la eksaj militoj, forvoris ilin via granda venko.

Jen, nevĉjo mia, tiel estis, vi ja mem scias; se ne estus tiel, mi nun ne estus ĉi tie, en la malliberejo, senkrima, tute kaj absolute senkulpa!

Tamen, vane mi tion parolas, ankoraŭ neniuevitis la sorton.

ONI ĴETAS NIN AL FIŜOJ, SEN FUNEBRA PREĜO

Ni, la serboj, atingis eĉ la maron, kaj trovis tie nian destinon.

Eĉ niaj ostoj fridiĝas. Pavimojn kovras niaj mortintoj, sed barkoj de aliancanoj ne aperis. Poste mi legis ie – tricent naŭdek mil mortintaj serboj restis sur la marbordo de Skadaro kaj Draĉo ĝis Valono. Ne devis nin mortigadi germanoj, ŝvaboj kaj hungaroj, ankaŭ bulgaroj ne devis nin mortigadi – ili povis nin, senpene, al niaj amikoj kaj aliancanoj transdoni, pli rapide nin pereigis la helpo de la amikoj, ol ĉiuj armiloj de niaj malamikoj.

Jen do, sur la maro ni estis, ni drivis super la abismo. Elpelitaj, neakceptitaj: fremdan kompaton ni atendis, sed ĝi forestis. Treniĝis amaso da malsanuloj kaj mortontoj, neniue pri ili kalkulis, neniue ilin respektis. Kaj vere, pensis ni, nin ne respektis eĉ tiuj, kiujn ni per nia kampula ŝvito ŝuldigis, kiuj antaŭnelonge en niaj kampulaj ŝaflanj kovriloj naskiĝis – kial do nin respektu la anglaj kaj francaj sinjoroj.

Stevo Tuleĵanaco ektimis, li vidis malbonon, sed li kuraĝigis nin – liakrede ni ne estas perditaj kaj forgesitaj, niaj aliancanoj estas kristanoj, kaj ankaŭ ni, verdire, estas ja kristanoj. Li esperis, ke ili nin savos, sed kiun ili nun savu, nun, kiam ni jam mortis, sen funebra preĝo.

Vasilio estas tia, kia lin faris dio. Ne volas doni, diris li, la eŭropa sinjoraro siajn belajn barkojn, ke ilin malpurigu kampulaĉoj; rigardu vin, diris li, kaj al vi ĉio estos klara: la aliancanoj ne konstruis siajn barkojn, por ke sur ili agoniu la pedikhavaj serboj, ilin tute ne zorgigas la fakto, ke la serboj pro propra misprudento estas malsanaj kaj fekfekaj. Vi ja vidas, diris li, al kio ni similas: ni estas hordo da skeletoj, vivaj mortintoj. Jen nun, diris li, ni ĉiam penis simili al niaj bravaj prauloj, sed ni, samkiel ili, nun estas mortaj.

Kiu atente rigardis, tiu vidis, ke li parolis la veron. Nu, reale, ĝuste tiel estis. Ni vere malpurigis la barkojn, ĝuste kiam ni estis surterigantaj sur Korfuon! ... Mi estis inter la lastaj, terure estis vidi, kion la skeletoj elvomis.

Malmultaj ankoraŭ povis stari, nevĉjo mia. Ni kuŝis en malsanulejo. En fremdaj kalsonoj, manĝante fremdan panon.

Ankaŭ mortintoj, ili kuŝis amase. Flegistoj konstante elportadas ilin. Ankaŭ min forporti ili alvenis. Kial, ho, kial min! – mi ektimis, sed flegistoj ekridis: la doktoro diris, asertis ili, ke mi estas morta. Kiu doktoro, ho, mi ja scias pli bone ol li, ĉu mi estas viva, ĉio ĉi tio al mi malplaĉis, nur tiam mi komprenis, kiel proksima al la morto mi estis.

Stevo Tuleĵanaco ektimegis. Ĉu vi scias, Miluteno, ke ili ne havas sufiĉe da ĉerkoj por ni, oni nin ĵetas, onidire, al fiŝoj, sen funebra kanto.

Ne sufiĉas, kion fari, eĉ por la oficiroj ĉerkoj ne sufiĉas – mi provis konsoli lin.

He, se ni povus trovi tabulojn, diris li, ni povus fari ordinaran kestaĉon, por ke ni povu lin enterigi. Al li estis malfacile eĉ pensi, ke fiŝoj lin formanĝos. Ni, la kampuloj, diris li, neniam ĝis nun vidis maron. Nun ni ekhavis tiun eblecon, sed ni devas morti. Kaj nutri fiŝojn per niaj korpoj. Vi dum via vivo eĉ ne gustumis maran fiŝon, sed la sorto decidis, ke maraj fiŝoj vin formanĝu.

Nu, kion fari, tia estas nia sorto. Sed vane estas ĝemplendi, prefere ni penu postvivi.

Iom post iom, ni, la postvivintoj, ekpovis stari.

Ni eĉ komencis vizitadi unu la alian. Kaj eliradi el la tendoj, kiel lacertoj, tuj post suneliro.

Ni rigardis la ĉirkaŭaĵon, ni rigardis la maron. Sed ni pensis, memkompreneble, pri Serbujo. Kaj pri nia reveno tien.

Mi memoras, kvazaŭ nun mi tion rigardus – oni elportis sur portiloj iun Brankon, al mi ŝajnas, ke lia familia nomo estis Jovanoviĉo, aŭ Jankoviĉo, mi ne povas tion absolute certe diri, sed mi scias, ke li estis el Kragujevac. Lin elportis soldatoj, li tion postulis, dezirante rigardi la mondon, juna li estis, klera ulo li estis.

Li levetiĝis, kaj sidiĝis sur la portilon. Ankaŭ li rigardis la maron.

Ĉu vi vidas, diru, kiel ĉi tiu maro kvietiĝis, trankviliĝis, ĝi satmanĝis multe da serba karno, diris li, nun la maro kvazaŭ peziĝus, kvazaŭ ekdormetus, kiel grasigita porkino.

Lian okulon mi ne disponas, mi ne konis la maron, unuafoje mi ĝin vidis, sed mi sentis plorurĝon. Mi rigardis lin riproĉe, dum li pluparolis: Same estos ankaŭ post la milito, se iu ajn el ni revenos en Serbujon, ĉio, diris li, kvietiĝos, forgesiĝos, kvazaŭ nenio okazus, kvazaŭ ni, diris li, per bastonoj batadus akvon.

Pli bone por vi estos, se ni vin forportos en la liton, por vi ĉi tiu suno estas malutila, diris mi. Mi vidis ke li estas pala kaj plurloke blua, por la malsanulo eĉ la suno estas malamiko, al multaj ĝuste ĝi donis la lastan baton. Li ne volas, li deziras atendi, vidi la sunsubiron – kaj deklamis ion pri la suno kaj marvastato.

La sekvan matenon oni lin transdonis, memkompreneble, al la fiŝoj. Mi poste denove rigardis tiun maron, kaj pensis pri Branko, memorante, kion

li estis tiam dirinta al mi, kaj mi mem tiam rimarkis, ke la maro peziĝis kaj ekdormetis, ke sur ĝi estas eĉ ne unu trueto, eĉ ne unu punkto tie, kie Branko estis ĵetita, neniel tiu loko diferencis de la aliaj.

KANTAS KAJ PLORAS

Rigardu, nevĉjo mia, min. Kiam vi min rigardas en ĉi tiu mallibereja vesto, ĉi tian, kia mi estas nun, unuokula kaj sunbruna – vi ne povas kredi ke mi eĉ en Afriko estis. Sed mi estis tie. Oni min sendadis, same kiel la aliajn, de unu al la alia insulo. En fremdaj ĉifonoj, sur fremdaj ŝipoj, sur fremdaj maroj, kaj poste en Afrikon. Tie mi konatiĝis kun la majoro, doktoro Ristiĉo.

Ĉi tion mi povus rakonti ankaŭ malpli longe, sed tio ne estus honeste, rilate al la doktoro Ristiĉo. Li nin ĉiujn konsiladis. Foje, foririnte kun ni promeni, li diris: Gardu vin, fratoj miaj serboj, – tiel li vortis, je dio, kvankam tiu homo estis majoro, kuracisto – ĉi tio estas, diris li, Afriko, ĉi tie serpentoj rampas dum ĉiuj sezonoj, ne estus bone, se ne pereus ankaŭ pro la afrikaj serpentoj. Nu, li konsilis, ke ni ne miru, ne enrigardu, ne multe kaŝobservu tion, kio troviĝas antaŭ ni. Oni povas, diris li, multon vidi, eĉ ne enrigardante, verŝajne por ke ni ne ridindiĝu en Afriko, sed tute kaj absolute ne eblas, ke serbo ne enrigardu, ĉio al ni ŝajnis stranga, eĉ la brutoj ne estis tiaj, kiaj estas la niaj, kaj kreskaĵoj – des pli.

La doktoro Ristiĉo konstante instruis nin, kiel teniĝi, kiam ni sur stratojn eliros. Ne estu ridindaj kaj konfuzitaj, rektiĝu kaj rigardu senkaŝe, vi ja estas soldatoj, vi ja estis armeano, kial vi nun hontu, vi estas nek kulpinto nek erarinto, nenies familian domon ĉi tie vi detruis, vi ja meritis ĉi tiun soldatpanon, kiun al vi la aliancanoj donas; vi, diris li, havis siajn domon kaj sian brutaron, vi estis mastroj en Serbujo. Mi ja rigardis vin, li ĝuste tion diris, kaj mi eksentas ploremon kaj plorurĝon. Kiam iu forpasas, vi preskaŭ sereniĝas, ĉar vi ne estas plu ties ŝuldantoj. Tio estas danĝere, diris li, tio povas esti kontaĝa, de generacio al generacio, simile al malsano – memkompreneble, la doktoro estas klera homo, li ĉion scias.

Tiu doktoro Ristiĉo faris ĉien eblan por ni. Li penis laborigi nin, ke ni plenumu terlaborojn, ke ni prizorgu brutojn. Li ja scias, kio serbojn plej facila povas revigligi. Memkompreneble, li deziris, ke ni ne estu similaj al amaso da martiroj kaj senhejmuloj, kiuj hontas kaj pri la aliaj, kaj pri si mem, en fremdlando.

Ĉu vi sonĝas ion, Miluteno? – demandis min foje la majoro, doktoro Ristiĉo. De la sonĝado, diris li, la sano multe dependas.

Mi ne songas – mensogis mi, ĉar mi ne kuraĝis diri: mi songas enterigejon sen tombokrucoj.

Ĉu vi havas infanojn? – demandis li foje, nun mi ne memoras, kiam tio okazis. Mi ne havas, s-joro majoro.

Kial do vi aspektas tiom malĝoja? – demandis li min, li, la bonulo.

Verŝajne ĉar ni eĉ venis tiel malproksimen s-joro majoro, ĉar Serbujto pereis, dum ni tra la mondo vagabondas. Verdire, aŭfable la francoj nin akceptis, dankegon al ili, – mi levis, jen, eĉ la serbĉapon, ĉi tiel – sed kio okazos kun ni post ĉio.

Li kaptis sian barbon, komencis zorgi, mi vidis tion, mi ja ne estas stultulo, tio ne povas esti nur pro Miluteno, tio estas pro nia, serba, sorto. Staris li tiel, rigardis min, rigardadis, kaj diris: Ne foriĝu kaj ne soliĝu, Miluteno, al vi ne estas pli malfacile ol al ĉiuj aliaj; ĉizornamadu ankaŭ vi lignajn soldatbotelojn, same kiel la aliaj, faradu diversajn ŝalmojn, vi ja vidas ke la homoj okupiĝas pri diversaj aferoj, faru fajroŝtonon por cigaroj, por bruligado. Penu ne multon memori, Miluteno! La memoroj povas nin pereigi, ili povas nin velkigi, same kiel prujno velkigas kapsikojn.

Dankon, s-joro majoro – kion alian mi povis diri al li, kvankam mi rezonis: se ni estus bonŝancaj, ni ne estus ornamantaj la lignobotelojn, ni ne estus ĉi tie, malproksime, en la malproksima Afriko, en fremda kuŝejo, ni ne manĝus fremdan panon. Malfremdan panon ni manĝus, malfremdajn montojn kaj alpojn ni grimpus.

Tiujn lignobotelojn diverskolorajn, kaj tiujn ŝalmojn, kiujn ni ĉi tie faras kaj ornamas, tio eble estas la nurajo, kiun la serba soldato akiros kaj kunportos, se li el ĉi tiu infero iam ajn revenos al sia hejmo – jen kion diris al mi la doktoro Ristiĉo, mi ĵuras per miaj okuloj.

Jen, do, rezonis mi, la ornamitaj lignoboteloj estas nia savilo, la ŝalmoj, kiujn ni faras en fremdejo – diris mi mense, svingante la kapon. Sed kiom da ĉi tiuj ŝalmoj ekmuzikos en Ŝumadio, kiom da tiaj lignoboteloj estos plenigitaj per nia brando, kiom da lignoboteloj estos por nupto destinataj?

Doktoro Ristiĉo ekkareis mian kapon, kaj foriris por konsoli aliajn – jen homa homo: lia solfilo pereis traŭrante Albanujon, mortigis lin albanoj, sed li postvivis por kuraci fremdajn infanojn.

Antaŭ ol reveni el Afriko, la doktoro Ristiĉo nin irigis al la serba tombejo, por adiaŭi niajn mortintojn.

Ni nun estas ĉe la tomboj de niaj kamaradoj, kaj neniam plu ni estos ĉi tie – diris la doktoro Ristiĉo – poste dum ŝtataj festoj alvenados diplomatoj, sed – ve al la tomboj, ĉe kiuj larmojn verŝas diplomatoj.

Sur la ŝipo, dum li estis kun ni, iu ekkantis: „Hordeon falĉis knabino el Gruĵo“. Ekkantis ankaŭ la doktoro Ristiĉo. Ho, ĉiela tribunalisto, kian koron li

havas, solfilon li lasis en albanaj ravinoj, sed li kantis, li, tute umita serbo. Kaj ploris!... Sed la doktoro Ristiĉo kantis pro aliaj homoj, li estas pli saĝa ol ni, li scias, ke ni estas popolo pereigita, ni ja ne devis sur koŝmaraj maroj vagaĉi, sur fremdaj ŝipoj, manĝante fremdan panon, sed jen, li kantas, kion fari.

Nu, doktoro – demandis mi lin foje, uzante aperintan eblecon, kiam ni estis solaj – kiu estas tiu Trumbiĉo? Multe en tiu tempo oni parolis pri Trumbiĉo.

Kial vi tion deziras scii? – li alrigardis min, preskaŭ suspekteme.

Eble la homo ekpensis, ke iu sendis min spioni lin – mi ekstremis, sentante min kulpinto. Pardonu min, s-joro majoro – ekpetis mi lin, kaj turniĝis por foriri, sed li min haltigis.

Miluteno – diris li – se pereos tute kaj absolute ĉiuj, pri tio ne estos kulpa Trumbiĉo, ne li venigis nin ĉi tien.

SENVOJEJOJ SUB NUBOJ

Kaj kiam okazis tio sub la monto Kajmakĉalano, la kolonelo Ivoviĉo min alvokis en sian enfositejon – ni ja estas samaĝuloj, eble mi jam diris tion al vi: kiam li ekiris en Kragujevacon, lerni tie, mi lin sekvis, kaj portis lian sakon ĝis Jasenica etponto.

Lo, Miluteno – la kolonelo montris al mi ĉi tiel – ĉi tio estas, jen, la monto Kajmakĉalano, ĝi altas mil kaj ok cent metrojn. Neniam iu ajn popolo Eŭropa militis sur ĉi tia alteco, nenies vojoj por savo de la patrujo kaj ŝtato estis sur ĉi-tioma alteco. Niaj vojoj, diris li, gvidas tra ĉi tiuj nigraj senvojejoj, sub la nuboj.

Ĉu estas eble, ke ni, la serboj ilin transpasos, mense diris mi. Ĉu ni, ĉi tiel malfortiĝintaj kaj malmultiĝintaj, ĉu ni nun devas transiri tiom grandan montaron. Se ili nur ŝtonojn ĵetadus sur niajn vertojn, ili nin senvivigus. Mi ne kredas, nevĉjo mia, mi ja ankaŭ tiam ne kredis, ke sur tiuj altecoj troveblas ia ajn feliĉo por iu ajn krom por agloj. Se mi estus bonaŝanca, tion mi neniam dirus, mi eĉ ne scius ke ekzistas Kajmakĉalano.

Kion fari, kolonelo, ne ni konstruis Kajmakĉalanon, ni ankaŭ ne mezuros ĝin – mi ja ŝajnis min stultetulo, nevĉjo mia, mi ja sciis, kiel oni kun oficiroj devas interparoli – dio ja scias kion li faris, kiam decidis, ke serboj militu sur la plej altaj altaĵoj, verŝajne li decidis montri, kion la homoj povas fari, kaj li elektis por tio ĝuste serbojn. Mi etendis al li tabakujon, por ke li faru cigaron, kaj diris: Eble dio volis la serbojn ankaŭ en ĉi tiu maniero elprovi, kial li por tio ne uzu la altecon, se li tion jam faris sur la maro.

Nevĉjo mia, konfuziĝis la kolonelo Ivoviĉo, li ne komprenis, ĉu mi veron vortigas, aŭ eble mi priridas nian sorton.

Mi veron diras al vi, rigardis min la kolonelo, sed ankaŭ mi rigardis lin. Kial mi ne rigardu lin. Li estas pli ol mi proksima al tiuj, kiuj decidadis pri la sorto de la popolo – kial do ni ne rigardu unu la alian. Mia konscienco estas tute pura, sed li pensu pri sia konscienco.

Ek, nu, Miluteno, ĉiuj ĉi niaj suferoj, turmentoj kaj suferoj niaj en legolibroj estos priskribitaj; infanoj, diris li, nepoj kaj pranepoj niaj lernos pri ni, venkoj niaj ilin kuraĝigos.

Tombejoj niaj ilin kuraĝigos – korektis mi liajn vortojn.

Nu, bone, niaj tombejoj – manfrapetis li mian ŝultron.

Kial vi manfrapas min, rezonis mi, mi ne estas stultulo, kiu pretas vivon sian doni por legolibro, krom tio, mi certe la popolon ne pereigus, nur por ke ĝi estu menciata en legolibroj, sed, kion fari – estu kiel estos.

Ni konkeris Kajmakĉalanon, nevĉjo mia. Kovris ni ĝin per kadavroj. Ankaŭ ĉevaloj en aregoj restis putrantaj sur ĝiaj montodeklivoj.

Nu, antaŭ ĉi tiu dua milito, mi subeniris en vendostraton, kaj renkontis tie Markon Draĵeviĉon. Ni kore kaj fervore salutis unu la alian. Delonge ni ne renkontiĝis, kvankam li ja estas mia malproksima parenco, mia patrino kaj lia avino estis fratinoj de du onkloj.

Kion fari, kien iri, ni elektis la kafejon de Moravĝio. Kaj ĉio sekvis laŭku-time: brando, kafo, interparolo. Mi demandis, kiel fartas liaj samhejmanoj, mi ja aŭdis, ke mia fratino, lia patrino, ŝajne malsanetas. Demandis mi ankaŭ

pri la rikoltaĵo, ĉu ili pretigis ĉion, ĉu la jaro estas fekunda, sed li min demandis rekte kaj inspekte: Oĉjo, ĉu vi estis sur Kajmakĉalano?

Tio al mi estis agrable, nevĉjo mia. Estas bone, rezonis mi, ke almenaŭ iu memoras tiun Kajmakĉalanon, ke ne ĉiuj fajfas pri ĝi, aŭ, kiel la karmemora Branko diris, rigardante la maron desur la insulo de morto, ke ĉio kalmiĝos, ke restos eĉ ne memorero pri niaj suferoj.

Jes, diris mi, kompreneble, mi estis sur Kajmakĉalano. Kaj mi komencis rakonti detale kaj reale. Kaj kiel artileriaj grenadoj komenci eksplodi, kaj kiel ni sturmis, kaj ke pozicioj niaj estis disaj-misaj, pro kio nin bulgaroj kaj germanoj alpafis, kaj kiel malantaŭ ni restadis niaj mortintoj. Kaj kiel ni kisadis la teron, kiam ni transiris Kajmakĉalanon.

Nu, tio estis eraro, – interrompis min Marko – tio estis granda eraro. Kaj li ridis.

Bone, rezonis mi, eraro, sendube tio estis eraro, mi ja scias, ke ni ade eraradis, dekiam ni nian landon forlasis; mi rememoris tiujn niajn ostejojn kaj kadavrojn en Albanujo kaj en la koŝmara maro, kaj la arajn insulojn, kaj eĉ Afrikon.

En ordo, kara nevĉjo, eraro, sed kia eraro, kion ni eraris? – mi volis ekkompreni, kvankam mi sciis, pri kio li parolas.

Vi eraris, ĉar vi tiomope pereadis, kaj ĉar pri tiu pereco vi ankoraŭ ĉiam fieras, jen la eraro. Kajmakĉalano ne estas serba tero. Ne plu validas tio, kio estis en la epoko de Duŝano la Potenca.

Ho, juĝisto Plejpotenca, kial li iris en lernejon, kial li tra Beogrado vagaĉis – rezonis mi, subpremante mian koleron.

Bone, kara mia, sed kial ni tiam kisis la teron? Kial do ni luktis por tiu tero kontraŭ la turkoj en la dekdua jaro? Mi rezonis, nevĉjo mia: ĉu ni ne havis pli gravan farendaĵon, ol pereci en Makedonujo? Ĉu, kara nevĉjo, diris mi, ĉu tiuj, kies estas tiu tero antaŭe sciis, ke ĝi apartenas al ili? Se ili sciis, kial ili ne batalis por ĝi, kial ili ne liberigis ĝin, kial ili nur nun rememoris kies ĝi estas?

Jen, vane estas miaŭi, tia estas nia serba sorto, ni unue pereas, kaj poste meditas, ĉu estis necese, ke ĉio okazu ĝuste tiel. Aliaj popoloj estas maltiaj, ili unue pripensas, kaj, se tio eblas, ne pereas – li malkaŝe priridis min.

Bone, kara nevĉjo, ĉu ekzistas ankaŭ aliaj serboj kiuj pensas kiel vi? – mi demandis, kvankam io sub mia brusto komencis kunpremiĝi.

Min alsturmis bildoj kaj figuroj; mi rememoris la kolonelon Ivoviĉon, kaj la interparolon ĉe lia enfosejo, rememoris mi la pereon de Miliĉo el Kalanevaco, kaj Manojlon el Guriŝevaco – sed, negrave, mi eltenis, ĉar mi volis vidi kio okazas, kaj kion oni nun pensas!

Ekzistas, ĉu vi ne aŭdis, ĉu vi ne legis, ke vin, la Kajmakĉalananojn oni nomas „kajmakĉalanaj hantuloj“.

Mi rigardis, sed io min ĉi tie, jen, komencis sufoki, ekkirliĝis Kajmakĉalano ĉirkaŭ mi, sed mi subpremis tiun senton, la manojn mi bridis, parenco mia li ja estis.

Bone, kara nevĉjo – pluparolis mi kun li milde, kvankam mano mia deziris pugniĝi – bone, sed kiu nin tie, en Beogrado nun nomas „kajmakĉalanaj hantuloj“, kiuj serboj tie tion faras? Mi mense ripetadis, lernejano li estas, studento li estas, li amikas kun aliaj homoj, li legas librojn kaj gazetojn, en arestejo li estis, pro tio li forlasis la edukejon. Se ĉio estus en ordo, li jam delonge iĝus juĝisto, sed jen, li okupiĝas pri politiko. Nu, kara nevĉjo, volu diri al mi, kiuj estas tiuj homoj, kiuj nun, posttempe, iĝis tiel saĝaj?

Li diris, mi ne sukcesis ĉion memorfiksi, mi scias ke li menciis iun Ristiĉon, kaj ankoraŭ iujn literaturistojn. Nun ili ĉiuj skribas kaj parolas, ke ni forrabis Makedonujon kiam ni transiris Kajmakĉalanon. Sed mi, nevĉjo mia, vidas nin kisantaj la teron, kiam ni venis al ĉi tiu flanko de Kajmakĉalano, tial mi sentis, ke tio, kion li parolas, estas maljusta. Kial ni sentis bezonon kisi la teron de Kajmakĉalano, pro kio la makedonoj koleras kontraŭ ni, kaj

nun, mi aŭdis tion, ili eĉ parolas, ke ni ilin okupis en la dekoka jaro. Kial ni ne lasis ilin, ke ili mem liberigu sin, kaj kreu sian ŝtaton Makedonujon, se la bulgaroj tion permesus al ili? Kial Makedonujo por ni estu triobla tomba kelo, kial nun eĉ niaj kleruloj nomu nin kajmakĉalanaj hantuloj, kial ili moke nin nomu tesalonikaj veteranoj, kvazaŭ facile estis iĝi tesalonika veterano. Kial oni forgesas, ke eĉ el la malmultenombraj skeletuloj, kiuj el Ĥalkidiko ekiris kiel jam dekonigita serba armeo, ĝis la militfino pereis pli ol duono... Kial ni fine iĝis ridindaj?

BELAJ VILAĜOJ KAJ URBOJ

Kaj jen, kapitulacis Bulgarujo. La bulgaroj foriris al siaj domoj. Nia komandantaro ne permesis, ke ni iru en Bulgarujon. Des pli bone, ne estas bone esti okupanto, ni ja scias, kio estas okupantoj, pro dio, ne estas ja bone rosti maljunulinojn kaj mortigadi fremdajn infanojn. Mi sentas dankemon al nia komandantaro, ĉar ili interkonsentis kun bulgaroj, kaj ni ne revenĝis por tio, kion ili faris en Surdulico, Toplico, Jablanico, kaj por iliaj aliaj kruelaĵoj, ni ja ne iĝis tiaj, kial ili estis.

Ni komencis peli germanojn. Kaj ili, tiuj homoj, memkompreneble, fuĝis al siaj domoj, ni eĉ atingi ilin ne povis. Vasilio, mi tion memoras, ŝercaĉis: Mal-ve al la germanoj, diris li, la homoj revenas al siaj domoj, sed ni, ni kvazaŭ ne havas proprajn domojn, ni niajn vilaĝojn preterkuris, kvazaŭ preter prizonultombejo.

Ankaŭ al la aliaj estis malfacile, ili preferis reveni, por vidi kio okazis, ĉu vivaj estas iliaj parencoj, sed la oficiroj eĉ aŭskulti pri tio ne volis: nun ne estas tempo, ke la serboj kise-mise salutu sian parencon, ni ja devas transiri la riverojn Savaon kaj Danubon, ni devas liberigi la teritoriojn, sur kiuj vivas sudaj slavoj. Nun realiĝas la militaj celoj de Serbujo.

Ho dio! Eĉ ripozi ni ne povis. Ili prelegis al ni, kiel al lernantoj. Prelegis pri sudaj slavoj. Devigis nin kanti pri frateco kaj samgenteco. Ni ne kuraĝis diri: tiujn kantojn kantu tiuj sudaj slavoj, por ni jam estas sufiĉe, ni jam faris ĉion, kion ni devis fari.

Krom tio, nevĉjo mia, malfacile al mi estis lerni. Mia kapo, kiu jam estas plenplena da nigraj memoroj, ne povis adopti ion novan.

Tamen, nin neniu demandis. Antaŭen, antaŭen! Ni tute elĉerpiĝis en la regionoj, kiuj ĝis tiam estis Aŭstrujaj.

Mi ne povas mensogi – la vilaĝoj kaj urboj tie belis. Ankaŭ la homoj estis bele vestitaj, neniu havis opankojn, neniu havis ŝiritan veston. La mastrejoj estis bele ordigitaj, eĉ ne unu tegolo mankis – eĉ sur porkejoj.

Kaj ni, ĉifonvestitaj kaj truŝuaj, enrigardis tra pordegoj, alrigardis kortojn, pririgardis stalojn, gregejojn. La homoj, sopirantaj siajn mastrejojn, piedis kaj rigardis. Ilin mirigis, ke ĉio estis konservita kaj akurata. Sed la kapitano Topolco, tion mi vidis klare, ne estis kontenta, li ekhontis. Ĉi tie oni militis nek nun, nek antaŭe, ĉi tie oni ne ribeladis – klarigis li, mi ja vidis, li timegis ke ni ridindiĝos, verŝajne li kompatis niajn homoj. Ĉi tie, diris li, oni neniam ribelis, la situacio ĉi tie ne estis, tia, kia estis ĉe ni, ili kun siaj malamikoj interkonsentadis, marĉandis.

Ho, kiel fia estis nia sorto – svingis la kapon Stevo Tuleĵanaco – fioble fia estis kaj nia sorto kaj nia Serbujo, tro multekosta ĝi estis; kial, demandis li, ankaŭ inter ni ne aperis iu, kiu povis interkonsenti kaj marĉandi kun niaj malamikoj.

Nu, vane estas miaŭi, ĉiu havas propran saĝon, propran animon, kaj tio determinas onian sorton – rikanis Vasilio.

Veliĉko Veliĉkoviĉo, serĝento el alia taĉmento, li ricevis distingilon, iĝis serĝento, la uniformon li alĝustigis, streĉis, sin purigis, al mi ŝajnas ke li eĉ parfumis sin, tia homo li estis, verŝajne ne hazarde li havis tiun propran kaj familian nomon, kiu ĉiam sopiris grandecon kaj gravecon, li ŝatis elstari kaj eleganti, kaj jen, ĝuste ĉi tiel, foje haltis antaŭ iu pordego, kie staris du knabinoj. Ili interparolis pri io, estis klare, ke unu el ili forakompanas la alian, kaj Veliĉko Veliĉkoviĉo estis juna homo, li deziras ion demandi, li komencis interesiĝi pri la preĝejo, sed la knabinoj nur ekrigardis unu la alian, kaj daŭrigis sian interparolon, sed, tio estis evidenta, ili rapidis adiaŭ unu la alian, ili ne rigardis al ni, kvazaŭ ni estus fiodora fromaĝo.

Li parolas france, diris mi pri Veliĉko, por igi lin iom pli grava. Li, la viglulo, vere ellernis iom la francan lingvon, tie, en francaj malsanulejoj, en Afriko kaj en Tesaloniko, li ja ŝate amikis kun francoj.

La knabinoj alrigardis unu la alian, kaj disiris, ili foriris senvorte, mi ja vidis, ke ili ne kredas, ke Veliĉko parolas la francan lingvon; mi ja vidus, ho, ke eĉ la plej bonorda kaj plej belaspekta inter ni por ili estis tute neinteresa.

Poste mi rakontis pri tio al la kapitano Topolaco. Mi volonte pri tio parolus ankaŭ al la instruisto el nia vilaĝo, kaj al la leŭtenanto Garaŝanino, kaj al Mladeno Markovo, sed kun la plej granda ĝuo mi pri tio parolus, se mi povus, al la reĝo kaj al Paŝiĉo.

Al la kapitano Topolaco, memkompreneble, tio ne plaĉis. Li koleretis pro la knabinoj. Ili, diris li, ne scias kio estas la armeo, ili neniam havis sian armeon ĉi tie, ili ja pensas, ke ni estas hajdukoj. La etulinetoj, diris li, opinias ke ili estas pli bonaj ol ni, ke ili estas civilizitaj eŭropaninoj. Kaj tiu civilizita armeo, en kiu iliaj viroj servis, pendumadis en Serbujo kaj en Sremo serbajn infanojn kaj virinojn. Memkompreneble, tiu armeo estis pendumanta, ĝi ne

estis serba, la serba armeo al neniŭ revenĝis, eĉ ne unu infanon ni pereigis. Vi povis tion, diris li, aŭdigi al ili.

Tamen, mi ja tute ne emis kun knabinoj disputi, pruvadi al ili kiu estas kia. Se mi estus bonŝanca, mense diris mi, jam delonge mi estus en mia domo, kun miaj veraj parencoj.

La loĝantoj, nevĉjo mia, rigardis nin, kvazaŭ ni ne estus venkintoj. La homoj miris, ke ni, tiel malmultenombraj, kaj ĉifonŝuaj, venkis la armeon, kiun ili kun admiro rigardis dum paradoj.

Jovano Venĉanaco falis sur ŝtonpavimon, li ruliĝas tie, dum lokanoj rigardis lin. Malcedu, Joĉjo – flustris mi al li, ne sciante kiel helpi lin – ĉi tiuj homoj nin ne konas, ili pensos, ke ni ĉi tiujn malsanojn el la domo kunportis, ke ni malsanas denaske, ili ne scias, ke ni ĉi tiujn malsanojn dum la milito akiris, ili ja ne povas scii, ke viva homa estaĵo post nia vojado ne povis sana reveni, ke eĉ ĉevaloj niaj tion ne povis elteni.

Virinoj fortunis la kapojn, ili ne povas rigardi nin: venkinto frapas per sia verto la ŝtonpavimon, ŝaŭmo sur lia buŝo aperas.

Mi rememoris denove la instruiston el nia vilaĝo, ankaŭ Mladenon Markovon mi rememoris, ankaŭ la leŭtenanton Garaŝaninon, ankaŭ mian samaĝulon, la kolonelon Ivoviĉon. Li, la mizerulo, parolis, ke ni iĝas parto de ia granda libro, sed ni, jen...

Ankaŭ tiuj inter ni, kiuj longe elegantigadis sin, por simili al la venkintoj – malgrandiĝis, ili aŭdis, ke nin ĉi tie, en la regionoj, kiujn ni liberigis, oni nomas serblandaj krudaĉuloj, primitivaĉuloj, malnobluloj, eĉ ciganoj.

Nu, se mi jam menciis la vorton krudaĉuloj, mi devas ankaŭ jenon diri al vi... Estis vintro. Neĝo kovris ĉion. Ni iris tra vilaĝo, sed la vilaĝo ne estis kiel la nia, ilia vilaĝo estas granda, pli granda ol niaj urbetoj. Sur strateto – anseroj. Ili havas anserojn kaj anasojn, pa!

Krudaĉuloj, krudaĉuloj! – infanoj kriis, mokis, ŝrikis kaj eskapis malantaŭ pordego. Kaj denove: Krudaĉuloj! Kaj ni estis hontofrapitaj.

Ĉu ni – krudaĉuloj! – Stevo Venĉanaco demetis la pafilon, premis la ĉanon kaj ekpafis al anseroj. Ankaŭ aliaj demetis siajn pafilojn, kaj ekpafis al anseroj. Disŝutiĝis plumoj, gakis la anseroj. Kio okazis, vi, malbenitoj! Ĉesu, ho homoj! – kriis mi, la anseroj neniom kulpis.

En la kortoj, malantaŭ la pordegoj, aŭdiĝis interkriado kaj lamentado pri la anseroj.

Stanko, fuĝ! – mi ektiris lin. Ĉi tio ne finiĝos bone, ĉu vi ne aŭdas, ili pri la anseroj lamentas pli ol en Maĉvo oni lamentis pri infanoj kaj virinoj. Ni rapidis tra la strateto – kaj vojeraris. Penplene ni atingis la bivakon.

La sekvan tagon alvenis civiluloj por plendi pri la anseroj. Nin oni deplojis!

La kapitano Topolaco eliris kolera, videble, li puŝis la ĉapon sur la okulojn. La civiluloj sekvis lin. Ĉiuj estis bele vestitaj – nigraj ĉapeloj, nigraj surtutoj, kun gantoj sur la manoj, la froston ili ne sentis.

Mi tre scivolis, ĉu la kapitano Topolaco nun permesos al ĉi tiuj uloj promeni antaŭ nia linio, kaj per fingroj montradi nin, kiel ŝtelistojn. Mi ne mirus, se oni ankaŭ ĝendarmojn ŝvabajn venigus, por ke ili arestu nin, nin kiuj ilian imperion detruis, jes, tio estus la lasta surprizo de Ĉielo.

Ho soldatoj, vi ja scias, ke mi ne povas kaj ne rajtas diri, ke vi hontiĝis, kaj tial, diris li, mi alproprigas vian malhonoron, ĉar mi dum longa tempo ankaŭ garnadis min per via gloro.

La soldatoj ekhurlis. Ili ĵetadis la ĉapojn en aeron. Mi sentis min tre bone. Mi deziris ekkrii: dankon al vi, kapitano, ĉar vi almenaŭ unu fojon protektis nin, dividis kun ni nian honton kaj malhonoron.

Bona estis la kapitano Topolaco, sed ankaŭ lia sorto estis malfeliĉa. Li estis sendita en frenezulejon. Bedaŭrinde Serbujo ne havis lin dum ĉi tiu lasta milito kaj okupacio.

Nu bone, ni daŭrigu.

Ni eliradis en grupoj, kiel ŝafoj, grege, malgajaj, sentante ian nekularan kulpon, sed samtempe ni kaŝe ridetis, kvazaŭ ni estus kaptitaj dum ŝtelo.

Iru, ho Miluteno, kun mi – alvokis min la kapitano Topolaco – ni iru drinketi.

Mi sentis agrablon, tion mi ne volas kaŝi, baldaŭ ni verŝajne disiĝos, tial ni iru kundrinki. Mi iris post li, en kafejon, kaj li, la oficiro, jen, elektis tablon en angulo, la plej malproksiman, kvazaŭ li ne estus oficiro, tiel belaspekta, li kvazaŭ de iu kaŝiĝus, aŭ hontus antaŭ iu.

Kiam ni pereadis, ni multe kredis – diris la kapitano kaj eksilentis, eĉ ne unu vorton post tio li diris, nur drinkis, glason post glaso. Kiel tiu homo leviĝos, meditis mi, li antaŭ ĉiuj ĉi homoj ridindiĝis. Mi komprenis, kio lin turmentas, pensante: tro malfrue, sinjoroj oficiroj, tro malfrue.

Kial vi koleras, nevĉjo mia, mi ja parolas nur veron.

Ili devigis nin marŝi. Deploje. Ni devas, diris ili al ni, vidigi, kia armeo ni estas, tion petas iu komitato de Sudaj slavoj, ĝian nomon mi ne povis memorfiksi. Ĉi tie estas multaj homoj, diradis ili, kiuj ne ŝatis imperian armeon kaj aŭtoritatulojn, tial ni devas montri, ke ankaŭ ni estas regula armeo.

Ĉu ja ne estis sufiĉe, ke ni disbatis la imperian armeon kaj potenculojn, rezonis mi, ĉu ni ja vere bezonas nun per vundoplenaj piedoj kaj en disfalantaj ŝuoj plandaĉi sur la aŭstruja ŝtonpavimo – sed kion fari, nun estis kreata granda ŝtato.

Ni marŝis, sed mankas tiu akra sono en nia paŝado – niaj paŝoj ne estis kiel iam; eĉ la flagoj niaj ne estis indaj por paradoj – trapafitaj ja ili estis, kaj sangumitaj, pa.

Ankaŭ kantoj niaj ne estis tiaj, ke ni povu fieri pri ili – tio jam ne estas tiuj kantoj, kiujn ni kantis, ekirante defendi Serbujon.

La kantoj nun fariĝis lamentoj – diris Stevo Tuleĵanaco, li ja komprenis, ke neniu emas kanti, ni nun ne scias pri kio kanti.

Forestas ankaŭ la knabinoj, pri kiuj oni parolis, dum ni estis alvenantaj, ŝercaĉis Kosmajaco. Ni ankaŭ ne vidis infanojn, ĵetantajn antaŭ nin florojn, kion multaj atendis, neniu akvokruĉon alportis por trinkigi la soifantojn. Li neniel, diris li, povas kompreni, kial ni paradas, kiun ni kaĵolas. La homoj, kiuj nin vidas ĉi tiajn, povas pensi, ke ni venkis hazarde, aŭ pro iu ega eraro.

Mi ne mokas, nevĉjo mia, ne mi mokas, je dio, la sorto mokas pri ni.

ANKORAŬ NENIU EVITIS SIAN SORTON!...

Alvenis la tago, kiam mi rigardis vagonaron forveturanta al Beogrado. En furgonoj estis soldatoj. Niaj, memkompreneble. La homoj veturis en Serbujon. Ili plenumis sian devon antaŭ Dio, antaŭ la caro, nun ili estis revenantaj al siaj domoj. Baldaŭ ankaŭ ni revenos, mense diris mi. Onidire jam alvenas rekrutoj. Ni kantis „Malnova la soldataro, iras hejmen kun fanfaro“, sed nevĉjo mia, ne estis tiel. Oni ordonis al ni deploji. Denove tohuvabohuo, onidire ni iros haltigi italojn. Tio estas vero, diris la kapitano Topolaco, la italoj deziras iujn urbojn, sed ni ne iras tien, tie estos aliaj, ni ja iras prizorgi ordon.

Okazis tohavobohuo, diris li, lernantoj atakis iun riĉulon, ni iras pacigi ilin, sed pafi ni rajtas nur en la aeron, nur por timigi ilin. Nenikaze en la korpon! ... Se iu tion faros, tiu iros en punlaborejon.

Ho, Miluteno, mi ĵuras per la fastotagoj, diru, kio ja okazas nun, kie estas festado kaj muzikado, fikfekinda estas nia sorto, ĉu fine de la milito ni iĝos ĝendarmoj, aŭ eĉ punlaboristoj; nu, ne estu tiel, mi formoviĝis pisopretekste, kaj malŝargis la pafilaĉon; mi la pafilon, per kiu mi batalis sur Kajmakĉalano kaj sur Bona Kampo, ne volis uzi por timigi la bubaron, mi malvolis, ke oni min igu timigilo. Mi ne volis, ho, ke pro senpripensio senhonorigu mia animo, ke mi pereu en punlaborejo.

La kapitano Topolaco nin rapidigis, sed ne foriĝis, kvankam li estis sur ĉevalo – ankaŭ li komprenis, kio okazas, kaj kio okazos. Ankaŭ li ne emis post tiom da niaj bataloj nun persekuti ordinarulojn, ni ja ne pro tio batalis.

Ĉu scias pri ĉi tio nia reĝo, la oĉjo Peĉjo, cerbumis mi, li ja ĉiam zorgis pri sia armeo.

Ankaŭ aliaj ĝemis. Al la homoj tio ne plaĉis. Ho, se ni tion scius tiam... ĉu por ĉi tio ni pereadis en Kosovo – grumblis Stevo Tuleĵanaco – se Putniko scius ĉi tion, ĉu li irigus nin tra Albanujo.

Ĉu Paŝiĉo nin azenigis? Aŭ eble tion faris tiu Trumbiĉo? – demandis Tanasko Stragaraco.

He, se nun antaŭ ni rajdus la vojevodo Stepo, tio estus vera parado – umaĉis Vasilio.

Kaj tie, apud kastelo, komenciĝis kunpuŝiĝo. Oni nin insultas, tiuj lernantoj, aŭ vilaĝanoj, aŭ laboristoj. Ili fivortis kontraŭ ni! Kaj elprenis armilojn.

Ni ja sciis, kion oni al ni diris. Atentu, ne pereu en punlaborejo, nun, kiam ĉio estas finita; post ses jaroj da milito ni ne enprizoniĝu.

Je dio, aŭdiĝis eĉ kelkaj fusiloj. Preterfajfis pafkuglo.

Ĉu ĉi tie estas ankaŭ tiuj, kiuj kontraŭ ni pafis sur Cero kaj Kolubaro, cerbumis mi.

Haltis mi, nevĉjo mia, apud iu konstruaĵo, trovis rifuĝejon en la tohuvabohuo, sed tiam mia okulo komencis pik-ardi – sparkoj ekfulmis.

Jes, mia okulo. Frapegis pafkuglo muron apud mi, disŝutiĝis mortero, ŝtonero, aŭ io simila, desaltis – rekte en mian okulon.

Ho, aĉoble aĉ, fiega estas via sorto, Miluteno, diris mi mense, ĉu mi invalidiĝos nun, ĉu mi ridindiĝos nun – ĉu la okulon mi perdu nun, pro ĉi tiuj malinduloj!

Mihailo Akinaco umis ĉirkaŭ mi, konsolis min: Pli bone okulo, ol mano, kion kampulo farus sen sia mano, nur ŝafojn la kampulo povus gardi, ĉi tiel vi almenaŭ povos plugi.

Alvenis ankaŭ flegisto, vundisto, li pririgardis mian okulon, kaj diris: La vundo ne estas granda, ne estas danĝera, la ŝtono vin, diris li, tuŝetis, sed via okulo estas senviva. Li min bandaĝis, stringis, envolvis, mi apenaŭ povis ankaŭ per la alia okulo ion ajn vidi, mallarĝiĝis mia mondo. Sed Vasilio rikanis: Diru, Miluteno, vi ja iĝis vundito, nun, en libereco, kiel ni nun venĝu vin? Eble ni komencigu novan militon!

Ho, Vasilio, vi almenaŭ nun povas silenti, vi ne devas uzi ĉiun eblecon por mokaĉi. Tia estas, diris mi, mia sorto, min senokuligis tiuj, kontraŭ kiuj ni ne povas venĝi. Ankoraŭ neniu evitis sian sorton! ...

Miluteno, kio okazas? – laŭ la voĉo mi rekonos la kapitanon Topolacon, sed vidi lin mi ne povis.

Mi ne scias kio okazis, kapitano, al vi mi volis fari tiun demandon.

Poste oni serĉis tiun, kiu pafis, kies pafkuglo resaltis de la muro, derompis morteron, kiu min senokuligis, sed lin oni, kompreneble, ne trovis.

Eĉ se oni lin trovas, ĉu tio helpus min? Ĉiu, kiu pafas, povas senokuligi homon, sed rehavigi la okulon oni ne povas.

En malsanulejo kuŝis rezerva leŭtenanto, Radoviĉo, kiu civilaĝe estis studento. Homo bela, brunhaŭta, kun plaĉaj okuloj, kaj hararo krispa, sed vundoplena; sanfeblo atakis lin, tial li paliĝis, velkis, sed gazetojn li legis, regule. Foje li min alvokis, kaj diris: Ĉu vi vidas tion, vi, kiu braviĝis sur Cero, Kolubaro kaj Virkata Ŝtono, sur Kajmakĉalano kaj Kurba Rivero – li menciis ĉiujn la plej grandajn batalojn niajn – ĉu vi komprenas ĉi tion? Kaj li komencis legi al mi. Tremis la gazeto en liaj manoj, voĉo lia trepidis. Ĉu vi vidas ĉi tion, ho bravulo! La gazetoj estas plenplenaj da rakontoj kaj malriproĉoj pri la nova ŝtato, reĝo kaj registaro. Konstante, konstantege ili skribas, ke ni batalis por la reĝo.

Bone, s-joro Radoviĉo- demandis mi lin – ĉu la reĝo legas tiujn gazetojn? Ĉu li scias, kion oni tie publikigas? Kial la reĝo ne malpermesas tiajn artikolojn, kial li ne punas la gazetistojn, kiuj bagateligas lian popolon?

Vana estis nia batalo – la leŭtenanto Radoviĉo nur ekstremis – ni forpelis la turkojn, sed nun nin umas niaj agaoj kaj bejoj. Ni venkis kaj ŝvabojn, kaj germanojn, kaj bulgarojn, sed nun niaj flataĉuloj liberecon nian malpurigas. Ĉio estas vana, ĉar ni mem malamikojn niajn naskas – fremdajn malamikojn ni ne bezonas, lakeoj niaj, diris li, ĉion pereigos kaj senhonorigos. La leŭtentanto Radoviĉo paliĝis, gutoj de ŝvito rosumis lian frunton.

Bone, nu, sinjoro Radoviĉo, ne ĉagreniĝu, ekzistas kleruloj, kiuj ŝatas sian popolon, ili ne timos tiujn flataĉulon kaj aliajn fetorulojn. Ankaŭ nia popolo povas klerigi homojn, kiujn ni bezonas, kaj kiajn ĉi tiu suferanta popolo meritas. Se ni tiom da kuraĝaj kaj honestaj homoj havis sur sangaj batalejoj, kial ni en paco malhavu honestajn homojn.

Vi ja estas freneza, aŭ naivaĉa! – ekkoleris li, sed mi ne volis al li diri, ke mi estas nek freneza nek naivaĉa, negrave, li pensu tion, kion pensas; sed mi vidis, ke li estas homo, kun kiu oni povas interparoli, tial mi demandis lin pri tio, kio min premis dum multaj jaroj, jam de la momento, kiam nin, la malmultenombrajn serbajn malfeliĉulojn oni irigis en Sremon, por helpi la grandegan Rusujon kaj aliajn slavajn fratojn.

Bone, diris mi, sinjoro Radoviĉo, ĉu nun la homojn, kiuj dum ĉi tiu milito nin gvidis, sidiĝis ie por ĉion sumigi, kaj vidi, kiu kie eraris. Ĉu ĉi tiu ĝibiĝinta popolo havas ajnan parlamenton kaj deputitojn, ajnan komisionon, kiu ĉion ĉi esplori, almenaŭ pro niaj multenombraj tomboj ĉe la riveroj Savao kaj Drino, en Albanujo kaj amara maro, ĝis Afriko, kaj retro, sur la sangokovrita Kajmakĉalano kaj Kurba Rivero. Ĉu iu ajn havas tiun taskon en ĉi tiu popolo, aŭ nur la popolo havas sian taskon, kiun ĝi plenumis – kaj malgrandiĝis, duoniĝis.

Vi, Miluteno, estas freneza! – la leŭtenanto Radoviĉo ne povis elteni, li tremegis, sed mi silentis, rezonante: parolu tion, kion vi deziras, kaj kiom vi

deziras; se mi estus freneza, ĉu mi demandus vin pri ĉi tio; se vi estus homo kun pli fortaj nervoj, vi laŭ mia demando komprenus, ke mi estas nek freneza nek naiva.

Ĉu iu, do – demandis mi lin – antaŭ ni ĉiuj respondecos pro la infanoj, kiuj pereis en la albanaj abruptejoj?

Miluteno, sentaŭgulo – diris Radoviĉo – ne ekzistas tia parlamento, ne ekzistas tia komisiono, kaj ĝi neniam ekzistos, malforgesu tion, neniuj respondecos pro la serba vilaĝanaro. Ĉu eble iu memvole respondecos, mem konfesos ĉion?

Neniu konfesos, neniuj konfesos siajn pekojn, malforgesu tion, Miluteno, oni simple devas plui. Jen, vi vidas kion skribas la flataĉuloj en ĉi tiuj stultaj gazetoj, kiel ili vortaĉas pri niaj „majestaj venkoj“, tute ne pensante pri tio, ke la popolo, kiu perdis duonon de sia kompleta viraro, pri la virinoj mi eĉ ne parolos, ne povas venki dum milito, ĉar tiu popolo perdis ege pli ol oni povas venki dum milito. Kio povas sencigi tiom da pereoj dum ni iris tra Albanujo? Ĉu tion povas ĉi tia ŝtato, ĉi tiu infera danco?

Al mi li rakontis ankaŭ pri Apiso. Kaj kiel oni mortigis lin. Kiel Aleksandro finfaris tion, kaj nun li povas fari tion, kion deziras.

Bone, s-joro Radoviĉo – demandis mi – ĉu tio ne signifas, ke ni ridindiĝis?

Jes, tio signifas ĝuste tion – ekĝojis li – ĝuste tion, Miluteno: ni ridindiĝis.

Kion pri la oficiroj, pri niaj serbaj oficiroj, kiuj kun ni kunmilitis dum tri militoj...

La oficiroj, Miluteno, pleje ridindiĝis. Unu Aleksandron ili ĵetis tra fenestro, alian Aleksandron ili enkondukis tra la vicpordo, nun ili lin flataĉas, la serviluloj, la humiluloj. Ili brustoŝvelas, paradumas kaj pavas, ili nur dum balfestoj rolas «fierajn serbojn». Ili kisas la manojn de tutmonde konataj feklekuloj, kvankam unu milionon kaj ducent mil serbojn forvoris bestetoj, fiŝoj kaj vermoj, kial do tio okazis?

Nevĉjo mia, ne riproĉu min, mi ne lekcias pri historio, mi nur vortigas miajn pensojn, tion, kio premas mian animon.

JEN MIA DOMO, JEN ŜUMADIO

Nevĉjo mia, eliris mi el la stacidomo. Ankoraŭ estis mallumo. Tio ne gravis! Miaj kruroj sciis la vojon.

Eliris mi sur Flavan Rokegon; la mateniĝo blankis. Koro mia dancis, dancadis – jen mia domo, jen Ŝumadio.

Ekiris mi tra Petroviĉa herbokampo, rigardis, eĉ ne unu fumtubo en la vilaĝo fumis. Aŭdiĝis eĉ ne unu hundo, ekmuĝis eĉ ne unu bovo, eklekis eĉ ne unu ŝafo.

Kiom da ili forestas – kiujn en la vilaĝo mortigis aŭstroj, hungaroj kaj germanoj? La nura bonŝanco estis, ke ĉi tie, ĉe ni, en Ŝumadio ne estis ankaŭ bulgaroj.

Mia domo kaj konstruaĵoj malgrandiĝis. Same la aliaj domoj kaj konstruaĵoj en la vilaĝo. Ankaŭ la strateto malgrandiĝis. Ĉien penetris arbustoj kaj trudherboj. Tio estis preskaŭ ridinda, ni larĝigis kaj grandigis la ŝtaton, sed ĉio nia, ĉio utila kaj plezuriga, ĉio kion ni estis havantaj – malgrandiĝis.

Miaj samfamilianoj estis antaŭ la domo, la patrino kaj la edzino, ili leviĝis frue. Tio estas bone, ili estis vivaj, iliaj kaptukoj blankis.

Ne povante elteni, mi ekkriis.

Miluteno, ĉu tio estas vi? – Ĵivana ekkuris al mi sur irejeto.

Jes, Ĵivana – diris mi, kiam ŝi haltis antaŭ mi, preskaŭ ne kredante.

Laŭ la voĉo, tio estas vi, diris ŝi, sed vi tute ne similas al Miluteno.

Mi restis sen unu okulo, Ĵivana – mi alturnis la kapon.

Negrave, diris ŝi, neniu vin riproĉos, ne afliktiĝu, plej grave estas, ke vi revenis viva.

Mia patrino Gvozdenia alkliniĝis, ŝi ne povis kredi, ke tio estas mi – sur mi ja estis vesto franca, kaj dorsosako bovleda – aŭstruja.

Unuokululo mia, ho unuokululo! – la patrino komencis vekrii, ŝmackisi kaj brakumi min. Nu, jen, ŝi min kromnomis „Unuokululo“, kaj tiun nomon ekuzis ĉiuj, krom preĝejaj, armeaj kaj impostaj libroj.

Estas bone, ankaŭ la patrino rekonsciiĝis, estas bone, diris ŝi, ke oni vin ne senmanigis, sed senokuligis. Ankaŭ ŝi sciis, kion la viro, la kampulo, pli bezonas. La kampulo sen mano estas malinda. La senmanulo povas esti nur paŝtisto, sed ni, en Ŝumadio, ne estas paŝtistoj, ni ja devas plugi, grenon faskigi ni devas.

Mia Ĵivana ekridis – ŝi ĝojis, kontenta, ĉar la malfeliĉo estas negranda. Kontenta estis ankaŭ mi, je dio; la aliaj homoj ne estas tiaj, ili koleras pro malgranda gajno, blasfemas kiam Dio ilian grandan gajnon eĉ iomete malgrandigas, sed ni, jen, estas kontentaj ankaŭ post perdo, ni estas feliĉegaj, ĉar la malfeliĉo ne estas pli granda. Ho dio, pensis mi, ĉu Paŝiĉo kaj Putniko konis niajn patrinojn kaj edzinojn, ĉu ili sciis, ke ni estas tiaj, ĉu ili tial tiel uzis nin.

Miluteno, – alvokis min la patrino, venu flanken, estas bone, diris ŝi, ke mi ĝisatendis vin, por povi ĉi tion diri al vi: ni du ĉi tie vivis kiel du monaĥinoj, ĉi tio estis ne domo, sed malplena monaĥejo, ni nutris nin per niaj

propraj manoj, kvankam oni de ni forprenadis pli ol multe pli fortaj homos povus perlabori, ni ŝpinis kaj teksis, sed ankaŭ tion oni de ni forprenadis, tamen la honoron ni malperdis, kaj la nian, kaj la vian, sed tio ne estis facile, precipe al Ĵivana. Mi protektis ŝin, por ke ŝi ne iru en la magistratojn, ne iru en la ĝendarmojn, ne iru sola kun brutoj, eĉ al plugkampo.

Atendu, ho – demandis mi – kial ŝi ne iris sola kun brutoj ankaŭ en plugkampon, ne estis ja eble, ke tie estos ŝvaboj?

Ne ŝvaboj, sed la niaj; ili estis neniom pli bonaj ol la ŝvaboj; pli multe, diris ŝi, niaj ŝtelistaĉoj kaj friponoj forrabadis kaj seksperfortadis, ol tion faris la ŝvaboj kaj hungaroj. Bandaĉanoj povis perforte fari ĉion, kion volis. Ĉion ĉi vi ekscios, Miluteno, sed ĉi tion mi nun parolas al vi, por ke vi ne afliktu Ĵivanan. Ne estu tia, kiaj estas la aliaj. Mi malĝojas vidante armeanojn revenantaj el la milito, neniam revenas tiaj homoj, kiaj foriris, revenas aliaj, ŝanĝiĝintaj, kruelaj al siaj samdomanoj. Vi neniokaze konduku kiel Drago-lubo. Dragolubo batas Perkan, li aŭdis, ke ŝi estis perfortita. Hej, nu, Miluteno, ŝin seksperfortis krimaĉuloj, kaj nun ŝia viro ŝin batas. Kiel ŝi povos ĉi tiun militon forgesi! Kaj kian utilon al Perka alportis via venko. Kaj kian signifon por ni via venko kaj via reveno havos, se ni ne havos kvieton. Gardu la domon, savu la animon, ĝis nun vi savadis la ŝtaton kaj vian vivon, nun savu la domon kaj la animon; se vin, diris ŝi, la domo kaj la edzino ne resanigos, nenia medicino vin kuracos – jen ĉio, diris ŝi, – kion mi volis diri.

Nevĉjo mia, mi ja devas ĉion rakonti eĉ tro detale, kial mi parolu maldetale, la parolado ja estas la nura, la sola animfaciligo, sed ni havas ĝin en la malliberejo nur dimanĉe antaŭ tagmezo.

Mi foriris en la drinkejon de Uroŝeviĉo, mi ja volis ekscii kaj aŭdi de homoj, kio kaj kiel okazis. La trinkejo, memkompreneble, estis plenplena. Violono kvivitis. Tamburino tremis. Miaj militaj kamaradoj kantis. Iuj eĉ ploris. Ankaŭ al la drinkeja kantistino ne estis facile kun ili. La mono ne estas ĉio. Ankaŭ la drinkejaj kantistinoj havas animon.

For! – ekkriegis iu malantaŭ mia dorso. Mi rekonis la voĉon de Pero Uroŝeviĉo. Li estis elĵetanta Manojlon Dikinacon, puŝanta lin el la kafejo. Pero ŝovis lin de la pordo sur la strateton, kaj mi rememoris Vojislavon, la fraton de Manojlo. Mi estis dironta: ne faru tion Pero, Vojislavo ricevis de la kronprinco poŝtranĉilon, tion scias ni, kiuj por li kandelon bruligis, kiuj lin enterigis. Sed mi diris: Ne faru tion Pero, Manojlo estis plurfoje vundita, la homo estas malsana, eĉ brutoj krevadis sur nia sortovojo. Mi ripetas al vi, mi kompatas Manojlon, senfortiĝis li dum la milito, dum Pero grasiĝis kaj fortiĝis, lin manĝis nek malvarmego, nek dormomanko.

Kial vi patrinumas, Miluteno, – saltis Lazaro Ĉarapiĉo, kaptis la gorĝon de Pero, kun la mano sur la tenilo de ponardo – Pero ja, diris li, riĉiĝis dum

ni pereadis, li kun ŝvaboj niajn edzinojn parigadis, kun la ŝvabaj ĝendarmoj li niajn domojn prirabadis, al li tiutempe mankis tute kaj absolute nenio.

Atendu, ho, Lazaro! – mi ne cedis, timante ke li eligos la ponardon, sed mi konstante ĵetadis rigardon al Pero, timante ke li spitaĉos, pro kio li povus perdi la vivon, kiel ŝafido antaŭ Georgfestotago. Sed Pero sciis, kiam kaj kiel oni devas konduti, tial li konfuziĝis, restis senmova, silentis prudente, kompreninte, ke li misagis.

Kion vi atendas – ekkrietis Lazaro Ĉarapiĉo al la aliaj – kial vi ne surrajdas lin?

Homoj alsaltis, ekhurlis, ili Peron tujtuje el la kafejo elpelis, ligis liajn manojn malantaŭ lia dorso. Ili surperiĝis, kaj ekrajdis lin. Unue Manojlo, kaj poste ĉiuj ceteraj. Unu post la alia. Tra la vilaĝo, tra la strateto al niaj domoj, poste suben, al la urbodomo. Tumulto kaj diboĉo. Mi preferus iel liberigi Peron, sed mi nenion aŭdacis fari, ĉar povus okazi io ankoraŭ pli malbona. Mi iris kaj pensis: Pero ĉi tion ne forgesos, alvenos la momento kiam li venĝos. Li multajn kambiojn kaj kvitancojn havas en sia tirkesto, multaj homoj ankoraŭ venos al li petante prunton.

Mi flankeniĝis, kaj ekiris hejmen. Mense mi diris: ne iru en la drinkejon, Miluteno, vi tute kaj absolute ne havas bezonon iun ajn rajdi, lukti kontraŭ maljusteco, vi ja havas proprajn zorgojn, propran domon kaj propran brutaron. La familestroj kaj honestaj homoj por rajdado uzas ĉevalojn, ne najbarojn. Ĉu ne estas tiel? Kial mi rajdu ordinaran drinkejstron, kvankam krudulon?

Se tio, kion li faris, estas la plej granda malbono de nia militado, al la drinkejstro ĉio estu pardonita.

GUNOJ

Mi kultivis la teron kaj riparis konstruaĵojn. Kapabla mi estis. Mi rekovris, aranĝis supertrabojn, pavimis gregejon, faris novan kripon! Ĉiujn arbojn, kiuj al mi malplaĉis, mi forhakis por fari ingon, radrondon, brankardon, direktstangon, ankaŭ jungolignon, stangingon, foldotrabon, forkostangon – ĉion, kion ĉiu bona kampulo bezonas.

Atendu, nevĉjo mia, kial mi rapidu? Kien mi rapidu? En malliberejo mi estas, hodiaŭ ja estas dimanĉo... Se vi rapidas, vi iru, mi vin komprenas, vi estas oficisto. Verdire, mi eĉ miretas, ke vi volas kun mi ĉi tiel sidi kaj aŭskulti min.

Nu jen, mense diris mi, vi estas ĉi tie oficisto, vi eble havos problemojn, vi ja scias, vi nun sidas kaj interparolas kun malliberulo...

Nu bone, bone, se estas tiel – ni plue parolu...

Pasis unu-du jaroj, mi havigis porkinon, ankoraŭ unu-du jaroj, mi kreskigis kvar ŝafojn kaj aĉetis bovidojn.

Mi laboris, akiradis, plibonigis la staton, sed Ĵivanan mi sendadis de unu al alia doktoro, de unu al alia monaĥejo, ankaŭ kuracherbojn ni boligadis, ankaŭ sorĉaĵoj... sed dank al dio... gravediĝis mia Ĵivana, kaj mi ne permesis al ŝi ion ajn labori. Kiam ni bezonis akvon el la puto, mi ĝin elputigis; kiam ni devis prifosi kaj buti maizon, mi ĉion faris mem, eĉ en vinberejon iri mi al ŝi malpermesis, ĉion mi faris sola. Kaj, dank al dio, ŝi naskis nian Radojon. Mi preĝis al Dio, kaj dankis lin por lia donaco. Kvankam eksjuna, mi estis feliĉa, feliĉega, tial mi komencis prilabori la teron ankoraŭ pli impete.

Ne pensu, ke mi ne meritis, ke la najbaroj, parencoj kaj amikoj min vizitu. Ĉar min ĉi tie en la malliberejo neniu vizitas vi povas pensi, ke mi tion ne meritis. Ke mi estas homevitulo aŭ sinamulo, ke la homoj ne fidas al mi, kaj mi al ili. Nenikaze, neniel! Ne temas pri tio. Temas pri io tute alia.

Nu, se vi tion deziras scii – mi al Ĵivana skribis, ke min neniu vizitu. Mi ja pensis: la homoj havas infanojn kaj nepojn siajn, ne estus bone, ke ili min vizitadu, ke pro tio suferu ankaŭ iliaj samdomanoj. Mi ja scias, kiel en nia regiono oni kondutas rilate kun tiuj, kiuj vizitas la homojn kiujn la nunaj potenculoj arestis. Jes, ĝuste tiel estas!

Mi ne certas, ĉu mia Radojo havis kvin aŭ ses monatojn, kiam abrupte aperis impostkolektistoj. Evidente okazos malbono, ilia alveno aŭguras malbonon. Mi, diris ili, ne plenumis mian impostan devoligon. Ili volis forpreni el mia stalo du gunojn, kiuj mi penplene ĵus havigis. Vi tion scias, nevĉjo mia – kiam mi, post nia granda milito revenis, en mia stalo mi trovis eĉ ne unu dukornulon, ĉiujn ja forpelis ŝvaboj kaj hungaroj. Ĉion ĉi mi klare kaj detale diris al la kolektistoj, sed ili eĉ aŭdi tion ne volis: milito estas milito, sed imposto estas imposto.

Ĉu min, ho, oni instruu kio estas milito, kaj kio estas imposto.

Tie, en la ulmaro, ĉe etrivero, ekgrakis korvo, kaj min io tremigis. Sed mi diris mense, graku ĝi, aŭguru ĝi tion, kion ĝi volas, mi la gunojn defendi devas, kampulo sen kornobestoj ne estas kampulo, tia kampulo estas malriĉegulo, tia kampulo mem estas bruto, cepo kaj maizpano, ni ne mensogu nin mem, tia homo estas kalva pelto.

Ne rapidu, ho homoj, ankaŭ mi scias kio estas la milito, kio estas la imposto, mian stalon ne mi malplenigis, mian brutaron ne mi perdis drinke aŭ hazardludante, miajn brutojn pereigis ne apto, sed la milito kaj okupacio. Atendu, ke Miluteno iĝu bonhava, tiam havos kaj la ŝtato, kaj Miluteno – diris mi, sed la kolektistoj eĉ aŭskulti min ne volis.

La leĝo, ho Miluteno, forpelas viajn gunojn, diris ili, ankaŭ la ŝtato havas siajn postulojn.

Mia edzino, Ĵivana, premis la infanon en sur la bruston, ŝi ĉirkaŭiras nin, petis min kvietiĝi. La devo estas devo. Miluteno, diris ŝi, donu al ili la gunojn, ni ja havas infanon, mi ja havos lakton por mamnutri ĝin, ĝis kiam la aliaj gunoj naskos bovidojn, ne igu malfeliĉon, ili ne povas de ni forpreni tiom, kiom ni povas elteni.

Nu, kial nur mia edzino havu lakton, ĝin ja ankaŭ bovinoj devas havi, ho malbenuloj, mi ne povas dum la tuta vivo nur pri la ŝtato zorgi, ho ne, ne estas eble, eĉ al la ŝtato mi ne permesos eksperimenti, por vidi kioma estas mia eltenpovo – tio jam trois – kaj mi ekiris preni hakilon.

Sed mia patrino, Gvozenia, kvazaŭ sciante kion mi faros, staris apud la hakilo, kaj ne permesis al mi proksimiĝi.

Per la hakilo oni domon ne defendas, ĝin defendi oni povas nur per pacienco. Nun vi, diris ŝi, estas patro, ho filĉjo mia: rememoru pri Radojo, ne havu la sorton, kiun havas Kondiĉo. Pli bone estas malriĉuliĝi, ol hajdukiĝi. Hajduki vi ja ne povas, nur unu okulon vi havas, la hajduko bezonas du okulojn, eĉ du okuloj al la hajduko ne sufiĉas. Pli bone estas perdi gunojn, ol prudenton. Jen, rigardu, via maizo estas granda kiel Moravo. La dia planto nin savos, eĉ se la ŝtato nin malsavas, vi plenigos la korbojn, tiam al vi estos tutegale.

Kion fari, mi ne povas ne obei al la vortoj de mia patrino. Mi kalmiĝis. La gunojn mi malligis, kaj akompanis ilin tra la strateto. Mi revenis hejmen.

Kaj prenis inkujon kaj plumon.

Mi ja ne estas analfabeto. Leteron mi skribis kaj sendis al la reĝo sur Oplenaco. Mi volis, nevĉjo mia, vidi kio okazos, kiel nun la reĝo kun mi komuniĝos. Mi priskribis, kiel mi miajn ŝtrumpojn en Skadaro desur miaj piedoj demetis, por doni ilin al la karmemora reĝo Peĉjo, dio savu lian animon, kaj pardonu al li niajn vundojn kaj suferojn. Mi ankaŭ menciis, ke post nia venko sur Kajmakĉalano, mi, kiel elita soldato honorkisis la flagon je la nomo de nia regimento. Mi memorigis la reĝon pri la ordono, kiu estis legata antaŭ ĉiuj soldatvicoj, en kiu li, je la nomo de la patrujo kaj krono dankis al ni, al la ŝumadianoj por la konkero de Veterniko...

Mi povus, rezonis mi, skribi, skribadi pri la meritoj, kujn mi akiris, servante la ŝtaton kiom da fojoj mi ja konsolis homojn, petis ke ili ne plendaĉu, kiom da fojoj mi anticipis Vasilion, interrompis lian paroladon, kvankam mi pensis same kiel li; kiom da fojoj mi ion prisilentis pro la ŝtato... se oni konsiderus nur tion, kion mi prisilentis, kion mi al la ŝtato pardonis – ne povus okazi, ke oni gunojn el miaj staloj forpelas. Mi la veron skribis, al la reĝo mem, al Oplenaco... Kial mi ne skribu al li?

Al Oplenaco..., mi ne adresis la leteron al Beogrado, ĉar mi rezonis: Beogrado estas lia tronloko, en Oplenaco estas lia hejmloko... nu, ni ja estas sampatrujanoj, preskaŭ najbaroj, lia patro kaj ni iam estis najbaruloj.

Ĉion mi komponis en bela maniero. Mi ne estas homo, kiu la ŝtaton ne komprenas, ĝi ne estas mia vicpatrinaĉo, ĝi ja estas mia, ĝin ni estigis. Nu bone, lia praavo nin gvidis, sed ankaŭ ni, mi ja uzu vian esprimmanieron, ankaŭ miaj praavoj ne estis malpli meritaj. Nu, ĉu ne estas tiel? Kion Karaĝorĝo povus fari sola, se la aliaj ne estus sindonemaj kaj fervoraj, se ili pri Serbujo ne zorgus, kiel pri propra hejmo, ni ĉiuj ja tiutempe estis unuecaj, ĉiuj postsekvis lin senpripense, sed ankaŭ nun ni, la posteularo, ne estis malpli meritaj. Tion li devas scii, kiu povas tion scii, se li ne scias. Li ja ne estis tia reĝo, kiaj estis iuj aliaj, li estis kun ni sur militpozicioj, en ŝlimaj tranĉeoj. Ĉu ne estis tiel? Li ja gvidis nin en la mil naucent dekdua jaro, ni glorigis kaj lin kaj nin, sen ni li ja ne povus tiel triumfe elmontriĝi antaŭ la estontaj generacioj... Nu, jen, se vi tion deziras aŭdi, ni ja povos kun fiero renkontiĝi ankaŭ kun niaj prauloj, kun niaj mortintoj, ankaŭ kun niaj propraj praavoj, kaj kun nia karmemora Gvidanto, kviete ripozu restaĵoj liaj.

Ĉion mi klare komponis. Mi priskribis ankaŭ kio okazis kun miaj gunoj. Mi ne plendis, sed mi petis, ke oni atendu, ke miaj gunoj unue nasku bovidojn. Kial ne estu tiel? Por ke mi iĝu bonhava, por ke poste mi taŭrojn kaj virbovojn vendu kaj buĉu por la bezonoj de la ŝtato, sed la gunojn doni... neniel. Do, ĝis tiam la registaro kaj la reĝo bonvolu ja atendi. Ĉu ne estas tiel, la registaro kaj reĝo apartenas al iu alia popolo, ĝu ili ne estas niaj, kampulaj.

Mi skribis, kaj atentis la paperon ne malpurigi kaj ne ĉifi – vi ja scias, kiaj estas niaj manoj, manoj kampulaj, neniam oni povas el ili forigi la malpurajĵon.

Sed ĵivana antaŭtimis. Kio vi estas, Miluteno, kiu rajtigis vin skribi al la reĝo, kio ja okazus, se ĉiuj pri siaj zorgoj al la reĝo skribus, la reĝo ja havas pli gravajn farenadaĵojn, pli gravajn zorgojn, li ne povas zorgi kaj prizorgi la zorgojn de la kampuloj. Ne skribu, Miluteno, ni ja havas nian filon, la skribado ne estas nia tasko, nia tasko estas fosado kaj plugado. Kaj plenumado de aliaj kampulaj farenadaĵoj. Via skribado povas malfeliĉigi nian domon. Vi ja konis Majstoroviĉon, Miluteno – li leteris, kaj nun liaj samfamilianoj ĉetere serĉas lin, demandas pri li, sed li malaperis, tute kaj absolute.

Vi ja scias, en ĉi tiu nia lando la homoj timhezitas skribi, oni ja malamas la homojn, kiuj skribas. Tio veras, onidire tiel estis ĉiam, tial ankaŭ mia patrino timis la skribadon. Ne faru tion, diris ŝi, Miluteno, neniun la skribado feliĉigis, vi faru viajn farenadaĵojn. Vi ja havas vian infanon, vi ja havas edzinon, kaj domon, havos vi ankaŭ brutojn. Tion, kio nin nun trafis, tio estas puno, ĉar vi ankaŭ dum diaj festotagoj laboris. Pri ĉi tio ne kulpas via reĝo, pri ĉi tio kulpas vi mem – vi ja senarbustigadis la kampon dum la tago, kiu estas dediĉita al sanktuloj.

Zorgu pri nenio, patrino – diris mi, ne povante al la maljuna kaj simpla virino klarigi, ke la reĝo ne estas ĝendarmo, ke li estas homo nobla, ke li estas

pranepo de Karaĝorĝo, ke miaj prauloj kune kun Karaĝorĝo ĵuris antaŭ la ĉefpopo Atanasio, ke mi kune kun la reĝo Albanujon trairis, kaj tra Veterniko revenis.

La patrino jen, ĉi tiel, rigardis min, malkredante. Diru, Miluteno, diris ŝi, ĉu vi eble dum la milito faris iun pekon, eble vi ion desur iu mortinto forprenis – horloĝon, ĉenon, ŝtrumpojn? Ŝi min rigardis, rigardadis.

Jes, konfesis mi. Jes, sur la Stermova remparpozicio. Mi demetis la boton desur la piedo de unu nia samgentano el la Aŭstruja armeo, mi ĝin demetis, sed ne vestis, mi ĝin ĵetis.

Nu, Miluteno, kial do vi miras, ke oni nun forprenis viajn gunoj, Miluteno, ĉiu homo portas sian krucon. Tiel estas deĉiame.

Nu, ni vidos, ĉu estas vere tiel, ĉu oni ankaŭ pro tio devas suferi. Se estas tiel, tiam ĉi tiuj niaj samgentanoj el la Aŭstruja-hHungaruja armeo neniam havos gunojn. Tie, sur Stermovo, mi eble ja misfaris, tamen tio neniam plu reokazis, sed mi faris ankaŭ multajn bonaĵojn. Jen, mi ne permesis al Vasilio buĉi kaptitajn bulgarojn.

Vasilio venis – mi nun ne memoras ĉu pasis du aŭ tri tagoj de kiam oni miajn gunojn forkondukis. Vasilio rikanis – la tempo estis pasanta, ĉio ŝanĝiĝas, nur li ne ŝanĝiĝis. Ni, diris li, ekzistigis grandan ŝtaton, ni havigis al la ŝtato eĉ marbordon, sed viajn gunojn oni forkondukis por kovri vian impostŝuldon.

La gunojn oni ne forkondukis ĉar ni ricevis la marbordon – rezonis mi, ne volante diri al li, ke mi pri ĉio jam skribis al la reĝo sur Oplenaco, mi ne volis pri la letero trumpeti, mi preferis atendi, ke alvenu ĝusta moment opor tio. Tamen, mi atendis tro longe...

Monatoj pasis dum mi atendas.

ONI NE RAJTAS ARESTI FAMILIESTRON

Se ni estus tiaj, kiaj iam estis, la reĝo respondus al mi skribe, mi ne atendus lian respondon pli ol unu monaton; sed ni ne plu estis tiaj, kiaj ni estis iam, nun ni estas Granda ŝtato, ni ne plu estas Serbujo malgranda, nu, kampula; kaj hajduka, kiam tio estas bezonata – mi sidis sub antaŭpordo, vespermanĝis kaj meditis, glutaĵoj ŝtopis mian gorĝon, kvazaŭ mi manĝus sorpon.

Mia Ĵivana alvenis kaj sidiĝis sur la benkon apud mi. Vi, Miluteno, ial koleras, tio ja videblas. Vane, diris ŝi. Lo, nia Radojo kreskas, ni havas grenon, ĝi sufiĉos ĝis la sekva rikolto; mi teksis sufiĉe da drapaĵo, nia porkino estas graveda. Ankaŭ la vetero estas ĝuste tia, kian oni nur deziri povas. Dank al dio, lo, ni povas sidi sub nia antaŭpordo, ni povas rigardi ĉi tiun belejon kaj

ĉarmejon, negrave ĉu vi rigardas al Oraŝaco, aŭ al Oplenaco – ĉio ĉi min ne konsolis, kvazaŭ Oraŝacon kaj Oplenacon konstruigis la registaro kaj la reĝo por ke ni rigardu ilin; kvazaŭ ili dirus: jen al vi, al la serboj, al la kampuloj – Oraŝaco kaj Oplenaco, la lokoj historiaj, jen al vi herbejoj kaj defensejoj – nun ni ne plu devas pensi pri vi.

— Ne blekaĉu! – diris mi al ŝi. Kaj lasu min kvietita. Faru viajn farendajojn, min vi ne konsolu. Min jam ĉio tedis, ĉu ne estas tiel, ne estas la plej grava la antaŭpordo kaj ĉio ĉirkaŭ la antaŭpordo, en la stalo kaj ĉirkaŭ la stalo. Mi tiel rezonis, kiam aŭdiĝis pordega knaro, la hundo ekbojis, aperis ĝendarmo, li alportis alvokon, ke mi venu en la ŝtatoŝtationojn, al la ĉefo mem. Sed ne forgesu jenon, – diras la ĝendarmo – mi ne deziras vin konduki tien ligitan. Ĝuste tiujn vortojn li diris, mi ĵuras je mia ununura okulo!

Ho dio, rezonis mi, jen, ĉiu sentaŭgulo, eĉ tiu ĝendarmo, opinias, ke li povas ligi homon, famiĉestron; ili, je dio, forgesis, ke niaj prauloj regantojn mortigadis kaj forpeladis, ĝendarmojn ligadis, en porkejojn enfermadis, porporkajn manĝaĵojn al ili manĝigis kaj trinkigis, kaj, kiam tio estis bezonate, per kverkoligno saĝigis iliajn kapojn.

Nu, miru nek pro la alvoko, nek pro la ĝendarmo, filo mia – alpaŝis min mia patrino, kaj jen, ŝi ĉi tiel sidiĝas sur benkon apud mi.

Antaŭnelonge, diris ŝi, mi gardis miajn ŝafojn ĉe Koŝutico. La tago estis serena, belegega, postfojno jam verdis, korvoj aperis elpost monto, traflugante la ĉielon, grakante.

Bone, rezonis mi, ne povas de birdoj dependi ankaŭ nia sorto. Mi ekiris por vidi, kie mi estis, kaj kion mi faris en ĉi tiu mondo, kion mi signifas por la ŝtato, kaj kion la ŝtato signifas por mi.

Pro kio, ho, mia stalo senbrutiĝis, kiu min igis preskaŭalmozulo; ĉu mi ion disipis en drinkejo, diboĉante, ĉu mi kartludante senbrutis la stalon, ĉu mi senmoniĝis en luksaj banlokoj!? La reĝo, la registaro kaj la politikistoj komencis tiun kverelon, ili ekis la militon. Hom, kvankam vi estas nia reĝo, vi ja tion devas kompreni. Vian kronon mi savis. Atendu, pro dio, ke la gunoj plenkresku, ke ili nasku bovidojn, por ke Miluteno ankaŭ la bovidojn kreskigu, por ke Miluteno ilin vendu, kiam ili iĝos virbovoj, tiam tio sufiĉos kaj por Miluteno, kaj por la ŝtato, ne povas la ŝtato preni ĉion, ne povas Miluteno resti senhava kaj malprava, la ŝtato ne estas mia duonpatrinaĉo, mi ja ne estas ĝia duonfilo.

Mi eniris la oficejon, vestita konvene – nur en novaj vestoj, kvazaŭ mi irus al eŭkaristio. Kaj la ĉapo. Kaj la ĉemizo. Drapkitelo. Opankoj novaj, sesvica rimenaro. Vera ŝumadiano!

La ĉefo sidis ĉe sia tablo, li ne levis la kapon, ŝajnis okupatecon. Li ne alrigardas min, sed demandis: kial vi eniris tiel ŝlimŝua.

Mi tuj komprenis kio okazas, kaj kiel ĉio finiĝos. Li min eĉ ne alrigardis, sed diris, ke mi estas ŝlimŝua: li volis konfuzi min, igi min ĉifono: sed vane – mi silentis.

Tiam li rediris: En la ŝtatan oficejon oni ne eniras en ŝlimaj opankoj.

Mi ne estas ŝlima ĉar mi malrespektas la urbodomon, sed ŝlimaj estas niaj vojoj kaj stratetoj, ŝlima estas la lando kaj la popolo – respondis mi kviete, ne dezirante streĉi la situacion. Mi ne volis klarigi al li, ke mia Ĵivana verŝis sur miajn manojn akvon, por ke mi povu lavi min, ke mi la ungojn pritondis, kaj sur la manoj, kaj sur la piedoj, ke mi nur purajn vestojn surmetis, ĉar mi en la ŝtatan oficejon ekiris pro mia afero kun la reĝo. Mi eĉ komencis bedaŭri, ke mia patrino tiel ĝojis dirante: Nun vi, Miluteno, eĉ kun la karmemora reĝo oĉjo Peĉjo, se li estus viva, povus ja kune sidi, ne sentante honton...

Ĉu vi povas, Miluteno, demeti la ĉapon, kiam vi eniras ŝtatan oficejon? – la estro leviĝis, ekpaŭtis, li rigardis min, deziras leporon enpeli en mian koron. Ĉu vi vidas ĉi tion? – li montras al mi bildon de la reĝo, pendantan sur la muro – en lia mano estis mia letero, kiun mi sendis al la reĝo sur Oplenaco.

Mi ja vidadis lin dum tri militoj. Sed koncerne mian ĉapon, ĝi ne estas facile demetebla – mi montris al li mian serbĉapon. Ĉi tiu ĉapo estas soldata, diris mi, sub ĝi mi dum ĉiuj militoj militis, same kiel miaj prauloj. Ni, s-jro estro, havas ĉi tiun ĉapon sur la kapo, por ke ni ne devu demetadi ĝin, kaj kiam tio estas bezonata, kaj kiam ne estas bezonata. Scias la reĝo, ke ĉi tiu ĉapo ne estas demetebla – jen, tiel mi parolis al li, sen ĉirkaŭumado.

Kion vi, ho, pensas, ne trotaksu vin! – ekkriis li al mi.

S-joro estro, ne kriaĉu kontraŭ mi, nur diru, kie vi estis dum la milito? – demandis mi lin, nevĉjo mia, ĉar mi sciis, ke li estis ŝvaba oficiro.

Kiu rajtigis vin demandi min pri ĉi tio, kiu vin povigis? – li konfuziĝis, sentante malagrablon.

Nu, jen, s-joro estro, jen pri kio temas. La reĝo kaj mi estas militaj kamaradoj, ni kune dum tri militoj militis, kaj mi al li, al mia militfrato, skribis, tial mi nun deziras scii, ĉu li estas tiu, kiu permesis, ke inter li kaj mi, kiel decidanto estu iu, kiu kontraŭ ni militis.

Kia rilato estas inter tiu milito kaj via letero kaj via imposto, ĉu vi scias kion vi parolas, kaj kion vi skribis?! Ĉi vi opinias ke la reĝo ne havas pli gravajn farendaĵojn, ol zorgi pri viaj gunoj? – li svingis tiun mian leteron.

Aŭskultu, s-joro estro, mi ne petas la reĝon min avancigi aŭ burokratigi, mi ne intencas rondiri ĉirkaŭ lia kortego, ankaŭ liajn balfestojn mi ne partoprenos; mi la reĝon pro miaj gunoj bezonis, ankaŭ li min plurfoje bezonis, jen kial mi min turnis al li, al mia militfrato, kune kun kiu mi estis kreanta Grandan ŝtaton...

La estro min interrompis: De tiaj, diris li, kia vi estas, nun la ŝtato devas sin defendi.

Atend! Ĉu de mi la ŝtato devas sin defendi, de mi, sen kiu ĝi ne ekzistus! Sed li, li kapjesis, konfirmis, ke ĝuste de mi li devas defendi la ŝtaton.

Se estas tiel, tiam ĉio estas misa, tiam la ŝtaton ni tute ne devis krei.

Sed li, furioza – volis min aresti, en malliberejon, diris li, li min enpuŝos.

Nu, tio ne estos tiel facile, s-joro estro. Ŝumadian famiilestron oni ne povas aresti tiel facile, mi ja ne estas oficisto, ankaŭ oficiro mi ne estas, nek ŝtelisto, nek politikisto, vi min aresti ne povas. Tion vi ne povas pro la reĝo, kiu al vi mian leteron donis. Scias la reĝo, kiu gardas la ŝtaton kaj la kronon. Vi povas aresti iun ajn alian, laŭ via bezono kaj emo. Burokratojn vi aresti povas, ĉiufoje kiam vi tion ekdeziras. Ankaŭ la oficiron vi aresti povas. Eĉ la popojn aresti vi povas. Sed vi ne povas aresti Ŝumadian famiilestron. Tion ĉiuj reĝoj ĝis nun sciis, precipe la niaj, serbaj, kampulaj.

Kion vi diras! – ekkriegis la estro. Kian kampulan reĝon vi mencias, vi, hontindulo! Lia majesto, la reĝo de Jugoslavio, ne estas reĝo kampula, nomi lin reĝo kampula estas, diris li, ofendo.

Tamen li estas kampula, kompreneble, ne povas ja la reĝo esti nobela, se lia popolo estas kampuloj. Alia afero estas, ke li vin en silkon kaj veluron envolvis, sed oni ne vivas per silko kaj veluro, ne, oni ja tion scias... scias tion ankaŭ la reĝo. Li ja vidis, kiu eltenis de la dekdua ĝis la dekoka jaroj, diru tion al li, sentime diru kion Miluteno vortis, mi ja volas vidi, ĉu li min arestos pro tio.

Sed la estro ŝajnis sin nekomprenanta. Li promenetis, nervoziĝinta, mordis la lipharojn. Li ne komprenis, diris li, kial li min ne povas aresti; li ne estas, diris li, el nia regiono, li venis el la eksa Aŭstrujo, tial li ne komprenas, jen, kial li ne povas min aresti.

Nu jen, simpla estas la afero, s-joro estro – vi ne povas, ĉar Miluteno estas famiilestro. Kaj la famiilestroj ja estas popolo! Kaj la popolo estas tio, kion bezonas kaj la caroj kaj la reĝoj, tiuj, kiuj la ŝtaton akiris kaj malpereigis. Memkompreneble, famiilestroj, kiuj sian teron prilaboras, kiuj per sia laboro siajn infanojn nutras. He, tion vi devas scii, la famiilestrojn vi ne povas aresti. Niaj reĝoj tion neniam permesis. Ĝis nun, kaj mi kredas, ankaŭ post nun. Scias ili, kio ili estas, kiuj estas la famiilestroj Ŝumadiaj, ili ja scias, kio estus ili, reĝoj niaj, se ili ne havus niajn famiilestrojn, ili ja scias, kio okazus kun la ŝtato kiu famiilestrojn afliktus. Ĉion ĉi mi diris al la estro. Ankaŭ, ke al la reĝo sur Oplenaco li diru ĉion, kion mi diris. Ĉion.

La estro koncentriĝis. Li promenetis. Frotis sian barbon. Rigardis min, kaj kapsvingis. Kio okazus, diris li, se la reĝo ĉiujn kampulajn leterojn, viajn petojn kaj lamentojn, ricevus en siajn manojn. Li miras, diris li, ke ni, la kampuloj, ĉi tie en Serbujo, volas interparoli kun niaj regantoj, ĉiufoje, kiam

ni tion ekdeziras. He, nun tio ne eblas, diris li, tiuj tempoj forpasis. La ŝtato ne plu estas tio, kio ĝi estis, ankaŭ la suvereno ne estas plu via, kampula suvereno.

Je dio, mi subite komprenis ĉion. Leksandro eĉ ne vidis mian leteron. Ĉion ĉi liaj oficistoj implikis, sub preteksto ne ĝeni la reĝon – tion mi sentis. Ĉu ĉi tion ĝuste ĉi tiel volis la reĝo, rezonas mi, aŭ lin aliaj konvinkis, aŭ nun ĉio nia estas detruita, ĉar ni havas grandan ŝtaton? Negrave kial, sed tio estas malbona.

GRENO, VIRBOVO, MORTIGO DE LA REĜO

Mi rigardis fruktĝardenon, mi rigardis plugkampojn, vinberejon, brutaron, sana mi estis, dank al dio. Jes, dank al dio, mia sano konstante boniĝis, post ĉiu jaro, mi iĝis pli forta. Mi eĉ imagi ne povis, ke min atendas tio, kion mi ne esperis. Mi apogis min al la homoj, kaj la homoj apogis sin al mi, tia ja estas nia serba moro, ĉiam ekzistas domoj kaj homoj al kiuj oni povas fidi. Sed, tamen, sincerdire, la dinaro estas kiel rado. Mi memoras, kiel se tio okazus hieraŭ, sed mi ne povas diri precizue, en kiu jaro tio estis. Okaze de Ĉieliro de Dipatrino, mi ŝarĝis ĉaron per greno, ekveturis al vendostrato, kaj vendis ĝin. Mi prenis monon – sed sentis honton. Ĉu estas eble, ke la greno nur tiom kostas? Mi rigardis la monon. Mia tutjara laboro ne valoras, kiom unu salajro ĝendarma, kvankam mi estas familiestro.

Nu, bone, ankaŭ tio pasis.

Mi plukis fazeolon. Ĝi abundis kiel kratago, ĝu! Mi alportadis ĝin, korbon post korbo, kiam Ĵivana min alvokis, ŝi kriis ke mi iru hejmen. Malfeliĉo okazis.

Mi tuj ekkuris.

Mi kuris sur ŝparvojo, tra fruktĝardeno mi enkuris la korton, kaj vidis mian Radojon ploranta.

Kio okazis Ĵivana?!

La patrino, diris ŝi, ventrenpikis la virbovo.

Mi enkuregis la domon; mia patrino, mi tion vidis, estis forpasonta. Ŝi penplene ekridetis.

Ĵivana, kuru al Lazaro Ĉarapiĉo, li jungu ĉevalojn, venigu la doktoron! – tiutempe mi ankoraŭ ne havis proprajn ĉevalojn.

Sed mia patrino kapsvingis, la virino sciis, ke vane estus venigi la doktoron.

Alvenis ankaŭ Vasilio – li rigardas mian patrino. Poste li alrigardis min. Kaj kapsvingis. Li vidas kio okazis.

Ĵivana elkuregis el la korto, alkriante Lazaron Ĉarapiĉon.

Mi prenis hakilon – la virbovon mi volis hakumi. Mia patrino militojn eltenis, la domon konservis, edzon siajn perdis, kaj filojn, sed nun virbovo ŝin mortigis. Mi ĝin vendociele nutris, esperis plibonigi la mastrumon, ĝi estis mia espero, sed ĝi mortigis mian patrinon.

Mi eniris la stalon, la virbovo premiĝis al muro, rigardis, kvazaŭ sciante, kion ĝi faris. Sed Vasilio estis malantaŭ mia dorso. Li kaptis la tenilingon. Lasu tion – li parolis pri la hakilo. Ni ne venĝis eĉ al pli grandaj kulpintoj pri nia sorto. Ĝi, li parolis pri la virbovo – neniom kulpas, vi ja esperis progreson.

Li forprenis la hakilon, kaj irigis min en la domon. Kion via patrino dirus, se vi venĝus al la virbovo, rekonsciiĝu, Miluteno! Vi la virbovon bezonas por ĝin vendi, monon vi bezonos, por starigi tombmonumenton por via patrino.

Alvenis Lazaro Ĉarapiĉo kun doktoro, sed mia patrino jam forpasis.

Dia volo, Miluteno – diris al mi Lazaro – ni ŝin inde entombigos, laŭ moroj niaj, Ŝumadiaj.

Nu, jen granda konsolo, entombigi ŝin laŭ niaj moroj, Ŝumadiaj – rezonis mi, sed kion fari.

Vasilio rigardis mian forpasintan patrinon, rigardis min, li videble ŝanĝiĝis kaj malĝojiĝis. Jen, diris li, Miluteno, vi ĉiam fidis al kornbrutoj; jen kian utilon ni havas de bonaj virbovoj.

Tamen, de virbovo oni utilon devas havi, kio alia povas esti utila, meditis mi poste, kaj denove virbovojn grasigis. Alian eblecon ni ne havas. La plej grandan monon la kampuloj ricevas por bonaj virbovoj. Ses – sep portajon portis mia virbovo, utilo sekvas utilon, kaj la stalo iĝis pli kaj pli plena.

Mi ne aĉetas specialajn vestojn. Ne aĉetas multekostajn piedvestojn. Kion mi bezonas en la domo, tion mi faras mem, aŭ havigas en la vilaĝo. Ĵivana min riproĉis, ĉar mi al ŝi ne aĉetis novajn ŝuojn. Pasis, diris ŝi, jam dudek jaroj, de kiam mi tion promesis al ŝi. Tamen, ho virino, eltenu ankoraŭ kelkajn jarojn, ke ni havigu ĉion bezonatan, tiam mi aĉetos ŝuojn por vi, nun mi ja kolektas monon, por aĉeti ĉevalojn.

En tiuj jaroj komenciĝis konsiderindaj malfacilaĵoj, ni devis defendi la brutaron de «Golubaca» muŝeto, fruktĝaredenojn de raŭpoj, grenon de melampiro.

La homoj miaŭas, sed mi pensis: dio donu ke ĉi tio ne estu aŭguro, kaj post ĉi tio ne okazu io ankoraŭ pli malbona.

Estis pluvtempo! Nebuliĝis. Oni nenion povis labori ekstere, mi estis en la stalo, striglis la ĉevalojn, fajfis. Subite aperis Mihailo.

Vi, Miluteno, fajfas, ĉu? – Mihailo rigardis min mire.

Mi fajfas, kial mi ne fajfu?

Ĉar oni mortigis nian reĝon – diris Mihailo kun la mentono tremanta.

Mi rigardas lin, ne povante kredi. Ne estas bagatelaĵo, mortigi reĝon, ne estas, je dio, kvankam tio ne estias la unua fojo, ĉe ni oni jam mortigadis reĝojn, sed tamen. Sincerdire, mi ne scias kion pensi. Mi sidigis sur la fojnjon, ne povante kompreni, kiu mortigis nian reĝon. Mortigis, ĉu vere?

Ĉu tion denove faris oficiroj? – demandis mi.

Kial oficiroj, kion vi parolaĉas? – ekkoleris Mihailo, nervoza. Oficiroj mortigis la reĝon Aleksandron Obrenoviĉo, sed la reĝon Aleksandron Karaĝorĝeviĉon mortigis aliaj homoj.

Nu, bone, kiu lin mortigis?

Mi ne scias – diris li – oni mortigis lin en Francujo.

Tuj kiam li diris, ke oni lin mortigis en Francujo mi rememoris, ke mi aŭdis kaj legis en gazetoj, ke li en Francujon forveturis.

He, tio estas granda umaĵo, io ne estas en ordo.

Lin ne mortigis serboj, tio estas la plej malbona – diris Mihailo, kaj alvokis min en la lernejon, tie, diris li, ariĝas homoj!

Mi forĵetis la striglilon, kaj kune kun Mihailo tuj ekiris al la lernejo. Tie jam ariĝis multaj homoj – la instruisto parolis pri la karmemora reĝo, dio savu lian animon.

Bone, instruĉjo – demandis mi lin – kial nia reĝo devis veturi en Francujon?

Li veturis tien, por fari aliancon kun francoj kaj kun Eŭropo, se nin atakos germanoj kaj italoj. Grandan taskon li estis plenumanta, sed pereis – diras la instruisto.

Nu, diru, kiu lin mortigis? – demandis mi la instruiston.

Lin mortigis kroatoj kaj bulgaroj – diras la instruisto, sed mi tion ne povis kompreni; ne estas eble, ke ili aŭdacis fari tion.

Ili devus pli serioze rilati al la serboj. Dum la lastaj militoj, ni montris al ili, kio ni estas – kaj kiaj ni estas. Min tio konfuzis. Konfuzita mi estis, nevĉjo mia, jam de tiam, kiam tie oni min senokuligis, nu, nun mi estis ankoraŭ pli konfuzita: nian reĝon oni mortigis. Hej, ho, tio ne estas bagatelaĵo. Kiu aŭdacis reĝon nian mortigi? Mi estis ofendita, por mi la reĝo ja ne estis ia sanktaĵo, sed tamen, nia li estis, serbo li estis. Jes, min turmentis premento.

Ĉu ekzistas iu, kiu povos venĝi lin, la martiron? – demandis Radojka, la edzino de Ĵivomiro. Ŝi malligis la kaptukon, kvazaŭ mortus ŝia propra frato.

Mut! – alkriis mi, sed Mihailo kontraŭstaris.

Kial ne venĝi lin, ĉu ni, la serboj, estas la plej malgravaj uloj en la mondo, ĉu iu ajn perfidulo povas senpune mortigi nian reĝon. Ni ja ĵuradis, ni preĝadis pri li, kune kun li ni militis, ĉu nun li forlasu ĉi tiun mondon, kvazaŭ li estus ordinara orfo.

Vi, ho, Mihailo, martelas, kvazaŭ ni mem neniam estis mortigintaj nian reĝon. Kiu mortigis Gvidanton, kiu mortigis la princon Mikailon, kiu forpelis la reĝon Milanon. Kiu mortigis la reĝon Aleksandron kaj la reĝinon Dragan? – Vasilio surtiris la serbĉapon sur la okulojn, li apenaŭ ridetis kaj parolis, paroladis.

Nu, tio estas io alia, Vasilio. Se li kulpis kontraŭ iu ajn, li kulpis kontraŭ ni, nin li irigis tra Albanujon, trans la amaran maron, trans la monton Kajmakĉalanon kaj Bonan Kampon, per niaj ostoj li konstruis insulojn de morto kaj bluajn tombejojn, do se lia morto estas bezonata, ni mem povis fari tion, ni ja ne bezonis mondajn friponojn – mallaŭdis lin Mihailo, kaj same faris la homoj kiuj estas ĉe li. Ĉiuj ektumultis kontraŭ Vasilio.

Nu, homoj, kalmiĝu; ni aŭdu, kiel pereis la martiro? – mi volis kvietigi la homamason, tial mi petis la instruiston, ke li diru al ni ion pli detalan.

Heroe, diras la instruisto, heroe li pereis. Li ne volis surmeti kirasan ĉemizon. Same, li ne volis en kirasaŭton sidiĝi... Li sidiĝis kaj veturis en malfermita aŭtomobilo, li plene fidis al la francoj, ili estas niaj amikoj, se ni iun ajn amas, la francojn ni amas, ili ja meritis tion, kaj la reĝo sciis, ke ili nin amas, nin, la serbojn.

Je dio, vi vere povas fieri, li pereis heroe, sed oni lin mortigis insidaĉe, kaj la serboj estos malbenitaj, se ili lin ne venĝos. Ne kvietos liaj restaĵoj, kaj la restaĵoj de lia patro, nu ankaŭ la restaĵoj de Karaĝorĝo, li ja estas ilia posteulo, antaŭ ol la serboj lin venĝos – komencis vorti Radojka, pli elokvente ol ĉiuj aliaj. Aliaj virinoj, memkompreneble, nur suspiris, kaj per la randoj de siaj kaptukoj viŝas larmoj, kaj Radojkan neniu povas silentigi.

Silentu jam, ho virino, ne parolu pri venĝo! Ankaŭ ni mortigis ilian Radiĉon, se ni venĝados reciproke, kiam ĉio ĉi tio finiĝos. Al mi ne plaĉas, nevĉjo mia, ia ajn venĝo, mi ne ŝatas la sangon kaj krimojn, jes, mi tion malŝatas, tute kaj absolute.

Kiun Radiĉon? Ĉu vi Radiĉon komparis kun nia Aleksandro, ĉu vi ne scias kion Radiĉanoj faris en la mil naŭcent dekkvara jaro en Zagrebo, ili, ho Miluteno, la serbojn atakadis pli aĉe ol Franciskanoj! – senhalte vortis la instruisto. La Radiĉojn oni devis mortigi jam en la mil naŭcent dekoka jaro, kiel militajn krimulojn, Radiĉoj ja torturis la serban landanaron en Kroatujo.

Mi ne scias, ĉu Radojka aŭdis aŭ ne aŭdis la instruiston – sed ŝi denove eklamentis pri la reĝo, kvazaŭ pri propra frato.

Ligu la kaptukon – diris mi al Radojka – kaj ne venenu nin, infanoj vin aŭdas, saĝiĝu, vi grizhariĝis, sed vi ne scias kie estas via loko, je dio; iru hejmen, okupiĝu pri viaj farenaĵoj. Je dio, mi diras al vi, nevĉjo mia, eĉ sen ŝia vekriado sufiĉis tie la amarsento kaj malĝojo.

La popolo larmis, virinoj ploraĉis. Ankaŭ mi sentis plorurĝon. Ploris ankaŭ militintoj, grandaĝaj homoj, ploris ili kiel infanoj. Tiam aperis Grujo

Lazareviĉo, opankisto, li iris sur strateto, rapidis el la urbo, rigardis antaŭ sin, rapidegis, deziris kiel eble plej rapide veni hejmen, al la patrino kaj frato, mi vidis tion.

Jen Grujo – diris Mihailo – nun li ŝvebas sur nuboj.

Ne sur nuboj, sed tra timejo, Mihailo! Li ne ĝojis pro tio.

Memkompreneble, li ja pafis al la bildo de la reĝo en la kafejo de Vuliĉeviĉo, nun oni, anstataŭ li, en Marsejlo trafis la reĝon.

Mihailo, sidu via langon malantaŭ la vango! – diris mi al li, sciante kio povas tujuje eksplodi, sed Mihailo ne obeis.

Ni devus strangoli ĉi tiun... – Mihailo montris al Grujo.

Strangolu, sed unue vi devos strangoli min – mi staris ĉe tiu pordo, ne permesante, ke ni nun strangolu unu la alian, pro la mortinta reĝo; mi rezonis – vere, Grujo pafis, sed en kafejo, al la bildo li pafis, sed li ne pafis kontraŭ viva homo; ordinara bildo, kaj viva reĝo, tio ne estas same; Grujo pafis en politikon kaj, finfine, lia patro, Obreno, estas nia homo, el nia vilaĝo. La malfeliĉulo pereis dum la lasta milito. Tamen, ĉio estis vane, la homoj agitiĝis, ĝuste ĉi tiu Mihailo hieraŭ insulte menciis la patrinon de la reĝo, sed nun li volis strangoli Grujon, oni ja ne rajtas mortigi la reĝon de la serboj.

Kalmiĝu, ho homoj! – denove ekkriis mi. Ne estas kulpa Grujo la opankisto, aliaj estas kulpaj – mi ne permesos, ke pri ĉio respondecu Grujo. Ho homoj, pripensu: meze de Beogrado oni mortigis Radiĉojn, ĉi tiuj en Marsejlo mortigis Karaĝorĝeviĉon, kaj ni nun strangolos Grujon la opankiston – ĉu tio ne estas troe?

Kial vi, Miluteno, konstante kompataĉas pri tiuj Radiĉoj. Radiĉo ofendis la serban popolon. Radiĉo demandis, diris li, kiom kostas la serba sango, verŝita dum militoj, por ke li kvitigu la ŝuldon...

Ne tempoperdu pro Radiĉo, ĉar Grujo eskapis – grumblis iu, sed mi staris ĉe la pordo. Me defendis Grujon.

Post kelkaj tagoj mia Ĵivana alvenis kaj rakontis al mi: ŝi renkontis Grujon Lazareviĉon, kaj li fanfaronis, ke li aŭdis, ke oĉjo Miluteno lin defendis.

Vi tion bone faris, Miluteno, bone estas helpi homojn, tio ne revenos al vi kiel malbono, Grujo agon vian ne forgesos – tiel ŝi parolis al mi tiam, nevĉjo mia, kvazaŭ ŝi scius, ke proksimiĝas malbona tempo.

FESTADO EN TEKERIŜO

Iun vesperon mi estis prizorganta brutojn – mi sternis kuŝpajlon, nutris porkojn kaj ŝafojn, Ĵivana melkis bovinojn, ĉio estis tiel, kiel dio ŝatas. Mi

brustoŝvelis, mi liberiĝis de ĉiuj malfacilaĵoj, ĉio iĝis bona; virbovoj kiel ŝipoj, ankaŭ ĉevalojn mi aĉetis, novajn jungaĵojn, mi planis eĉ kaleŝon konstruigi, se mi tion povos, kial ankaŭ mi kaj la miaj ne ĝuverturu iomete – sed tiam enabruptis Paŭlo. Li alvokas min iri en Tekeriŝon, tie oni festos dudek kvin jarojn de nia granda venko.

Mi konsentis. Kial mi ne iru – hejme oni min povas anstataŭi: dank al dio, Radojo jam havas dekkvin jarojn, li povas kaj manĝigi kaj trinkigi la brutojn; mi ja volis ankaŭ la ordenojn promeni iomete, same kiel la aliaj – oni vidu, kiaj ni estis, kiam tio estis bezonata.

Al Ĵivana tio ne plaĉis. Ŝi rigardas min tiel buntan – mi surmetis peltkitelon kaj mantelon kun ses vicoj da rubandoj, novan serbĉapon, novajn opankojn kun ses vicoj da rimenoj, plus ordenojn, brile brilajn. Ĵivana kapsvingis. Vi tion ne bezonas, vi estis tie, kiam tio estis bezonata, kial vi iru nun, sidu en via domo. Ŝi songis, diris ŝi, Mladenon, la filon de Marko, iranta tra Prostrugo, kun libro en la mano, kaj homamason, kiu eliris por lin saluti.

Tamen, songo teruras, songo forkuras – mi ne obeis al ŝi. Kun Paŭlo mi ekiris suben sur Prostrugon. Ni direktiĝis tra strateto.

Subite min io ekskuis – kial ŝi ĝuste antaŭ la festo songis la mortan batalinton? Kial ĝuste Mladenon, la filon de Marko, ŝi lin apenaŭ konis, krom tio, kun la liaj, kun Jeriniĉoj, ni estas parencoj.

Mi iras kun Paŭlo, sed Mladenon, la filon de Marko mi ne povis forpeli el la kapo. Kia homo, kia cerbulo, kia belulo, vera bonulo!

Kiel li parolis pri Serbujo al ni, al la ordinaraj kampuloj kaj soldatoj, tio ĉiam povis varmigi niajn korojn. Sed jen, la milito forportis ĉiujn la plej bonajn kaj la plej bezonatajn homojn.

Kion do mi diru al vi, nevĉjo mia? Sur Tekeriŝo ariĝis grandega homamaso.

Alvenis homoj de ĉiuj flankoj. Paŭlo kaj mi, jen, ĉi tiel, estis kiel unu animo. Ni rigardis, ĉu tie estas iu konato.

Muziko – ĉiuflanke. Kaj tendoj. Oni rostas virŝafojn kaj porkidojn. Sur ŝtipostabloj – rostaĵo. Drinkaĵojn oni englasigis. Ĝuego, jes.

Ĉe tablo sidis la kapitano Ĵivkoviĉo el alia taĉmento, nun kiel civilulo – mi sentis animan faciligon, lin mi ne vidis de la naŭcent dekkvara jaro, mi eĉ ne sciis, ĉu li estas viva.

Mi etendis la manojn, por saluti la bravulon de la monto Cero. Estas bone, ke tiaj homoj ankoraŭ vivas, dum tiaj ekzistas, ni ne devas zorgi, vere, pri la sorto de la popolo kaj ŝtato. Mi ekiris renkonte al li, sed li – ŝtoniĝis. Eĉ ne unu moveton li faris. Kiu vi estas? – demandis li min.

Ĉu estas eble, ke li min ne rekonis – mi ektemis, sentante malagrablecon. Mi haltis preskaŭ gambkune, salutis lin soldate, kaj diris al li ĉion direndan,

mian propran kaj familian nomojn, municipon kaj armean distrikton. Mi portis vin vunditan – diris mi, kaj turniĝis por montri la lokon, kie li estis vundita, ĝi videblis de ĉi tie.

Vi tion ne devis fari – li interrompis min – fakte ne indas, ke vi faris tion! Li rigardas oblikve, desube turnante la glason en la manoj. Sidiĝu tien – li montris al mi lokon sur la benko apud si. Alpuŝinte teleron kun rostaĵo antaŭ min, li plenigis mian glason per vino.

Ne estas bona momento por rostaĵo – mi forpuŝis la teleron, kaj komencis menciadi la nomojn de vunditoj kaj pereintoj. Li min ne aŭskultis. Drinku kaj silentu, diris li.

Mi gustumis la drinkaĵon, supozante ke tio estas vino – sed tio estis brando, rebakita slivovico. Mi misglutis, sed ne vidigis tion. Malfeliĉulo, vin io venenis, la brandon oni ne drinkas el glasego, mense diris mi, kaj pluparolis. Mi menciis al li Radovanon Banoviĉon el Bukoviko, leŭtenanton Manojloviĉon, kiu antaŭ sia taĉmento vundita sturmis Kajmakĉalanon, mi menciis al li Milojon Joldiĉon, kaj Radivojon Jovanoviĉon kaj la fratojn Vukaniĉojn.

Vi ĉiam parolaĉas – diras li, kaj denove plenigis mian glason. Mi malplenigis la glason glute-tute, kaj daŭrigis la menciadon de mortintoj: Milanon kaj Ivanon Popoviĉon, du fratojn volontulojn, la filojn de Adamo, la serĝenton de la taĉmento de lernantoj – Miĉon Petroviĉon, Stanojon la tamburiston, Bogdanon Ristiĉon.

Multon vi memoras – la kapitano denove plenigis mian glason. Mi la tuton engorĝigis, skuiĝis kaj daŭrigis menciadi niajn pereintajn kamaradojn.

Kiel vi vivas, se vi tiom memoros? – la kapitano drinkis kaj fiksirgardis min. Li dentogrincis kaj singultis.

Kiel vi vivas, se vi devas tiom multe drinki? – mi ne volis demandi lin, mi ne estas freneza, mi ja scias kial la oficiro drinkas, des pli dum la festotago en Tekeriŝo.

Laŭtparoliloj ekkriaĉis. Ili aŭdigis ies paroladon. Neniu forlasis la tendon, neniu foriris por aŭskulti pri la partoprenantoj de la batalo sur Cero. Ĉiuj umis telerojn kaj glasojn.

La kapitano Ĵivkoviĉo leviĝis. Ni iru, diris, en Tekeriŝon. Li ekiris, ŝancelpaŝis, kaj kroĉiĝis al la tablo. Kaj ekploris kiel infano. Miluteno, diris li, ni malestas. Ni perdiĝis en ĉi tiu mispacaĉo.

Sinjoro kapitano, ne parolu tiel, junuloj rigardas nin. Mi foririgis lin el la homsvarmo, kaj komencis promeni kun li. Sed li nur suspiris. Kaj ĉesis plori. Malebriiĝis li. Mi neniam vidis, ke oni tiel rapide malebriiĝis.

Miluteno – diris al mi la kapitano Ĵivkoviĉo – iru hejmen. Sed sciu, ke la serboj neniam plu faros tion, kion ni tiam faris en Tekeriŝo, pri tio mi, diris li, konvinkiĝis dum ĉi tiuj dudek kvin jaroj.

Ĉu vi vere tion opinias – mi rigardas lin. Li frapetis mian ŝultron, kaj diris: Iru hejmen, nenion vi ĉi tie povas trovi, nenio estas prikantinda, ĉio jam estas finkantita, Miluteno, mi ne estas ebria.

Mi vidis, ke li ne estas ebria. Kaj mi komprenis, kio lin malebriigis.

Mi devis senti zorgon, nevĉjo mia, mi ja ne ŝajnigas, simplas tio, mi estas homo. Mi ne scias, kial vi, homoj kleraj, havas tian opinion pri ni, pri la kampuloj. Ni, ja, eĉ pri niaj brutoj ne pensas tion, kion vi, la kleruloj, pensas pri ni, kvankam vi alivestiĝis antaŭnelonge, vi ĵus forĵetis la opankojn kaj piedvolvaĵojn... kaj vi forgesis viajn antaŭulojn. Nu, jen, mi nun opinias, ke dum la pasinta milito pereis, kaj en Albanujo estis senvivigitaj tiuj lernantoj, kiuj sciis kio ili estas, kaj kiaj estis iliaj antaŭuloj...

NE SCIAS LA INFANOJ, KION ILI PAROLAS

Mi plektis branĉpalisojn. Radojo helpetis al mi – estis bela tago por tia laboro. Subite aŭdiĝis la preĝeja sonorilo, alvokisto komencis kriegaĉi. Mi ne sciis, sed sentis, ke okazis io nova, ke denove koviĝas ia komplikaĵo.

Miluteno, ho Miluteno! – Mihailo vokis nin veni en la lernejon. Mesaĝis la instruisto, ke ankaŭ ni, la batalintoj, alvenu, ke ni surmetu niajn medalojn, kunportu standardojn. Estas rompita, diris li, la pakto kun la germanoj.

Atendu, ho, ĉu la germanoj alidecidis, ĉu ili forpelis nin, aŭ nun la niaj denove umas?

Nian hontagon ili nuligis – ĝojis Mihailo.

Nu, rezonis mi, tro frue estas ĝoji, nuligi la malhonoron ni devos post tio, facile estas disŝiri kontrakton – merdon al dio, kaj al ĉiuj diuloj, ĉi tio odoras je milito.

Vestiĝinte, mi ekiris post Mihailo. Kion fari, mi devas fari tion, kion faras ĉiuj aliaj.

Milivojĉiĉo el Obarako alvenis, portante standardon, li vokis min iri kune kun li. Mi evitumis, standardon porti mi ne deziris. Ankaŭ lin mi konsilis rezigni tion, kial li portas tiun standardon, tiu standardo estas serba, pornupta, ĝi ne estas ŝtata, jugoslavia.

Milivojĉiĉo eĉ aŭdi min ne volis, li ŝatis porti standardon – juna homo li estis, li ne militis, li ne sciis kiom grava estas la standardo.

Al Ĵivana tio ne plaĉis. Ŝi kapsvingis. Kial vi iru, Miluteno, inter infanojn kaj instruistojn, vi jam, diris ŝi, plenumis vian devon, ne permesu, ke vin, dekoritan kaj ornamitan, oni por iu malfeliĉo misuzu kaj sendu en arbaron; prefere vi ne iru kiel ansero tra nebulo, ĉi tiu tohuvabohuo finiĝu sen vi.

Prudenta estis mia Ĵivana, sed kiel obei ŝin, mi jam diris al vi, ke mi ne povis apartiĝi de la aliaj. Do, mi foriris al la lernejo.

Nin, la tesalonikajn veteranojn, oni lokis je la frunto de kolono, kaj irigis al la vendokvartalo. Tie ja estis ĉeftumulto. Tipa serbaĵo. Sur la strato – lernantoj kaj standardoj. Kriado kaj kantado. Same estis ankaŭ en la naŭcent dekkvara jaro, post la mortigo de tiu princo en Sarajevo. Ankaŭ tiam oni antaŭgajis, kvazaŭ la milito estus jam gajnita. Same nun ili ne estas pli saĝaj. Ankaŭ nun ili forlasis lernobenkojn, levis standardojn, insultis, kantis, ĝojegis kaj jubilis. Oni neniigis la pakton kun Hitlero. Per plena voĉo ili kriis: „Pli bone sub glavo, ol esti sklavo!“ Kvazaŭ oni permesos al ili elekti tion, kio por ili estos pli bona, kvazaŭ ili ne estos samtempe kaj sklavo kaj sub glavo, tio ja neeviteblas, kvankam malbone estas kaj esti sklavo, kaj esti sub glavo.

Do, ni, la tesalonikaj veteranoj, iris, jes, vere, tiel, antaŭ ĉiuj, antaŭ la infanoj, ni, ĉi tiel kriplaj. Vestitaj bunte, ŝumadiece. Brilegis ordenoj kaj medaloj kiujn ni sur multegaj batalkampoj meritis. Ĉirkaŭ ni oni kriaĉis, dankis Anglujon, kiu helpis al la serboj neniigi la pakton, faligi tiun registaron, establi novan registaron, kiu sendube nin militigos, subtenante la anglojn, sed mi rezonis: la angloj ne estas frenezaj, la angloj plenumas siajn farendaĵoj, al ili estas tutegale kiom da serboj malaperos, same ja estis ankaŭ dum la antaŭa milito.

Haltu! – ekkriis iu. Nin haltigis infanoj, lernantoj. Dume fotistoj, jen ĉi tiel, haltis antaŭ ni, ili lokiĝis, volis foti nin, tial mi kovris la okulojn per la manoj, mi ne sentis fotemon, mi ja ne sciis certe, kion ĉi tio signifas, kio okazas, krom tio, la foto, tion oni ja scias, restas porĉiame, oni povas ĝin ŝovi ankaŭ en gazetojn, kaj eterne ŝajnos, ke mi influis la sorton de la popolo. Kvazaŭ mi provokus ĉion ĉi, vi ja bone scias kion signifas fotografajo, ĝi povas hazarde aperi ankaŭ en arkivo, kaj poste mi ne povos pruvi, ke mi estas nur ordinara ŝumadiano, ordinara kampulo... Kion plu diri: foti sin oni devas post milito, ne indas fari tion anticipe, krom tio, mi ne deziris, ke oni insulte menciadu la nomon de mia patrino, ke, kiam komenciĝos pereado, oni demandu, kien nun forbloviĝis tiu oĉjaĉo, kiu medalumita kaj bunta provokis la militon, kaj eĉ fotiĝis.

Mi rememoris, nevĉjo mia, kiel estis antaŭ la milito en la mil naŭcent dekkvara jaro. Ankaŭ tiam oni multe ĝojis anticipe, kiam en Sarajevo estis mortigita tiu princo kaj lia edzino. Sed kiam iĝis danĝere, malaperis la kriorioj kaj bruemuloj, ili formoviĝis.

Forigu, ho oĉjo, la manon desur la okuloj, – kriis al mi knabo, eble lernanto, eble studento – ne hontu, diris li, honti devas la princo Paŭlo.

Tamen, kial honti devas la princo Paŭlo? – mi tion ne sciis, sincerdire, Karaĝorĝeviĉoj ja neniam estis kontraŭ tohuvabohuo.

La princo Paŭlo devas honti, – la knabo kraĉis, jen, ĉi tiel, apud min, kaj liaj okuloj ardiĝis – li estas perfidulo de la popolo!!

Bone, rezonis mi: se vi ĉi tion konkludis pri la princo Paŭlo, peka estu lia animo; ne estus, rezonis mi, bone, se vi senkiale la homon nomas perfidulo; tamen, se vi pri ĉio ĉi estas certa, kaj se vi pri ĉio havas pruvojn... Ĉiu ja pentos pro sia misago, eĉ se temas pri la princo Paŭlo. Dume ili ĉesis okupiĝi pri mi, satskoldinte kaj satriproĉinte min ili forturnis al mi la dorson, foriris serĉi alian, kiun ili povos moki kaj hontigi, parolante konstante pri la popola honoro.

Nu bone, mi demandos ankaŭ pri la princo Paŭlo, por kompreni, kion li fakte volis, kion li fakte faris, tiam mi scios, ĉu li estas perfidulo, aŭ, eble, li vidis pli multe, pli bone, kaj pli malproksime, ol ĉi tiu bubaro.

Sincerdire, nevĉjo mia, mi ne estas stultulo, mi vidas tion, kion mi vidas, jam nubiĝis, ege nubiĝis; denove resonado de nuptofesto, denove iun „regnon ĉielan“ oni mencias, iun Kosovan batalon oni pretigas – timas mi, la politiko estas prostituado, ĉiu hoko tiras al sia loko, por mi pli bona estas tiu, kiu estas pli malmultekosta, kiu verŝas pli malmulte da sango, mi ja timis malprofundan saĝon kaj vanan bravumadon, konstante antaŭ miaj okuloj reaperis amasoj da mortintoj kaj vunditoj el la antaŭaj militoj, tial mi rezonis: eble ili reaperas ankaŭ antaŭ la princo Paŭlo. Mi vidos, verŝajne mi poste ĉion ekscios, ĉio ĉi devos klariĝi.

Ekiris mi apud pluvtuboj kaj vendobudoj, elŝoviĝis mi el la urbo, konstante irante apud muroj, kvazaŭ mi kulpiĝus antaŭ iu, kvazaŭ mi, dio min pardonu, kvazaŭ ankaŭ mi estus perfidulo; mi demetis la medalojn, malornamiĝis, kaj sentis faciligon, mi sentis min malpli facilanima.

Mi iris hejmen kaj vidis ŝarĝaŭton, plenan da armeanoj kaj kanonoj. Kaj deie venis kelkaj popoloj. Kion ili volas? Kien ili iras? La armeanoj kantis. Verŝajne ankaŭ la popoloj kantis, sed tio ne aŭdeblis. Oni multe kantis kaj blasfemis. Tio sen sangoverŝo multa ne finiĝas. Tiel ni faris ankaŭ antaŭ la lasta milito. Por tio ni ĉiam estas kapablaj.

Mi iris kaj meditis tiel, kiam subite Vasilio aperis antaŭ mi. Ankaŭ li fuĝis, kaj ekiris el la vendokvartalo per ŝparvojo. Ankaŭ sur li estis eĉ ne unu medalo. Li demandis min, ĉu estas tiel, ankaŭ en la tuta ŝtato, ĉu ĉiuj en la ŝtato ĉi tiel ĝojas kaj kriegaaĉas, ĉar estas nuligita tiu pakto, aŭ ĉi tiel okazas nur ĉe ni, en Serbujo, kaj en Beogrado. Mi timegas, diris li, ke ni estas la solaj, ke ni klopodegas kaj denove entreprenas tion, kion ni elteni ne povas. Li timegis, ke la aliaj denove prenos siajn dentobrosojn, kaj nur la frenezaj Serboj restos duelpretaj.

Jes, tia estas nia sorto, jam longan tempon, tiaj ni estis ĉiam, rezonis mi, kaj diris: Lasu min Vasilio, sufiĉe vi deprimigis min dum la pasinta milito, ne faru tiel ankaŭ pri ĉi tiu.

Mi preterpasis la lernejon, kie tiu infanoj, bazlernajanoj, jen, vagaĉis, ili nek lernis, nek iris hejmen, nur kriis: Pli bone sub glavo ol esti sklavo!

Mi krucsignis. Ne permesu, ho dio, ke ili spertu tion, pri kio ili krias, ne scias la infanoj, kion ili parolas.

ĈEVALOJ EN TRITIKEJO

Nevĉjo mia, malprofunde mi dormas, neniam mi dormis tutbone, precipe nun, ĉi tie, en la malliberejo. Vi ja scias, kiel fartas la maljunulo en malliberejo, mi baldaŭ entombiĝos, tamen oni tenas min ĉi tie ŝlosita. Ofte mi nokte traserĉumis la memoron, kaj diversaj okazaĵoj aperas antaŭ miaj okuloj klare kaj senbare.

Mi sidis, antaŭ mia stalo. Odoris je fekaĵo de miaj ĉevaloj, mi kvazaŭ vidus miajn ĉevalojn, sed mi ne sciis kie, mi aŭdis, ke kun la deknaŭa regimento ili foriris al Makedonujo. Mi bruligis cigaredon – la ĉevaloj min ne malhonorigos, ili estis flegitaj tiom bone, kiom mi povis, ili povas haŭbizon el la plej granda pluvkavego eltreni, kvietaj ili estas, trenemaj, tial la armeanoj ilin ŝatos, ili zorgos pri la ĉevaloj – mi kredis tion, la ĉevaloj estis en la manoj de kampuloj, de filoj de vilaĝanoj, la ĉevalojn oni ne donas al oficistoj. Ĉu ne estas tiel?

Kion vi faras tie, Miluteno? – interrompis mian pensadon mia Ĵivana. Mi diris al ŝi, ke mi pensas pri niaj ĉevaloj.

Kial vi pensas pri ili, Miluteno, jen la ĉevaloj, diris ŝi, ili estas en tritikejo.

Atendu, edzinjo, kion la ĉevaloj faras en tritikejo? – demandis mi, sentante kvazaŭ martelego frapus mian verton

Jen, – diris Ĵivana – soldataj ĉevaloj paŝtiĝas en la tritikejo.

Kion la ĉevaloj faras en la laŭbo – mi kuris tra la Roviĉa kampo al Kapi-tana kampo, kaj vidis: vere soldataj ĉevaloj paŝtiĝis en grenejoj, en aprilo. Ĉu ni tial hurlis „pli bone sub glavo ol esti sklavo“, ĉu ni tial la princon Paŭlon kulpigis pri ŝtatperfido, ĉu tial la regadon transprenis la armeo! La germanoj detruis nian Beogradon, kaj nun la soldataj ĉevaloj paŝtiĝas en mia grenejo; kion ni ankoraŭ povis esperi! Mi forkurigis la ĉevalaĉojn el la grenejo. Kio do okazis kun la armeo, al kiu ni antaŭ dudeko da jaroj transdonis la sorton de la popolo kaj ŝtato, kio do okazis kun la ŝtato, kiun ni kreis? Ĉu pro tio Miluteno senokuliĝis?! Mi ĵetis al ĉevalaĉo herbobulon, sed ĝi ne ektimis, nur gapis al mi. Ili ne timas, ili restis sen sia mastro, sen komando, tio estas same, kiel se la homoj seniĝas je regado kaj leĝo.

Mi komencis piedi sur la kampo de Mihailo. Mi ne povis kredi al la okuloj – soldataj kaldronoj kuŝis sur etstratoj.

Jungaĵoj – en densejoj, forĵetitaj.
En fruktoĝardenoj kaj ĉirkaŭ densejoj – kanonoj.
En Granda herbejo – tanko.
Kestoj plenaj da municio en fosaĵoj.
Maŝinpafiloj surherbe.

Kio okazis? Kial ni pagadis la imposton? Kiom da virbovoj kaj porkoj kaj sekprunoj, kiom da greno estis venditaj por aĉeti ĉi tiujn armilojn – ni ne havis fabrikojn por mem fari ilin, por aĉeti armilojn ni devis manĝi malpli multe. Nu, ĉu nun ni ĉion ĉi neniigos, jen malbenaĵo! Kial ni la 27-an de marto tiom kriadis kaj svingadis la standardojn.

Mi ekpaŝis apud putbarilo por almenaŭ malsoifiĝi, kiam aperis Vasilio. Li alpaŝis min, rikanante:

Ĉu ni pagadis la imposton al la ŝtato por pagi la soldatojn kaj armilojn, aŭ ni restis ion ŝuldantaj, Miluteno? Ŝajne, ni plenumis ĉiuj niajn devojn.

Spasenia, la edzino de Raĉo, ekveis sur Prostrugo. Ŝi demetis la kaptukon kaj svingis ĉi tiel. Ankaŭ ŝi estis forpelanta ĉevalojn el sia grenejo. Insultante.

Se ĉio estus en ordo, la ĉevaloj kanonojn trenus, ili ne vagus tra grenejoj. La ĉevalaĉoj gapis al ŝi, streĉis la orelojn.

Vasilio rigardis kaj kruccignis: Kion vi opinias, Miluteno, kion la germanaj ĉevaloj manĝos, se la niaj manĝas grenon?

En la vilaĝo estis eĉ pli malbone. Armeanoj vagis ĉiuflanke. Unuope, en negrandaj grupoj, duope, trioje. Ili serĉis civilajn vestojn. Ili proponadis novajn soldatajn vestojn por ia ajn peltkitelo, aldonante ankaŭ soldatajn surtutojn.

Mi endomiĝis kaj ekmiris. Sur seĝoj – soldataj surtutoj, bluzoj.

Kio okazas? – demandis mi Ĵivanan.

Kial vi min demandas, Miluteno, kiel mi povas scii? Mi vidas tion, kion ankaŭ vi vidas: la armeanoj alivestiĝas.

Sed kiu nin defendos? – demandis mi, komprenante, ke mi estas ridinda, ĉar mi ŝin demandas. Pri ĉi tio oni devus demandi Aleksandron kaj Paŝiĉon, miajn komandantojn, la malfeliĉulojn, kiuj restis en Albanujo, la leŭtenanton Garaŝaninon kaj Mladenon Markon Jeriniĉon, ili deziris ĉi tian ŝtaton. Kaj finfine, pri ĉi tiu alivestiĝo de la armeanoj oni devus demandi ankaŭ la bubaron, kiu svingaĉis la standardojn, kiu trofrue ĝojkantis – kial ili tiom kriaĉis... Nu bone, mi plurakontu.

Laŭ la malnova kutimo, ni ariĝis apud la lernejo, por aŭskulti novaĵojn de la fronto. La novaĵoj estis ĉiaj. Niaj ŝumadianoj, onidire, sub la komando de la arma generalo Milano Nediĉo penetris Bulgarujon, ili atingis Ĝumajon. Poste ni eksciis, ke ili vere atingis Ĝumajon – sed kiel kaptitoj. Baldaŭ Branko Stankoviĉo alvenis timoplana – germanoj eniris la vendokvartalon.

Kion, diru, ĉu ili konkeris Oplenacon?! – demandis mi.

Ankaŭ Oplenacon – diras Branko Stankoviĉo.

Sen batalo, ho, homoj, ĉu Oplenaco estis konkerita sen batalo? – pludemandis mi. Sed Branko ekridis: Kiu batalus por Oplenaco? Kiu en ĉi tia ŝtato pensas pri Oplenaco? Ĝuste la oplenacanoj kulpas pro la fiasko. Se ili volis, diris li, ke iu defendu Oplenacon, kial ili pereigis Serbujon? La aliaj ne estas kiel ni, diris Branko, frenezaj ŝumadianoj, pretaj pereji en Albanaj ravinoj aŭ sur la la monto Kajmakĉalano, kaj en fremdaj regionoj. La aliaj estas alio.

Pli saĝaj ili estas. Saĝa estis Branko, tiu klera homo batalis dum tri militoj, same kiel mi, rezerva kapitano li estis, sed li iĝis troaĝa. Neniu ĉi tiun ŝtaton sentis sia, diris li, ĉiuj fosis ĝian tombokavon, nun ĝi estas morta. Jam estas tempo ke ankaŭ ni, la serboj tion komprenu kaj rekonsciiĝu.

Je dio, ankaŭ nia junularo konfuziĝis. Ili ne sciis kio okazos. Infanoj demandadas, kiel oni vivis dum la pasinta okupacio. Nun ili vole aŭskultas historiojn, pri kiuj ili ĝis hieraŭ mokridis.

KION NI JA KULPIS?

Mi kaj Ĵivana foriris en la urbon aĉetocele, mi ne memoras precize kiu tago estis tiam, sed tio estis post la festotago de sankta Vido.

La urbeto estis plena da popoloj.

Kiom granda popolo ni estas, se ni havas tiom da popoloj, Miluteno? – demandis Ĵivana. Vere – ridinde, la urbeto estis malgranda, centoj da detalvendejoj, drinkejoj, forĝejoj, hufferejoj, opankejoj kaj aliaj vendejoj, sed tiom da popoloj, tiel multege da homoj en ĝi, kvazaŭ pretiĝus ia granda preĝo aŭ ia grandega funebra ceremonio.

Ni, la serboj, ne estas tre granda popolo, Ĵivana, sed nun oni nin kunpremis. Ĉi tiuj homoj, – mi montris al rifuĝantoj – estas forpelitaj el Kroatujo kaj Bosnujo, el Kosovo, el Makedonujo, oni kunpuŝis ilin ĉiujn en Ŝumadion, tial ŝajnas, ke ni estas multhoma popolo – mi ja penis eviti pluan demandadon de mia Ĵivana. Sed ŝi gapis, mirrigardis la popolojn, mirrigardis la homojn, la virojn, kaj inojn, kaj infanojn, ŝi haltetadis, demandadis min.

Ne demandadu – mi interrompis ŝin – mi ja ne povas scii, kial tiuj homoj estas forpelitaj de siaj sojloj, kaj kial oni ilin tie mortigadis! – mi ja volis foriĝi de la homoj, kiujn ŝi fiksrigardis. Sed ŝi, mia Ĵivana, neniel volis foriĝi.

Donu, diris ŝi, Miluteno, tiun sakon – ŝi kaptis la sakon, kaj demetis ĝis desur mia dorso. Ŝi elprenis lignan ujon kun fromaĝo, kaj pecon de lardo, kiun ni kunportis por manĝi antaŭ ol ni revenos hejmen.

Ni sidiĝis apud tiuj homoj, kaj ili rakontis al ni...

Nevĉjo mia, tiam ĉio komencis iĝi klara... Bone vi komprenis min, nevĉjo mia – klariĝis tio, kio tie, en Albanujo al ni restis malklara.

Tiam mi denove rememoris tiujn niajn povrulojn, la leŭtenanton Garaŝaninon kaj Mladenon Markovon, ĉar estis bone, ke ili ne aŭdis ĉi tiujn niajn serbajn rifuĝantojn... sed mi aŭdis ilin.

Aŭdis mi, ke oni preĝejon plenigis per infanoj, kaj buĉis ĉiujn senescepte, kaj ke sango infana fluis el la preĝejo.

Aŭdis mi, ke tie serbojn oni ligitajn ĵetadis en iujn profundegaĵojn, kaj ke de tie, el la profundegaĵoj, eĉ post tuta semajno aŭdiĝis veoj.

Aŭdis mi, ke infanojn oni senokuligadis, kaj plenajn korbojn da infanaj okuloj donace sendadis al siaj estroj en Zagrebo.

Aŭdis mi ankaŭ pri la edziĝfestoj, kies festantojn ligitajn kaj buĉitajn oni flosigis laŭ la rivero Savao, nuptovojaĝi en Serbujon!

Mi ne pluos, estas tre multenombraj serbaj malfeliĉoj, ni povus pri tio paroli tutan tagnokton, ho, terure estas, nevĉjo mia, eĉ pensi pri tio, kiel tiuj frakasadis infanajn kraniojn. Hej, lo, tiuj frakasas infanajn kraniojn, elŝutadis infanajn cerbojn, senokuligadis ilin, ĉar ankaŭ ili estas serboj! Kion ni ja kulpis?

En tiuj tagoj, nevĉjo mia, rifuĝantoj alvenis ankaŭ en niajn vilaĝojn. Ni akceptis la homojn, ili vivis en niaj domoj. Ke travivu homoj. Kaj ili, memkompreneble, rakontis. Pri la suferado de serboj en Kroatujo, kaj Bosnujo kaj Hercegovino. Hororo kaj teruro, al kiu estis malfacile kredi.

Mi memoras, iun tagon alvenis Lazaro kaj Vasilio. Ili akceptis rifuĝantojn, kaj aŭskultis kio kun serboj en Kroatujo okazas. Ili ankaŭ al mi rakontas. Sed mi ne volas aŭskulti. Kial vi al mi parolas pri tio, diris mi. Tion devas aŭskulti Paŝiĉo kaj la reĝo Aleksandro, la leŭtenanto Garaŝanino kaj Mladeno, ili deziris grandan ŝtaton – mi ne volas pri tio aŭskulti, mi volas tion forgesi.

Lazaro Ĉarapiĉo interrompis min: Miluteno, ŝtopu la buŝon, diris li, kiel vi povas forgesi, kiu popolo ĉi tion rajtas forgesi!

Prepensu ja, la serbojn oni mortigas ne nur en Kroatujo, oni mortigas ilin ankaŭ en Makedonujo, en Kosovo kaj en Vojvodino.

Nu, kion ni nun devus fari? – demandis min Lazaro.

Forgesi – nevole diris mi – kion alian ni povas fari.

Miluteno, ĉu vi vere ne hontas – rediris Lazaro – kiu tion povas forgesi! Kia popolo ni estus se ni povus ĉi tion forgesi?

Dume Vasilio, tiel, deflanke, ririgardadis.

Mi scias, ke pri la forgesema homo oni diras, ke li malsaĝiĝis – diris Vasilio – mi ne scias, kion oni diras pri forgesema popolo.

HO DIO, ĈU IU AJN INCENSIS PORKEJON!

Germanojn vi mencias, ĉu? Kion mi rakontu pri la germanoj, nevĉjo mia? Ne la germanojn mi timas. Por ni – la germanoj germanas. Ili ne alvenis por bonfari, por plaĉi al ni. Malfremdulojn mi timas. Ili dividiĝis kaj poreterne malamikiĝis, iuj kun kronsigno, aliaj kun stelsigno, nur iliaj ĉapoj estas la samaj.

Eĉ la popo Kosto iĝis vojevodo, li nomis sin „Oraŝaca vojevodo“, kvazaŭ Oraŝaco estus lia. Eĉ familie li ja ne devenas el Oraŝaco!

Al li ne estis sufiĉe esti popo, ke la homoj lin respektu kiel popon, al li ne sufiĉis, ke li havu ses infanojn, edzinon kaj tridek abelulojn, li ja deziris ankaŭ ordonpovon, li deklaris sin vojevodo. Nun neniu rajtas lin nomi kiel antaŭe „popo“, aŭ „patro“, ĉiuj lin nomis – „vojevodo“! Kaj ĉiuj salutadis lin soldate, kvankam li eĉ ne soldatservis, patro lin de la soldatservo elaĉetis. Vi ja scias, ke tio estas ebla.

Ankaŭ Sreteno Ĉarapiĉo arigis taĉmenton. Li trovis eĉ armilojn kaj uniformojn en vilaĝoj. Tie estis tiom da armiloj, kiom li deziris, nenio dum la milito estis foruzita. Liaj homoj sur la ĉapoj havas la samajn signojn kiel la popo Kosto, sed ili malŝatis unuj la aliajn, ili unuj la aliajn nomadis perfiduloj – kaj murdadis unuj la aliajn.

Mi ne komprenas, kial Lazaro Ĉarapiĉo al la filo donis ĉevalon, ne sciante kio estas Sreteno, oni ja ne bezonas ĉevalon en ĉi tia milito, krom se oni volas esti pli rimarkebla, por ke oni el densejo al li pli facile celu kaj faligu lin desur la ĉevaln.

Ankaŭ la viandovendisto Stojadeno arigis taĉmenton kaj deklaris sin vojevodo, al ĉiuj siaj homoj titolojn li donis, ordenojn fremdajn surkroĉis, kun li estis kelneroj el la vendostrato, viandistaj knaboj kaj la panbakisto Rako. Se ni estus bonŝancaj, ili povus por iu vera armea formacio esti provizistoj, sed ili rimenojn kaj kartoĉbalteojn volvis ĉirkaŭ sin de ĉiuj flanko, ili havis pli da armiloj ol tion bezonas vera soldataro. Stojadeno volis esti nek kun la popo Kosto, nek kun Sreteno Ĉarapiĉo, same Kosto ne volas esti kun Sreteno, nek deziris esti kun Stojadeno, ili ĉiuj volis esti por si mem, ĉar nur tiel ĉiu povis titoli sin vojevodo.

Je la tago de Ĉieliro de Dipatrino Stojadeno ekaperis en mia korto, li kun siaj homoj vagis tra mia kelo kaj subtegmento, ili serĉis sekviandon, englasigadis vinon kaj brandon, poste al la kesto de Ĵivana ĵetiĝis, serĉis tie broditajn ŝtrumpojn kaj tekszonojn, deziris sin buntigi kaj garni. Ili prenis ŝtrumpojn, tukon kun nuptodonacoj de mia patrino kaj mia Ĵivana, sed mi

tiam diris al ili: Kial vi deziras tiujn ŝtrumpojn, homoj, vi ja vidas, ke ilin tineoj truigis, ili ne estas vestebraj, ili estas nur memoraĵo. Mi tute ne povis kompreni, kial kelneroj kaj viandistaj knaboj bezonas tioman buntecon; la armeo bezonas vestojn simplajn kaj firmajn, se estas vera armeo. Kiam oni ilin rigardis, ili pli similis al edziĝfestantojn kaj vizitantoj de la domo de novedzoj, ol al militantoj.

El mia fruktarbejo aŭdiĝis fusila pafado. Stojadeno kaj la liaj kuŝiĝis, malantaŭ palisojn, sub subdomajn kolonojn.

Zumis plumbaĵoj. El la fruktarbejo aŭdiĝas bruego kaj blasfemado. Kaj alvokoj kapitulaci. La korton invadis homoj de Sreteno. Pleniĝis kaj la fruktarbejo kaj la korto. Ili estis ĉirkaŭitaj.

La homoj de Stojadeno rigidiĝis. Ok estis mortigitaj, dekkvar kaptiĝis, sed Stojadeno estis nek inter la mortintoj, nek inter la vivantoj.

Do, li estas ie inter la brutoj – ekkriegis Sreteno desur sia ĉevalo. Traserĉu kralon kaj gregejon. Kaj la bredejon. Bone, traserĉu ĉion!

La kelnero Lisko, la plejulo de Stojadeno – ankaŭ li estis inter la kaptitoj – faris signon, montris ĉi tiel al mia porkejo, li deziris bonvoligi Sretenon. Kaj Sreteno al siaj knaboj faris signon ĉirkaŭi la porkejon.

Porkoj ekgruntis. La knaboj de Sreteno kun alcelitaj pafiloj ekkriis: Eliru Stojadeno!

Kaj de tie, el la porkejo, eliris Stojadeno, aĉaspekta. Pajlo kaj porkofekaĵo kovris lian belegan drapan veston, plorige estis rigardi lin, pajlon sur silka rubando.

Kial vi ĝuste en porkejon kaŝiĝis, – ekridis Sreteno – kiel vi, viandisto, kiu milojn da porkoj buĉis kaj bakis aŭdacas kaŝiĝi inter porkoj, kaj kalkuli pri ilia amo kaj protekto?

Sed ĉu mi povas pri via amo kalkuli? – demandis Stojadeno Sretenon.

Nu, estas tro malfrue por tio – ekridis Sreteno dorloteme.

Ho, dio, kiu tion aŭskultus, tiu kredus, ke la ŝumadianoj afable interparolas, sed ne estis tiel...

Stojadeno alrigardis min, verŝajne li volis, ke mi helpu al li savi la vivon kaj peti Sretenon. Sed kiel lin helpi? Same, se la situacio estus mala, se hazarde Sreteno estus sur lia loko, kaj se mi petus Stojadenon, ĉu tio helpus?

Mi neniom povas helpi vin, Stojadeno, rezonas mi, kvankam mi kompatas lin. Li havis sian viandbutikon kaj kafejon, kial do li deziris vojevodiĝi. Li estis bela kaj altstatura, eĉ sen rango. Li ja pezis naŭdek kilogramojn. La plej fortan apron li povis sola faligi kaj buĉi, viandisto li ja estas, ho! Virbovon li per pugno plurfoje renversis en Arangelovaco dum foiro.

Sreteno ordonis al siaj knaboj malligi Liskon Zoloviĉon, li alpaŝis Stojadenon, elingigis la ponardon de Stojadeno, kaj etendis ĝin al Lisko.

Lisko rigidiĝis. Li rigardis Stojadenon, rigardis Sretenon. Ankaŭ Stojadeno rigardis Liskon, rigardis Sretenon, li ne povis kredi, ke li ĉi tiel ĉieleniros. Sed neniu elbuŝigis eĉ unu vorton. Tamen iu ekridegis.

Kiu ridas? Kiu nun ridas? – ekkriegis Sreteno, dezirante scii, kiu nun ridas.

Mi – reagis Rako la panbakisto.

Lin, diris Sreteno, malligu, li iru hejmen. Plaĉis al Sreteno, ke Rako la panbakisto ekridis.

Ankaŭ tiuj, kiuj restis ligitaj komencis ridi, sed sed vane, la rido helpis nur tiun, kiu la unua aŭdacis ridi.

Sed Lisko staris timoplene. Kiel infano. Li tremis. La ponardo preskaŭ elfalis el liaj manoj. Al li ŝajnis, ke tio, kio kun li okazas estas sonĝo. Mi preskaŭ bedaŭris lin, min jam interesis nek la ŝtrumpoj el la fraŭlina ekipaĵo de mia patrino kaj de mia edzino, mi nun ne povis pensi pri la ŝtrumpoj, la ŝtrumpoj estas pardoneblaj; nun mi bedaŭris lin, mi diras al vi la veron, ankaŭ li ekiris batali, gloriĝi, gravuliĝi, elstariĝi li volis, ke rangon li ekhavu, por heroumi, eble li eĉ ekkredis, ke iun gravan kaj utilan taskon li plenumas, nur dio tion scias, oni rakontis al li ĉiaĵojn, nun eĉ malpli krudajn homojn oni povas erarigi.

Kion vi atendas?! – ekkriegis Sreteno. Lisko kvazaŭ ekirus, sed liaj genuoj tremis, li apenaŭ povis paŝi.

Stojadeno spiregis, viŝis ŝviton, malseka kvazaŭ post baniĝo, tio ja estis komprenebla. Li denove ekrigardis al mi, poste ankaŭ al Sreteno, sed tiu lin rigardi ne volis, li evitis ties rigardon. Stojadeno kapsvingis kaj diris: Sreteno, ĉu ni ne povas kompromisi. Ni ja havas, diris li, komunajn malamikojn, la komunistoj fortiĝas, ili konstante multenombriĝas, kial ni mortigadu unu la alian, ni ja havas la samajn standardojn, ni ja portas la samajn ĉapojn?

Mi ne iras sub la sama standardo kun tiuj, kiuj inajn nuptekipaĵojn ŝtelas, same kiel la kestojn, en kiuj estas porsepulta ekipaĵo de maljunuloj. Tio estas, diris li, sanktaĵo, ĉar tio dum la plektado kaj teksado estis per larmoj surverŝata. Tiel parolis Sreteno, bele kaj mallaŭte al Stojadeno, sed mi komprenis, kion li celis, li deziris akiri simpation de la popolo, fortiĝi kaj grandiĝi, jen tia estas la politiko.

Kion vi faras? – ekkriis Ĵivana. Ŝi el la domo ekiris tra la korto, kaj venis rekte al Sreteno. Li preskaŭ konfuziĝis.

Ĉu vi tial studis kaj oficiriĝis, por ke vi buĉu serbon en mia korto! – mia Ĵivana maltime diris tion. Mi devos ja vivi en ĉi tiu korto, ĉu ne, mi ja devos iradi ĉi tie, ĉu ne? Ankaŭ mia filo. Ankaŭ miaj nepoj, kiam mi aviniĝos. Ĉu mi, kiam ekregos paco, ĉi tie kun viandista reaperanto vivos – ĝuste tiel ŝi diris, «viandista». Ŝi parolis pri tio, kio okazos, se Stojadenon ili buĉos en la korto.

Stojadeno kvazaŭ sereniĝus, ekĝojus kaj ekesperus. Mia Ĵivana – ŝi vestiĝis bele, ligis novan kaptukon, vestis novan lanjakon – severaspekta ŝi estis. Mi ja en ĉi tiu korto edziĝfestos kaj festenos! Kio okazas kun vi, ho Sreteno la Nigra, ĉu pro ĉi tio ni fieris, kiam lernaĝe vi venadis ferii? Ĉu vi ne memoras, kiel ni eliradis, diris ŝi, sur la strateton por vidi vin! En la domon ni vin alvokadis, la plej bonan pomon ni por vi konservis – mi ĵuras per mia ununura okulo, ĝuste tiel parolis mia Ĵivana, pri la pomo ŝi lin memorigis, kaj li tiam malrigoriĝis.

Nu, bone, onklino Ĵivana, vi ja pravas – diris Sreteno – mi dankas, diris li, ke vi memorigis min pri la pomoj. Kaj tiel plu, li parolis, ke en la koro li portas tiujn pomojn, ke li ilin neniam forgesos.

Kiel pri tiuj purpuraj pomoj rememoris mia Ĵivana, rezonis mi, kiel ŝi sukcesis lian koron per tiuj pomoj konkeri? Jes, mi devus lin peti, pri miaj militadoj memorigi, mi devus cikatrojn de miaj vundoj vidigi al li, sed, ŝi, jen, menciis nur la pomojn – kaj li malstreĉiĝis. Mi ĝojis, ke Sreteno tiel rapide obeis al mia Ĵivana, tamen mi estis ofendita, ĉar Ĵivana pli bone ol mi konas la homojn, kaj eĉ oficirojn.

Dume Stojadeno, viandovendisto kaj vojevodo, serenigis sian vizaĝon, preskaŭ ekridetis, li ĝojis, memkompreneble, savita estis lia vivo, tio estas certa. La homo evidente iom miris, verŝajne li pensis ke Sreteno la Nigra fakte ne estas tiom nigra, se li ŝanĝis la opinion pro purpuraj pomoj; eble li tion konkludis pritaksante sin, eble li ja ne ŝanĝus sian opinion, se hazarde li kaptus Sretenon.

Ili ĉiuj eliris el mia korto. Mia Ĵivana sukcesis nur kruccsigni kaj diri: „dankon al vi, ho Dio!“, kiam sur la strateto aŭdiĝis la voĉo de Sreteno. Kio nun okazas – mi ekiris al la strateto, por vidi, kio okazas.

Kion vi atendas! – ekkriis Sreteno, post kio Lisko saltis al Stojadeno, sed ne povas atingi lin, Stojadeno estas granda kaj dika homo, kvankam ligita, li ne cedis al Lisko. Sed Lisko estis kiel vespeto. Li batis, batadis per la ponardo, drapo ŝiriĝis, rubandoj distiriĝis, sango ekŝprucas. Kaj finfine, Stojadeno falis, peze falis.

Kaj nun – en la rojon lin – Sreteno montris al Lisko.

Ne, Sreteno! – elpaŝis mi. Mi kompatis Liskon. Patro lia estis diboĉulo, ĉion li disipis, kaj forpasis sur ŝtonpavimo, ebria. Patrino lian mi konis, bona virino, ŝi penplene Liskon kreskigis, ebligis al li labori en intestejo, tie li ankaŭ la metion de buĉisto ellernis.

Ne mortigu lin – diris mi al Sreteno – irigu lin kun vi, li vin plej bone servos.

Tamen Sreteno Ĉarapiĉo ne emis konsenti. Mi ne volas, diris li, ke min servu homo, kiu sian vojevodon perfidis kaj buĉis, tiajn homojn mi ne bezonas.

Ĝuste tiaj estas la plej utilaj, li nun povas esti nur kun vi, Sreteno – respondis mi. Sed li replikis: Ne ŝovu vian nazon en fremdan vazon, oĉjo Miluteno! Cetere, diris li, mi ĉi tiun ulon mortigos pro vi, je gloro via kaj je gloro de mia patro.

Kaj dum mi tiel interparolis kun Sreteno – Lisko ekkriegis. Ili ne irigis lin en la rojon, sed buĉis sub morusujo, apud la vojo. Nun ĉi tiujn, – montris Sreteno al la kaptitoj – konduku tra la vilaĝo, por ke ili al ĉiu domo redonu tion, kion ili forprenis, kaj ĉie, kie ili forprenaĉis knabinajn nuptoprovizajojn, vi bastonu ilin dudek kvin fojojn.

Sreteno surĉevaliĝis, kaj ekiris kun sia soldataro.

Mia Ĵivana flamigis lucernon. Kandelon ŝi bruligis por Stojadeno kaj Lisko. Kaj por tiuj, kiuj en la fruktarbejo kaj malantaŭ palisoj ĉirkaŭ nia domo pereis. Ŝi pretigis fumilon, kaj komencis incensi la domon, kaj la korton, kaj la fruktarbejon. Mi ja sekvis ŝin.

Tiam mi vidis, ke la porkoj interpuŝiĝas ĉirkaŭ io. Kio estas tio – mi alpaŝis kaj vidis: sako kaj rimeno. Nova, je dio, sako oficira, leda, la porkoj ĝin ĉirkaŭmanĝis, sed malfermi ĝin ne povis. Min io tremigis. Mi eniris la porkejon, forprenis la sakon, kaj enportis ĝin en la domon. Malferminte ĝin mi ekvidis, ke tio estis sako de Stojadeno, lia nomo estis skribita sur kajero. Mi enrigardis – tio estis arkivo, nu, ne vera arkivo, sed tamen arkivo. Listoj de domoj, kiuj subtenis ilin. Listoj de homoj, kiuj laŭ lia opinio, subtenas komunistojn. Listoj de homoj, kiujn oni ne devas tuŝi. Ĉion ĉi tion li en tuta nia regiono pridetalis. Disdividis, finplanis. Oni povis vidi, por ia regado li sin pretigis, sed se oni pripensas, li tamen faris bonon, li konservis kelkajn homojn, siajn homojn. Li konservis kaj puŝis la saketon sub pajlon en la porkejo, kvankam sian kapaĉon li elportis kaj puŝis sub ponardon, mi ja uzu vian esprimmanieron, la kapaĉon li perdis, sed la saketon li konservis. Do, ankaŭ en li estis io respektinda. Kaj aĉulo kaj krimulo – sed jen, ankaŭ li scipovis ion bonan fari.

Mi diras la veron, mia Ĵivana incensis kaj la korton kaj la fruktarbejon, ŝi incensis ankaŭ la porkejon, kaj mi pensis: ho dio, ĉu iu ajn iam ajn incensis porkejon, ĉu tia estas nia fino; ĉu ni vere ĉi tion meritis?

KIAL, HO, VI DETRUAS ĈI TIUN PONTON?!

Ili alvenis nokte. La pordo skuiĝis, kvazaŭ elsaltante.

— Kio ja okazas, fulmo kaj tondro! Mi ekstaris – kiu volas derompi la pordon.

Kaj kial? Mi eliris kaj vidis, ke tio ne estas germanoj, steloj estis sur iliaj ĉapoj. Antaŭ ili estis Grujo. Kio okazis, he, homoj karaj, kial la pordon vi sturmas, ĝi ja ne estas ŝlosita.

Ni ne sciis – diris Grujo.

Sed kiel vi ne scias; kion vi scias Grujo, se vi ne scias, ke en serbaj vilaĝoj domojn oni ne ŝlosas, kiel vi povas en Ŝumadio ribelumi kaj militumi, se vi tion ne scias!

Al li tio malplaĉis, sed li tamen insistis: Donu al ni ilojn, diris li, kaj venu kun ni.

Kiajn ilojn, kien mi iru, demandis mi mense, sed tamen silentis. Mi vestis pantalonon, surpiedigis opankojn, kaj eksekvis ilin. Ili arigis pioĉojn, hakilojn. Mi rigardis, sed silentas – estus bone, se ili nur pioĉojn kaj hakilojn tenus, se per pioĉoj kaj hakiloj sian laboron plenumadus. Sed kion fari? Mi sekvis ilin. Ĝis la etponto sur Despiĉa rojo.

Ili demetis la ilojn desur la dorsoj, kaj komfortiĝis. Per la pioĉoj ili komencis frapadi. Ankaŭ min ili provis instigi detrui la etponton.

Atendu, kial detrui la ponton?!

Kial detrui la ponton? – interrompis la laboron Grujo. Kia demando! Kial vi ŝajnigas vin stulta, oĉjo Miluteno!

Mi ne ŝajnigas min stulta, diris mi, sed vi faras min stulta.

Li rigardis min.

Kial, ho, vi detruas ĉi tiun ponton?! – demandis mi lin denove. Kiun ĝi ĝenas?

Li rigardis min, malkontenta.

Bone, oĉjo Miluteno – finfine diris Grujo – ĉu vi ne konsentas detrui pontojn, kiujn uzas la okupantoj, ĉu vi ne deziras, ke ankaŭ ni kontribuu al la venko super faŝismo?

Bone, diras mi, faru tion, kion vi deziras, tio estas via afero – mi misglutis, ne aŭdacante diri al ili, kion mi vere pensis. Ĉi tiun ponton bezonas nur ni, ĝin bezonas neniuj aliaj sub la firmamento, ĝi neniun ĝenas. Ni per ĝi transriverigas nian penaĵon – grenon, sterkon, kareksaĵon kaj ĉion alian. Ni ja konstruis ĝin, neniuj registaro ĝin konstruis, ĉar neniuj registaro ĝin bezonis. Precipe la germana. Nur ni bezonas ĝin, kial do ni detruu ĝin, vi malbenulo! Kaj kial ni mensogu nin mem, ke tion ni faras kontraŭ la okupantoj. Ĉu ne estas tiel? Kiel perturbo la germanan potencon detruido de tia etponto. Hej, lo, se la okupantojn ĉi tiaj etpontoj malhelpus, ili ja ne alvenus ĝis ĉi tie, ne okupus la tutan Eŭropon! Ek, diru sincere, kiu armeo ne povas transiri rojon, profundan unu metron kaj duonon? Sed ĉio estis vana, neniuj demandas min pri tio, pri tio oni demandas aliajn – se entute ekzistas iu ajn kiun oni demandas, aŭ eble oni ĉion faras laŭ propra volo. Ne faru tion, homoj, ne ŝercaĉu, ĉi tiu ponto

ne troviĝas sur iu ajn milita mapo, ĉi tiun ponton ni proprainciate konstruis. Mi ne aŭdacis diri: vi detruos la ponton, kaj forkuros, same kiel tiam, kiam vi detruis la ponton en Ŝijaco, kaj poste germanoj alvenos, arigos nin, senvivigos nin, same kiel ili faris en Ŝijaco, 82 homojn ili senvivigis, el la domo de Miliĉo – kvaropon, jen kia estas via kalkulo, poste vi tion enskribos en vian grandan libron. Neniom, diris mi, ni malutilos al la germanoj, sed ni malutilos al ni – jam morgaŭ, ni denove devos ĝin konstrui, eĉ se germanoj tion al ni ne ordonos. Kiamaniere ni alvenos al niaj plugkampoj kaj herbejoj sen ĉi tiu ponto? Ne faru tion, homoj karaj, kion pri ni pensos la germanoj, ili ridos pri ni, kiam ili estos mortigantaj nin, pro ponto – la malgranda!

La filo de Pulao la ĉarfaristo eksaltis. Tiu ulo apartenas al la kvina kolono! – diris li pri mi. Sed Grujo, mi devas esti sincera, defendis min. Atendu, kamarado, diris li, ne rapidu tiel, sendube ne estus bone, se anoj de la kvina kolono kreskus ĉi tie kiel fungoj – Miluteno estas prudenta homo, el honesta domo, tion ni konfesi devas – se tiaj homoj estus anoj de la kvina kolono, se tiaj homoj iĝus anoj de la kvina kolono dum unu nokto, ni vaniĝus, fiaskus. Grujo parolis, la aliaj aŭskultis, kaj la filo de Pulao mallevis la kapon.

Nu, sendube, vi ne povas nomi ano de la kvina kolono ĉiun, kiu ne pensas same kiel vi, vi ne estas sola en la mondo, krom tio, ankaŭ tiu kvina kolono ne estas sola, ekzistas ankaŭ aliaj homoj, ekzistas ankaŭ aliaj kolonoj, krom la kvina – ĉu vi komprenas min?

Ho, ĉiela tribunalo! – mi interrompis lin, sed Grujo pluparolis.

Silentu, oĉjo Miluteno – li ektiris min flanken, kaj mallaŭte, por ke la aliaj ne aŭdu, atentigis min pripensi tion, kion mi parolos. Ekzistas homoj, diris li, ĉi tiuj, junaj, kiuj vin ne komprenos ĝuste, nun ja estas tia tempo. Min li tre afable konsilis. Mi ja meritis tion, li bone scias, ke mi lin savis je la tago kiam pereis la reĝo Aleksandro; scias li, ke li estus strangolita, ĉar en la kafejo de Vuliĉeviĉo li pafis al la bildo de la reĝo Aleksandro. Grujo ja estis bona homo, bedaŭrinde li pereis tiel rapide. Oni diras, ke li perdis la vivon ie sur la monto Zlatiboro, li ja estis vundita, kiam liaj samtaĉmentanoj retiriĝis en Novan Urbon, kaj forlasis la vunditojn, post kio germanoj alvenis kaj distretis per tankoj la tutan malsanulejon, en kiu estis ankaŭ la kompatinda Grujo, Dio pardonu liajn pekojn.

Mi revenis hejmen, alportis instrumentojn, kaj vekis Ĵivanan. Ek, diris mi, veku Radojon, pretigu panon kaj kunpanaĵojn por du-tri tagoj, dume mi elstaligos la bovinojn, ni devas fuĝi trans la monton, kaj eĉ pli malproksimen, se tio estos bezonata.

Ĵivana krucsignis, ŝi demandis, ĉu ŝi sonĝas.

Ho vi, edzino mia, faru kion mi diris, ni devas ne malfrui – jen pri kio temas – kaj mi diris al ŝi, kio okazis kun la etponto, ŝi tuj saltleviĝis,

riproĉegante. Kial, diris ŝi, vi permesis al ili detrui la ponton, kial vi ne defendis ĝin, por ke ni ne devu nun pro kelkaj traboj fuĝi el nia domo; kia homo vi estas, diris ŝi, ĉu vi dereliĝis, kiel tiu knabaĉaro, kial vi ne elsakris ilin, vi ja tri militojn militis, vi ja scias, kio estas la milito!

Mut! Ho virino, neniu nun konsideras mian opinionon.

Suferiga tio estas, nevĉjo mia, kredu. Propra cerbo turmentas onin plej multe. Kiu mi estas, kaj kio mi estas, demando estas nun. Kaj kies do estas la etponto, jen la demando. Certi oni ne povas!... La etponto, ho, ne estas en Germanujo. Alia afero estus detruo de ponto, ekzemple, en Germanujo. Aŭ, detruo de ponto, por ke antaŭenirantaj germanoj ne transiru ĝin, aŭ por malrapidigi ilian antaŭeniĝon.

Tamen, nevĉjo mia, la germanoj estis ĉi tie, ili jam alvenis.

Sed la plej malbone estis, ke mi nenion aŭdacis diri. Mi povis perdi la vivon, kaj iĝi ridinda. Eĉ al la siaj, al la najbaroj kaj konatoj, al kampuloj mi ne aŭdacis diri ion ajn. Mi kvazaŭ tenus akvon en la buŝo antaŭ la filo de Pulao, kvankam mi iam estis batalulo, savanto de la patrujo. Nu, je dio, aĉa mi ŝajnis al mi mem; mi, unuokula, treniĝis tra la monto kun miaj edzino, infano kaj bovino, sed ne aŭdacis diri, kion mi pensas. Mi transiris Albanujon, revenis trans Kajmakĉalanon, oni ornamis min per medaloj, sed mi devis silenti, por ne perdi la vivon, por ne iĝi ridinda.

LA FILOJ DE BOŜKO

Ekklakis pafiloj, ektondris bombojn. Je dio, longe tio daŭris. La nokto estis kiel vazelino. Mi eliris antaŭ la domon, ĉirkaŭrigardis, aŭdis kaj vidis, ke oni pafis ĉe Sariĉo. Kiam mateniĝis, ekkrakis mia pordego, alvenis Paŭlo. Venu Miluteno! — alvokis li min – pereis filo de Boŝko Sariĉo.

Kiu? – demandis mi, sciante, ke unu filo de Boŝko havas stelon, kaj la alia – kokardon sur la ĉapo.

La pli juna ido de Boŝko pereis, la partizano – diris Paŭlo, kaj rakontis al mi ĉion, kio okazis. La pli juna filo venis hejmen kun tri homoj. Ili estis irantaj sur la deklivo de Nego, supre de la domoj de Janiĉijeviĉo. Hundaro persekutis ilin. Sed tiuj aliaj, memkompreneble, ne estis surdaj. Ili el la domo de Filipoviĉo aŭskultis la bojadon, kaj tiel sekvis tiujn, post kiuj la hundaro bojis. Kiam la bojado ĉesis apud la domo de Boŝko, ili sciis, kiuj estas tiuj. Ili ekiris kaj ĉirkaŭis la domon. Kaj kripostulis kapitulacon.

Mi veron diras, homo kara – serbo de serbo postulis kapitulaci, li volis la fraton kapti.

Sed neniuj aŭdacis kapitulaci. Eĉ frato antaŭ frato ne aŭdacas kapitulaci; en ilia milito ne ekzistas kaptitoj; ne frato mia, se iu malfeliĉulo kapitulacis, ne havante alian eblecon, tiu la plej aĉan morton elektis.

Tion sciis ankaŭ tiuj en la domo de Boŝko. La unua elsaltis la filo de Boŝko – li ĵetis grenadon, kaj saltis post ĝi, sed lin pafkuglo trafis jam en la korto. La aliaj tri sekvis lin, sed kun ili okazis tio, kio okazis ankaŭ kun la filo de Boŝko, memkompreneble, ĉirkaŭitaj ja, sub lunlumo, kvazaŭ estus tago, ili ĉiuj estis mortigitaj.

Ni iru, Paŭlo – kion fari, tia estas nia moro, dum la entombigo ni ĉiuj helpas unu la alian. Kiam ni alvenis tien, la pli aĝa filo de Boŝko jam alvenis, sed ne aŭdacis eniri la korton. Li staris, jen ĉi tiel, ĉe la pordego, sed aŭdacis aperi nek antaŭ la patro nek antaŭ la patrino. Armita, kokardo estis sur lia ĉapo – mi propraokule tion vidis – la homo staris, sed la patron kaj patrinojn li ne alpaŝis, ne aŭdacis. Sed io lin puŝis ĉeesti la entombigon de sia frato. Kaj alpuŝis lin. Io ja ekzistas. Radisavo, la nevo de Boŝko, alvenis al Boŝko, kaj diris, ke lia filo estas antaŭ la pordego. Boŝko diris: Mi ne havas filon, mia filo, diris li, estas morta. Kaj li montris la filon en la ĉerko, la mortan. Kvietaj estis Boŝko, tamen ne kvietaj, frakasita homo li estis, sed lia cerbo laboris kiel horloĝo; li diris, ke liaj filoj estas liaj, nur kiam ili estas mortintoj, kaj mi diris mense: jen kio okazas nun, vanaj estos ĉiuj niaj venkoj kaj nia libereco, se, hazarde ni ĝin atingos.

Radisavo eliris por transdoni la mesaĝon, por diri al la viva filo de Boŝko, ke li iru laŭ sia vojo, ke li ĉi tie ne estas bonvena.

Mi rigardis Boŝkon – li, kara mia, ho, malmildega homo liestis, sed nun li kvietiĝis. Li similis mortigiton, tio ja estis komprenebla. La filojn li kreskigis, de ilia bebaĝo.

Boŝko alpaŝis min, sidiĝis, ĉi tiel, apud mi. Li fiksirgardis min, kaj diris: Ĉi tio estas, oĉjo Miluteno – tiel li min nomis – ankaŭ via malfeliĉo. Mi rigardas lin, sed li min ne rigardis, liaj okuloj direktiĝis ien, foren. Li metis la manon sur mian ŝultron, kaj denove diris: Ĉi tio estas, oĉjo Miluteno – ankaŭ via malfeliĉo. Ĉi tio, diris li, ne povas esti malfeliĉo nur mia, tio ne povas esti malfeliĉo por nur unu homo; tio estas ega, diris li, ĉi tio estas grandega malfeliĉo, por ke ĝi estu malfeliĉo por nur unu homo.

Ega, rezonis mi, ege grandega, ege grandega por la tuta popolo; malgranda ni estas popolo por tiel granda malfeliĉo.

Mi rigardis lin tian, volante iel konsoli lin. Nu, jen, tia estas la nuna tempo, diris mi, serboj deziras venki serbojn. Pasis la tempo, kiam la serboj ne politikumis, dum okupanto estas en ilia lando, kiam ili unue defendis la patrolandon, kaj nur poste politike kvitiĝadis. Nun estas alia tempo, nun ili deziras la okupacion misuzi por politike kvitiĝi inter si, tia nun estas ilia kalkulo, oni ne pensas pri la honoro, sed pri venko. Sed li, la mizerulo,

preskaŭ ekridis, kaj diris: Kial vi, la veteranaj batalantoj ne kolektiĝas, ne interkonsentas, kaj ne ĉesigas ĉi tiun tragedion; kiu tion faros, se ne vi, vi ja estas patroj kaj savintoj de la patrujo!

Mi rigardas lin, sed ne aŭdacis diri: kiaj batalantoj kaj savintoj ni estas, ĉi tiuj, kiuj nun konfliktas, konas nek la patrojn, nek la patrinojn, nek la fratinojn, ili batalas por ekregi la landon.

Jen, post iomo da tagoj, proksimume tagmeze, alkriis Radisavo, la nevo de Boŝko: Venu, ho avo Miluteno, vortis li, la oĉjo pendigis sin!

Ho, je dio, tagmeze! Kiu pendigas sin en ĉi tiu parto de la tago, rezonis mi. Sed, tamen, diris mi mense, li ne pendigis sin konscimanke, cerbo lia funkciis kiel horloĝo; do, nenion alian li povis fari.

Mi demetis lin desur la pendumilo, sed mi la tutan tempon kvazaŭ aŭdus lin parolanta al mi: ĉi tio estas ne nur mia malfeliĉo, ĉi tio ne povas esti malfeliĉo por nur unu homo, ege grandega ĝi estas por unu homo. Je dio, mi diras al vi, mi konstante aŭdis lin: kial vi, la veteranaj batalantoj ne kolektiĝas, kial vi ne ĉesigas ĉi tiun tragedion.

Nu, ni devas iel kolektiĝi, mense diris mi, ni devas provi, fari tion kion ni povas, se nenion alian, almenaŭ por konsciencon nian kvietigi. Sed kiel? Iu el niaj eksaj estroj devus gvidi nin, iu rezerva oficiro.

MI PETIS, SED TIO NE HELPIS

Foje, somere, en la kvardek tria jaro, Spasenia, la edzino de Velimiro, aperis en mia domo. Velimiro alvokis min iri kun ŝi al Sreteno, por peti pri ŝia filo Velko. Vi, diris ŝi, Miluteno, militis kune kun Velimiro kaj kun la patro de Sreteno, Lazaro, vi estas homo, kiu ne timas iri al Sreteno. Ŝian Velkon Sreteno kaptis, diris ŝi.

Atendu, ho, ne eblas, ke li kaptis Velkon, ankaŭ via Velko ja estas ĉetniko – mi ne povis kompreni, ke Velkon kaptis Sreteno, alia afero estus, se lin kaptus komunistoj.

Mia ĵivana staris en la ekstera loko, kaj krucsignis – la virino miris, ke serbo estas sklavo de serbo, ke najbaro povas esti sklavo de najbaro, ili ja kune iris en lernejon, kune ŝafojn paŝtis, kiel eblas, ke ili nun persekutas unu la alian, ĉiuj ja scias kiu estas kaptirajta. Kaj ĵivana persvadis min iri al Sreteno, tuj, senprokraste. Ek, Miluteno, diris ŝi, vi kun la patro de Sreteno kune multon trasuferis. Vi ja estis paruloj, vi ja kune militis, kune Serbujon savis, ĉu eblas, ke nun viaj filoj kaptas unu la alian! Surŝovis ĵivana sur mian kapon novan serbĉapon, kaj irigis min preskaŭ trude.

Estis tagmezo, je dio, la suno ardis, kvankam jam estis aŭtuno – tio ja fojfoje okazas ĉe ni, en Ŝumadio. Nenio estas pli bela en la tuta mondo. Mi venis al la lernejo, kaj antaŭ tilio ekvidis tablon. Kaj tablotukon el kotontolo. Ĉe la tablo – Sretenon. Solan. Antaŭ li pomojn, sed mi ne vidis, ke almenaŭ unu pomo estis ekmanĝita. Nu, kiam homo eĉ pomon ne povas enbuŝigi, kiel interparoli kun tia homo? Ĉu ne estas vane tian homon peti pri io?

Fore, apud barilo, selita ĉevalo hufopradis, kaj vipis sin per sia vosto. Soldatoj estis malproksime. Neniu deziris esti kun Sreteno, ankaŭ li ne deziris esti kun iu ajn. Lin kvazaŭ ĉirkaŭus barilo, ia, nevidebla.

Ankaŭ al mi ne estis agrable alpaŝi lin, sed mi rememoris la forpasintan Velimiron, poste ankaŭ Lazaron, la patron de Sreteno – kiom da fojoj ni pruntadis monon unu al la alia, kiom da fojoj ni partoprenis komunajn helplaborojn. Rememorinte tiujn plezurigajn tagojn, patronfestojn, kaj hejmajn kaj vilaĝajn, mi diris mense: ho, ĉu ni eĉ pensi povis, ke niaj filoj, jen, ĉi tiajn zorgojn kaŭzos al ni?

Kaj mi diris tion al Sreteno. Ĉion ĉi mi diras al li, sed li respondis, ke ĉion ĉi li mem scias, ke mi tion tute ne devis al li diri. Li sidis tiel, frotis la barbon, oftofte alrigardis min. Poste li promenetis, promenetadis, kaj rigardis ien. Silente.

Mi denove komencis paroli, por kiel eble pli rakonti pri ni, pri la batalintoj el la pasintaj militoj, kaj pri Lazaro, pri lia patro, kaj pri Velimiro, la patro de la kaptita Velko. Sed Sreteno subite alturniĝis kaj traboris min per sia rigardo: Ni ne povas pardoni iun ajn. Vanas via vortado!

Ĉu tiel, do? – mi frapis la tablon per la manplato.

Vane, oĉjo Miluteno, absolute vane! Li devas esti punita, por ke ni, la serboj, ne estu ekstermitaj; nun ne estas bona tempo por heroumi, por mortigadi germanojn. La kalkulo estas klara – se ni germanojn mortigados, multe da ni malaperos. Ni estas malmultnombra popolo, oĉjo Miluteno, diris li, dum la pasinta milito malaperis unu miliono kaj decent mil serboj – li komencis ciferi – se ankaŭ en ĉi tiu milito malaperos la sama kvanto – ni tute malaperos. Velko ja organizis tiun embuskon apud la malgranda ponto, se li tiam mortigus unu germanon, la germanoj poste mortigus cent serbojn. Nu, mi, oĉjo Miluteno, ne rajtas, mi eĉ ne volas, diris li, lasi viva la homon, kiu pli ŝatas unu mortan germanon, ol cent vivajn serbojn.

Tamen, s-joro kapitano – mi intence uzis lian titolon, kvankam li estas filo de Lazaro, kvankam mi lin, kiam li post la aprila milito revenis, defendis de lia patro Lazaro, de mia samaĝulo kaj milita kamarado – Velko ne mortigis tiun germanon, aŭ, dio ne permesu tion, plurajn germanojn. Sed Sreteno replikis: Li tion ne faris, ĉar mi malebligis al li tion, ĉar mi dispelis liajn embuskantojn, antaŭ ol alvenis germanaj ŝarĝaŭtoj, se mi ne farus tion, oĉjo

Miluteno, vi jam estus vidinta kio okazus al niaj infanetoj, al nia vilaĝo, kaj al ĉi tiuj grupoj niaj – li montris, jen, ĉi tiel, al la vilaĝo.

Mi kvietiĝis iomete, sed rememoris, ke la filo de Velimiro perdos sian vivon, tial mi diris: Klopodu, s-joro kapitano, provu iel ajn kompromisi, la vivon al ĉiu homo dio donas nur unu fojon.

Oĉjo Miluteno – li turniĝis al mi, kvazaŭ fajro lin brulvundus – se vi kaj mia patro, kaj la aliaj viaj samaĝuloj al mi diros, ke mi ataku la germanojn, mi faros tion. Serbujo denove brulu. Kaj forbrulu. La germanoj mortigadu virinojn kaj infanojn. La tuta Serbujo iĝu Kragujevac kaj Kralevo.

Ankaŭ mi ne volas, ke niaj infanoj pereadu – penoplene diris mi, komprenante, kion li volas diri.

Nu, se vi ne volas, ke niaj infanoj pereadu, vi ne venus por peti indulgon por Velko. Nun okazas gravaj aferoj, nun ne estas tempo pensi pri najbareco, nun oni ne devas vane uzi sian tempon. Sed la manoj de Sreteno, kreu min, paliĝis kaj nigriĝis, ili pendis senmove, kvazaŭ rompitaĵoj. Tamen ili estis danĝeraj, vere danĝeraj, je dio. Ŝajnis, ke ili estas fortomankaj, ŝvitomankaj, eĉ pomon ili ne povas levi ĝis lia buŝo, same kiel lia buŝo ne povis gluti, sed jen, strangoli, buĉi, tion ili povis. Mi okulis dekstren kaj maldekstren, dezirante scii, kie la ido de Velimiro estas malliberigita, sed li diris, ke mi iru hejmen, kaj ke mi denove venu, se mi ion bezonos. Kaj mi foriris. Kion mi povis fari?

Mia Ĵivana atendis min en la strateto, apud la pordego de Stankoviĉo. Ŝi ekiris renkonte al mi, esperante aŭdi bonan novaĵon, kaj alporti ĝin al Spasenia.

Mi ne povas ĝojigi vin, kaj vi ne povos ĝojigi Spasenian, diris mi.

Ve, kiaj homoj vi estas – krucosignis mia Ĵivana – vi forgesis, kiu vi estas, kie vi naskiĝis, kiaj estis viaj patroj kaj avoj, patrinojn viajn malfeliĉajn, mi eĉ ne mencios: kiamaniere, diris ŝi, vi iros sur la tombejon dum la tagoj de memoro pri mortintoj, tie ja kuŝas viaj patrinoj kaj avinoj.

Nu, Ĵivana mia, mi neniom kulpas, ili nur penas certigi sian regadon.

Sed ŝi pluparolis diris: Ĉu vi vere ne hontas, Miluteno, oni ja unue devas postvivi, nur post tio oni rajtas pensi pri regado – ŝi haltis iomete, kaj alrigardis min – kia estos tiu regado se oni filuktas por ĝi per arkebuzoj kaj ponardoj. Mi ja rigardis mirante, kiel mia Ĵivana ŝanĝiĝis en ĉi tiu tohuvabohuo kaj tempesto, ŝi nun parolis, kiel se ŝi librojn legis.

Kara edzinjo, mi ne luktas por la regado; min neniue demandas, min nun neniue respektas, nun estas alia tempo, ĉi tio nun estas alta politiko – mi vortis, kaj ŝi iomete kvietiĝis.

Ni du iris tiel tra la strateto al la domo de Spasenia, Ĵivana jam silentis, evidente penante ordigi la pensojn.

Ho ve! – ekĝemis homo tie, apud la lernejo.

ĉu vi aŭdis, Miluteno? – ŝtoniĝis mia Ĵivana.

Mi aŭdas, ĉu mi povas ne aŭdi, tio ja aŭdiĝis tra tuta duono de la vilaĝo.

Li denove ekhurlis – kompreneble, Velko. Li stertoris. Kiel se oni estus mortigantaj buĉbruton.

Miluteno – Ĵivana rigardis min rekte en la okulojn – ĉu vi petis Sretenon ĝustamane kaj ĝustalonge?

Kompreneble, mi petis, Ĵivana, mi petis, petadis, eĉ la ŝtono moliĝus, sed jen, ili estas tiaj homoj, malmulte nun helpas petoj. Mi ne volis diri: same oni petis Velkon, sed ankaŭ Velko ne volis aŭskulti petojn.

ONI MALDEVAS MENCII LA MALAMIKON

Atendu, nevĉjo mia, parolos mi ankaŭ pri la maljunaj batalantoj, nun mi volas diri al vi alion.

Dum la entombigo de la filo de Milano Periŝiĉo, mia Ĵivana, memkompreneble, staris ĉi tiel, ĉe mi, ni atendis ke alvenu la popo, ke li faru fenebran preĝon, post kio la akompanantaro ekiros. Sed la popo ne estis venanta; ankaŭ al la popoj ne estis facile, ili timis, ke la fenebra preĝo ofendos la mortigintojn, kiuj povus pro tio venĝi – ĉiuj scias, ke post la entombigo en Buĉio tiea popo fornebuliĝis.

Dume Milano, la mizerulo, paŝadis en la korto, rigardadis al la strateto, esperante, ke la popo aperos. La homo ne sciis, kiel entombigi la filon, sen popo li tion ne povis fari, neniam oni sen popo entombigas, krom la hajdukojn, sed lia filo ne estis hajduko.

Ĉu vi vidas tion, Miluteno, eĉ la entombigoj ne estas tiaj, kiaj ili antaŭe estis – alflustris al mi Ĵivana – en la bonaj tempoj oni vekriis kiam iu forpasis. Simpla la virino, tamen ŝi vidas tion, kion vidas: neniam oni pli mortigadis, sed neniam, malpli da lamentado aŭdiĝis.

Ankaŭ por mi tio estis malplezuriga. Oni silentis, ĉiuj ariĝis, sed rigardis antaŭ sin, kvazaŭ ni estus ŝtelintaj mortinton, kvazaŭ la senviviginto estus inter ni.

Estus bone, se vi, la viroj, la grandaĝuloj homoj, eklamentus – alflustris al mi Ĵivana – la vira malbeno estas pli mortiga. Prudenta estas mia Ĵivana, ŝi scias, ke ankaŭ al la senvivigintoj ne estas tute gale, ĉu ili mortigas homojn, kiuj vekrias kaj malbenas, aŭ homojn, kiuj silentas. Sed tamen, kiel mi faros tion, kiam ĉiuj silentas, estus normale, ke Milano la unua ekveu, li ja estas patro.

Kial vi ne vekrias, Milano – mi alpaŝis lin – filo via havis dudek unu jarojn, li vizitadis lernejon, dum vi estis taglaboristo; ni ĉiuj ĝojis kaj esperis, ke ankaŭ ni havos nian kuraciston, sed nun, jen, ni lin, mortan, prisilentas kaj nur levas la ŝultrojn.

Milano alrigardis min. Kiel mi vekriu, Miluteno, diris li, se mi maldevas la malamikaĉon menci, la malamikaĉoj estas nun ĉie, ĉiuflanke, diris li, ĉe rojoj, en densejoj, ili eble estas ankaŭ inter la akompanantaro. Mi timas, diris li, se la malamikaĉojn mi mencias publike, ili mortigos ankaŭ mian alian filon; oni maldevas, diris li, la malamikaĉojn mallaŭdi. Ĉi tiu, kiu mallaŭdis ilin – Milano montris la ĉerkon kun lia morta filo – vi ja vidas, kio al li okazis.

Mi kvietiĝis. Kion diri: li pravas, vidas la homo kio okazas.

PANON – NE ĴETU!

Mi plugis sur Nigra Krutmonto. Virbovoj miaj elĉerpiĝis, mi haltigis ilin, sidiĝis sur plugiltrabon, ekbruligis cigaredon.

Saluton, oĉjo Miluteno! – tremigis min voĉo dedorse.

Dio helpu! – respondis mi, kaj turniĝis: triopo kun pafiloj staris sur plugejo, paŭtaj, mi komprenis, ke al ili ne plaĉis mia saluto, sed mi, la stulta, kutimiĝis, tuj kiam mi vidas homojn kun pafiloj diri: dio helpu! Same kiel kiam mi militis.

Mi forgesis, ke ekzistas armeo, kiu dion ne agnoskas.

Ĉu vi havas ion por manĝi? – demandis la filo de Pulao, lin mi rekonis.

Mi foriris ĝis la ĉaro, prenis sakon, elprenis lignan ujon, panon, lardon, kaj sorbtrinkilon kun brando. Al malsatanto doni panon kaj alpanaĵojn estas bonfaro. Prenu, homoj karaj, manĝetu tion, kion mi havas, kaj drinketu.

Tamen, sen drinkaĵo, ni estas, oĉjo Miluteno, armeo, kiu ne drinkas – diris la filo de Pulao.

Min mirigis, ke ekzistas armeo, kiu ne drinkas – tial mi levis la ŝultrojn, sed li pluparolis: Ni bezonas sobran cerbon. Kaj honestecon.

Mi denove levis ŝultrojn, pensante: ekzistas ja homoj kun sobra cerbo kaj plena honesteco, kvankam ili fojfoje drinketas, sed povas esti ankaŭ male.

Drinku – diris mi – kaj restu sancerba. Mi kun la kolonelo Ivoviĉo antaŭ Veterniko drinkis grekaĵon, homo min alvokis, ni drinkis kiel homoj, sed sancerbaj ni restis, kaj venkis, la brando nek helpis nek malhelpis – tiel mi parolis pri la greka konjako, fanfaronante, ke mi drinkis kun la kolonelo, dezirante iel ekscii kial li ne drinkas, mi ja sciis, ke li drinkis, ka lia patro

drinkis eĉ pli, ankaŭ avon lian mi memoras, tiu drinkis, frato mia, pli ol la aliaj, sed ĉi tiu, jen, neniom, eĉ ne unu guton.

Bone, nevĉjo mia, ĉu vi estas malsana? – ankaŭ mi obstinis. Neniam mi ŝatis rufianojn, sed ankoraŭ pli malmulte mi ŝatis la sobruulojn, kiuj ĵurpromesis ne drinki; nun mi volis ekscii, ĉu ili nun la brandon evitas, por plaĉi al la popolo, ĝis kiam ili iĝos regantaj.

Mi ne estas malsana, oĉjo Miluteno – diris li – mi ja ne drinkas, ĉar niaj malamikoj drinkas.

Nu, bone, rezonis mi, ne estas ili viaj malamikoj pro brando, vi ja ne dividiĝis je rufianoj kaj sobruuloj, sed je ĉetnikoj kaj partizanoj.

Do, demandis mi lin, ĉu vi ion drinkos, kiam vi ekregos, aŭ vi restos sanktuloj ĝis la fino. Min tre interesis, ĉu ili aktoros sobruulojn nur ĝis kiam ili ekregos.

Neniam ni ŝanĝiĝos – li preskaŭ ekkoleras, ĉar mi dubis pri tio.

Bone, nevĉjo mia. Mi proponis al li la sakon ka la ensakaĵojn.

Ĉu vi vidas, oĉjo Miluteno, kiel ni batas la germanojn? – li ne povis silenti eĉ manĝante.

Mi vidas – diris mi, kvankam, sincerdire, ne tre multajn germanojn mi vidis mortaj – sed mi vidas, ke la germanoj ne batas nur vin, sed ankaŭ infanojn.

Li min rigardis, kaj diris, ke ĉiuj ostoj en fundamenton iu granda estonto estas enkonstruitaj. Ĉiuj infanoj en Kragujevac, kiuj estis pafmortigitaj, ĉio ĉi tio estas fundamento.

Mi troaŭskultis pri infanaj ostoj kaj fundamento jam en Albanujo, kaj poste mi vidis, kia estas la fundamento el infanaj ostoj, tio ja videblis ankaŭ en ĉi tiu milito – babilis mi. Mi parolas tion, kion mi pensas.

Kion vi diras, Miluteno! – ekstremis la filo de Pulao, kaj ĵetis panon. Li min ne nomis oĉjo, sed nur Miluteno, li ekkoleris.

Atendu! Panon – ne ĵetu! Mi levis la pecon de pano, kisis ĝin, kaj montris al li la plugilon kaj plugejon – ĉi tion oni devas respekti! Mi montris al li la panon: Mi ĉi tion, nevĉjo mia, honeste perlaboris, pano sen pioĉo ne ekzistas.

Sed li min tute ne aŭskultis. Li nur siblis: Ĉu vi deziras, Miluteno, ke la aliancanoj solaj venku Germanujon, ke ili poste solaj triumfu kaj dividu la mondon. He, por tiaj, kia vi estas, Miluteno, ni havas ĉi tion! – la filo de Pulao manfrapis la pafilkapon.

Atendu, ho! – diris mi, al mi malplaĉis, ke li minacas al mi, kiel ja povis okazis, ke la filo de Pulao minacu al Miluteno. Tamen, nun estis tia tempo, tial mi sindetenis; Mi ne volis ofendi vin, mi ne volis diri, ke la aliancanoj devas solaj ĝui la venkon, sed jen, ekzistas homoj kiel mi, kiuj ne komprenas, ke la aliancanoj multe helpas bruligo de municipa arĥivo, precipe se en la arĥivo

troviĝas nur listoj de kampulaj domoj, nomoj de familiestroj, naskiĝjaroj kaj datoj de morto.

Ĉiuj arĥivoj estas bruligitaj, negrave kiaj ili estas! – bruskis la filo de Pulao. Nu, li volis bruligi, neniam argumentoj helpas.

Al mi tamen ne plaĉis, ke ili bruligas listojn, kiujn nur ni bezonas, kaj ke germanoj pro la listoj, kiujn germanoj neniam bezonas, bruligas niajn domojn, mortigas niajn hejmanojn... kaj pro paperaĉoj, kiujn bezonas neniu, krom ni mem.

Pripensu, Miluteno, kion vi parolas – li ekflagris, alrigardis la duopon apud si, kiuj gapis al mi – ne pensu, ke ni ne scipovas mortigi.

Tiu ideo ne venis al mi en la kapon – diris mi – mi ja scias, kion vi „scias kaj povas“, vi ne devas min tre kredigadi pri tio. Mi nur diris tion, kion vi min demandis. Mi nek petis vin alveni kaj postlasi min malsata sur la plugejo, mi nenion vin demandis, sed kiam vi demandis min – mi respondis. Se vi volis, ke mi respondu al vi tion, kion vi mem scias kaj deziras, vi ne devis min demandi; se vi demandis, por aŭdi miajn vortojn, eltenu tion, kion mi respondas. Kian liberecon vi promesas, se vi mortigas pro tio, kio al vi ne plaĉas, ĉu ekzistas en via libereco ajna libereco ankaŭ por mi?

Ĉio ĉi estas seriozaj aferoj, nevĉjo mia. Ridindaj aferoj. Ĉu ne? Mi plenumis mian militdevon, mi plenimis la devon antaŭ la patrujo, sed tiam alvenas la filo de Pulao, kaj nun li saĝumas.

VIN, MILUTENO, NUN NENIU DEMANDAS PRI IO AJN

Atendu iometete, poste ni parolos pri la maljunaj batalintoj. Unue mi devas paroli pri Boraŭo Sturmo. Mi diros tion al vi, li apartenas al la familio Garaŝiĉo, la kromnomon Sturmo al li donis liaj militaj kamaradoj. Verŝajne, ĉar li ofte sturmis. Mi ja konis demonajn homojn el la pasintaj militoj, kiuj sturmadis kiel rabiaj, kaj tial ili ricevis la kromnomon „Sturmo“. Ankaŭ tiun Boraŭon mi bone konis. Ankaŭ patron lian, Jablanon, mi konis. Ankaŭ lian avon – Borivojon. Bonaj homoj ili estis. Kaj patro lia, kaj avo lia, estis pedeloj. Ili ĉiam servis dum liturgio en preĝejo, kantis ĉe la popo, portis al li epitraĥelion kaj fumilon, sanktigante akvon en la vilaĝo ankaŭ okaze de entombigoj kaj funebraj festenoj. Sed Boraŭon ili planis popigi, li vizitadis teologian seminarion en la urbo Srema Karlovaco, bona lernanto li estis, liaj samdomanoj tre ĝojis, vi ja scias kion signifas por malriĉula domo popigi samfamilianon. Tamen, Boraŭo ilin trompis, li ne volis popiĝi, kvankam post popiĝo li havus ĉion:

kaj preĝejon, kaj preĝejan loĝejon, kaj fruktarbejon kaj vinberejon, kaj du hektarojn da pluginda tero, kaj du hektarojn da gresejoj. Tiu paroĥio, kion diri, tio estas du vilaĝoj, ambaŭ riĉaj, kaj ĉiuj tie estus liaj paroĥianoj. Sed ĉio estis vana, ne volis Borao popiĝi, li sian vivon dediĉis al komunismo, li ĉiam kunumis kun opankistoj kaj tajloroj, lokaj ĉefkomunistoj. Same estis en la kvardek unua jaro, Borao foriris kun opankistoj kaj aliaj – kaj patro lia krevis. Nu, tiu Borao, nevĉjo mia, alvenis al mi kun siaj kunuloj, por ripozi kaj satiĝi – ŝajnas al mi, ke tio estis antaŭ aŭ post Nikolaotago en la kvardek tria jaro.

Mi kaŝis ilin en la subtegmento de mia stalo. En fojno. Unu el ili estis vundita. Mi ne sciis kiu li estas, la knabon mi ne konis, sed mi sciis, ke lia vundo malcikatriĝis, ke li havas febron, mi ja sciis, ke li ne estas el nia regiono, ke li aĉajn vundojn eltenas kiel brava viro, eĉ per la dentoj li ne ekgrincis. Ili diris, ke li estas el Kroatujo, unu el la knaboj-rifuĝintaj. Ustaŝoj senvivigis ĉiujn liajn parencojn. Nur sian fratinton li menciadis. Kordoloriga estis tio. Li bezonis lakton kaj infuzaĵon. Krom tio, Ĵivana povis ankaŭ balzamon sur liajn vundojn smeti. Ne estas bone, ke la vundita junulo dormu en subtegmento, oni devas lin transporti sur kuŝejon, por ke Ĵivana povu ŝanĝadi liajn kompresojn – peko estas tio, juna estis la malfeliĉulo, li estis nur iom pli aĝa ol mia Radojo. Sed Borao Sturmo min haltigis, li volis ke mi lin aŭdu, li komencis babili pri impostoj.

Atendu, ho, Borao, ne estas tiuj impostoj la plej granda malfeliĉo en la mondo, nun ja ne estas momento por solvi la impostan problemon. Tiajn aferojn, Borao, oni solvas en parlamentoj – ne en subtegmento – diris mi.

Li eĉ aŭdi min ne volis: Kiaj parlamentoj, diris li, la parlamentoj havis sufiĉe da eblecoj por nuligi impostojn, sed ili tion ne faris! Ni ne povas, diris li, kredi al la parlamento, tiujn demandojn oni solvas sturme, ne per mallertaj parlamentaj interparoloj.

Ni lasu tion, Borao, por alia okazo, atendu, ke mi ĉi tiun knabon subenportu el la stalo, ke mi metu lin sur la kuŝejon, tie estas pli varme kaj pli komforte, Ĵivana lavos lian vundon per kuraĝakvo, kaj surmetos balzamon, samkiel ŝi farus, se li estus ŝia infano. Lakton varmetan li trinku, por vundito ne povas ja subtegmento stala anstataŭi kuŝejon – prefere ĝi anstataŭ ejon parlamentan.

Mi subenportis la vunditon, kaj metis lin sur mian kuŝejon. Ĵivana bruligis sebkandelon, kaj komencis agi. Mi faris fajron, varmetigis akvon, varmetigis kuraĝakvon. Kaj purigis la vundon. Kaj surŝmiris balzamon, kaj bandaĝis, Ĵivana alportis lakton kaj mielon, ho, kia agrablo.

La knabo varmiĝis, vangoj liaj ruĝiĝis. Li ekdormis.

Ĵivana kaj mi tiel sidis apud li, apud la infano, animdolore estis rigardi lin. Tiam audiĝis frapado sur la pordo. Kaj ankaŭ sur la fenestro. Mi ekvidis tubojn sur la fenestro, al mi ne estis malfacile kompreni, ke la pardon frapas pafilkapo.

Mi prenis hakilon, ekstaris ĉe la enira pordo, kaj demandis, kiu estas tie. Malfermu, malfermu! – grumblis voĉo ekstere. Kaj iu minacis al mi.

Atentu, Ĵivana – flustris mi al la edzino – se ili eniros, diru, ke ĉi tiu, en la lito, estas nia filo, Radojo, diru ke Radojo malsaniĝis.

Sed kion mi diru, se ili ankaŭ Radojon ekvidos? – paliĝis Ĵivana. He, mi ne scias kion ni tiam faru. Nu, kiel agi, mi ne sciis. Sed la batado sur la pordon ne ĉesis, kvazaŭ oni volus forrompi pordon.

Mi deŝovis la riglilon, kaj stariĝis sur la la pordosoĵlon. Kaj rekonis Vuĉiĉon Bajoviĉon.

Kiu estas en via domo, Miluteno? – ekkriis li, dezirante timigi min. Sed se li min timigos, tio estos fino kaj por mi, kaj por miaj samdomanoj, kaj por la domo.

Vuĉiĉo Brajoviĉo tre facile povas bruligi iun ajn domon, mortigi iun ajn homon. Vuĉiĉo povas fari eĉ pli aĉajn aferojn. Li estis panbakisto, lernanta metion de Miloĵeto. Fajron kaj ponardon li ĉiam volontege uzis.

Kial brilas lumilo en via domo, Miluteno? – Vuĉiĉo Brajoviĉo volis preteriri min, transiri mian soĵlon.

Atendu, ho, Vuĉiĉo, oni ne tiel eniras mian domon; ni ja estas serbojm, homoj, mi ja devas ankoraŭ vivi en ĉi tiu domo, sed kiel mi vivos, se en mian domon oni eniras laŭ propra kaprico! Kie mi estas respektinda, se mi ne estas respektinda sur mia soĵlo?

Miluteno, ne prediku! – Vuĉiĉo min puŝis, volis eniri.

Sed mia Ĵivana eliris sur la soĵlon, kaj ekparolis laŭtvoĉe: Ho, Sreteno Ĉarapiĉo – per la manplatoj ŝi faris kvazaŭfunelon, voĉo ŝia same resonis – ho, Sreteno, ho, kapitano! Ŝi kriis plengorĝe.

Kaj Vuĉiĉo konfuziĝis: Kial vi kriaĉas, Ĵivana, kion vi volaĉas? Kial vi alvokas la kapitanon?

Mi volas demandi la kapitanon Sretenon Ĉarapiĉon, la filon de Lazaro, kial ĉi tiu mia stultulo – ŝi montris min, kaj lia patro Lazaro militis de la naŭcent dekdua, ĝis la dekoka, se ni eĉ sur nia soĵlo ne meritis, ke oni nin respektu kiel homojn! Mi volas, diris ŝi, demandi Sretenon Ĉarapiĉon, ĉu lin tial lia patro sendis en lernejon por oficiroj, ke lia armeo nun invadu domojn de liaj militaj kamaradoj kaj najbaroj de lia patro. Mi volas demandi lin, kial ni en nia domo eĉ lampon bruligi ne povas pro lia armeo, eĉ kiam nia filo malsanas.

Mi ŝin rigardas – jen kian solvon ŝi trovis, je dio. Kaj mi vidis, ke Vuĉiĉo kvietiĝis. Li ne sciis, ke la infano malsanas, diris li. Pravigante sin. Kaj foriris. Sed Ĵivana komencis skoldegi min: Maljunuliĝis vi, diris ŝi, dum la militoj, nun vi eĉ ne scias, kiel oni devas kun soldatoj interparoli.

Ĉesu, Ĵivana – diris mi al ŝi – scias mi, kiel oni kun la soldatoj interparolas, sed ĉi tiuj ne estas soldatoj, vi ja vidis, kiaj ili estas.

Sed ŝi pluvortis malhezite: Vin, Miluteno, nun neniu demandas pri io ajn. Nu, mi haltis kaj komencis pensi – vere, ŝi parolas la veron, oni min ne demandas pri io ajn.

MATENE, ROSTEMPE

Nu, ankaŭ ĉi tion mi devas diri.

Mi paŝtis la brutaron. La brutojn mi elpelis, por ke ili paŝtu antaŭ la tagiĝo, antaŭ ol ekardos la suno: dum varmego la brutoj ne povas paŝti, ili povas nur ripozi.

Ĉio raviga. Freŝis herbo, freŝis folioj. Dume birdoj kantis, kvazaŭ ne estus milito kaj okupacio.

Subite el la Kerstoviĉa ŝafmelkejo aliris du knaboj kun knabino inter ili, la duopo subtenis la knabinon, mi vidis, ke ŝi estas vundita. Knabino – sed vundita, ankaŭ tio estas novaĵo en ĉi tiu milito nuntempa.

Ili haltis antaŭ mi, mi rigardis ilin, la knabinon mi kompatis, ŝi estis preskaŭ infano, iom pli aĝa ol mia Radojo.

Kien vi iras, pro dio? – mi volis alpaŝi la knabinon, pri vunditoj mi jam iĝis spertega. Sed unu el ili nur mansvingis:

Mankas tempo, diris li, ili postkuras nin, oĉjo, ĉetnikoj Kosmajaj, de la hieraŭa tago, nun ili preskaŭ atingis nin. Helpu, se vi iel povas.

Fuĝu al tiuj vinberejoj – mi montris al Seka Altmonto – mi mensogos pri vi. Kion alian mi povis diri, alvenis la tempo, kiam nur per mensogo oni povas helpi homon.

Mi sidiĝis sur kampolimon, kaj atendis. Kial kosmajanoj alvenis ĉi tien? Kaj kiuj estas ĉi tiu infanoj, kaj ĉi tiu vundita knabino?

Kampulaj infanoj ili ne estis, tio estis tuj videbla, krom tio, la kosmajanoj ne postkuras ilin por montri, ke ili estas pli rapidaj, sed por senvivigi ilin, do mi devas helpi. Krom tio, vi ja promesis, Miluteno, diris mi mense.

La brutoj ektimis kaj rigidiĝis, ili staris kaj rigardis. De tie, elpost la densejo, aperis soldatvico. Ili iris rekte al mi. Kion mi povis fari, krom sidi kaj rigardi. Eĉ ne unu alvenanton mi konis, ili ne estas el nia vilaĝo, ili ne sekvas Sretenon Ĉarapiĉon.

Ĉu vi, oĉjo, vidis „ruĝulojn“? – alrajdis unu el ili, sur ĉevalo, verŝajne oficiro.

Malbone mi vidas, nevĉjo mia – diris mi al la oficiro, kaj montris al ĉi tiu mia ununura okulo – mi senokuliĝis dum la granda milito, tial mi ne kapablas miksiĝi en ĉi tiujn viajn aferojn. Mi ne povis diri al li, ke mi senokuliĝis

dum la granda milito por en ĉi tiu milito hontiĝi kaj iĝi denunciinto, ĉar la denunciinto estas la plej malhoma ago, almenaŭ iam oni tiel parolis.

Ĉu vi vidis ruĝulojn? – denove min demandis la oficiro sur la ĉevalo.

Kaj mi diris: Mi vidis. Du junulojn kaj unu knabinon.

Ĉu vunditan? – demandis la oficiro kaj, eble, faris signon ke oni min starigu.

Mi vidis, diris mi, ke ili helpas ŝin iri, verŝajne ŝi estas vundita.

Kaj kien ili foriris? – demandis la oficiro. Mi montris ĝuste al Seka Altmonto, dio mem diris al mi vortigi la veron, post kio la homo sur la ĉevalo turniĝis al Radana kampo. Mensogis la oĉjo, diris li.

Ili foriris kiel pluva ŝaŭro, malal Seka Altmonto. Ho dio, rezonis mi, jen kiel nun oni devas mensogi, ni tiom kutimiĝis mensogi, ke jam neniu kredas je la vero.

Ho dio, rezonas mi plue, kiu povis atendi ĉi tiajn ŝanĝojn, kiu povis ekpensi, ke io ĉi tia okazos al la homo, kiu brutaron paŝtas matene, rostampe, ĉi tie, en en nia kvietaj kaj malsovaĝa Koŝutico?!

Mi miris, nevĉjo mia, memkompreneble! Kaj neniam mi ĉesos miri.

Mi aŭdis, ho, pri tiu revolucio, sed ne povis kompreni, kion ĝi faras en Koŝutico.

PARLAMENTA DEMANDO

Mi memoras, kiel se tio ĵus okazus – sonĝis mi nian karmemoran reĝon Aleksandron, tian, kian mi vidis lin en la dekseca jaro, en januaro: li staris sur la bordo de la insulo Vidao, antaŭ li estis amaso da niaj kadavroj, oni ligadis ŝtonoj al ili, por ke la povruloj ne drivu sur akvo, kaj li, Aleksandro, rigardis, apogis sin sur sabron, kaj tute nigra, rigardis al tiu insulo, kiu pro niaj mortintoj ricevis la nomon Insulo de morto. Mi alpaŝis, haltis, ĉi tiel, kaj demetis la serbĉapon, sed mi ne povis ekparoli pro pedikoj, mia buŝo estis plena da pedikoj, tio ja vere okazis, kaj mi komencis ŝiri la pedikojn el la buŝo, elprenadi ilin, kraĉi, tiam la reĝo Aleksandro min alpaŝis kaj demandis: Ho soldato, ĉu al mi la serba popolo povos pardoni tiel grandan pereinon?

Neniu iam ajn povos pardoni al vi, vi, reĝo nia, vi tute pereigis ĉi tiun popolon, ĝi ja neniam plu estos tia, kia estis, ĝi ne povos, eĉ se volus, mankas pardonontoj, mankas homoj, pereis la popolo. Rigardu, via moŝto, ĉi tiujn homojn – mi montris al li tiujn niajn kadavrojn, la kadavroplenan bordon – diru sincere, cia moŝto, kial ĉi tian popolon vi pereigis; neniam plu tiaj serboj vivos, tiaj, pri kiaj vi povis fieri en la tuta mondo.

Pro la unuiĝo mi oferis mian popolon – diris li al mi. Mi volis demandi lin, ĉu li vidis kio fine okazis, ĉu li vidis serbajn rifuĝantonj el Kroatujo kaj Bosnujo, el Kosovo kaj el Vojvodino, sed mi rekonsciiĝis, la reĝo tion ne povas scii, oni ja mortigis lin antaŭ la milito.

Tiun tagon mi sidis sub antaŭpordo, kiam aŭdiĝis la pordosono – alvenis Paŭlo, tutkovrita de rubandoj, kun medalaro sur la brusto.

Ek, Miluteno, vestiĝu, nin invitis la majoro Miŝo Radoviĉo, ni iru kun li, ni devas repacigi la malamikiĝintajn fratojn.

Miŝo Radoviĉo estis, nevĉjo mia, eksa rezerva majoro de la serba armeo, bona kaj honesta homo, batalanto la plej brava kaj bona en nia regiono, inda familiestro, lia domo estis homoplena, kvar filoj, bofilinoj kaj neparo; la plej bona abelisto kaj greftisto en nia regiono li estis, dank al liaj greftaĵoj la tuta Ŝumadio ekfloris kaj fruktis ege.

Mi ne povas diri, ke mi absolute ĝojis pro tiu kontakto kun la majoro Miŝo, sed mi ne povis ne konsenti.

Mi vestiĝis, surmetis la ordenojn, ornamigis kaj ekiris kun Paŭlo, antaŭ nian lernejon. Tie nin atendis la majoro Miŝo kun pluraj niaj tesalonikaj veteranoj. Tiam la majoro diris al ni, kial li nin alvokis, dankis ĉar ni konsentis kaj alvenis, post kio li denove ekparolis pri sia intenco. Homoj karaj, ni estas profundaĝaj, diris li, ni jam havas nepojn, sed ĉi tia milito... vi ja vidas kio okazas. La milito, diris li, nur alportis inter nin malakordon, kiu nin detruas pli ol la okupantoj. Se ĉi tio daŭros, ni ne bezonos malamikojn, fremdulojn, ni mem pereigos nin. Ni, en nia tempo, faris por la savo de Serbujo pli ol ni povis kaj rajtis, tio nun esti nia rajtigilo, ke ni nun faru kion ni povas, por ke la senkulpa lando kaj popolo liberiĝu de la malbono, kia inter ni ĝis nun neniam ekzistis.

Mi meditis, nevĉjo mia, ĉu diri ion, sed tamen mi ne faris tion – tio, kion la majoro Miŝo decidis fari, ne povas esti malbona, oni ne povas kompromitiĝi farante tion, finfine, nenion pli gravan ni nun povas fari! Sed tamen, ankaŭ tiu, al kiu ni volis iri, la majoro Kalaiĉo, estas homo, kiun ni konas, kaj kiu konas nin. Ĉi tie, antaŭ la milito, li estis mezuristo, sed nun, li iĝis majoro, kvankam, kiu al li donis tiun rangon, tion mi ne scias, mi nur scias tion, kion mi aŭdas, ke li komandas iun reĝan gvardion, kaj ke li el Plata Monto venis en nian regionon.

La majoro Kalaiĉo nin renkontis, sincere ekĝojis, li estis milda kaj kompleza, kaj ĉar li estas pli alta ol ni eĉ kiam sidas, li nin aspergis per belaj vortoj, kaj ankoraŭ pli afabla rigardo. Estas bone – diris la majoro Kalaiĉo – ke la rezerva majoro Radoviĉo arigis kaj venigis al li tesalonikajn veteranojn, ke li por tiel grava afero arigis tiujn, kiuj plej multe suferis por la savo de la patrujo. Por li, ĉi tie, diris li, la plej grava estas tio, kion ni ne havas, pro kio ni

dum la pasinta milito perdis, iu okulon, li montris al mi, iu brakon, iu kruron. Ni, diris li, kortuŝis lin. Kaj estas bone, ke ni tiel ornamis sin per medaloj – li observis nin. Observis la medalojn. Kaj proponadis al ni manĝaĵojn kaj drinkaĵojn. Al la gastejestro li ordonis surtabligi regalaĵojn – ĉi tiajn gastojn, li, majoro Kalaiĉo, diris li, ne havis, kaj li ne kredas ke ĉi tiel ariĝintajn ankaŭ la kafejstro delonge ne vidis.

Ĉu li umas nin? – mi rigardis la majoron Kalaiĉon.

Sinjoro majoro, ni kun pura koro kaj kun la plej bona intenco venis al vi ĉi tien, ne por tagmanĝi, sed laŭkonscie plenumi nian ŝuldon al la popolo, same kiel ni tion faris dum la tri militoj – oponegis ja nia majoro Miŝo Radoviĉo, li parolis, paroladis, liaj lipharoj senĉese saltadis, kiel se li farus raporton. Jen, ĉiuj ĉi maljunaj bataluloj – la majoro Miŝo per la mano montris nin – diros kio premas la popolon kaj nian karan patrolandon.

Ilin – denove la majoro Miŝo montris al ni – nia karmemora reĝo Petro la Unua Liberiganta gvidis tra Albanujo, kaj ili lin tie portis. Li haltis, silentis certan tempon, kaj daŭrigis. Jes, li ilin gvidis, kaj ili lin portis, kaj tiel grandan gloron akiris, kaj tial al ili oni devas kredi – li montris al ni – antaŭ la patrujo ili neniam mensogis, neniam pekis.

La majoro Kalaiĉo sincere kortuŝita, kapjesadis, aprobadis, frapadis la ŝultron de la majoro Miŝo, kaj proponadis al ni ekmanĝi kaj ekdrinki, ni ja estas liaj gastoj, kaj li ĝojos, se ni ion desur la tablo, kiun li por ni ordigis, prenos manĝi, same kiel li farus, ĉe la tablo de iu ajn el ni. Dume ni povas paroli, tial ja, diris li, ni renkontiĝis. Li tostis kun ni, vivuadis, bonvenigadis. Parolu libere, homoj, faciligu la animon, diru ĉion, kio premas viajn korojn. Li, la majoro Kalaiĉo, scias, diris li, kiaj estas la koroj de maljunaj bataluloj, kaj kion signifas zorgi pri la patrolando.

La majoro Miŝo tuŝumis la lipharojn, kaj diris pli severe: Se ni daŭrigos ĉi tiel, ho vojevodo, ni bezonos nek germanojn, nek bulgarojn, nek hungarojn, nek ustaŝojn, ni mem estos sufiĉaj, ni ekstermiĝos eĉ sen ili.

Kaj ni ĉiuj unuvoĉe – rekuraĝiĝis – aprobis la vortojn de la majoro Miŝo.

La majoro Kalaiĉo sidis kaj aŭskultis. Kaj subridis. Nu, vere bonas, diris li, ke vi ĉiuj ariĝis. Kaj bonan taskon vi plenumas. Bonan ideon vi havis. Por viaj animoj bonon vi faras – li rigards nin, leviĝis, promenetis ĉirkaŭ ni, kaj denove sidiĝis. Bone, diris li, se vi ja alvenis paciĝi min kun la komunistoj, diru, ĉu tio signifas, ke vi interpaciĝis kun ili?

Antaŭe, diris li, vi devas kun ili interpaciĝi, kaj post tio vi rajtos interpaciĝi ankaŭ nin.

Min io tremigis.

La majoro Miŝo ne cedas, li havas ĉiujn eblajn ordenojn, ankaŭ du Karaĝorĝajn stelojn kun glavojn. Tio veras – diras nia Miŝo al la majoro

Kalaiĉo – ĝuste, ĉiuj serboj devas interpaciĝi kaj unuiĝi, ĉiuj, ĉie, kaj kiam la taskojn soldatajn ili plenumos, kiam ili savos la patrolandon, post tio oni povas politikumi kaj kverelumi. Dum balotado. Ankaŭ en parlamentoj. Tia estas la ordo kaj tradicio inter veraj kaj estimindaj popoloj en Eŭropo.

Sed kion vi, oĉjo Miluteno, opinias – la majoro Kalaiĉo fiksrigardis min – ĉu vi pensas same kiel la sinjoro majoro Radoviĉo?

Mi konfuziĝis. Kion mi diru? Mi vidis, ke al li ne plaĉis tio, kion parolas la majoro Radoviĉo, mi ankaŭ sciis kia estas la sorto de la homoj, kiuj parolas tion, kio al li ne plaĉas, sed kiel mi nun povis perfidi nian Miŝon, la maljunan serban rezervan majoron. Kaj finfine, ni alvenis por interpacigi la malamikiĝintajn fratojn, ni maldevas permesi, ke oni nin timigu kiel infanojn.

Mi samopinias, s-joro majoro – bruskis mi, fiksrigardante rekte en liajn okulojn, kaj li skuiĝis. Kaj malagitiĝis. Mi, diris li, pensis alie – li rigardis nin senekscite, kvietan nun li estis.

Mi, diris li, pensis, ke ni unue devas kvitiĝi kun la komunistoj, kaj poste kun la germanoj. Kun la germanoj, diris li, oni povas kvitiĝi eĉ sen ni, sed kun niaj komunistoj, se ni kun ili ne kvitiĝos, tion faros neniu. Kaj ankoraŭ io, germanoj sendube foriros de ĉi tie, tiu momemnto alvenos, eĉ se neniu el ni kontraŭ ili ekpafos, kaj se la komunistoj ekregos – ili ĉi tie restos porĉiame, poreterne, ili nin jugos pli longe ol la turkoj. Diru do, ĉu mi ne pravas? Kion vi opinias? – turniĝis li al la majoro Miŝo.

Tio estas parlamenta demando – diras al li Miŝo, tuj, malevite.

Parlamentaj demando, diras vi, nu, seĝi oni povas en parlamento – li kapsvingis, ridante, tial estis malfacile kompreni lin. Li nin rigardis, rigardadis, sed ni silentis, atendis, kaj li ekvortis: Karaj patroj miaj, tre sentemaj vi estas. Vi eklarmis pro komunistoj. Al vi plaĉis, ke ili gravumas, pafetas kontraŭ la germanoj. Al vi ŝajnas, ke ili similas al serbaj gerilanoj, eble al vi eĉ ŝajnas, ke ili similas al vi. Ĉu ne estas tiel? Vi ĝojas, kiam oni pafas al la germanoj. Neniam al vi sufiĉas tohuvabohuo; hajduka sango via diras tion, ĝi ŝatas la ribelojn, ĝi ne povas sen ribelo. Kvankam tiun ribelon gvidas tiuj, kiuj kontraŭ vi pafis en la dekkvara jaro, kompreneble, ĝuste ili, kial vi miras. Kaj vi ne demandas vin, kial tiu ribelo ne estas organizita en Zagorjo, post kio la en Varaĵdino germanoj pafmortigus dekkvin mil lernantojn kaj junulojn, kiel en Kragujevac kaj Kralevo, ho, karaj patroj de nia patrolando! Kiu oni tiun inferan dancon ne okazigis tie, kial la kamaradoj el Zagorjo alvenis ĉi tien, en Ŝumadion, por ludi kun la vivoj de viaj infanoj kaj nepoj. Vi, patroj, patraĉoj ne pensantaj pri viaj infanoj! Nenio vin saĝigis, nek Albanujo, nek la insuloj de morto, nek la bluaj ĉerkujoj, vi tamen nun alvenis por ploraĉi pri la sorto de la ruĝa menaĝerio. Ĉu vi iam ajn saĝiĝos – demandis li nin – diru, mi, la malfeliĉaj patroj de la ankoraŭ pli malfeliĉa patrujo. Ĉu vi scias, ke ankaŭ la

germanoj kalkulas pri nia frenezeco, ĝuste tial ili deklaris „cent por unu“, nur por ni, kaj por neniu alia, nek por la slovenoj, nek por la makedonoj, pri la kroatoj mi eĉ paroli ne volas, nur en Serbujo estas tiel, cent serboj por unu blondaĉa ŝvabo.

Li leviĝis, tial al mi pro subita timego aŭ pro tiuj liaj vortoj ekŝajnis, ke li estas ankoraŭ pli alta ol li vere estis. Li iris kun la glaso en la mano, kun ĉiuj tostas, sed al ni ŝajnis, ke li frapas niajn kapojn. KREDU, neŭĉjo mia, ne estis agrable eĉ rigardi lin, okuloj liaj ardiĝis, vizaĝon lian estis kovrinta barbegiĉo.

Li promenetis re kaj re, kaj denove, per kvietiginta voĉo, sublaŭte: Kial do ni estu stultuloj, kial ni donadu cent por unu, kia kalkulo estas tio?! Vi, ŝumadianoj, devas de Varaĵdinanoj lerni kiel oni kun malamiko devas interparoli; vi restis kun la sako sen enhavo, diris li, vin sendis en arbaron la komunistoj. Al ili vi ekkredis, sed al mi vi ne kredas, vin mirigas, ke mi viajn kantojn ne kantis, kaj ne hopas en via rondodanco, vin tio mirigas, ĉar mi portas viajn signojn sur la ĉapo.

Li demetis, neŭĉjo mia, la serbĉapon, kaj observis la kokardon, la aglojn, ion fingrumis, ni ne povis scii kion li volas, sed li denove ekparolis: Ni devus nun laŭte ĝemplendi, diris li, antaŭ ni devus esti monaĥoj, ne batalistoj, sed monaĥoj kun transturnitaj talaroj, kun kandeloj renverse bruligitaj. Nun estas tempo por malbenoj kaj preĝoj, ne por malprofunda intelekto kaj vanvana bravado. Sed vi, karaj patroj, ne aŭskultas Varvarinanojn kaj Miŝaranojn, vi permesas al Varaĵdinanoj verŝi vian manĝaĵon el internaĵoj, ĉi tie, en Ŝumadio, sed tie en Varaĵdino oni ne hopas rondodance, oni ne kantas kantojn, pro kiuj oni perdas la vivon, karaj miaj, sagacaj miaj patroj – ĝuste tiel li diris, „sagacaj“ patroj, kaj mi tuj komprenis, kien ni kun niaj grizaj melonoj alvenis.

Mallevis la majoro Kalaiĉo sian glason, kaj komencis promeneti ĉirkaŭ ni, konstante karesante per la mano niajn kapojn, unu post la alia, poste li denove plenigis la glason, sed nur la sian, eldrinkis la enhavon glute-tute, ĉesrefute, kaj sidiĝis, brakumante la majoron Miŝon.

Jen, diris li, tion mi opinias, ho karaj patroj de nia patrujo, sed se vi pensas malsame, ankaŭ mi agos malsame, viaj deziroj por mi estas ordono, la historio komandas, mi devos obei al vi.

Neŭĉjo mia, mi komprenis kio okazas. Ankaŭ la aliaj komprenis. Ni silentis, silentegis. Li konstante ripetadis „la patroj de patrujo“. Oni ne parolas tiel, kiam oni bonon pensas.

Sed kion vi pensas, ĉu la komunistoj interpaciĝus kun ni? – demandis li, observante ĉiun el ni laŭvice. Ni konfuziĝis, rigardas la majoron Miŝon, kiu, kiel se estus nomvokita, diris: Pri tio ni okupiĝos poste, ni ĉi tion nur nun komencis.

Kalaiĉo leviĝis kaj streĉe tiris la rimenojn sur si: Kiun, diris li, mi obeos, se vin, la patrojn de la patrujo, mi ne obeos.

Li ŝuklakis, salutis nin soldate, ni saltleviĝis, resalutis, soldate, kompreneble, elakompanis lin ĝis fiakro kaj restis tiel salutante lin, kaj rigardante la fiakron forveturanta al la foirkampo. Tiam li abrupte sur la malantaŭa sidejo turniĝis, kaj el sia fusilo sendis al ni pafaron. Fajfis kaj knalis plumbaĵoj, ni ne povis kredi kio okazas. Eĉ foriĝi ni ne kapablis.

Facile estis al vi antaŭ ŝvaboj, germanoj kaj bulgaroj! – li kriaĉis per plena voĉo. La ĉevaloj ektimis, timretiriĝis, ili ne aŭdacis iri antaŭen, kaj alveturigis lin denove ĉi tien, antaŭ nin, la ĉevaloj faris mem, pro iu ĉevala timego.

Viaj malamikoj alvenadis kaj foriradis, sed miaj malamikoj intencas resti ĉi tie, porĉiame – li staris en la fiakro, lin oni povus aŭdi en la tuta vendokvartalo. Bonvolu iri, kaj kun komunistoj disputi en parlamentoj, sed mi kun ili interparolos nur per arda plumbaĵo!

Neniu estis tie en la vendokvartalo, eĉ ne unu hundo transkuris la straton, nur ni, amaso da eluzitaj veteranoj, paliĝintaj, aŭskultis kaj rigardis la furiozaĉan ĉetnikan majoron, kies krioj pli kaj pli timigis la ĉevalojn. Li ne volis atendi la francajn pneŭmatikajn buletojn el Korfuo, pri kiuj ni parolis dum senlaboraj vesperoj.

Mi scias, diris li, tio estos parlamento, en kiu nur komunistoj rajtos paroli, kvankam verŝajne ankaŭ ili nenion kuraĝos paroli en tiu sia parlamento. Vin, ho maljunulaĉoj stultaj, oni devus taskigi interparoli kun komunistoj en ilia parlamento, sed jen kion oni al vi permesos – li manfrapis subkubuton brakoflekse, prenis la gvidrimenojn de la soldato kaj skuis ilin. La ĉevaloj ekimpetis. Fajreris hufumoj sur la ŝtonpavimo. Ŝajnis, ke la radoj de la fiakro forfalos.

Kaj ni restis hontofrapitaj.

Ni staris sur la ŝtonpavimo, troornamitaj, en porfestaj vestoj, kaj kun medaloj sur la brustoj, evitante rigardi unu la alian.

Jes! – suspiris nia majoro Miŝo Radoviĉo, kaj ekiris en la vendokvartalon.

Jes ja! – eksuspiris ankaŭ mi.

PRENU LA PELTKITELON DE LA PATRO

Mi ne memoras precize, kiun tagon mi ricevis alvokleteron por mia Radojo, ke li iru en la komandojn.

Memkompreneble, la germanoj retiriĝis, la ĉetnikoj fuĝis. Ankaŭ la rusoj preteriris. Estis la 1944-a jaro, aŭtuno.

Mi sur lignohakejo hakis lignon, kiam mia Ĵivana alvenis kaj donis al mi paperon, alvokleteron por mia Radojo – ke li soldatiĝu.

Diru, Miluteno, kiel oni nian Radojo povas mobilizi, li ja ne soldatservis? – demandis ŝi, tute paliĝinta – ŝi ektimis.

Verŝajne iu tiel decidis – mi volis respondi, sed ne sciis kion diri. Se ni estus bonŝancaj, ion tian ŝi ne demandus, sed jen, ŝi demandis, patrino ŝi ja estas, tial ŝi demandis. Ŝi volis scii, kiel oni povas mobilizi ŝian filon, kiu ankoraŭ ne soldatservis.

Kvietiĝu ja, Ĵivana, diris mi, ne estas nur nia filo soldatiĝonta, vi ja vidas, ke oni soldatigas eĉ knabojn pli junajn ol nia Radojo. El la tuta Ŝumadio.

Ho dio, Miluteno – ekscitiĝis Ĵivana – kion vi ja parolas. Ĉu mi kvietiĝu, ĉar ankaŭ aliaj infanoj estas soldatigataj. Ĉu en via kapo mankas klapo, ho homo, ĉu al oni estas pli facile, se la malfeliĉo estas pli granda? Mi, diris ŝi, kvietus, se oni soldatigaĵajn virojn irigus militi – sed vi ja vidas, ke oni ne soldatigas virojn, kiuj havas inter tridek kvin-ses kaj kvardek kvin-ses jarojn, sed tiujn, kiuj ankoraŭ ne soldatservis.

Nu, tia estas la nuna tempo – kion alian mi povis diri al ŝi, ankaŭ mi ne scias, kial oni volas militigi infanojn, kaj ne soldatojn. Verŝajne ili havas iujn siajn kalkulojn.

Mi foriris en la garbejon, prenis blankan sakon, revenis kaj ĵetis ĝin antaŭ Ĵivanan.

Bonvolu pretigi ĉi tiun sakon por mi, diris mi. Ŝi ja rigardis min ĉi tiel, evidente konfuziĝinta, kaj demandis, kial mi bezonas blankan sakon. Nur en militon, laŭ nia moro, diris ŝi, oni kunportas blankajn sakojn.

Pretigu, Ĵivana, la sakon, ensakigu ĉion, kion oni devas pretigi, vi ja scias, tion vi ne faras la unuan fojon. Mi volas anstataŭi nian Radojon.

Bonege, Miluteno! – ekĝojis mia Ĵivana. Ŝi ekrapidis kaj plenigis la sakon eĉ pli multe ol estis bezonate. Estas bone, diris ŝi, ke vi estas viva, ho Miluteno, ke vi povas anstataŭi mian infanon.

Mi vestiĝis. Ĉio sur mi estis Ŝumadia. Novaj opankoj, nova peltkitelo. Ankaŭ la ordenojn mi surmetis, Stelon de Karaĝorĝo.

Mi kredis ke, se mi iras en armeon, kiu ne havas Stelon de Karaĝorĝo, oni min pli facile akceptos, krom tio, mi aŭdis, ke ili kompletigas iujn Likaajn kaj Bosnujajn trupunuojn, tial mi ne volis kompromiti min antaŭ likaanoj kaj bosnujanoj, mi ja volis, ke ili vidu, kia batalanto mi estis.

Mi foriris al nia urbodomo – tiel estis ordonite en la alvokletero – kaj tie mi aŭdis kantadon. Same kiel ĉiam, kiam oni en armeon kaj militon iras. Mobilizitaj junuloj observis pafilojn, veraj infanoj ili estis, ili evidente ĝuis, tenante la danĝerajn ilojn en siaj manoj. Sed mi, tamen, ne ŝatis vidi infanojn armitaj. Mi en la militon irigus maljunulojn. La junuloj estas nur pli rapidaj, sed ni, la maljunuloj, estas pli fidindaj. Cetere, la rapidecon ni ja ne tre bezonas, la germanoj ne tiel rapide fuĝos; kiam la germanoj retretas, ankaŭ ni, la maljunuloj

estas bonaj, sed kiam ili atakas, ni estas ankoraŭ pli bonaj. Koncerne la sanon, ni, la maljunuloj estas multe pli fidindaj, ol la junuloj, ni malpli ofte malsaniĝas.

Ĉe tablo, ĉi tiel, meze de la korto, sidis komisionanoj. Oficiroj, junuloj. Paperoj kaj listoj kuŝi antaŭ ili.

Mi alvenis kaj salutis soldate. Mi ja rakontas ĉion sincere, ke mi alvenis por anstataŭi la filon, kiu ne soldatservis kaj ne scias, kio estas milito.

La oficiroj kvazaŭ ne kredus al siaj okuloj, ili rigardis unu la alian, kaj ridetis.

Rezignu, maljunulo – diras al mi oficiro – vi estas ne nur kaduka, sed ankaŭ unuokula. Kaj li rigardis min persiste, en ĉi tiun mian okulon, kiun mi ne havas.

Kaj mi diris al li: Mi ne kadikiĝis kaj senokuliĝis pro nenifarado, simple lasu min iri anstataŭ mia filo.

Ankaŭ mi ne cedis, kion diri ankoraŭ, mi volis, ho, plenumi la taskon, pro kiu mi alvenis. Mi pensis pri Ĵivana, kiel ŝi fartos, se foriros ŝia Radojo, kaj se restos mi, kiu povas elteni la militon, kaj kiu jam estas sufiĉe aĝa por morti.

Sed la komisiono eĉ aŭdi ne volis. Vi ne estas sur la listo – diris al mi la oficiro – vi ja tie ne povas esti. La knabo rigardas min, ĉi tiel kadukan kaj blindan, kaj miris, kio okazas kun mi, kial mi insistas ŝtopi iun tranĉeon. Sed mi al li ne povis klarigi, ke ĝuste por plenumi tiujn taskojn, dum kiuj morto estas nepra, oni ja devas sendi maljunajn, lamajn, kriplajn kaj unuokulajn ulojn, tiajn, kia estas mi, pro dio. Ĉu ne estas tiel? Ni jam plenumis niajn farenaĵojn, ni ja satvivis, kaj ne estos damaĝo, se ni krevos. Damaĝo estus perdi tiujn, kiujn atendas la vivo.

Atendu, junulo – mi ne povas al li diri kamarado, kiel mi povas esti lia „kamarado“, se li povas esti mia filo – ĉu vi scias, ke mi kune kun la kolonelo militis? Ĉu vi scias, ke mi ĉi tion sur Veterniko akiris? – mi montris al li la ordenojn. Por ĉi tio min Stepao proponis, ĉi tion li donas nek por rakontado kaj kantado, nek por siestado sur kampoj kaj en arbaroj, por ni la milito estis ĉiun tagon, ne nur dum plenluno.

La oficiroj, se ili estis oficiroj, interrigardis. Sed mi insistis, ke ili min akceptu. Pli bona ol mi, diris mi, neniue estis en la regimento, ankaŭ nia regimento estis tia, pli bonan deziri ne povis Stepao mem, do, ankaŭ vi ne faru tion – parolis mi konvinke, mi ja sciis kial mi alvenis, kaj kion mi devas fari. Sed la oficiro eĉ aŭdi ne volis. Kiu anstataŭos la aliajn, diris li, kiu anstataŭos min, jen, diris li, mi havas nek patron, nek onklon, nek kuzojn, ankaŭ fratinojn mi ne havas, ĉiujn miajn la ustaŝoj buĉis kaj en profundegajon ĵetis, tial mi, diris li, fofiris militi.

Mi, jen, mi anstataŭos ankaŭ vin. Krom tio, ekzistas ankaŭ aliaj maljunuloj, alvoku ilin, ne indulgu la maljunulojn, indulgu la junulojn, la

estonteco dependas de la junuloj; pli bone estos, se pereos ni, la maljunuloj, ol vi, kiuj devas edziĝi.

Tio al la oficiro ekplaĉis. Li komencis ĉi tiel aprobe fraptuŝeti miajn ŝultroj. Dankon al vi, oĉjo, diris li, sed tio, kion vi deziras, ne eblas. Li senĉese tion ripetadis al mi, kvazaŭ mi tion eĉ sen li ne sciuis, sed, jen, mi devis provi, patro mi estas, pli facile estos al mia animo, kaj se ne eblas, se devas esti tio, kio devas esti, mi nenion povas fari.

Ho, tribunalo ĉiela, ĉu oni vere denove devas; kial la serboj ne saĝiĝas, kial ili almenaŭ unu fojon ne atendos, ke aliaj militon iel finu, kial ili ja ĉiam hastas al perejo – mi iris tra strateto, kaj meditis, sed kion fari, mi konsolis min, ĉi tio ne estas nur mia sorto. Kaj mi konsolis min, ke la milito ne estos longatempa. Kaj ke Radojo kun la soldataro ne iros for de Beogrado, espereble ili tie restos, espereble ili ne transiros la akvon, ne iros en la ebenejon – mi timas la ebenejojn, mi scias kiel estas tie, ni gustumis ebenejojn en la dekkvara jaro, dum kelkaj tagoj ni sentis kion signifas suferegi. Ankaŭ nun ne povus esti pli bone.

Apud Stublino min atendis Paŭlo.

Ek, mi alvokis lin kaj pretere rakontis ĉion – kie mi estis, kion mi volis, kaj kiel ĉio finiĝis.

Paŭlo iris malantaŭ mi, malĝojeta, per la kapo malsupren, samkiel mi. Scias la homo, kiel mi fartas, filon militi mi sendas. Mi estis malproksimiĝanta, kaj Paŭlo haltetadas.

Bone, Miluteno, ĉu neniu milito povas finiĝi sen amasa perejo de serboj?

Tia estas nia sorto – nenion alian mi povis respondi. Li dume piedis malantaŭ mi, kaj denove haltis. Diru, Miluteno, ĉu eble ni havas iun nian homon, kiu iomete prigardos la serban junularon? Mi, diris li, aŭdis, ke ankaŭ en ĉi tiu milito plej multe da serba sango estas verŝita.

Kiu alia tion povis fari, krom la serboj, la aliaj estas alitipaj, ili ne kutimiĝis al tio – nenion alian mi povis al li diri. Mi rapidigis lin, mi ja devis la filon adiaŭi; tamen, verdire, tio, kion li demandis, tio ankaŭ min interesis – kial ni neniam havas iun nian, kiu almenaŭ iom prigardos la serbajn vivojn, ke ne ĉiam nia sango verŝiĝu pli ol la sango de la aliaj popoloj.

Nu, nevĉjo mia, ĉu al vi ne plaĉas ĉi tio, kion mi parolas? Sed kion vi ja pensis? Kiel vi do imagis al vi la serban kampulon, mi ja volus tion scii.

Mi petegas vin, diru, ĉu vi vere pensis, ke ni volonte sendas niajn infanojn al buĉejo!

Vi diras, ke vi ne kredas, ke ni tiom multe pensis pri la frontoj. Tamen, ĉu vi kredas, ke ni iras silente, ke ni ne zorgas, ke sur niaj koloj estas fremdaj kapoj. Nu, nevĉjo mia, jen kiom vi konas vian propran popolon.

Tamen, negrave, tio estas via afero.

Mi alvenis hejmen, kaj alvokis Radojon.

Prenu ĉi tion, filo mia – demetis mi la sakon, kaj transdonis ĝin al Radojo, kvankam koro mia deziris elsalti, tial mi ĉi tiun mian ununuran okulon forturnis flanken – ĉar okulo mia volis eklarmi. Sed Radojo rimarkis tion, kaj provis min konsoli – li, min...

Ne heroumu, etulo, sed prenu ankaŭ ĉi tion – demetis mi mian peltkitelon, kaj etendis ĝin al li, sed li ne volis, li ja ricevos, diris li, veston, anglan veston.

Kian anglan veston, la sorto ne favoros nin en fremdaj vestoj, ĉi tion ja ankaŭ mi vestadis, tro multekosta tio estas, sed nenion la angloj donas nulkoste. Prenu la peltkitelon, vi ja vidas, ĝi estas nova, pli longa, kaj vi, dank al dio, filo mia, estas tro granda por via peltkitelo, tial mia peltkitelo por vi estas ĝustamezura. Ne kompatu ja mian peltkitelon.

Sed Radojo samkiel antaŭe ne volis. Kaj li denove diris al mi, ke li ricevos veston anglan.

En tiu momento aperis Mihailo, kaj helpis min. Kial vi obstinas, Radojo, diris li, prenu la peltkitelon de via patro, Miluteno ja scias, kion li parolas; ne estas facile al la patro en ĉi tiaj cirkonstancoj doni sian peltkitelon al sia filo; ne bezonas vi anglajn surkorpaĵojn, prefere militu en via peltkitelo, same kiel via patro, same kiel via karmemora avo, kiu pereis dum la kontraŭturka milito – sciis Mihailo, kion li parolas – dum vi estos en la peltkitelo de via patro, pafkugloj kaj grenadsplitoj ne trafos vin, vi ja ne kuros laŭ komando sensingarde,

Surmetis mia Radojo mian peltkitelon, kaj mi disiĝe diris al li:

Ne sturmemu, Radojo, tion faras nur stultuloj kaj malkuraĝuloj.

Ne celu kiam vi pafas; se vi ne celas, vi povas kredi, ke ankaŭ vin oni ne celas. Eĉ sen celado oni pereas.

Ne prenadu tion, kion aliaj homoj pene akiris, ne prenadu iliajn vestojn – neniam prenu horloĝon, ĉenon, soldatŝuojjn; ajnan alian havaĵon de la malamiko vi neniam prenu, de iu ajn, eĉ de mortinto.

Gardu vian animon, la caroj kaj reĝoj animon vian ne savos, oni ja scias, kiu mortan soldaton priploras.

Ne lasu min sola, eĉ la ŝtono ne povas esti sola, ne permesu, ke mi kvazaŭvidu, ke mi halucinu, eĉ kiam ĉiuj aliaj komprenas, ke vi jam troviĝas en iu foskavo.

Mia ĵivana longe kisadis Radojon, sed ne permesis al si eklarmi. Ŝi prenis, ĉi tiel, lian serbĉapon, kaj iomete flankensovis ĝin. Radojo preskaŭ eklarmis, tial li forturniĝis kaj foriris. Mi rigardas lin, ho, kia li estas, kioma li estas, sed koro mia estis timfrapita. Kiom ja valora estas ĉi tiu nia patrolando, se ni al ĝi ĉion la plej karan donas – donadas konstante. Sed tiel estas, ĉar ni estas jespopolo. Kaj ĉar ni estas kampuloj. Kaj serboj. Kaj Miluteno. Kaj la filo de Miluteno.

TRANSVERŜADO DE VINO

Legohoroj, nevĉjo mia, sekvis unu la alian. Oftofte oni vokis nin partopreni konferencojn kaj legohorojn. Ili deziris la popolon urĝe reeduki. Ili legis nur tion, kion ili deziras – sed mi ni sentis legemon.

Tro maljuna mi estis por lernado, zorgoj min premis, mi havis miajn farenaĵojn, jen kion mi diris al Lubina, la filino de Pantelio. Sed ŝi eĉ aŭdi min ne volis: Vi devas, oĉjo Miluteno, tion decidis superaj aŭtoritatuloj, diris ŝi, desupre alvenis tiu komando, ĉiuj devas pristudi „La devenon de familio“.

Mi nenion povas enkapigi. Kaj mi ne bezonas tion. Mi eĉ ne scias, kio okazas en kaj ĉirkaŭ mia familio – diris mi.

Mi ja ne volis diri al ŝi: vi, Lubina, se vi deziris esti instruistino, kial vi ne finis lernejon, kial vi tri fojojn iris en la saman klason, kial vi forlasis la lernadon. Mi estas homo memaga, mi ne emas tempoperdi en lernoĉambro. Krom tio, kial ili volas nin, la oldulojn, igi lernantoj.

Mia laboremo malgrandiĝis, nevĉjo mia, la brutaron mi ne prizorgis, mi ne striglis la brutojn en konforma maniero, ankaŭ Ĵivana min ege zorgigis.

Tuj kiam noktiĝis, ŝi sidigis sur benkon sub porĉo, sidis, atendis.

Ek, Ĵivana – mi kaptis ŝian manon, irigis ŝin en la domon. Malalta ĉielo, nuboj grandpezaj, kvazau ekneĝos, premaj noktoj, humideco kaj malvarmego. Venu, Ĵivana, mi legos al vi la leteron de Radojo. Mi ne povis diri al ŝi: kiu en ĉi tiu parto de la tago atendas, ke la filo revenu el milito, de tie oni ne revenas tiel facile.

Jen tiel mi ŝin trompis kaj venigis en la domon.

Mi estigis fajron, ĝi disflagris, la fornelo ekmuĝis.

Nun mi legos al vi, kaj vi sidu ĉi tie – mi sidigis ŝin sur tripiedon, mem sidigis sur alian, ĉe ŝi. Mi prenis la leteron de Radojo, la ununuran. La leteron mi proksimigis al la fornelo, ŝovetis kuirringon, lumo falis sur la paperon, kvankam mi la lumon tute ne bezonis, ĉar la leteron mi sciis parkere, mi encerbigis ĉiun ĝian vorton.

Ĵivana sidis kiel hantulo. Ŝi sidis kaj aŭskultis, eĉ ĝojiĝis. Kvazaŭ li devus esti viva, se ekzistas lia letero. Nu jen, ŝi verŝajne pensis, ke li estas viva, dum ŝi aŭskultas kion li skribis. Ŝi aŭskultis kaj demandadis: Nu, Miluteno, kian sencon havas la fronto en tiu Sremo? Ĉu la milito vere ne finiĝus, se ne ekzistus tiu fronto, kie nun pereas niaj infanoj?

Ne finiĝus, Ĵivana, neniam la milito finiĝus, se tie ne pereus niaj infanoj – diris mi, kaj plulegis la leteron de Radojo.

Diru, Miluteno – interrompis min Ĵivana – ĉu nia Radojo scias fosi tranĉeon, ĉu Radojo havas ilon por fosi?

Memkompreneble, absolute ne eblas – diris mi – ke iu pelis infanojn sur ebenejon, ne donante al ĉiu ŝpateton; ĉu vi scias, kio estas ebenejo, kaj kio estas la germanoj. La germanoj ne estas bagatelindaj. La germanoj estas germanoj, danĝeraj ili estas ankaŭ sen ebenejo, kaj en ebenejo – ankoraŭ pli; ĉu oni povas sendi infanojn en la ebenejon, antaŭ germanajn mitralojn kaj minĵetilojn, ne donante al ĉiu ŝpaton. Kiaj komandantoj ili estus, Ĵivana, fioble fi! Brutojn oni tiel ne aŭdacus peli al la fronto, Ĵivana! Kiel vi kuraĝis tian demandi fari, oni ne povas fronton igi buĉejo, Ĵivana, oni ja scias, kiel infanojn oni sendas al la fronto! Pri la infanoj oni respondecas antaŭ la popolo – mi enspiris aeron, por ne krei plu, kvankam, mense, mi pensis tion, kion mi vere pensis.

Miluteno – demandis ŝi – ĉu ili niajn infanojn instruis kiel militi, ĉu ili ne sendis ilin antaŭ la germanojn sen trejnado, ĉu niaj infanoj ne pereos vane en la ebenejo?

Kompreneble ja, ili instruis la infanojn. Ne povis ili nepretajn infanojn sendi al la fronto, antaŭ germanajn mitralojn. Se ili tion farus, ili pro tio devos respondeci, iam ajn. Ĉu vi scias, Ĵivana, ke la komandantoj estas kvazaŭpatroj de soldatoj; ĉiuj batalas por venki, sed kia estus la venko, pro kiu tiom da infanoj estus senvivigitaj.

Mi viŝis la frunton, ekfrotis la mentonon, kaj denove ekis legi la leteron de Radojo.

Mia Radojo ja skribis, kiel ĉiu juna soldato, kiu skribas al la patrino kaj patro – nu, oni neniam skribas la veron, sed ĉion beligas. Sed al mi, kiu scias, kio estas kaj kiel estas, pro tio estas ankoraŭ pli mafacile, koro mia volas krevi. Mi rezonis: ho, flavbeka filo mia – sed antaŭ Ĵivana mi ne aŭdancis diri – vi ja skribas, kiel se mi ne militis tri militojn, antaŭ ol vi naskiĝis.

DE VILAĜO AL VILAĜO, TRA LA EBENA SREMO

Mi ne sciis kien iri kaj kion fari, tial mi transfluigadis vinon, pri io mi devis okupiĝi. Subite- la pordego frap! Mi alrigardis kaj vidis, venas Janko Radiŝiĉo, li iras al mia domo, la krurojn li apenaŭ trenas: volas kaj ne volas veni. Malrapide li iris, sed mi eliris antaŭ lin:

Kio okazas, Janko, ĉu vi fartas malbone?

Li metis la manojn ĉirkaŭ mia kolo, ĉirkaŭbrakis min. Mi ektimegis, ĉar mi sciis, ke ni, la ŝumadianoj, nur pro grandega malfeliĉo brakumas unu la alian.

Parolu, Janko! – mi elŝiriĝis, sed li ŝrumpis, komencis laŭte plori. Kaj elprenis ian paperon.

Kio okazis?! – ekkriis mi. Ĉu mia filo eble estas vundita, aŭ pereinta?

Via filo pereis, Miluteno – ploris Janko.

Kion vi diris, vi, malbenulo! – mi ne povis kredi.

Ĵivana nin ekvidis, kaj ĉion klare komprenis. Ŝi ekpaŝis – dirante eĉ ne unu vorton. Ŝtoniĝis ŝi. Eĉ ekvei ŝi ne povis.

Ni faris ĉion, ke lia infanaĝo estu kiel eble pli facila, kiel eble pli bela – mi ĉirkaŭbrakis Ĵivanan, mi ja devis ŝin konsoli, kvankam mi ne sciis kiel, nek kial. Mi protektis lin. Mi ŝarĝon, pro kiu la ŝultroj de la homo kurbiĝas, sur min ĉiam surmetis, por ke li kresku rekta kaj svelta. Eble mi ankaŭ eraris, povas esti, ke li, se li estus pli eta, estus pli bonŝanca, eble lin, pli malgrandan, plumbaĵoj ne tuŝus. Oni ja ne scias, kie malfeliĉo embuskas.

Kion diri, nevĉjo mia, pereis mia Radojo, mi tute perdis laboremon. Labori mi ne deziris. Mi vendis la ĉevalojn, mi ne bezonis ilin. Mi restis ankaŭ sen jungaĵoj. Ankaŭ plugemon mi ne sentis, Ankaŭ de bovinoj mi seniĝis, ilin mi ne bezonis. Ankaŭ porkinon kun dika ventro mi vendis, ankaŭ ĝin mi ne bezonis – tion mi tiam pensis.

Petrija, la filino de Raĉo venadis oftofte. Ŝi kontante vokis nin iri en lernejon, partopreni legohorojn. Sed mi ne volis, mi ne bezonis ian ajn scion.

Kion – ŝi hirtigis la harojn – ĉu vi opinias, ke vi estas tre edukita?! Jen, ĉi tiel ŝi metis la manojn sur la koksojn, okuloj ŝiaj glimis: Kion vi scias pri Tito kaj Partio?

Tio min pikis. Sed mi nenion aŭdacis diri. Mi silentis, kaj ŝi iomete malstreĉiĝis. Venu, diris ŝi, al vi estos pli facile, vi scios, por kio via filo pereis.

Jes, mi scios, ĝuste ili tion klarigos al mi! Tamen, ĉu ŝi vere parolas tion, kion ŝi pensas? Se ŝi mensogas, tio estas bona; sed se ŝi kredas tion, kion ŝi vortas, tiam ĉio estas veinda.

Volis la filino de Raĉo – Petrija, ankaŭ Ĵivanan irigi al tiuj babilkunvenoj, je dio, ŝi volis, ke tie sidu eksjunaj virinoj, en funebraj vestoj, ke ili aŭskultu legadon.

Nu, je dio, Petrija, lasu tion, sufiĉas al mia Ĵivana ŝiaj veindaĵoj, ŝi ja irus al tombejo, se nia Radojo havus tombon; lasu, mi ripetas al vi, Ĵivanan lamenti en fruktarbejo, vian legadon ŝi ne bezonas.

Sed Petrija insistis: Vi, Miluteno, diris ŝi, devas scii, ke nun oni pereis ne kiel iam, iam oni ne sciis kial oni pereas – ŝi ja parolis pri la antaŭaj militoj – kiam ni pereadis.

Je dio, ho virino, mi eĉ la brutaron ne prizorgas, en mia domo oni panon ne plu knedas. Mi ne scias kie estas la tombo de mia Radojo, ĉu vi pensas, ke mi ĉeestos la legohorojn. Mi ja havas pli grandajn, zorgojn kaj pli urĝajn farenaĵojn. Tiel mi malinstigis Petrijan venadi en mian domon.

Sed Milenkon Ignatijeviĉon mi forgesi ne povis. Li estis mia samaĝa kiel mi nun, kiam li alvenis al la fronto dum la pasinta milito, kaj forportis sian pereintan filon.

Mi konstante planis, fine mi vizitis la domon de Janko. Leteron de la filo de Janko mi legadis. Li detale priskribis, kiel pereis mia Radojo. Kaj kie li estas entombigita. Kaj kiel li markis la tombon de Radojo, por ke oni ĝin facile povu trovi, saĝa homo li estas, li ja sciis kiel oni entombigas soldatojn en fremdlando, en malproksimejo.

Nu do, bone, rezonis mi, mi ja scias kion fari, kaj kiel tion fari.

La aliaj zorgis siajn zorgojn, sed mi pretigis mian sakon.

Tagoj estis pasantaj, mi iris de vilaĝo al vilaĝo tra la ebena Sremo. Dormis mi en fojno, matene kaj tage homoj min kun miro fiksrigardis. Ankaŭ soldatoj. Mi jam timegis – ili revenigos min hejmen, oni ja ne rajtas elfosi tombanojn laŭ propra volo, neniun interesas, ĉu en la tombo estas ies domano, la tomboj estas ŝtata propraĵo... kaj se oni pli bone pripensas, tio ja estas vero.

Ankaŭ miaj vestoj Ŝumadiaj vidigas de kie mi alvenis, ĉiuj tuj komprenas kiu mi estas, de kie mi estas. Foje mi alvenis al iu domo, kie mi vidis antaŭ stalo homon, manĝiganta brutojn. Tio okazis vespere. Mi ĉirkaŭrigardis, kaj demandis la homon: Amiko mia, pardonu, mi volas ion demandi. La homo mallevis sitelon, li ja ekiris manĝigi porkojn, post kio li min alpaŝis, kaj manpremis kun mi, sed li rigardis min, je dio, kiel raraĵon.

Ĉu vi estas serbo, diru la veron! Sed ne riproĉu.

La homo, jen ĉi tiel, turniĝis, ĉirkaŭrigardis, poste alrigardis min, kapjesis kaj konfirmis, ke li estas serbo. Sed li tion elparolis hezite, verŝajne la homo timis, vi ja scias, kio tie okazadis kun la serboj.

Mi, tamen, sentis faciliĝon. Bone, diris mi, jen pri kio temas, mi ĉion sincere diris al li, de kie mi alvenis, kial mi alvenis, kial mi lin vizitis, ke mi deziras tranokti, kaj morgaŭ foriri.

Vi ne devas foriri, vi alvenis tien, kien vi volis veni, via tombo, diris li, estas en nia distrikto. Trafe diris la homo, «via tombo» – jes, trafe, la tombo de mia filo estas ankaŭ mia tombo.

Mi sentis grandan faciliĝon. Li kondukis min en la domon, kaŝe, kaj venigis min en la ĉefan ĉambron. Atendu ĉi tie, diris li, neniun vin vidos.

Ho, je dio – volis mi diri – mi ne estas, ho, homo, ŝtelisto, mi ne alvenis por penetri en ies gregejon, aŭ ŝafejon, mi alvenis infanon mian forporti.

Sed tiu homo, Savao li nomiĝis, Savao Arsenijeviĉo, li alportis brandujeton, kaj diris: Amiko mia, ne zorgu, diris li, mi helpos vin, filon vian mi trovos – li konstante proponadis al mi drinkaĵon. Li diris: La vian mi trovos, sed miajn filojn trovi mi ne povas. Ili restis en la malbenita Mitrovico sub kalko. Rakontis la homo al mi, kiel oni liajn filojn senvivigis en Mitrovico en la kvardek unua jaro.

Sed kial? – demandis mi lin; mi sciis, ke tio okazis, ĉar ili estis serboj, sed tamen, jen, mi demandis, tiu demando elbuŝiĝis senvole.

Kaj la homo rakontis, tremige; ĉu ies sorto nigras pli ol la serba.

Estis jam malfrue, kiam Savao leviĝis kaj diris: La temp' está!

Luno lumis kiel tago, kvazaŭ la ĉielanoj sciis, ke ni iras elfosi pereintan infanon... Li kunportis ilojn, kaj ekiris, sekvante la priskribon en la letero de la filo de Janko. Ĉio estis, kvazaŭ ĝuste li, Savao, enfokus la infanon. Konis la homo sian teritorion, li ja sciis, kie infanoj niaj estis enterigitaj.

Sed kiam ni alvenis, ni vidis, ke tero estas disfositá. Mi ne estis la unua, kiu alvenis por forporti sian filon. Nur dio sciis ĉu la ostoj de mia Radojo restis, aŭ ili estis forportitaj. Tamen mi ies ostaron forportos, same kiel ankaŭ aliaj eble forportis la miajn – mi rezonis, ke eĉ tio estos pli bona, ol ke la ostoj restu ĉi tie, mi ja sensŭldiĝos antaŭ tiu, kiu mian malfeliĉulon forportis. Eĉ tio estos pli bona, ol ke la mia restu sen tombo, sen tombo ajna. Sed mi estis bonŝanca. Mi trovis mian Radojon.

Bone, mi ne parolos tro longe, nevĉjo mia, por ne turmenti vin, oni ja scias, kiel fartas la homo, kiu portas mortan filon de batalkampo.

PRI KIO TEMAS

Cedis al la sorto mia Ĵivana, same kiel mi; kion fari, ne nur ni estas afliktitaj, ni almenaŭ havis nian tombon. Sidis ni, foje, vespere, parolis pri nia Radojo. Jam veseriĝis, kiam iu ekfrapis sur nian fenestron. Mi malfermis, aŭdis flustron, iu vokis min per mia nomo.

Kiu estas tie? – demandis mi iom pli laŭte, sed la voĉo respondis, ke mi parolu malpli brue.

Kiu, do, alvenis? – Mi surpiedigis opankojn, surŝultrigis peltkitelon, kaj venis sub porĉon.

Kio okazas, ho, homoj, kia bono vin venigis? – demandis mi, apenaŭ vidante ilin.

Nenia bono, oĉjo Miluteno, nun bone estas nur por la malamikoj de la serboj.

Mi jam komprenis la radion. Pro ĉi tiaj gastoj oni poste povos rememori, kiam oni la mampinton de la patrino mordis, sed mi ne ektimis. Finfine, se aŭtoritatuloj tion ekscios, mi diros al ili: ankaŭ vi ĉi tiel en mian domon neinvititaj venadis, ankaŭ al vi mi panon kaj surpanaĵojn donadis, ne pro via stelo, sed ĉar oni vin persekutis, samkiel vi, je dio, nun persekutas ĉi tiujn.

Bone – demandis mi – pri kio temas?

Nu... do – diris al mi la ĉetniko – vi ja scias, oĉjo Miluteno, ke ni el Serbujo retiriĝis tra Sjenico al Bosnujo. En Bosnujo estis decidite, ke iuj el ni revenu en Serbujon, kaj ĉi tie atendu eblecon batali kaj renversi ĉi tiun komunistan reĝimon.

La ĉetniko longe parolis al mi, li diris, ke min rekomendis al li Sreteno Ĉarapiĉo jam en Bosnujo, kiam ili estis retiriĝantaj. Se vi alvenos en Ŝumadion, diris al li Sreteno, trovu oĉjon Milutenon Ostojiĉon, kromnomatan „Unuokululo“. Tio estas homo, al kiu vi povas fidi, amiko li estas, milita kamarado de mia patro Lazaro.

Ĉion la plej belan pri vi rakontis Sreteno Ĉarapiĉo – diris al mi tiu ĉetniko. Pri vi Serbujo nun povas kalkuli. La sorto vin por tio pretigis. Dum li milito vi neniun subtenis. Vi neniun malfavoris. Vin nun neniu suspektos. Neniu vin kaŝobservos. Ni, diris li, havas niajn fidindajn kaj bravajn homojn, ekzistas domoj, kiuj estis kaj estos niaj – sed tiuj domoj estas observataj, tial ni ne povas uzi ilian subtenon, sed vian domon neniuj observas.

Li tiel parolis, parolis, sed li ne povis senkaŝe diri, ke mian domon ili ne kaŝobservas, ĉar ĝi estas pereigita.

Nu, ĝuste, tio estas vero, kiam iu domo estas pereigita, ĝin neniuj timas, ĝin neniuj kaŝobservas.

Bone – respondis mi al la ĉetniko – veron al vi Sreteno Ĉarapiĉo diris, ĉion ĉi la viaj bone pripensis. Sed permesu, ke mi vin demandu; kial mi vin kaŝu kaj helpadu?

Pro via filo, ho Miluteno – diris la ĉetniko.

Kial pro mia filo, rezonis mi, kaj diris, ke mia filo pereis.

Ĝuste pro tio, ĉar via filo pereis, diris li. Vi, la gepatroj, kies infanoj pereis, devas venĝi al tiuj, kiuj irigis viajn infanojn al tiu buĉejo. Ĉu vi scias, Miluteno, kiom da infanoj el Ŝumadio kaj Beogrado pereis en tiu Sremo? Sed kial?

Mi bone komprenis, kion li aludas, sed mi silentis.

Kaj li aldonis. Nun venis la momento, ke vi al la komunistoj venĝu pro via filo, kaj pro ĉiuj infanoj, kiuj pereis en Sremo.

En Sremo, diris li, pereis serbaj infanoj. Vi, ŝumadianoj, trenaciis de tie ĉerkojn, en kiuj putris la forto de viaj filoj, de la filoj, kiuj vin igas venĝi kaj helpi nin.

Kiun vi nun volas venĝigi – rezonis mi. Kiam ni al la ŝtato kaj politikistoj pro frenezajoj iliaj venĝadis, kiam ni kapablis fari tion! Sed ĉu ni ankaŭ al vi, al la ĉetnikoj ne devus venĝi, ĉu ne vi senvivigis la germanojn en Stragaro, post kio germanoj alvenis kaj bruligis ĉion, eĉ kokejojn!

Nu, aŭskultu – mi decidis interrompi lin, ke li ne plu parolu, sufiĉe da zorgoj kaj veneno mi havis eĉ sen liaj vortoj – neniom mi povas helpi, neniuj plu povas atendi mian subtenon, mi ja mem restis sensubtena. Mia tempo pasis for; ĉio, kion mi havas, troviĝas en la tombejo.

Ĉu ne estas tiel, nevĉjo mia? Mi ja atendis, atendegis, ke mi kaj Ĵivana forpasu. Ni jam ĉion ordigis. Eĉ toamboŝtonon ni farigis el Bukoviĉa granito, tajlitan, pli bona ne estos en la tuta tombejo.

Mi la veron diras, ĉion ni ordigis, ni nur atendas ke ni estu apud nia infano. Ĵivana, la malfeliĉulino, demandas sin, kiu el ni du estos pli bonŝanca, ĉu ŝi, aŭ mi, estos la unua, kiu iros al Radojo. Sed mi diris al ŝi: Kiu estos la unua, verŝajne mi, mi estas pli aĝa ol vi, devas ie ekzisti ordo kaj justo. Ŝi ja preskaŭ ofendiĝis, vi ja tion scias, patrino ŝi estas. Kaj ni tiel paroladis, veron mi diras al vi, ni atendis, ke finiĝu ĉio ĉi-monda, ke ni kun Radojo renkontiĝu. Ni hejtadis iomete fajron en la fornelo, ni ja devis, vintro frostis, neĝo impetis, kaj ni tiel varmiĝis. Sed en la domo, kiel tion diri al vi, kia estas la domo, kiam en ĝi nenia gajo regi povas, nur du maljunuloj, pli aĝaj ol ili reale estas, sidis, kaj eĉ tra fenestro ne rigardas.

Tiu ĉetniko min rigardis, naŭzeme, frato mia, naŭzeme tordiĝis lia vizaĝo. Li kapsvingis.

Kaj vi konsideras vin serbo! Ŝumadiano! Tesalonika veterano. Kampulo. Familiestro! – li komencis denove listigadi. En la korto de Filipoviĉo ekbojis hundidoj. Ili bojis kontraŭ soldatoj, sendube, mi ja scias kiel hundidoj bojas kontraŭ soldatoj.

Do, de tie, tra strateto, soldatoj iras ĉi tien. Fuĝu, diris mi al la ĉetniko, fuĝu tra la fruktarbejo! – mi montris al li la direkton, tie al ili estos plej sendanĝere kaj plej facile fuĝi. Mi ne volis, ke denove ĉirkaŭ mia domo knalu pafiloj. Mi ne volis vidi mortintojn malantaŭ palisoj kaj en la porkejo. Krome, rezonis mi, helpi persekutaton estas bonfaro. Kvankam neniu el ili, nek la persekutantoj, nek la persekutatoj, ion ajn bonan por mi faris, al neniu mi ŝuldis ion ajn. Mi ne kredas, ke ili faris bonon al iu ajn. Multe da akvo laŭ la rivero Jasenico, antaŭ ol evidentiĝos ĉio, kion ili faris.

Iru for de mi, je dio. Kaj ili, kaj tiuj aliaj.

KION SIGNIFAS LA VORTO KULAKO

Ĉu pasis du plenaj jaroj post la liberiĝo, mi tion ne povas precize rememori – mia hundo komencis boji kaj kuregi, la ĉenon ĝi preskaŭ forŝiris.

Kiu alvenas ĉe la tagiĝo?

Lo, lo, Miluteno, ĝi ja ne bojas al furo, ne bojas al vulpo, ĝi ja bojas al iuj soldatoj – mia Ĵivana fiksrigardis min, io ŝin ekscitis.

Kiaj soldatoj nun, la milito pasis? – mi alpaŝis la fenestron, ekrigardis, sed vidis nenion, neĝo kirliĝis, tial mi surŝultrigis peltkitelon, kaj eliris en la

korton. Kaj kion mi vidis – Borao Sturmo alvenis al mia hejmo. Li staris en la korto kun ankoraŭ kelkaj homoj, armitaj.

Kio okazas, Borao, kia estas ĉi tiu menaĝerio, ĉu ĉi tiuj estas ĉi tie pro vi, aŭ pro mi?!

Ili estas ĉi tie pro maizo kaj pro tritiko – diris Borao – ni devas forpreni ĝin, oĉjo Miluteno.

Forpreni, kompreneble! Ĉie, kie oni havas tro multe, eĉ se ne estas tro multe, sed se oni povas malgrandigi la kvanton, por ke ni ĉiuj same suferu – mi ne povas vin instrui, diris mi, vi por egaleco batalis, nenikaze iu ajn havu pli multe kaj pli bone, ol li bezonas, en ĉi tiu tempo de ĉiomanko. Tamen, Borao, ne staru en tiu neĝoŝtromo, unue endomiĝu, tia ja estas la moro, kaj poste ni povos paroli pri farendaĵoj. Li ne volis, mi komprenis, ke li hontas, tial mi ekkompatis lin; dum la okupacio, li oftote venadis kun siaj homoj, tiam mia domo pro li povis forbruli, sed nun dum la paco, al li estas malagrade viziti mian domon. Li ŝajnigis sin ne aŭdinta mian inviton.

Ĉe ni, oĉjo Miluteno, diris li, eĉ ministroj manĝas tion, kion manĝas la popolo, nenion pli bonan – li ankoraŭ rakontas tion, kion li dum la milito parolis, kvazaŭ mi estus infano, kvazaŭ mi ne aŭskultus tro da fabeloj dum la militoj; dum la milito oni rakontas ne tion, kio dum la paco okazas, tiel estas de kiam la korvoj iĝis nigraj.

Dio volu, ke tiel estu, Borao – diris mi, sed ne aŭdacis diri, ke mi al li ne kredas. Ili ja tre koleras, kiam oni al ili ne kredas?

Mi devas esplorigardi vian maizejon kaj grenejon, por vidi, ĉu vi havas troaĵon, oĉjo Miluteno! – nervozigis Borao Sturmo, senĉese flanken rigardante; li ja ne povis senti sin agrable, ni ja konas unu la alian.

Nu, bone, Borao, ĉu vi al mi ne kredas, ĉu tia estas nun la rilato inter ni? – ĉuis mi, sed ne aŭdacis demandi, kial ĝuste li alvenis, ĉu ne povis alveni iu alia, malpli fama kaj brava, por plenumi ĉu tiun proviantistan laboron. Ĉu pro tio Borao forlasis sian teologian lernejon kaj eklezion, ĉu pro tio li sian nomon ŝanĝis – li ja nomiĝis Borivojo Garaŝiĉo, mi jam diris al vi, antaŭ ol li iĝis Borao Sturmo, kvankam mi ne scias, kial li ne povis batali ankaŭ havante sian antaŭan nomon, sub kiu batalis ankaŭ liaj prauloj, ili ja, je dio, estis neniom pli malbonaj ol li.

Mi diris al li, ke mi bedaŭras, li ja sain gloron kaj bravaĵojn nun en grenejon kaj maizejoj forkonsumos. Mi iris post li, kaj li enrigardis la grenejon, sub kolonojn sub la konstruaĵo, kaj la maizejon. Tiam li denove demandis: Ĉu vi eble havas iuloke kaŝitan grenon?

Diru, Borao, ĉu eble iu stukaĉis, ke mi grenon kaŝis? – demandis mi, ĉar mi sentis dubon, nun ja ekzistas infanoj stukaĉemaj. Jen, Ĵikon Skoĉajiĉon denunciis lia filo, kiu diris, ke li kaŝis grenon. Tia estas ĉi tiu epoko, infanoj

deziras avanci, kaj oni plej facile tion povas atingi, denuncante propran patron, kion fari, infanoj ja infanas.

Neniu vin denunciis, oĉjo Miluteno, diris al mi Boraio, sed greno nun malabundas, oni malsatas ĉie.

Kion fari, Boraio, prenu kion mi havas, mi ja al neniu povas grenon ŝuldi, antaŭ ol mi insterkonsentis liveri ĝin, des pli mi ne povas ŝuldi grenon, kiun mi ne havas.

Je dio, oĉjo Miluteno, pri tio mi ne povas al vi helpi, kiu ne senŝuldiĝas, tiu estos malliberigita, nun ni ja batalas kontraŭ la kulakoj?

Sed kion signifas la vorto kulako? – demandis mi, ĉar la homo, kiu devas en malliberejo ŝimi, kiu eble restos en arestejo, devas scii kio li estas, kaj kia li estas. Mi, Boraio, nemalmulton memoras, mi ankaŭ multon de niaj profundaĝuloj eksciis, oni ja parolis kaj rakontadis, ke la homoj kondukis diversmaniere, ni ja travivis kaj bonon kaj malbonon, ni renkontadis kaj honestulojn kaj bonulojn, sed ankaŭ fiuloj ne mankis, sed pri iuj kulakoj mi absolute neniam aŭdis.

Kulakoj, tiel la rusoj nomas familiestrojn – klarigis li, sed mi komprenis, ke ankaŭ al li ĉio ĉi ne plaĉis, li ja estis hontofrapita, sed devo ne estas revo.

Bone, Boraio – demandis mi – kial mi al vi grenon ne donus, por kiu mi ĝin kaŝus, ĉu mi eble bezonas ĝin por nutri virŝafojn por edziĝfesto de mia filo, aŭ mi gardas ĝin, pot nutri miajn nepojn? Li nur kapneis, ne respondis. Verŝajne al li estis pli malfacile ol al mi. Hontis la homo. Ne nur unu tagon ni vivas sub la sama ĉielvolbo. Sur la sama tombejo enteriĝas kaj miaj kaj liaj prauloj pli ol ducent jarojn; ni vivis dece, sed nun ĝuste li devas traserĉi miajn konstruaĵojn, serĉi ion, sciante, ke tion li ne povos trovi. Tamen, jen, li devas fari tion, kion li devas fari. Mi preskaŭ kompatis lin. Por ĉi tiaj taskoj oni ne devis elekti Boraon Sturmon, aŭ iun ajn el homoj lokaj, ne estas bone, kiam malfavoriĝas najbaroj, ne povas esti utile por la popolo kaj por la ŝtato, se malamikiĝas najbaroj kaj malaperas amikecoj; ne estas bona signo, kiam tio mankas; por tiaj taskoj oni devis venigi aliajn homojn, fremdulojn, el aliaj regionoj, la plej adekvataj estus turkoj, germanoj, hungaroj, bulgarioj, aŭ rusoj, frato mia, tiuj kulakoj estas iliaj, ili kontraŭ tiuj luktaĉis,

Ĝuste en tiu momento aŭdiĝis brufrapo de pordego. Je dio, pli forte ol ordinare. Mi sciis kiu estas tie – Vasilio, neniu alia povis alveni.

Boraio Sturmo preskaŭ skuiĝis. Li estis malkontenta. Li ja konis Vasilion, sed ĉi tio, kio nun okazas, jam ne estis petolaĵo.

Nu, Miluteno, vi grenon ne havas – ekhastis Boraio Sturmo. Do, vi devos iri en arestejon.

Mi veron diras, nevĉjo mia, ĝuste tiel li diris, ke mi devos iri en arestejon, ĉar mi ne havas grenon. Li ja hastis, sed Vasilion eĉ ne alrigardis.

Mi ne povis kredi. Kiel mi iru en arestejon, kial mi iru en arestejon, nevĉjo mia! La arestejo ne estas amuzejo. Tion eĉ infanoj scias. Tio estas tre granda ofendo. Mi rezonis, ke ne ekzistas aŭtoritatuloj, kiuj emas afliktigi propran popolon. Mi ne kredis al li, je dio – mi el la domo nenien iris, tial mi eĉ ne sciis, kio okazas kun la popolo.

Nu, Borao – alkriis Vasilio, ne permesante al Borao Sturmo eskapi – vi vere avancos; se vi ĉi tiel agos, ni, la ŝumadianoj, ekhavos Ŝumadian ministron.

Mi fartis malagrabla, je dio. Kion vi parolas, Vasilio, ĉu tiu, kiu niajn grenejojn trafos, kiu nin arestas, ĉu tiu estu nia ministro? Ĉu tiamaniere ŝumadiano ministriĝu?

Sed Vasilio rikanis kaj montris al la foriranta Borao Sturmo. Ĉi tiaj, diris li, plej rapide avancos.

Mi staris kaj pensis: ho, dio, Borao en mian hejmon venadis kiam li kaj la liaj estis persekutatoj... ĉu estas eble, ke la homoj ĉi tiel rapide ŝanĝiĝas?

Vasilio kvazaŭ legus miajn pensojn. Miluteno, diris li, ni estas troaj, kiel la dektria porkido. Kiam domoj brulis, kaj vivoj estis perdataj – Vasilio senĉese reigardis tien, kien foriris Borao Sturmo, kiam ili ne povis travivi sen ni, ni estis laŭdegatoj, sed nun ni estas balasta balasto. Li tion ripetadis, dum mi rezonis: ĉu ili entute uzas siajn kapojn por pensi, aŭ ili deziras simili al Rusio kaj ĝiaj komunistoj; ĉu ili tion devas fari, aŭ ne scias alie.

Venu, Vasilio, endomiĝu – alvokis lin Ĵivana. Sed li diris al mi: Ni iru al la domo de Kersto, helpi al ili en ilia aflikto.

Pro kia aflikto, al kiu Kersto?

Al Kersto Tijoviĉo, li ĉagrenmortis ĉi-matene.

Atendu, ho Vasilio, kial li ĉagrenmortis?

Nu, kiam propra nepino denuncas onin, oni devas ĉagrenmorti.

Ĉu ŝi denuncis lin pri la greno, same kiel Ĵikon Skoĉajiĉon denuncis lia filo? – demandis mi.

Ne pri la greno, sed pri io alia. Kersto insultis la aŭtoritatulojn, kaj lia nepino denuncis lin. Kerston ili alvokis, pridemandadis en la eturbo, kaj liberigis lin. Li revenis hejmen, kaj ĉagrenmortis, ĉi-matene oni trovis lin malvarman.

Mi ne iros en lian domon – diris mi. Al Kersto ne estis pli malfacile ol al mi. Li almenaŭ havis tiun, kiu lin povis denunci, min eĉ perfidi neniu povas. Mi estus feliĉa, se mia filo estus viva, se mi havus nepinon – negrave ĉu ŝi denuncus min. Tia epoko estas nun, por la nepoj estas utile siajn avojn denunci, nu, se ili tion vere deziras, ne estas grave, ĉu ili denuncos.

Sed tamen, al mi ne plaĉas, ke nepinoj tiel facile denuncas siajn avojn, tio ja ne estas en ordo, io ne estas kiel devus esti, aŭ por la avoj, aŭ por la

nepoj. Mi ne kredas, ke tio estas bona ankaŭ por la mondo, kiu dependos de la nepoj, kiuj la avojn denuncas; tia mondo ne povas esti bela kaj sendanĝera.

VANE ESTAS ENVII ŜTELISTOJN

Mia Ĵivana neniel povis kompreni, ŝi miris, kial mi devas iri en arestejon pro greno. Vi, Miluteno, ne estas ŝtelisto, vi estas, diris ŝi, respektindulo, kial oni vin arestu? – la simpla, neklera virino krucsignis. Ĉu ili estas normalaj, kiel ili povas pensi, ke vi ion ajn ŝtelis?

Ili min ne arestos, Ĵivana, pro tio ĉar ili kredas, ke mi estas ŝtelisto, ke mi fremdan grenon ŝtelis, ili min arestos pro mia greno, kiun mi ne havas. Kaj ili ne arestos min kiel serban, sed kiel rusan mastron, ili arestos min kiel kulakon.

Ĉu eblas, ke ankaŭ tio vin trafos, Miluteno, ĉu io tia estas ebla?!

Tia estas la nuna epoko, Ĵivana – mi volis ŝin prudentigi kaj konsoli.

Mia Ĵivana min rigardis, rigardadis, kaj denove krucsignis: Jen kion ili, diris ŝi, faras, ili vin arestas, sen ke vi povas apelacii, ĉar vi ne estas serba, sed rusa mastro – konfuziĝis mia Ĵivana. Vi, Miluteno, antaŭe povis apelacii, sed.... mi ne scias al kiu nun apelacii.

Ne turmentiĝu, Ĵivana, nur pretigu por mi linkovrilon, ĝin ja oni bezonas en arestejo – mi dume konstante rigardis al gardisto, mi ja volis vidi, kiel li fartas, li ja devas scii, ke mi ne estas arestinda.

Dume mia Ĵivana krucsignis – ŝi pretigis miajn aĵojn, krucsignante. Ŝi min adiaŭis, kaj krucsignis, rigardis post min, forirantan tra strateto, kaj krucsignis – tiu simpla, ektempa virino.

Ĉu ni povas ne iri tra la vilaĝo, homoj nin vidos, prefere ni iru tra kampoj! – diris mi al la gardistoj Li konsentis, mi komprenis, ke li tion preferas, por ke ni ne hontigu nun, ni ambaŭ.

Ankaŭ tra la urbeto ni ne iru, homoj tie min konas, ili ja konas ankaŭ vin, la homoj scias, ke mi ne estas ŝtelisto, mi ja hontas, ankaŭ vi ne povas fieri pri ĉi tio, la homoj ja konas viajn patron kaj avon.

Li konsentis. Li nur iris apud mi, kaj detale rakontis, kio al mi okazos. Li diris: unue vi estos ĉi tie, kaj poste ni vin, la kulakojn, irigos en neproksiman, konstantan malliberejon.

Bone – demandis mi – ĉu oni min tribunalos? Kutime la homo ne iras en punejon sen juĝado.

Oni vin tribunalos, oĉjo Miluteno, oni tribunalos, ĉio estos laŭ la leĝo – diris li, dum ni penplene elkotigadis la piedojn – vi ne iros en punejon sen juĝado, ĉi tio ne estas, diris li, la eksa Jugoslavio.

Mi silentis. Mi ne intencas defendi la eksan Jugoslavion, mi nur tretis koton, kaj rezonis: ne al vi, Miluteno, estas plej malfacile; pensu pri tio, kiel sentas sin la juĝistoj, kiuj min juĝos kaj juĝdecidos pro la greno, kiun mi nek ŝtelis nek havis, kiun mi do ne kaŝis, ekzistas ja inter la juĝistoj ankaŭ bonaj kaj honestaj homoj.

Ni eniris la eksan distriktan urbodomon. Tie estas malliberejo. Tie ĝi ĉiam estis – mi rememoris, ke mi antaŭ la milito pro la letero al la reĝo iris en tiun urbodomon, kaj ke la distriktestro minacis, ke li min arestos, sed mi sciis, ke li tion ne rajtas, kaj mi diris al li: ne rajtas vi, ho, aresti familieŝtron el Ŝumadio.

Nu, oĉjo Miluteno – denove la gardisto mion nomis „oĉjo“ – ni ĉion ĉi faras, por ke la malriĉularo vivu pli bone.

Malagrabla al li estis, li serĉis pretekstojn, kiel se li estus kulpa, kiel se mi ne sciis, pri kio temas. Arestu, ho, kaj silentu, mense diris mi. Kial vi pri la malriĉularo parolaĉas? Kiu havos utilon, pro mia artesto. Kian utilon havos la malriĉularo.

En tiu korto la kelaj fenestroj de ĉiuj flankoj havis kradojn. Kaj en la fenestroj, inter la kradoj, videblis kapoj, kiel la mia, grizharaj. Ankaŭ peltkitoj tie videblis. Multaj peltkitoj, same kiel antaŭ Bregalnico sur niaj mortintoj. La homoj gvatis.

Rigardis.

Ĉe la pordo antaŭ la konstruaĵo aperis Borao Sturmo.

Ho Borao, brave! – diris mi. Mi gratulegas vin!

Sed Borao rigardis min, jen, ĉi tiel, kaj demandis, kion mi gratulas.

Nu, Borao, vi, la komunistoj, vi estas veraj potenculoj; vi arestis Ŝumadiajn familieŝtrojn; tion, ho, neniu kuraĝis fari ĝis nun, nek la princo Miloŝo, neniu kuraĝis fari ion tian, ĉiuj timis la ŝumadianojn, sed vi nun venkis ĉiujn, de nun vi povas arestadi ĉiujn laŭ propra kaprico, pro kapricaj kialoj, ĉiun, kiun vi aresti deziras. Li nur rigardis min, sed mi daŭrigis, elkore: Pripensu, ho Borao, alvenos la momento, kiam vi pentos pro ĉi tio, en Ŝumadio vi ja vivas, Ŝumadio ja longe memoras. Min vi povas ofendi laŭ via plaĉo, rezonis mi, mi estas homo, kiu havas eĉ ne unu postuelon, sed ekzistas homoj, kiuj havas, aŭ havos, neparon, pripensu kiel vi traktos ilin; la potenco neniam daŭras senfine – ne permesu, ke iliaj nepoj rigardu vin en la okulojn kiam vi sendentiĝos, kiam vi griziĝos kiel, jen, nun, mi. Aŭ, dio ne permesu, ke iam la filo kun filo parolos, ke tiu demandos, la veron li volos, la via silentos – mi ja scias, kio tiam povas okazi.

Atentu, atentegu, ho Borao – mi ja ne priatentis, ke Borao min provis silentigi – vin, diris mi, al ĉi tio persvadis iu, kiu al Ŝumadio ne deziras bonon, aŭ ne konas Ŝumadion, mi ja ne parolas tion pro mi, al mi vi povas

fari ĉion, kion vi deziras, mi estas homo interrompita, sed ekzistas homoj, kiuj daŭrigas. Veran paradizon sur ĉi tiu tero vi devus fari, por ke de ĉiuj ĉi pekoj vi estu liberigita.

Silentu, Miluteno – Borao ĉirkaŭrigardis, por ke lin neniu aŭdu – traelportu ĉi tion, diris li, ankaŭ ĉi tio pasos, eble ĉio ĉi tio estas eraro.

Ĝuste tio estus terura, se aŭtoritatuloj povas tiel multe erari, pli bonaj estas eĉ tiranoj, ol ĉi tiaj uloj – mense diris mi.

Estis jam antaŭvespero, malliberuloj pretiĝis ripozi, kaj mi sidis kun Mihailo. Ni fumis ĉe necesejo. Mihailo estis malbonumora. Jen, Miluteno, kiel misŝancaj ni estas, diris li, Adamo Popoviĉo forpasis facile, forpasis ankaŭ Dragomiro Stankoviĉo kaj multegaj niaj samaĝuloj, sed ni, post tiom da niaj militoj, denove estas kune – sed en arestejo.

Niaj samaĝuloj estis bonŝancaj homoj, tial ili forpasis – konsolis mi lin – sed ni ne estas bonŝancaj, ni ne povas tiel simple morti, tia estas nia fato.

Kiel ni povas esti kondamnitaj, se ni eĉ ne estis juĝataj – koleris Mihailo, la homo ne ŝatis malliberejon, li ne volis esti kondamnito sen juĝado

Nin oni devis juĝi laŭregule, verŝajne ni tion meritis, multajn militojn ni militis, multajn medalojn ni ricevis, ni ja meritis, ke oni nin tribunalu kiel homojn, ke en la juĝejon alvenu niaj amikoj kaj niaj infanoj, nia neparo, kaj niaj advokatoj, por ke klariĝu, ke ni ne estas kulpintoj, ke ni nenion ŝtelis, nenion kaŝis.

Estu kontenta, Mihailo, ke ni estas kune; jen, ankaŭ Paŭlo estas ĉi tie, alvenos ankaŭ Vasilio kaj aliaj niaj militaj kamaradoj.

Eĉ ŝtelistojn oni tribunalas laŭleĝe, kial ankaŭ ni ne havu tian eblecon, almenaŭ kiel la ŝtelistoj, kial ni estas pli malbonaj ol ili; ankaŭ nin, diris li, oni devas tribunali publike, antaŭ la homoj, por ke ni povu turniĝi kaj rigardi la homojn en la okulojn, same kiel la juĝiston – ripetis Mihailo. Li ja volis rigardi la juĝistojn en la okulojn. Kaj siajn konatojn. Kaj la akuzistojn. Tia homo li estas – li ŝatis rigardi la homojn rekte en la okulojn.

Tio jam ne estas ebla, Mihailo, forpasis la epoko, kiam vi povis rigardi la homon en la okulojn, nun tion neniu faras; vin oni ne arestis, por ke vi antaŭ la neparo kaj konatoj malhontiĝu – mi ja volis kvietigi lin, sed li eĉ aŭskulti min ne volis.

Ni ne ŝajnigu nin sencerbaj, ho Miluteno, ni ĉi tiun landon savis, diris li, kio estus, se ni ne estus; ĝi ekzistas nur dank al nia malsatado dum nia retiriĝo tra Albanujo, dum la marŝado de Draĉo ĝis Valono, dank al nia malsanado por la savo de la patrujo – ĉu ni ne meritis, ke oni nin almenaŭ tribunalu, almenaŭ tiel, kiel oni tribunalas la mortigistojn kaj kanajlojn.

He, ni ne estas tiom bonŝancaj, ho Mihailo, nia sorto estas la nia, ne indas envii ŝtelistojn. La kanajloj havas sian sorton, kaj ni – la nian, jen ĉio.

Sed Mihailo tamen malcedis: Mian neparon ĉi tio venenigos, ili ĉi tiun mian malfeliĉon neniam povos forgesi, kvankam ne estas bone, ke la infanoj kresku kun malamo en la koro.

Ho Mihailo, ŝtopu la buŝon, ne venenigu la neparon, vi almenaŭ nepojn havas, kaj ili, dank al dio, estas vivaj kaj aktivaj.

Je dio, Miluteno, mi ne estas certa, ĉu vi vortas veran veron, la nepojn ja povas atingi la suferoj de iliaj praavoj.

VIDU, KIOM MULTAJ NI ESTAS!

Poste ili nin entrajnigis kaj veturigis en alian malliberejon. Al Mihailo tio malplaĉegis.

Mi ne povas akcepti ĉi tian sorton, diris Mihailo; se ĉio estus normala, ili devus fieri pri ni, ili nin ne veturigis en furgonoj; bonaj filoj kaj nepoj de bonaj popoloj en ĉi tiaj furgonoj veturigas porkojn kaj brutojn, ne veturigas siajn patrojn kaj avojn, kiuj honeste servis la popolon kaj la ŝtaton, iam.

Tia estas la nuna epoko, Mihailo, oni ne povas esti elektema, kiam oni iras el unu en alian arestejon. Ni ja estos en malliberejo en alia loko, oni ja ne povas nin veturigi per limuzino, vi ja vidas, kiom multaj ni estas...

Kaj, jen, ni venis ĉi tien.

Ho oĉjo Miluteno! – alpaŝis min tiun tagon pufvanga blondulo, rotestro, bela knabo. Ankaŭ antaŭe li min alpaŝadis, li min konas, tion li asertis. Nun li metis la manon sur mian ŝultron, tiu bonanima knabo, li ja plaĉis al mi, ankaŭ al mi ŝajnis, ke ankaŭ mi lin deie konas, sed jen, mi ne aŭdacis demandi kiu li estas, kia estas lia familia nomo, timante, ke eble mi konas lian patron aŭ avon, kaj se estus tiel, li hontos renkontiĝante kun ili. Tial mi silentis, sed li longe tenis la manon sur mia ŝultro, konstante ĉiurkaŭrigardante, por konvinkiĝi, ke lin neniu vidas, kaj fine li diris: oĉjo Miluteno, komprenu, tia estas la situacio, ĉi tio estas revolucio, la revolucio ne eblas sen viktimoj. Ni devas, diris li, pensi ankaŭ pri la rusa revolucio. La rusa revolucio ja estis multe pli malfacila, ĝi multe pli da kulakoj forvoris. Rakontis li, je dio, ke tie, dum tiu revolucio, milionoj da kulakoj – tiel ili nomis siajn famiilestrojn – la plej nigran sorton havis. Oni ilin ĉiujn en Siberujon sendis, tutajn familiojn ili sendis en Siberujon.

Mi lin rigardis kaj aŭskultis, al mi plaĉis, ke li volis min konsoli, sed mi neniel povis encerbigi, kio okazas kun la serbaj homoj, kial ili sin konsolas per Siberujo kaj rusa revolucio, ĉu iu vermo ilin rodas, interne, ĉu ilin ankaŭ ie, en la animo io bruldoloras. Mi rezonis, ankaŭ al ili ne estas facile, ne

povas fieri ĉi tia junulo kaj batalulo, pri tio, ke li gardas en malliberejo eksajn batalulojn – tial, jen, li kiel pretekston uzas la rusan Siberujon, kaj per pli granda malfeliĉo kaŝas ĉi tiun, nian, malfeliĉon. Mi sentis deziron demandi lin, ĉu iam ajn ĝis nun ni, la serboj, konsolis nin per Siberujo, ĉu ni en Serbujo Siberujon havis. Mi preskaŭ demandis lin: bone, nevĉjo mia, kian feliĉon kaj bonon homan la rusoj akiris, ĉar tiom da homoj ili en Siberujon sendis, kaj tie kadavrigis ilin, ĉu ili havas iujn pravigojn por tio, kaj ĉu la aliaj homoj en la mondo komprenas tiujn pravigojn?

POR BONA MORTO NI MALFRUIS

Razisto en la malliberejo enŝovis razmaŝineton sub mian akselon, kaj eĉ en mian pubhararon: li volas, diris li, min beligi, tion ebligis, diris li, la novaj aŭtoritatuloj, kiuj volas beligi Ŝumadiajn familiestrojn kaj veteranojn – li palpebrumis al mi kaŝe.

Kial vi min beligas, mi ja estas en malliberejo, demandis mi, mi ne pretiĝas iri al religia patronfesto, en la arestejo mi ja ne devas ŝminkaĉi min.

Sed li, la razisto – silentis silente. Ankaŭ mian barbon li volis fortondi.

He, tio ne eblas, nevĉjo mia, la barbon mi ne donos. Ĝi estas mia sanktaĵo.

Ĝi ne povas, diris li, resti. La barbo ja ne estas sanktaĵo, la ĉetnikoj, diris li, senhonorigis la barbojn, eĉ la sanktuloj nun la barbon fortondus, se ili tion povus.

La ĉetnikoj senhonorigis barbon sian, nevĉjo mia, ne la mian. Sur mia mentono ne estas ilia, sed mia barbo. Do, mian barbon ne tuŝu – obstinis mi.

Li devas, diris li, pro la sano senbarbigi min. La sano estas, diris li, por la homoj la plej grava.

Mi tamen ne permesis, ili min ĉi tien ne venigis por min sanigi, alicelle ili min alpelis. Ne igu min flavbekulo, mia sano ne malboniĝos pro la barbo, pro aliaj kialoj ĝi malboniĝis kaj malboniĝos.

La barbon mi kreskigis pro mia afflikto, ĝin mi havas pro Radojo – mi gapigis mian solokulon, sed li kvazaŭ tute ne rimarkus, ke mi havas nur unu okulon.

Vi, oĉjo, nun estas en malliberejo, vi ne povas fari kion vi deziras, ĉi tie oni ne rajtas elekti; ne mi estas kulpa, ke vi havis tre multajn hektarojn, pro kio oni vin en malliberejon venigis – li staras kun la razaparato, atendante ke mi cedu.

Sed kiam estis hontinde kaj kulpige havi dek du hektarojn da plugebla tero?

Iam ne estis, sed nun – anticipis li – nun estas la epoko de malriĉularo kaj senterularo, tial vi estas en arestejo, tial mi vin razos. Multe pli violentajn ulojn mi jam razis, inter ili estis ankaŭ iu vojevodo.

Vi razis ilin, sed ligitajn! – eksaltis Mihailo, volante kapti la gorĝon de la razisto. Post tio li tuniĝis al mi: Kial vi priatentas liajn vortaĉojn, Miluteno, li estas malliberulo, same kiel ni, li ja ne estas aŭtoritatulo, ĝuste tiaj homoj devas esti ĉi tie! Mihailo kaptis la gorĝon de la razisto.

Ne faru tion Mihailo – mi haltigis lin – forlasu la poŝoŝteliston; ne tuŝu lin, diris mi, li havas mentorojn; al li aŭtoritatuloj ordonis tondi nin.

Ĉu ne estas tiel, nevĉjo mia? Ne konvenas al ni kvereli kun poŝotranĉistoj kaj blatoj, ni estas, ho, dommastroj kaj bataluloj.

Mi rezignis defendi mian barbon, ankaŭ ĝis nun mi nenion sukcese defendis. Eĉ kion mi sukcese defendis, tio estis vana, vanega. Mise estas koleri en malliberejo. Por koleri ni jam estas troaĝaj, delonge ni troaĝiĝis.

En malliberejo la banado estas tre malagrabla, precipe por nejunaj homoj. Nejunaj homoj povas baniĝi solaj. Kaj aparte. Por ke neniu vidu lin. La maljuna homo estas malbela. Kaj al si kaj al la aliaj. Kio estas pli malbela ol maljuna nuda homo, nu, diru mem! Tion mi diris ankaŭ al tieaj niaj gardistoj.

Ne hontigu min, ne nudigu min tute antaŭ ĉi tiuj infanoj – mi montris la junulojn, kondamnitajn pro ŝtelado kaj aliaj impertinentaĵoj – neniam antaŭ junaj homoj mi senvestiĝis tute kaj absolute, ne ridindigu min; ne gravas, ke vi min arestis, sed ne lavigu min ĉi tiel. Mi ne estas en malliberejon por gardi la sanon, mi ne estas arestita por esti pura.

Sed la deĵorantoj eĉ aŭdi min ne volis. Ĉiuj devas sin bani, en la malliberejo ne estu fetore, ĉi tie, diris ili, estas multe da homoj, sen banado vastiĝos malbonodoro kaj ĉiaspecaj fiinsektoj, kaj tio estos malgloro por la ŝtato.

La ŝtato ja ne meritis mian respekton, sed se estas tiel, se tio endas, bone, mi ĝin respektos, ankaŭ ĉi tie, en la malliberejo.

Mi senvestiĝis, kaj per la manoj kovris mian hontigilon, vidante, ke ankaŭ Radovano Bananaco kaj Paŭlo faris same.

Kie estas viaj viriloj, ho, bravuloj Ceraj kaj Kolubaraj, ŝrumpis la ŝtatkonstituantoj, ankaŭ postajetojn vi ne havas, kiel maljunaĉaj lupoj! – ekkriadas Aĉimo, juna, bela ŝtelisto, poŝotranĉisto. Stranga knabo, en la malliberejo li estis pro multaj impertinentaĵoj, tamen, jen kiel sagaca kaj erudicia li estas. La aliaj ŝtelistoj, palpetis nin kaj deantaŭe kaj dedorse, ŝercaĉis, dum varmega akvo vergis nin el dekoj da duŝoj, vaporo leviĝis, densa kaj netravedebla. Absolute nenio videblis ĉirkaŭ ni, ni perdiĝis en la malbonodoro de brogita homa karno, deprimis nin la bruo kaj kriaĉado de junaj ŝtelistoj.

Grumblis kaj blasfemis miaj samaĝuloj, blasfemis la medalojn, kiujn dum la antaŭa milito ili meritis. Ankaŭ mi insultus la sorton, ĉar ĝi ne

pereigis nin sur la monto Kajmakĉalano, ĉar tiukaze mi ne kuiriĝus en ĉi tiu malbonodora vaporo, kaj la ŝtelistoj ne ofendadus mian eksjunan postajojn, sed ĉio estis vana.

Mihailo senĉese grumblis. Li proksimiĝis al mi, kaj diris: Tiel multaj niaj malamikoj, turkoj, bulgaroj, hungaroj, ŝvaboj, germanoj kaj la aliaj ne sukcesis nin mortigi, tial ni nun ĉi tion ĝisvivis. Multegajn virbovojn ni kreskigis, kial eĉ ne unu el ili nin ventropikis, ke ni nun niajn nudajn bazojn inter ŝtelistojn ŝovu, en nia maljunaĝo.

He, por bona morto jam estas malfrue, Mihailo, ne indas plendi – konsolis mi lin, kvankam ankaŭ mi sentis korpremon, kvankam ankaŭ mi sopiris konsolon, ian ajn.

Bone, Miluteno – rediris Mihailo, farante signojn per la fingroj – jen mi rezonas, ni estas, jen, en malliberejo, ni estas arestitoj, kvankam ni estas nek ŝtelistoj, nek mortigistoj. Ĉu tio signifas, ke ni nun estas venkitoj? Kio okazis kun ni, ĉu oni povas venki sian popolon? Kaj ĉu ni estas ies ajn popolo?

Mi tion ne povas scii? – mi jam ne povis elteni la demandadon. Ankaŭ mi, frato mia, komprenas absolute nenion. Eble ĉio ĉi estas ia eraro... eble ili nin liberigos. Kaj ekpentos iam ajn.

Tio ne povis esti eraro, Miluteno; kiel iu povas erare aresti homojn, kio estas vi kaj mi, kion vi ja parolas, ĉu ni iĝis tiom malgravaj, ĉu oni nin povas tiom subtaksi.

Ekzistas diversaj eraroj; ili ja ne tre volas pensi pri ni, ili havas pli gravajn zorgojn, pli gravajn fendaĵojn, tial ili povas ankaŭ erari – konsolis mi lin. Sed li interrompis min: Ho, Miluteno, ni devas apelacii, ni devas skribi al iu, ankaŭ ni, la ŝumadianoj sendube ie havas nian homon. Al kiu vi volas skribi, al kiu vi volas plendi. Ĉu vi vere opinias, ke iu ajn zorgas pri vi? – enhakiĝis en nian konversacion iu bubo, malliberulo, videble lerneĵano. Vi indas eĉ pli aĉan traktadon – li nomis nin kruduloj kaj ŝtipkapuloj – evidente bruska kaj danĝera ulo. Vi ja, diris li, al ili, al la komunistoj, donis viajn filojn, ankaŭ panon vi al ili donis; se ne ekzistus vi, ili ne venkus – siblis la ulo, impeta, la ulo juna kaj forta.

Atendu, ho! – ekbruskis Mihailo.

Kion mi atendu, vi ja atendis, nun ne plendu, vi, ruino vilaĝana, kaj nun vi muelas!

Mi jam timis, li batos Mihailon.

Kiam ni ilin mortigadis, vi ilin priploris – ankaŭ li okulgapis kaj, je dio, frapis per la fingro la frunton de Mihailo. Li denove eksiblis: sur fremda tombejo vi lamentis kaj vekriis, nun alvenis tempo, ke vi ankaŭ sur via tombejo plorĝemu, aŭdataj de neniuj, vi, fikrudcerbuloj, vi, familiestroj Ŝumadiaj, vi veteranoj! Kiam ni volis savi vian gloron kaj venkojn, vi turnis

al ni la dorsojn; vi plendis pro ĉiu malfekunda ŝafino kaj strudelo kiun ni formanĝis, vi nomis nin strudeluloj; kiam ni, diris li, per pafiloj kun ili la sorton vian solvadis, vi estis helpantaj ilin, ne nin, al ili vi kredis, sed ili vin prifriponis; vi restis kun sako sen enhavo, diris li, kredante al ilia politiko: ili ne volis preni manplendon da viaj prunoj, ĝis kiam ili vin tromplogis, sed nun ili forprenas eĉ la lastan vian greneron, infanojn viajn ili lasas sen peco da pano, vin ili promenigas de unu al alia malliberejo, kalsonojn viajn ili demetas, kaj plenigas viajn eksjunajn pugojn per pulvoro, por ke en trafekejoj viaj fibestetoj ne multiĝu, je dio, li alpaŝis Mihailon, kaptis lian orelon, kaj komencis ĝin tordi; rapide li turniĝis al mi, kaptis mian nazon, kaj ektiris ĝin. Mi toleris, mi ne volis interbatiĝi, mia batalaĝo jam estis for. Mi atendis, ke li lasu mian nazon, kaj spiris per la buŝo, atendante, mi ja pretigis respondon por li.

Tuj kiam li malpremis mian nazon, mi diris al li: Fi al vi, diris mi, vi talpulo, kaj al vi, kaj al la viaj, al la komandantoj kaj gvidantoj, kiun vi akuzas, kiu al vi donis la rajton tordi orelojn kaj nazojn de veteranoj! Ne banas ili ĉi tie min hazarde, ne hazarde mi okazis inter ŝtelistoj, kiuj niajn eksjunajn bazamentojn pinĉas kaj priridas nian karnon, kiu la retiriĝon tra Albanujo eltenis, trairis la insulon Vidaon, kaj Afrikon, Kajmakĉalanon – ektorentis el mi ĉi tiuj vortoj, eklavangis ili, invadas min ĝensento. Mi ne estas ĉi tie, diris mi, nur ĉar ĉi tiuj estis tro forta potenco, min ĉi tie, en ĉi tiu vaporo kaj malbonodoro, kadukan kaj nudapugan primokas poŝtranĉistoj kaj kraduloj ĉiaspecaj, ĉar vi, vi kaj viaj komandantoj, veraj merduloj estis. Honestajn homojn vi ja turmentis, kaj, je dio, eĉ buĉis. Jes, al ordinaraj kokistoj vi donis ponardojn en la manojn, rajtigis buĉi, kvazaŭ, por defendi nin, nin, la veteranojn, defendi gloron nian, kaj la gloron de niaj prauloj. Sed ili por nia gloro drinkis kaj strudelojn manĝis, buĉadis homojn, eĉ virinojn kaj infanojn. Mi ne volis indulgi lin, sed ankaŭ krei mi ne volis, mi parolis tiel, ke nur li povis min aŭdi.

Paŭlo kaptegis lian manon, estis batonta lin – sed mi ne permesis, ne estas bone en malliberejo interbatiĝi, nudapugaj.

Tamen, ni ne povas permesi al ili tordi niajn orelojn, eĉ nun, en la malliberejo; kio okazus, se ili venkus – siblis Paŭlo, dezirante stukaĉi, sciigi la administracion de la malliberejo kion faras la bubo. Mi ne permesis. Ni ne venis en la malliberejon por esti denunciistoj, por helpi tiujn, kiuj nin malliberigis. Ne tion ni devas fari. Neniam ion tian ni faris. Tiajn taskojn plenumas aliaj homoj, pagatoj.

Ni ja devas savi niajn animojn, se ni tion povos. Kaj reveni al niaj domoj. Al niaj tombaroj.

PRIPLORINDAJ NI ESTAS

Se ni estus bonŝancaj, nevĉjo mia, mi rakontus al vi, kiel oni fluigas la sangon de ŝafoj, kiel brutojn oni prizorgas, sed kion fari, oni devas paroli tion, kion oni devas.

Ek, oĉjo Miluteno, elportu la pajlomatracon, kial vi hezitaĉas – rapidigis min gardisto, junulo, rotestro.

Rapidu oĉjo, vi ja estas tesalonika veterano – vere bona estis tiu knabo, li pensis, ke la tesalonikaj veteranoj estas kapablaj por ĉio, eĉ por la vivo en malliberejo – oni devas elporti la aĵojn. La gardistoj hastis, maltrankviliĝis. La tuta malliberularo levigis. El iuj pavilonoj ĉiuj aĵoj jam estis elportitaj en la korton. Ankaŭ la litoj. Tie, malantaŭ la budoj, pajlomatracoj jam estis bruligataj.

Bone, nevĉjo mia, sed kial ni devis tiel rapidi, kia danĝero nin minacas?

Granda estas la danĝero, oĉjo Miluteno, diris li, granda danĝero. Malamiko, diris li, enŝovis pedikojn en vian malliberejon.

Min mirigis, ke li tiom konfuziĝis kaj ekscitiĝis pro pedikoj, kvankam lin ne maltrankviligis, ke ni, ke tiom da homoj estas en malliberejo.

Ĉu tiu malamiko ne havas pli danĝeran armilon kaj pli bonan aliancanon ol la pedikojn? – demandis mi, volante ekscii ion kaj pri li, kaj pri liaj malamikoj.

Vi ne konas la malamikon, oĉjo Miluteno, vi estas, diris li, naiva. La pedikoj estas danĝera kaj ruza armilo en la manoj de la malamiko.

Unue, la pedikoj ne estas en la manoj de la malamiko – mi hastis elporti la aĵojn – la pedikoj estas en niaj sinoj, ili estas en la malliberejo. Krom tio, mi ne kredas, ke la pedikojn enŝovis tiu malamiko; la pedikoj eble alvenis kun iu el novaj malliberuloj, el niaj domoj.

Dume, ĉirkaŭe, jam nebulis kaj fumis aparatoj. Kaj pumpiloj.

Eruptis flamo kaj fumo de bruligitaj pajlomatracoj.

Mi tuis, samkiel la aliaj, pro pulvoro kaj fumo. Tuis ankaŭ la rotestro. Blasfemante. Kiaj kulakoj vi estas, diris li, kial vi ne hontas, vi estas niaj klasaj malamikoj, riĉuloj vi estas, sed vi havas pedikojn!

Nu, se estas tiel, se mi estas tiu malamiko, tiam vi en Ŝumadio havos nemalmultajn malamikojn. Tamen, ho junulo, danku dion, ke vi estas komunisto en Serbujo, kaj viaj klasaj malamikoj estas en krudŝtofaj pantalonoj kaj opankoj, kaj, kiel vi nun vidas, ili estas pedikaj; pripensu, diris mi, kiel fartas la komunistoj en riĉaj landoj, kie iliaj malamikoj estas fabrikistoj kaj aliaj potenculoj. Tie, vere, ne ĉio finiĝus facile, kiel finiĝis kun la kampuloj Ŝumadiaj.

He, vi ne pravas – miaj vortoj ne plaĉis al tiu junulo, kiu, jen, ĉi tiel, ektiris mian manikon, kaj faris al mi signon, ke ni iomete foriĝu flanken – vi ne pravas, oĉjo. Mi ŝatus, diris li, ke miaj klasaj malamikoj estu en silko kaj veluro. La plej malbonaj kaj la plej danĝeraj etas la homoj en krudŝtofaj pantalonoj. Ili estas ankaŭ la plej eltenemaj. Nenio estas pli eltenema, ol la uloj kun krudŝtofaj pantalonoj, kun drapaĵoj, piedvolvaĵoj kaj opankoj, kaj eĉ pli, se la malamikoj portas ankaŭ serbĉapon. Saĝa la knabo, erudicia, parolanta kiel fonto, kiu sur ŝtonoj gajgluglas. Mi la veron diras, li tiel vortis: Pli facile estas al la anglaj komunistoj kun iliaj klasaj malamikoj, ol al ni, kun la niaj – li montris ĉi tiel al mia pantalono, pardonu min, al la la krudŝtofa pantalono, ho oĉjo, diris li, eltenema estas la malamiko, kiu havas pedikojn. Ĉi tiajn estas malfacile bridi.

Nu, ne indas plendi, ho junulo, estas tiel, kiel estas – mi senpolvigzdis miajn aĵojn, la pajlomatracon kaj lankovrilojn. Mi ne kredas, ke iu min pedikumis intence.

Kiaj ni estas en niaj domoj, tiaj ni estas ankaŭ ĉi tie – min ne interesis lia opinio, mi volis ĉion diri al li sen ĉirkaŭfrazoj – vi ne povas arestadi kampulojn, kaj atendi, ke ili en la malliberejo kondutu kiel sinjoroj; kia estas via popolo, tiaj estas ankaŭ viaj malliberuloj; ne povas vi forpreni nian liberecon, ne prenante ankaŭ niajn pedikojn, ili ĉiam estis kune.

Estas vero tio, kion vi diras, oĉjo Miluteno, ĉio estas vana, ni ne povas arestadi sinjorojn kaj riĉulojn, ĉar ili ne ekzistas; ni devas aresti tiujn, kiuj ekzistas – prudenta estis tiu knabo, li ne legis siajn libretojn vane.

Sed ne afliktiĝu, diris mi, vi ne venigis nin ĉi tien, por komplezi nin, por ke ĉio estu tiel, kiel ni deziras, nenie malliberejoj estas konstruataj por ke enkarcerigitoj en ili ĝuu.

He, oĉjo Miluteno, ni ja devas zorgi pri vi, diris li, ni nun tute kaj absolute respondecas pri vi. He, se vi pri ni respondecas, tiam al vi ne estos facile – mi mem ne scias, kiel tiuj vortoj elflugis el mia buŝo, sed li nur okulfiksis min, kapsvingis, kaj foriris.

Radovano Bananaco alpaŝis min. Li grumblis. Jen, diris li, kiaj homoj estas ni, la ŝumadianoj, kiel priplorindaj ni estas. Por niaj malamikoj la plej grandaj kaj la plej furiozaj malamikoj estas niaj pedikoj, jen kiel kompatindaj ni estas. Niajn pedikojn ili timas, kaj nin – neniom.

Ho, mia Radovano, ni vivos tiel, kiel ni nun vivas, sed povas esti, ke ni vivos eĉ pli malbone. Por ni estas grave, ke ni alvenu sur niajn tombejojn, sub niajn herbobulojn.

Ĉu ne estas tiel?

FILMOJ NE JUKAS MIN

Finiĝis filmo. Homoj estis elirantaj elinter benkoj. Brua muziko boris miringojn.

Kion vi opinias pri la filmo, maljunulĉjo? – demandis min gardisto, ne atendente, ke ni eliru eksteren, al aero. Ho, dio, min li demandas, kion mi pensas pri la filmo, kvazaŭ ĝuste mi devus pensi pri la filmoj. Kiam ni, en Ŝumadio, pensis pri filmoj? Ni eĉ ne sciis, ke tio ekzistas, tion ni ja ne bezonis, ĉar ni havis niajn amuzojn kaj festenojn. Tiuj filmoj, tio nun, post ĉi tiu liberiĝo aperis. Sed mi havis pli urĝajn aferojn, pri kiuj mi devas pensi, la filmoj min ne jukas – jen, tiel mi parolis, ĉar mi hontis diri, ke mi eksentis dormurĝon, ke mi ekdormis kiam la bildoj svingiĝis. Sed li, tamen, insistis scii, kion mi pri la filmo pensas; verŝajne oni ordonis al li kontroli, kion ni opinias, por scii, kiel ili nin reedukis, ĉu ni vane manĝas panon en la malliberejo.

Kial mi pensu pri la filmo – diris mi – mi pensas pri mia sorto, domo mia malpleniĝis, vakiĝis, kial mi pri filmo pensu?

Kion vi pensas pri la aktorino? – redemandis la gardisto. Mi merdas sur la aktorinon! Tuj kiam mi tion elparolis, mia ĉapo svingiĝis. Eksonis vango-frapo. Vango mia dolorbrulis, salivo ekfluis.

Nu, nevo mia, ĉu vi min, serbon, vangofrapegis pro tiu kapricaĉulino! – interrompis mi lin, ekkoleris mi, ne povante elteni, mi jam ne estis en kverelaĝo, sed finfine, ĉi tian vivon mi tute ne bezonas.

Vi, ho, fiku vian patrinon rapide – denove agresis la gardisto – vi ofendas, diris li, rusinon! Vi ŝajnigas malsaĝecon, kaj ofendas la landon de socialismo. Kaj la liberigantojn de ĉi tiu lando. Ĉu vi scias, diris li, kio okazus kun la tuta mondo, se ili ne ekzistus? Kiu, demandis li, liberigus la mondon.

Al mi ŝajnas, ke ankaŭ mi mem iam estis ia liberiganto – mi rebatis akre, ne volante indulgi lin, li ja tion ne meritis, sed mi mense diris: ho, Plejpotenca, kial vi nin punis, kial niaj filoj kaj nepoj ĉi tiel rapide forgesis ĉiujn niajn turmentojn kaj suferojn por ĉi tiu lando.

Ŝi estas – la gardisto kontinue parolis pri la aktorino – sindona partianino, bona ekzemplo por ni ĉiuj.

Ho, malfeliĉulo kara – kvietiĝis mi – ĉu vi ne havas ekzemplon pli bonan, ol tiun rusan aktorinon; ni ja havis tiom da militoj, tiom da bataloj kaj bravuloj; se ni estus bonŝancaj, ni estus por vi ekzemplo – mi montris al li la homojn, kiuj ariĝis kaj aŭskultis nian kverelon. Li min denove vangofrapegis. Ĉu vi ne scias, ke mi ricevis du Karaĝorĝajn ordenojn kaj Albanujan memormedalon, ĉu eblas, ke mi ĝisvivis tion, ke serbo mian oreton tintigis pro iu rusino, pro aktorino!

JES, MI ESTAS PAŬLO...

Mi konas vin, konas, vi estas tiu, kun kiu Miluteno interparolis, ĉiudimanĉe. Mi memoras, mi ja ne povas ne memori: vi vere harmoniis, vere, je dio... li nomis vin „nevĉjo mia“, kaj vi lin, samkiel la aliaj, „oĉjo“. Mi memoras, kvazaŭ mi nun vin rigardus, vin kaj Milutenon... vi sidis sur tiu benko... Dankon ke vi alvenis.

Mi volas paroli kun vi. Pro Miluteno. Ni iru sub la porĉon, por sidiĝi ĉe tablon. Ni trinku, por la karmemora.

Miluteno. Je dio, li vere estas karmemora...

Mi vidas, Miluteno vere al vi estas kara.

Kion vi diras... ke mi parolas kiel Miluteno. Povas esti, povas esti...

Nu, jen, pasis ankaŭ la tempo en la prizono. Ni eltenis ankaŭ tion, sed Miluteno ne eltenis. Koro lia krevis. Krevis.

La pasintan someron. Dum prifosado de maizo. Mi ne povas tutcerte diri al vi, ĉu jam pasis du aŭ tri semajnoj, de kiam vi foriris el la prizono – li alpaŝis min, kaj demandis: Ĉu ni, Mihailo, prifosos maizon?

Ĉu la ŝtatan – mi intence tiel demandis, volante elprovi lin – la malliberejan maizon ni prifosu, ĉu bone?

La maizo estas maizo – diris li.

Estu tiel, kiel vi diris, Miluteno, se vi diras, ke ni prifosu – ni do prifosos.

Ni prifosos, vidu tion la vagabondoj kaj poŝtranĉistoj, vidu ankaŭ ĉi tiuj, kiuj arestis nin, ke ni estas dommastroj, ke ni ne estas tiaj, kiaj ili estas.

Kaj ni prifosis maizon. Kaj sentis faciligon pro tio. La plugkampoj de la malliberejo estis grandaj, la maizo tia, ke estis ĝuige rigardi ĝin. Kaj Miluteno, kion diri, pli bona fosisto ne estis en la distrikto. Mi kvazaŭ nun vidus lin – fosas Miluteno tiel, kiel li fosis iam, kiam li havis por kiu fosi, kaj por kiu vivi. Kaj ofte, la povrulo, rigardis la ĉielon. Nubiĝis, li timis, ke pluvos.

Tamen, Miluteno, eble ni ŝajnos ridindaj, ĉar ni ĉi tiel ŝvitegas. Sed li min ignoris. Ankaŭ la aliajn li rapidigis.

Ni prifosas antaŭ pluvo, la rikolto estos malmanka, parolis li. Ni ja estas kampuloj, homoj ni estas!

Kaj tiuj malliberuloj, la poŝtranĉistoj kaj rompŝtelistoj, ili koleras, ili estas senvaloraj urbanoj, sed stultuloj ili ne estas. Por ili tio ne estas utila, ĉar la maizo ne estos en iliaj korboj.

Sed la maizo estas maizo, negrave kies ĝi estas, ja ni pri ĝi respondecas – konstante ripetadis Miluteno.

Sed ĉio estis vana, la poŝtranĉistoj ja ne scias kio estas la maizo, kio estas prifosado, tiaj homoj ne scias kio estas bonfaro, ili ne ŝatas la maizon. Sed al Miluteno oni tion pruvi ne povis, li jam perdiĝis, forgesis ke vilaĝanoj kaj kanajloj diferencas, tute kaj absolute. Prave Paŭlo parolis al li: Miluteno, ĉi

tiuj homoj estas danĝeraj, ili denaske estas arestotoj, ilin ĉiu registaro en la mondo arestus kaj senvivigus, rajte; ili ja priŝteladis domojn, kies hejmanoj estis senvivigitaj dum la milito, ne spitaĉu kiam temas pri tiaj homoj, ni jam ne estas en la aĝo, kiam ni povas ilin venki.

Sed Miluteno encerbigi tion ne povis, li impetis, malcedis, fosis, la mizerulo, tiel, kiel Dio al li tion ordonis, ni ja konas lin tia, li fosis pli rapide ol ĉiuj aliaj, kaj kiam li finfosis sian linion, li ĉiufoje revenis, kaj observis la prifositaĵon, rimarkante tion, kion la aliaj tute ne priatentas. Kaj tio pereigis lin.

Li finfosis sian linion, kaj, kiel se li estus, Dio pardonu min, en sia plugkampo, kaj jen, li iris kaj rigardis kiel la aliaj prifosis la maizon.

Memkompreneble, tio estis lia malnova kutimo, ne povis la homo en tiu aĝo facile rezigni siajn kutimojn... tio jam estis parto de lia naturo. Ni, la kampuloj, tion komprenas. Sed ĉu tio vere iĝas parto de naturo, tion eĉ doktoroj ne scias; mi ja demandis la doktoron Ĉabriĉon – mi rakontis al li ĉion pri Miluteno, ĉi tiel, kiel mi nun rakontas al vi, kaj demandis lin, ĉu tia sorto estis parto de lia naturo. Sed la doktoro diris: oni tiel nur diras, Mihailo, sed fakte ni ne scias, kio estas en la naturo, tiu afero estas neesplorita, tion ni ankoraŭ ne konstatis sendube.

Nu, Miluteno rimarkis, ke en la linioj, kiujn prifosas la poŝtranĉistoj kaj rompŝtelistoj la maizo velkemas. Sciis la homo, li ektiris la malgajan trunketon de la maizo kaj vidis, ke ĝi estas forhakita, ke la friponaro subtranĉas la maizon.

Komenciĝis kverelo. Koleris Miluteno, koleris la poŝtranĉistoj, ili graŭlis, graŭlegis. Miluteno insultis, memkompreneble, li estis kolera kiel cento da diabloj... li insultis iliajn patrinojn vagabondan – neniu rajtas pereigi la dian kreskaĵon, kiu nutras kampulojn kaj brutarojn, vermojn kaj formikojn kaj flugaĵojn ĉielajn.

Mi ne scias, kio okazis kun li, kial li tiom sakris; mi jam pensis, ke la homo freneziĝis, kial li kverelas kun ŝtelistoj kaj rabistoj, militaj banditoj, oni ja devas scii, kun kiu oni povas kvereli – nu, diru tion mem.

Miluteno – mi alpaŝis lin – ne insultu iliajn patrinojn, vi ne konas la krimaĉulojn, vi ja ne scias, kiom ili siajn patrinojn respektas. Sed li eĉ aŭdi ne volis: Mi ne povas, diris li, ĉiujn tedulojn timi, tio estus hintinda, Mihailo. Vi ja vidas, kio okazas kun ni, kun la ŝumadianoj, tio estas, diris li, veinda, ni jam ĉion timas, ĉu ni nun malkuraĝu ankaŭ antaŭ ĉi tiuj insektuloj.

Miluteno, diris mi, nun nin neniu respektas, ni estas eksuloj, pri tio eĉ paroli ne indas.

Li eĉ aŭdi ne volis.

Tiu Umulo – tiel oni lin nomis, li ja estis ĉefo de la blatuloj – ridis kaj montris al Miluteno:

Rigardu, diris li, la frenezan oĉjon, li predikas al ni, li tiras la voston de virkato, insultas niajn patrinojn vagabondajn, popas tiu oĉjo, li lekas la registaron, sopiras tiu oĉjo iri al sia tombejo, en sian vilaĝaĉon, li timas, ke li restos en ĉi tiu prizona tombejo.

Tiel li parolis, kaj poste ankaŭ li insultis al Miluteno lian eksjunan patrinon vilaĝanan kaj cimcerban. Li insultis, kaj diris: Eĉ maliiberejo ne estas por vi, la malliberejo ne estas por frenezuloj. En frenezulejon vi iros, sed unue ni venĝos al vi por via denuncemo.

Nu, ne temas pri denunco, ĉion ĉi tion Miluteno al neniu menciis, li ne denunciis, kvankam estus pli bone, se li farus tion. Se li farus tion, probable ĉio finiĝus aliel. Sed ne okazis aliel, li ne povis denunci ilin, infanoj ili estis kompare kun li, iom pli aĝaj ili estis ol lia forpasinta Radojo.

Mi opinias, ke ili estis certaj, ke Miluteno nenion diros ankaŭ pri kovrilumo... mi tion kredas.

He, se ni scius, ke ili kovros la kapon de Miluteno per litkovrilo, ni reagus, sed tion ni atendi ne povis.

Sincerdire, mi opinias, ke ankaŭ ili ne antaŭvidis, ke ĉio finiĝos ĉi tiel; sed jen, lia koro ne povis elteni, tio por li jam estis tro multe – li ĝisvivis, ke lin kovrilumu poŝtranĉistoj kaj blatuloj en malliberejo kaj, memkompreneble, lia koro krevis, jen ĉio.

Pasis nur du tagoj, de kiam oni lin kovrilumis – kaj lia koro rompiĝis. La koro de la maljunulo, nevĉjo mia, rompiĝis.

Memkompreneble. Jes, ĝuste tio okazis. La homo ne estas el ŝtalo, ĝi kolapsis. Tiel tio okazis, unuflanke, sed aliflanke, Miluteno sendube mal-aĉe mortis. Ekkompatis lin la ĉielulo. Li forpasis pro maizo.

Se oni bone pripensas, ĝuste tio okazis – li forpasis pro maizo.

Sed Ĵivanan vi vizitu, nepre. Mi rakontis al ŝi pri vi. Kaj ke kun Miluteno vi harmoniis, kaj ke vi kune sidis ĉiudimanĉe sur la benko en la mallibereja korto, ŝi tiam ĝojis, al mi eĉ ŝajnis, ke ŝi eklarmos. Memkompreneble, ŝi ĝojis, ĉar Miluteno en la malliberejo havis kunulon por afable interparoli.

APUD FAJRO, VESPERE, SENLUME

Dio vin favoru, infano kara.

Jes, mi estas Ĵivana, edzino de Miluteno. Kion fari, lia estas mi, kaj mia estas li. Al mi fojfoje ŝajnas, ke estus pli bone, kaj por li, kaj por mi, se ni ne apartenus unu al la alia, nek li al mi, nek mi al li, sed tiam en mia kapo ĉio distordiĝas, kaj mi tuj ekpensas: estas bone, ke estas ĝuste tiel, li estas mia, kaj mi – lia.

Ĝuste, vere, tiel – spite al la sorto.

Ho, vi estas tiu, dank al dio? Vi estis subteno por mia Miluteno.

Mi aŭdis, jes, aŭdis. Ĉion mi aŭdis. Ĉion diris al mi la niaj, kiam ili revenis el la prizono. Ĉion ili diris. Ili ripetadis: ne maltrankviliĝu, Ĵivana. Ŝtono defalis de la brusto de Miluteno. Ĉiudimanĉe, antaŭ tagmezo, ni satbabilis. Kaj ĉiam pri vi, infano mia, kvazaŭ vin Dio mem sendus al mia Miluteno, por ke li liberiĝu de la suferoj.

He, dankon al vi, egan dankegon. Kaj dankon, ke vi venis ankaŭ min viziti.

Bone, se vi deziras pri Miluteno...

Bone, jen, ĉi tiel...

Sidis mi sub porĉo, antaŭvespere. Ankaŭ kato kuŝis, ĉi tiel, Dio min pardonu, kvazaŭ mortinta.

Mi rigardis al la ĉielo, ŝajnis al mi ke ekpluvos, sed tio estis stranga, ke min ne doloris la lumbo – kiam subite, de tie, trans la rojo, aŭdiĝis la voĉo de Radojka, kiu kriis: Ho Ĵivana, ho Ĵivana! – ŝi iomete paŭzis, kaj poste rekriis – Ĵivana, respondu!

Mi respondus, se mi povus, sed mi ja estas fortomanka por kriparoli trans la rojo. Mi eliris ĝis la pordego, kaj Radojka min ekvidis. Ŝi kriis: Ĵivana, ĉu vi scias, ke via Miluteno mortis?!

Nu, kion? – demandis mi. Sed ŝi estis prudenta ino: Ne estas tio, diris ŝi, direbla trans la rojo. Veron ŝi diris, pasis jam tiu tempo, kiam ni povis per plena voĉo diri ke iu mortis, kaj kial mortis.

Verŝajne iu sendos al mi la informon, rezonis mi, estus normalne, ke mi sciu, kiel li mortis, kaj kial li mortis, ĉu li havis iun malsanon, aŭ mortis abrupte.

Kion vi atendas, Ĵivana – miris Radojka – kial vi ne eklamentis, ho virino, mortis via edzo, via famaliestro, la homa homo, eĉ ombron de iu ajn li ne surtretis, vojon al eĉ ne unu formiko li baris, ĉu ni ja senvorte eĉ morton renkontos! Eklamentu, ho virino!

Vi lamentu de tie, kaj ni lamentos de ĉi tie, reeĥe al vi, poste ni ankaŭ demandos kial kaj kiel mortis nia Miluteno. Ne permesu, diris ŝi, ke la morto enŝteliĝu, ke ĝin neniun rimarku, ke neniun eksonu – kiu tion faros, se ne vi, kaj kiam vi tion faros, se ne nun.

He, mi povas vekrii kaj lamenti pro ankoraŭ pli granda malfeliĉo, sed mi silentas. Ne temas pri Miluteno, pri lia morto, jam estis tempo por tio.

Sincerdire, li eĉ ne havis kialon por vivi.

Homoj aŭdis, kio okazis al Miluteno, kaj jen, ili komencis alvenadi, tia estas la moro. Ili sidis ĉi tiel, sub la antaŭpordo. Ankaŭ Lukao Lukiĉo alvenis. La homo etendis al mi la manon, kaj diris: Plej malbone estas, ho Ĵivana, ke ni ne povas venĝi Milutenon.

Lukao, pro dio! – mi skuiĝis, aŭdinte, kion li parolas. Kia venĝo, dio pardonu min, tio ja estas ridinda! Al kiu ja venĝi, je dio; Milutenon tien forkondukis niaj samgentanoj, lin ne forkondukis okupantoj, oni ja ne povas pri venĝo paroli.

Lukao tamen parolis pri venĝo, kaj mi, sincere dirante, hontegis, ĉar mi nenion povis proponi al la homoj, en ĉi tia tago, ke ili trinku por la animo de Miluteno.

He, nun neniu potenculo povas fari ion ajn kontraŭ li, jes Jevremo, nun la potenculoj lin ne jukas.

Ne afliktiĝu, Ĵivana – konsolis min Jevremo – nun oni nenion povas malbonfari kontraŭ li.

Kial mi afliktiĝu, verŝajne la sorto tiel decidis, rezonas mi, Miluteno la plej gravan taskon plenumis, li alportis Radojon el Sremo.

Denove klakbruis la pordego. Alvenis ankaŭ Vasilio, kurbiĝinta.

Nun verŝajne ĉio estos laŭmerite – malgaja vere estis Vasilio, nenio restis el lia fama petolemo, mi vidis tion, koron lian frapis la morto de Miluteno, mi jam ekkompatis lin, samaĝuloj ili estis, kune ili laboris, kune militis.

Nun Miluteno ricevos la lokon, kiun li meritis, en diejo, sendube li trafos en paradizon.

Dio permesu, ke li ie kun nia Radojo estu kune, sed pri la paradiza vivloko mi dubegas, mi ne kredas, ke eĉ en la diejo por mia Miluteno ekzistos ripozloko, eĉ tie avantaĝos pli gravaj, samkiel ĝis nun, rezonis mi. Sed Vasilio pluparolis. En diejo forestas trompo, supre oni scias, kia kiu estis, kaj kion kiu meritis, supre ne estas kiel ĉi tie, ĉi tie oni ĉion decidus politike, nun pri Miluteno ni ne plu devas zorgi, nun ni povas nur envii lin. Li parolis, kvazaŭ li jam estas en la diejo. Nun ĉiuj parolas, iuj promesas ĉi tie, aliaj en la diejo, oni promesas, promesadas senfine, senĉese, senhalte.

En ordo, Vasilio, diris Lukao, tio, pri la diejo, sed ankaŭ ni devas fari ion, kio de ni dependas, ni devas revenigi Milutenon sur nian tombejon. Li ne restu en la tombejo de malliberejo. La aŭtoritatoj pekis, verdiktinte, ke Miluteno mortu en la malliberejo, ni ja ne verdiktu al li resti sur la tombejo de malliberejo – ni ne verdiktu al li eternan arestejon.

Mi rigardis ilin, al mi estis agrable, ke ili ĉi tiel maltrankviliĝas pro mia Miluteno, ke ekzistas homoj bonordaj, tiaj, kiaj la homoj estis ĉi tie, en Ŝumadio, tiaj, kiaj la homoj devas esti, sed mi tamen zorgis, meditante, kiel lin de tia malproksimo alporti – tio ne estas same, kiel kiam oni plugas aŭ erpas, oni ja devas porti ĉerkon kaj tombokrucon inter tre multaj homoj, inter homoj, kiuj elirados kaj demandados, kiun ili portas, kie la povrulo mortis, sed kion ili diru – ke li mortis en malliberejo. Sed kial homo, kampulo, mortu en malliberejo? Kiel pruvi, ke li nek ŝtelis nek senvivigis?

Kaj se ili dirus la veron – tio estus eĉ pli malbona. La vero estas, sincerdire, la plej malbona.

Foje mi sidis ĉi tiel, apud fornelo, kaj aŭdis ke tintas pordego. Ankaŭ paŝojn mi aŭdis. Iu frapetis la pordon.

Enen! – vortis mi. La pordo ekmoviĝis, iu demandis: Ho onklino Ĵivana, vi estas viva, ĉu?

Kion fari, viva mi estas – diris mi, sed ne povis lauvoĉe rekoni tiun.

Ĉu vi konas min? – demandis li.

Kaj mi respondis. – Ne, mi ne konas vin. Kaj ne vidas vin! ...

Sed kial vi ne lumigas la ejon, kial vi, jen, sidas en la mallumo?

Nu, tiel – diris mi – verdire mi tute ne deziras lumigi la ejon, en la mallumo mi fartas pli bone kaj pli agrable; kiam estas lume mi vidas ĉion en la domo, mi tiam vidas ĉi tiun grandan malplenen kaj vivomankon en nia domo, sed kiam mallumiĝas, tiam tio malpli rimarkeblas. Krom tio, kiam malheliĝas, mi kvazaŭ ne estus sola. Al mi tiam ŝajnas, kvazaŭ tuj aperos la miaj, Radojo kaj Miluteno, kvazaŭ ili estus ie tie, kvazaŭ ili estus farantaj ion.

Nu, mi flamigis la fornelon, kaj alrigardis – ho, tio estas vi, Nenado!

Jes, tio estas mi, diris li, ho onklino Ĵivana, mi alvenis por vidi kiel vi fartas, kaj iom konversacii kun vi. Li sidiĝas, ĉi tiel, apud mi, sur tripiedon. Kaj li bruligis cigaredon. Agrabla estis tio, tabako ekodoris, homo vizitis mian domon.

Fumis li, kaj afable parolis kun mi. Suspiris la homo, honesta kaj animeca, tiu samaĝulo de mia Radojo. Multe, diris li, multe li afliktiĝas pro oĉjo Miluteno. Multe. Sed ĉio estis vane, ni devis aresti lin.

Kial vi uzas la vorton «ni», ne vi arestis lin, vi ja ne farus tion, kial vi tiel parolas, infano mia?! – li konfuzis min.

Sed li plue parolis, kulpigante sin mem, kvazaŭ ĝuste li arestus Milutenon. Ni devis, diris li, aresti lin, por igi la aliajn timi.

Jen do, sed kial?

Tio estas simpla, por ke ĉiuj vidu, kia li estas. Por havi pli da greno; ĉi tie estis granda manko da nutraĵo – ni ja devis nutri la urbanojn, la soldatojn, ni devis helpi la malsatantojn. Li parolis ĉi tiel, kaj mi vidis, ke li ial hontas, ke io premas lian animon, ke lin venigis ĉi tien ia koŝmaro, tial mi ekkompatis lin, juna li ja estas ankoraŭ, krom tio, li kamaradis kun nia Radojo.

Bone, infano mia, ne maltrankvilu ja pro tio, pasos ankaŭ tio, Milutenon oni ja forgesos, kvazaŭ nenio okazis, kvazaŭ li neniam ekzistis; vi, kara mia, vian junan animon ne venenu, ne ŝargu, dio vin pardonu; Miluteno estis maljuna homo – nu, mi parolis tiel, mi ja ĝojis ke li venis, ke Milutenon tamen iu kompatas, almenaŭ ĉi tiel, kvarokule, veninta kaj sidiĝinta apud fajro, vespere, senlume.

CIP – Каталогизација у публикацији
Народна библиотека Србије, Београд

821.163.41-31

POPOVIĆ, Danko, 1928–2009

Libro pri Miluteno / Danko Popoviĉo ; [tradukis Jovano
Zarkoviĉo, Ĵivanko Novakovo]. – Beogrado : Удружење
научних и стручних преводаца Србије, 2024
([Београд] : Службени гласник). – 129 str. ; 24 cm. –
(Serio de serba literaturo)

Prevod dela: Књига о Милутину / Данко Поповић. –
Tiraž 50. – Str. 5–7: Antaŭparolo / Zlatoje Martinov.

ISBN 978-86-917873-5-6

COBISS.SR-ID 154807817



Удружење научних и стручних преводилаца Србије
Репрезентативно удружење у култури

www.prevodi.rs

ISBN 978-86-917873-5-6



9 788691 787356